

Mór Jókai

Turkamondo en Hungarujo

Romano



2023

Mór Jókai

Turkamondo en Hungarujo

2023

Mór Jókai

Turkamondo en Hungarujo

Romano

Esperantigita de László Pásztor
Klarigoj aldonitaj de Adrienne Pásztor
Lingve lektoris Robert Moerbeek
Redaktis kaj la bildojn aldonis László Drótos

*

Frontospica bildo de: La turka Pešt kaj Buda.
Kuprogravuraĵo de Houfnagel György el 1617, el:
<https://dka.oszk.hu/html/kepoldal/index.phtml?id=25918>

*

La originala titolo de la romano estas: Törökvilág Magyarországon
Eldonita en la hungara de: Szépirodalmi Könyvkiadó Budapest, 1989.

*

Ĉiuj rajtoj rezervitaj ĉe Pásztor Lászlóné

Elektronike eldonita de: <https://mek.oszk.hu/24800/24800/>

ISBN: 978-615-01-8428-9

ENHAVTABELO

	paĝnumero
Antaŭparolo	5
1. Miraklo de Dio.....	7
2. La ora kaftano.....	15
3. Tri virgulinoj	19
4. Tri viroj.....	25
5. Landaj zorgoj.....	29
6. La tago de Nagyvárad	34
7. La monaĥo de Szentkút.....	46
8. La ektimiĝo de Nagyenyed	53
9. Damofoiro	56
10. La Amazondandaro	62
11. La insulo Margareta.....	65
12. Unu stelo en la infero.....	69
13. Szentgotthárd	74
14. La persekutata virino	84
15. Bejo Olaj.....	91
16. Defendo de virinoj.....	95
17. Lukto por sia kapo	100
18. Kontrastoj	108
19. Eraroj de la amo	112
20. Ludo kun iu blinda homo.....	119
21. La antaŭmorta nokto.....	121
22. La viktimo	131
23. Variaj tempoj, variaj homoj	134
24. La dívano.....	139
25. La turka morto	146
26. La garantiulo	152
27. La viro.....	155
28. Velkado de floro.....	159
29. La glavo de Dio.....	162
30. La frenezulo.....	168
31. Utilaj trompiĝoj.....	172
32. Iu viro, kiun sia gardanta anĝelo forlasis.....	177
33. La denove eltirita glavo.....	180
34. La lasta tago	184

Antaŭparolo

Mi plenumas mian devigon pri mia legantaro, kiam en mia nuna verko mi prezentas la bildojn de la sama tempoperiodo, laŭ kiu mi verkis la romanon „*Orepoko de Transilvanio*”¹. Mi ne volas serĉigi artan kunligon inter la du romanoj. Se tiu estus, tiu estus *eraro* de ambaŭ. Nur *la plej gravaj ideoj de la epoko* estas komunaj, kiujn mi volis karakterizi. Povas esti, se ĉi tiuj temoj ne estas interesaj, sed ili estas instruaj ekzemploj. Povas esti, ke ĉi tiu epoko ne estas tro glora, sed ĝi havas virtojn kaj saĝojn. Povas esti, se mi elektintus pli belan tempoperiodon de la historio de Hungarujo, la belaj historioj kompletigintus mian malfortan karakterdesegnon, sed iun nacion karakterizas ne la feliĉo, sed la malfeliĉo. Kvankam ne estas duondioj la figuroj, ili tamen estas homoj.

Tiutempe Transilvanio² estis memstara eŭropa imperio, kiu havis registaron, leĝojn, regantan religion kaj regnestran kortegon, kie la delegitoj de Aŭstrio, Francio, Pollando kaj Turkio konstante restadis.

Ĉe la montpasejo „Király”³ kaj trans la fortikaĵo de Székelyhid⁴ jam estis malbenita, malica mondo, kie la turka paŝao regas kaj ordonas al la setlejoj. Tie sur la fortikaĵpintoj brilas la turka duonluno. La persekutata religio kaj burĝolibereco tenas bona rifuĝejo la regadon de la turka duonluno; la hungaro helpas al sia malamiko neniigi sin mem. Dum bataloj estis ĉie en Transilvanio estis trankvilo. Ilia armilo estas timiga se ĝi estas eltirita el sia ingo, sed ĝi estas senkulpa, se oni elbatis ĝin el la mano. Ĉi tiu afero karakterizas ĉi tiun historion kaj ĉiu figuro okupiĝas pri tiu ĉi. La pacema regnestro prefere estintus meditanta sciulo, ol batalanta militestro. La kavalirstatura hungarlanda novalveninto, kiu atingis altan rangon, estis ŝatanto de la virinoj, idolo de la viroj kaj ludilo de la sorto. La bonanima konsilanto, lasta defendanto de paco de Transilvanio, kiu ne komencis batali, kiam oni regalis lin per regnestra felĉapo kaj kateno, tamen oferis: sian vivon kaj sian familion por realigi iun ideon. La juna fremdulo, kiu reveme sentas sin altirata al la hungaroj, sciis, ke li estas familiano tie, kien li atingis kiel malamiko. Tiu sekreta konsento, kiun havis la plej bela damo de ambaŭ patrujoj, estas kaj ĝoja kaj malĝoja, kiu senĉese kunligas la okazintaĵojn kaj figurojn de la epoko de Buda⁵ ĝis Gyulafehérvár⁶ kaj tiuj figuroj estas samgrade konataj kaj fremdaj. Kaj kiu videblas super ĉiuj ĉi, tiu estas la konsilanto, la unua ministro de Transilvanio. Tiu en pacaj tempoj estas ambicia, sed en la malfeliĉo estas saĝa kaj dum la triumfo estas antaŭvidema kaj superruzas la cerbon de siaj amikoj kaj malamikoj. Kaj antaŭ ol li mortfalis, li rekonsciiĝis kaj novajn planojn faris. Mi ne volis beligi erarojn de la familio, sed ne volis diri nur la rezultojn. Mi klopodis karakterizi lin kiel homon. Kelkaj vortoj sufiĉas por karakterizi la epokon, kiujn diris

¹ Transilvanio kiel landonomo signifas: lando trans la arbaro.

² Pri Transilvanio vi povas legi en la vikipedia artikolo:

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Transilvanio>

³ Pri la montpasejo „Király” vi povas legi en la vikipedia artikolo:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Pasul_Craiului

⁴ Pri Székelyhid vi povas legi en la vikipedia artikolo:

<https://eo.wikipedia.org/wiki/S%C4%83cueni>

⁵ La setlejo nomita Buda estas parto de la hungara ĉefurbo. Pri ĝi ĉe:

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Budape%C5%9Dto>

⁶ Pri la setlejo Gyulafehérvár bonvolu vidi la vikipedian artikolon:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Alba_Iulia

Johanon Bethlen,⁷ ne por ĝia ekskuzo sed por ekkompreni ĝin: „Ankaŭ ni sciis kiujn ni *devus* fari, sed ni faris *kiujn eblis*.”

Miaj estimataj gelegantoj! Ĉi tiun frazon bonvolu apliki ankaŭ pri la mankoj de mia romano.

La 12-an de novembro en 1852, Peŝto.

Mór Jókai⁸

⁷ Pri Johano Bethlen vi povas legi en la wikipedia artikolo:
https://eo.wikipedia.org/wiki/J%C3%A1nos_Bethlen

⁸ Mór Jókai estas la verkista nomo de Maŭrico Jókai. Pri li vi povas legi ĉe:
https://eo.wikipedia.org/wiki/M%C3%B3r_J%C3%B3kai

1. Miraklo de Dio

Estis bela serena somera nokto, la novluno jam subiris de la ĉielo, sur ĝi ne videblis nuboj, nur multmiloj da steloj brilis.

Ĉie estis silento, vento ne movis la arbojn, la monto kaj valo ripozis, nur kelkfoje aŭdiĝis en la malproksimo iu nekonata voĉo kaj la nokto de tempo al tempo ŝajnis pli hela. Sed ĝi daŭris nur kelkmomentojn. Kvazaŭ la dormanta naturo parolus sonĝante, kvazaŭ la tutfermit-okula nokto por momentoj malfemintus la okulharojn.

Ankaŭ en Kolozsvár⁹ dolĉe oni dormetis. En la valo ripozis la ŝindajn tegmentojn havantaj domoj kaj eĉ ne unu lampolumo perfidis en tiuj la vivon. Nome la regnestro severe ordonis, ke la gardistoj ne kriadu antaŭ lia palaco. La gardistoj plenumis la ordonon tiome ke ili ne kriis la horojn en la tuta urbo. La kaŭzo de la malpermeso estis, ke la regnestro pasigis la noktajn horojn sur la balkono de turo de la palaco, rigardante la stelojn. Ekde kio pasintvintre unue videblis en Transilvanio la norda lumo, kiun tiutempe eĉ ne la famaj natursciencistoj vidis kaj ne konis, Apafi¹⁰ ekinteresiĝis pri nenio alia, nur pri la astronomio. Li esploris la astronomion science, neglektante la modajn superstiĉojn de la astrologoj. Li pasigis tutan nokton sur la balkono de la turo apud siaj kelkaj intimuloj, kiam estis serena vetero kaj videblis la steloj. Tie estis sinjoro Johano Biró, kortega amuzanto, la grandestimata sciencista profesoro Johano Paŝŝai kaj la pastora moŝto Ladislao Magyari¹¹, kortega pastro. Kelkfoje aperis tie ankaŭ Anna Bornemissza,¹² sed okaze de tio Apafi ne la stelojn rigardis, sed la okulojn de sia edzino. Tiunokte sinjoro Magyari sidis apud Apafi siajn manojn metante sur sian ventron kaj pro la entuziasmo jam dormis. Pro tio la regnestro povis vidi multe da steloj. Kaj Apafi prenante iun teleskopon, rigardis atenteme la planedojn, kiuj kuradas. Li forte atentis tiujn kaj pro la palpebrumadoj liaj okuloj komencis dolori. Sed la enigmaj eklumadoj konsternis lin.

– Kion povas signifi tio? – Apafi demandis kaj sin mem kaj sinjoron Magyari, sed la lasta respondis iom ronkante. Apafi kolere skuis la dormetantan sinjoron kaj diris al tiu:

– Do, ne dormu, via ekscelenco!

Magyari volis diri, ke li jam ne dormas kaj diris, ke estis bone vekiĝi, ĉar li sonĝis, kvazaŭ li predikus, sed ne sciis la tekston.

- Ĉesigu la sonĝon kaj rigardu la ĉielon. Kion vi vidas?
- Mi vidas multe da belaj steloj.
- Ĉu vi ne vidas, ke la sennuba pura ĉielo kelkfoje fulmas?
- Sed jes, mi vidas tion.
- Kio estas la kaŭzo de tiu fenomeno?

⁹ Pri la setlejo Kolozsvár bv. vidi la vikipedian artikolon:
<https://eo.wikipedia.org/wiki/Klu%C4%B5o>

¹⁰ Pri la reganto de Transilvanio, Miĥaelo (Mihály) Apafi 1-a, vi povas legi ĉe:
https://eo.wikipedia.org/wiki/Apafi_la_1-a

¹¹ La originala hungara virnomo estas: László Magyari, la nomon bonvolu prononci: laslo madjari.

¹² La virina nomo eldirendas anna bornemissa.

– Mia moŝta sinjoro – diris la pastro trankvilante – mi estimas la volon de Dio kaj ne volas tion konsideri, kio venas el la lando de Dio, tio estas ĝusta afero, kaj tiu estas stultulo, kiu volas atingi la senfinon. Mi akceptas, se Dio fulmojn sendas al la Tero, kaj ne demandas ties kaŭzon.

– Bone estas, mia pastora moŝto – dormu plu – diris Apafi kaj rigardis en la teleskopon, ĝuis la stelan ĉielon kaj vidis, ke la plej brilaj Algol¹³ kaj Denebola¹⁴ similas al iuj polvoj kiel la plej malgranda nebulstelo.

Subite, kvazaŭ tra la ĉielvolbo atakus, forte knarante – krakante kuregis de sudo al nordo iu grandega meteoro kaj ŝajnis flugi ĝuste super Kolozsvár. Tio estis admirinda fajroglobo. Ĝi subiris kiel la subiranta suno malrapide, ĝia lumo rapide malpliigis, sed ĵetante fajrerojn ĝi krakadis bruege. Aŭdante la ĉielan bruegon la homoj kuregis el siaj domoj por gapi al la fenomeno kaj aŭdiĝis el la valaĥiaj setlejoj la voĉoj de la sonorilejoj anoncantaj la danĝeron.

La fajroglobo simila al la plenlumo, unue ruĝiĝis, poste iĝis blua, sed konstante ŝanĝis sian koloron, ĵetadis fajrerojn, krakis, poste ekiris al la Tero.

– Jesuo, helpu! – ĉiuj kriis sur la stratoj timante, ke tiu falos sur iun domon. Subite la meteoro fulmante, tondrante disfalis, la ĉielo kaj la nokto denove iĝis malhela.

La kolozsvar-anoj kredis, ĉe ili disfalis la fajroglobo, sed ankaŭ en Braŝo¹⁵ ĉiuj vidis, kiel same ankaŭ en Szentmiklós¹⁶, kie ĝi dispecetiĝis kaj ĝia unu peco falis sur la domon de sinjorino *Miĥaelo Sándor*¹⁷. Ŝi verŝis sur ĝian pecon tinon da akvo kaj prenis per la antaŭtuko, sed tiu deĉiela ŝtonaĵo trabruligis ĝin, ja tiu estis tro varmega ankaŭ post tri tagoj. Dum kelkaj tagoj ĉi tiu estis babilada temo en Transilvanio, kvankam tiun fenomenon ĉiuj homoj vidis kaj spertis. La famo de la fenomeno tre rapide disvastiĝis, eblus verki tutan kronikon pri la evento: „Unue ĝi iĝis fajra homo, kiu rajdis sur dinosaŭro kaj stelojn vomis. Sed ĝia famo ĉiam pli kaj pli longe disvastiĝis kaj ankaŭ la sciencisto Johano¹⁸ Bethlen enskribis ĝin en la taglibron, laŭ kio du ĉielaj fajraj malamikaroj batalis unu kontraŭ alia luktante per glavegoj, dum kio aŭdeblis sonoj de tamburoj kaj tri pafoj de kanono kaj poste estis terura batalbruo kaj kriego de homoj. La homoj ĝemis vidante, ke la ĉielaj batalantoj foriris al Braŝo kaj finiĝis la batalo post unu pafo de kanono kaj la meteoro falis sur la domon de sinjoro Miĥaelo Sándor. Unue ĝi bruligis la manon de la dommastrino volonta kapti ĝin per antaŭtuko. Pli malfrue ĝi estis disrumpita, la pecojn oni disdonis al la loĝantoj de la urbo. Kelkajn pecojn ricevis ankaŭ la arkivejo de la majesta regnestro. Ĝiaodoro ne estis agrabla.”

Iutage dum semajna foiro okazis en Kolozsvár ke la pastora moŝto Ladislao Magyar sidis en la agrabla vinberlaŭbo de lia domo, kie pli ol tricent maturiĝintaj grapoloj da vinberoj pendis. Apud li sidis la estiminda sinjoro Cyprián Dragoŝ¹⁹, la loka popo. Ili estis en reciproka interkonsento. Sinjoro Magyar multfoje gastigis lin, kiu jam ege kroĉiĝis al la familio de sia bonhumora kolego.

¹³ Algol estas ŝanĝiĝema stelo: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Algol>

¹⁴ La Denebola estas la dua plej brila stelo laŭnome Beta Leonis en la Leono stelaro: <https://gobertpartners.com/what-is-the-radius-of-denebola>

¹⁵ Pri Braŝo vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Bra%C8%99ov>

¹⁶ Szentmiklós (sentmikloŝ) estas jam detruiginta urboparto de Torda, en la nun rumania departemento Koloĵ.

¹⁷ La familian nomon Sándor, bonvolu prononci: ŝandor.

¹⁸ La hungara nomoriginalo estas: János (janoŝ)

¹⁹ La virnomon bonvolu elparoli ciprian.

Tiutempe Csetnek²⁰ kaj Kóspallag²¹ ne estis mondfamaj lokoj kaj la pipfumado estis konata nur de la parlamentaj malpermesoj. La hungaro priridis la frenezan turkon, ĉar tiu nur pipfumas, sed vinon ne drinkas. Pro tiuj la du pastroj ne kapablis utiligi la tempon aliamaniere, do ili havis tempon abunde por paroladi pri aferoj de la mondo. Ĉar la vinberlaŭbo estis antaŭ la domo de Magyari, ili povis rigardi la piedirantojn, salutis unu la alian kaj provis diveni, al kiu konfesus apartenas ili. Se iu venis silente sur la strato, tiam tiu ne rigardis la du pastrojn, nur balbutis ion kiel „estu laŭdata” levante la ĉapon, sed ne rigardante ilin. Tiu estis papisto.

Venis alia sinjoro, kiu jam de malproksimo rigardis ambaŭ pastrojn. Jam tiu preteriris ilin, sed ne salutis ilin: tiu estis unitariano.

Poste venis denove iu, kiu demetis la ĉapon kaj dankeme proksimiĝis al ili. Tiu estis valaĥo. Tiu iris al ili por kisi la manojn kaj ili vane protestis. La valaĥo ne foriris ĝis li kisis la manojn. de la estimindaj pastroj.

Fine iu venis, kiu sian ĉapon levante al sinjoro Magyari salutis kriante: „Mi deziras al vi bonan tagon, sinjoro Magyari!” Ĉar tiu diris pli laŭte „al vi, sinjoro Magyari!”, pro tio ne estis dubo, ke tiu estas kalvinano. Pro tio ambaŭ sinjoroj ridis multe.

- Viaj kreduloj estas pli malpli multe toleremaj, ol la miaj – rimarkis la popo.
- Ilia kolo estas kulpa.

Poste venis vendistinoj portintaj al la pastro ĉiajn aĵojn tiom bonkore, ke ili ne kuraĝis ne akcepti la donacon, ĉar tiuj dirus, ke ili estas tro fieregaj.

Post ili venis iu sinjorino kunportanta du ujojn:

- Mi portis al mia grandestimata sinjoro prunmarmeladon. Mi volonte portus pli multe, sed ne estas pli multe. Ankaŭ ĉi tiu ne elĉerpiĝos dum tri jaroj.
- Mia edzino estas en la domo. Donu al ŝi – respondis la donacito.

La sinjorino revenante el la domo diras:

- Mia grandestimata sinjoro, bone estus petpetegi por iomete da pluvo. Kvankam la semaĵo en la prisemita agro sekiĝis, sed la maizo kaj fazeolo ankoraŭ povas tamen reviviĝi.

- Nu, sekvontdimanĉe ni petpetegos por la pluvo.

Poste venis alia sinjorino kunportata sur ĉarumo ujon da ĉelara mielo.

- Mi portis al mia grandestimata sinjoro iomete da dolĉaĵoj.

Ŝi portis tiun en la domon al la dommastrino kaj revenante haltis antaŭ la pastro:

- Ho, ve, mia dolĉa grandestimata sinjoro, mi iros malproksimen, mi portos mielon al Krakovo, sed timas la pluvon. Pro tio bonvolu petpetegi ke estu bona vetero.

Ladislao²² Magyari ne lasis sin ĝeni.

- Mia kara animo, mi ne povas fari sekvontdimanĉe, ĉar tiam mi devas petpetegi por pluvo, sed post unu semajno mi volonte petpetegos por bona vetero.

Denove venis alia sinjorino.

- Mia edzo salutas vin kaj sendas ĉi tiujn spronojn – kaj ŝi elprenis el la pakaĵo la spronojn.

- Ĉu al mi?

²⁰ Csetnek estas vilaĝo en la nuna Slovakio, la nomo eldirendas: ĉetnek:
<https://eo.wikipedia.org/wiki/%C5%A0%C3%ADtnik>

²¹ Kóspallag estas hungara vilaĝo, pri kio vi povas legi ĉe:
<https://eo.wikipedia.org/wiki/K%C3%B3spallag>

²² La hungara nomoriginalo estas László (laslo).

Kvankam tiujn faris mia edzo por sinjoro Stefano Apor²³, ja mia edzo estas oraĵisto. Sed sinjoro Apor volis pagi pli malmulte da mono, ol la antaŭan prezon. Mia edzo ne donis por malmulte da mono kaj diris, ke li prefere donacos al la pastoro.

– Sed por mi ne estas bezonataj tiuj spronoj. Vi scias, ke mi ne povas porti spronojn.

– Nu, ne gravas; sed tiujn mi ne reportos. Vi havas filinon kaj se ŝi edziniĝos kaj naskos filon, tiam li povos porti tiujn.

La pastro ridis kaj liaj larmoj fluis. Sed poste ĉesigante la ridon li rimarkis, ke tiu sinjorino emas plori.

– Kial vi emas plori, sinjorino Mátyus?

– Ja por mia edzo mi devus petpetegi al Dio por kuraci lin.

– Sed mi tiel scias, ke li jam ne estas malsana.

– Vere ne, sed mi timas, ke li denove estos malsana. Nome nokte okazis miraklo, ĉar en la fiŝlago la fiŝoj batalis kaj la mortintajn fiŝojn elĵetadis sur la bordon.

– Tio estas mensogo!! Kiu diris tion, tiu estas freneza!

– Majstro Szénási²⁴ diris tion.

– Nu, ja, mi riproĉos lin, ĉar li disvastigas tiujn fifamojn!

– Sed ankaŭ la ĝardenistoj diris tion.

– Jes. Ĉar ili per harpuno ĉasis la fiŝojn kaj ne volis, ke ankaŭ aliaj eksciu la ŝteladon pro tio li kriis miraklon. Diru al la magistro Szénási, ke li ne renkontiĝu kun mi, ĉar...

La sinjorino ŝtele foriris kaj post nelonge venis la alia. Tiu sekretadante iris al la pastoro kaj oni povis pensi, ke ŝi volas diri teruran aferon.

– Kio estas la malbono, sinjorino Kálóczy?

– Nun teruraj aferoj okazis. Pasintnokte mi venis hejmen el mia draŝejo kaj elektinte la pli mallongan vojon mi iris al la kapelo. Survoje mi renkontiĝis kun miaj konatuloj kiuj diris ne iri plu, ĉar estas danĝere. Kio okazis? Mi ne sciis. Sed subite mi aŭdis kantadon kaj sonon de orgeno. Mia sankta bona Dio! Kio ĝi estas? Miaj konatuloj balbutante diris, ke ili vidis la mortintojn veni el la tombejo, kaj iri en la kapelon kaj tie ili nun kantas. Mi ektimis, sed ne forkuris de tie. Kial? Mi ne scias. Finfine la kanto kaj sono de orgeno ĉesis, malfermiĝis la pordo de la kapelo kaj la fantomoj elvenis el la kapelo portante blankan mortotukon kaj facilmove malaperis inter la tomboj. Ni ne kapablis paroli pro la teruro.

– Ĉu vi sonĝis ĉi tion?

– Mi vidis ilin, kiel nun vin. Hodiaŭ mi parolis kun Szénási kaj ankaŭ li atestis tion.

Kial estas temo pri Szénási?

– Ĉu mi tion ankoraŭ ne diris? Do, mi diras. Ni staris ektimate antaŭ la kapelo, timante, ke la lasta fantomo venonte el la kapelo volos ekkapti nin. Kaj jen, el la kapelo kiel lasta elpaŝis la magistro, portante tavolan mantelon kaj triangulan ĉapelon. Ni ne volis vidi lin, sed li venis al ni dezirante bonan vesperon kaj rakontis, ke la fantomoj dum la kvara nokto vekis lin kaj li devis iri kun ili en la kapelon por orgeni kaj ili kantis. Poste iu fantomo iris sur la predikseĝon por oratori, sed li ne komprenis la vortojn. Li nur vidis la movon de la buŝo. Li diris, ke tio estas omeno. Tamen tion ni diru al neniu, nur al vi, mia estiminda sinjoro. Sed la urbo jam scias tion. Kion mi faru nun?

²³ La virnomo havas la hungaran nomoriginalon István Apor.

²⁴ La nomon Szénási bonvolu elparoli: senaŝi.

– Iru hejmen, faru vian laboron. Mi certigas vin, ke de nun la fantomoj ne iros en la kapelon kaj ne venĝos kontraŭ vi.

La sinjorino dankadante foriris. Ambaŭ pastroj silente meditis. Subite sinjoro Magyari sen antaŭaĵoj eksaltis kaj kriis: „Mensogo!” kaj per pugno batis en la aeron kaj certe li batus tiun, kiu starus antaŭ li.

La popo silentigis lin.

– Ne ekscitigu vin, estiminda kolego, ja la diablon ne eblas mortbati per pugno, ĉar kie estas superhomaj estaĵoj, tie la homo estas malforta.

– Kial tiuj estus superhomaj estaĵoj? Tiuj estas simplaj homoj, kiujn la fanatiko portis en landon de la mirakloj.

– Ĉu eblas, ke vi neas la potencon de Dio manifesti sin per la mirakloj kaj fenomenoj?

– Duspecaj mirakloj estas: miraklo de Dio kaj miraklo de diablo. Sed mi konas ankaŭ la trian miraklon. Tion petolantaj homoj kultivas por frenezigi la homojn.

– Kial ili frenezigus la homojn?

– Pro multe da kaŭzoj okazus. Ĉu vi ne memoras la pasintjaron, kiam oni komencis bruligadi en Transilvanio? Ĉiunokte ie ruĝiĝis la ĉielo. Ne estis setlejo en la lando, kie ĉi tiu plago ne okazus. Oni ekkaptis kelkajn bruligadantojn, kiuj konfesis, ke ilia celo estis, ke la homoj ne havu ŝaton militi. Ĉu la celoj de la mirakloj estis kontraŭaj? Ĉu iuj bruligadas la domojn, aliaj la animojn de la homoj? El inter du disputantoj la tria homo havas pravon.

– Do, vi klarigas la miraklojn el partiointereso.

– Ĉu ĉiuj ne reiras tien? Se la rivero Maroŝ²⁵ inundas, superakvas la landon, sekvatage ĉiuj parolas pri tio: sango inundos nin! Se la akridoj aperas, en la lando ĉiuj diras, ke tiome grandnombra armita popolo preparas sin kontraŭ ni, kioman homo vidis neniam. La papilioj faras sangajn makulojn sur la folioj de la plantoj, kiuj laŭ tiuj misfamigantoj estas sanga ŝvito de la naturo. Aperas iu kometo kaj la homoj diras, ke tio estas brulanta glavo, kiu ĉesigas multe da vivo. Kiu komencis disvastigi la famojn? Neniu scias tion. Sed pro tio la homoj estos furiozaj kaj forlasos la metiejojn kaj instruos uzi la glavojn. Metiistoj, lernantoj iros batali kaj por tiuj estas utila la furioza etoso. Mi diras al vi, ke la miraklojn kaŭzas la altrangaj homoj, sed ne Dio.

Dum parolado de la estimindaj pastroj en la vendoplaco io okazis. Sur iu loko multe da homoj faris tumulton.

– Rigardu nur! – diris la popo – Tie io okazas.

– Povas esti, ke tiuj estas la hundon dancigantoj, aŭ iu turko vendas iun junigan balzamon.

Sed nun alvenas kriante el la homamaso iu dikstatura, grandan ventron havanta viro kaj mansignas al la du pastroj:

– Venu, miaj altestimataj sinjoroj, rapide!

Magyari rekonis la eklezianon kaj ne komprenis la kaŭzon de la vokado. Pro tio li atendis, ke la ekleziano venu pli proksimen.

– Kio estas via malbono? Kial vi estas indignanta?

– Kial vi ne venas, estiminda sinjoro? Mi pro tio vokas vin, ĉar en la foirplaco estas iu demono.

– Povas esti, ke tie estas ege multe da demonoj.

²⁵ Pri la rivero Maroŝ vi povas legi ĉe: [https://eo.wikipedia.org/wiki/Mure%C8%99_\(rivero\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Mure%C8%99_(rivero))

– Sed tiu estas vera demono, en kiun iris la diablo, kiu manĝas teron, ŝaŭmiĝas, profetaĵon diras al la homoj. La magistro Szénási nun iris al tiu, sed ne kapablas silentigi lin. Spite de tio tiu estas furioza kaj diras, ke el inter la sep fortikaĵoj de Transilvanio nur du ekrestis kaj la steloj defalis, nur la duonluno pliiĝas kaj estos sama kiel la plenluno.

– Sed nun jam sufiĉas! – kriis la pastoro indignante. – mia sinjoro ekleziano, iru en mian ĉambron kaj portu mian kanan bastoneton. Sinjoro kolego, restu ĉi tie.

Kaj li iris inter la homojn, kiuj rekonis lin. La homoj lasis lin iri tien, kie la demono estis. Sur iu podio, kiu estis ĉirkaŭbarita de ĉenoj, staris iu kurbdorsa viro kaj iu bubo. La antaŭa staris sube de la podio, la lasta kuŝis supre sur la podio kaŭriĝinte. La antaŭa estis la demono kaj la bubo estis magistro Szénási, kiu estis Proteus Transsilvanicus, kiun prezentos al ni la atestiminda sinjoro Magyar.

Magyar staris meze de la podio kaj siajn manojn metinte malantaŭen demandis la magistron:

– Kion vi faras ĉi tie, diboĉa Proteus Transsilvanicus?

Tiu metis la manojn sur sian bruston, rigardis la ĉielon senkulpe. Kiu ne konis tiun, tiu kompatus. Tiu humile, tremetante respondis:

– Kial vi nomas min diboĉa Proteus Transsilvanicus, ja mia nomo estas magistro Szénási?

– Kia magistro vi estas? – iĝis la pastro furioza. – Vi estas majstro de diabloj, orgenisto de infero kaj pedelo de Belzebubo. Vi estis kuirhelpisto en Nagyvárad²⁶, sed forfuĝis kun iu riĉa juda knabino, ĉar vi volis esti ĝin via edzino, do vi iĝis judo. Vi iris ŝtele al Turkio, tie vendis vian edzinon al paŝao de Tesalio kaj iĝis islamkreda. Sed de tie vi forfuĝis kaj iris en Beogradon, kie vi iĝis fuŝa buĉisto. Fine vi venis al Transilvanio kaj iĝis unitariano kolektinta monon por la templo de Szamosújvár²⁷. Kio vi estas nun? Vi estas senhejmulo, kiu loĝas nenie kaj ekzistas ĉie. Vi estas ĉies servanto, kiu portas la onidirojn de Hencida²⁸ ĝis Boncida, de Paŭlo Béli²⁹ ĝis Miĥaelo Teleki kaj reen. Vi faras kolerojn inter la familioj, ribeligas la homojn kaj vi estas Erinio³⁰ de religiaj sektoj. Vi estas bona, malbona, orgojla, humila, pia, masakranto, flataĉulo, en la bazaroj demagogo, en la tempo de paco heroo kaj en milito pilgrimo. Kaj vi estas kapabla ŝanĝi vian aspekton, ĉar hodiaŭ vi montras malsanan maldikan vizaĝon, sed morgaŭ jam havos dikan vizaĝon. Sed nun vi iras per lambastono, sed morgaŭ vi rajdos elegante. Sed nun respondu al mi kaj al ĉi tiuj homoj: kiu donis al vi la rajton elvoki mortintojn kaj malbonajn animojn? De kiu vi iĝis profeto de la tempoj?

La magistro levis la manojn al la ĉielo kaj ĝemetis:

– Ho, ve, mia Sinjoro! Mia sur rokon konstruita fortikaĵo! Vidu, ke mia malamiko volas ekkapti min. Miaj persekutantoj kiel fortaj taŭroj ĉirkaŭprenas min kaj fajron blovas sur min. Miaj piedoj estas kunligitaj kaj similas al la mortintoj, kiujn la malsataj bestioj elfosis el iliaj tomboj. Ho, ve, mia Sinjoro, kiu estas lumo en la malhelo, ĉesigu

²⁶ Pri Nagyvárad, vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Oradea>

²⁷ Pri Szamosújvár bonvole legi plu: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Gherla>

²⁸ De Hencida ĝis Boncida ... estas onidiro pro ilia granda distanco unu de alia, ja Hencida estas hungara setlejo, Boncida estas en Rumanio.

²⁹ Pri tiu nobelo bonvolu legi la vikipedian artikolon: https://eo.wikipedia.org/wiki/Pa%C5%ADlo_B%C3%A9li

³⁰ Pri Erinio vi povas legi en la vikipedia artikolo: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Erinio>

la mallumon de la cerbo de mia malamiko. Paroligu la mutulojn, la surduloj estu kapablaj aŭdi kaj la fieruloj timu, demandante: kiu estas via mastro?

La magistro finante sian bombastan parolon ekstaris kaj rigardante la homamason dum singultadoj stertore diris:

– Ho, ve! Popolo de Assur³¹ kaj Edomo³²! Alvenos la terura tago de Dio kaj ĉeso de lumoj de la ĉielo! Tiuj mortos, kiuj ne preparis sin por atendi la tagon de Dio. Sed kiuj ne mortis, tiuj iros ĝis gorĝo en la sango de la mortfalintaj homoj. Kaj kiuj forkuras, tiuj estos similaj al la karno-ŝira birdo. Filinoj de Moáb³³, ploru, portu sakovestaĵon, ĉar la veado aŭdeblos de monto al monto kaj la sango de la beboj fluos, ĉar oni batadis ilin al la rokoj. Antaŭpreparu viajn lancojn, arkojn, ĉar alvenos la tago de la timego.

– Do, lancoj kaj arkoj estas antaŭpreparitaj – diris Magyari – kaj iris al la demono, kiu timige rigardis la popolamason. – ĉu vi, pia profeto ne scias, ke nun jam oni ne pafadas per arko, sed nur per pafilo?

Tiu komika diro de Magyari kaŭzis ridon de la kuraĝaj homoj, sed la demono volis ĉesigi la ridon kaj kriis al Magyari kaj dume Szénási minacadis parolante per fantomaj voĉoj.

– Vi havos malbonon, ĉefpastro de Akháb³⁴, heredanto de Hámán, filo de Belialo³⁵, la orgojla Áhitófel!³⁶

Pro la misprofeta aŭgurado, sinjoro Magyari jam plu ne toleris la ofendon. Li saltis al la demono kaj donis al tiu du vangofrapojn, pro kiuj tiu preskaŭ terenfalas. Poste li ekkaptis la hararon de la demono, levis tiun kaj ekskuis forte. Poste li diris:

– Kies filo mi estas? – li kriegis.

– Ho, ve! Vi estas la atestiminda sinjoro! – kriegis la demono kaj volis liberiĝi de la pastoro.

– Kio vi estas? – kriis Magyari.

– Mi estas neniulo, nur hejtisto de la magistro. Ne tiru mian hararon, mia sinjoro.

Magyari ne tiris plu la hararon de la demono kaj la demono forkuris dum la homoj ridante batis tiun. Magyari turnis sin al la magistro. Ankaŭ tiu forkurintus, sed la pastoro kaptis lin kaj ĉar la ekleziano portis la kanobastoneton, Magyari ekinstruis al la magistro la moron per la kanobastoneto. Li diris al tiu belan instruon:

– Vi estas Dion primokanta, multe da kredoj havanta, el judo iĝinta muzulmano. Eksciu, ke mi ekkonas la diablojn, ĉefe tiujn, kiuj similas al la homoj. Se vi renkontiĝas kun viaj kunuloj, tiam diru al ili, ke mi ricevis de Dio unu diablon forpelantan ilon (kaj li levis la kanobastoneton), per kiu la malbonajn animojn el la homoj mi kapablas forpeli, eĉ el la tuta lando.

Szénási jam estis tre deziranta foriri, sed Magyari daŭrigis:

³¹ Pri popolo de Assur, vi povas legi en la vikipedia artikolo:

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Assur_\(Dio\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Assur_(Dio))

³² Pri Edomo bonvolu vidi la vikipedian artikolon: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Edomo>

³³ Pri posteuloj de Moaboj, vi povas legi en la vikipedia artikolo:

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Moabo>

³⁴ Akhab estis reĝo de Israelo: <https://eo.wikipedia.org/wiki/A%C4%A5abo>

³⁵ Pri Belialo: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Belialo>

³⁶ Ahitofel, fama pri sia saĝeco, estis unu konsilisto de reĝo Davido:

<https://hu.wikipedia.org/wiki/Ah%C3%ADt%C3%B3fel>

– Sed mi diras ankoraŭ ion. Se en la fiŝlago de la regnestro la fiŝoj iam batalas, tiam ĉiujn ĝardenistojn, fiŝistojn mi forsendigas el ilia ofico. Diru al la fantomoj, ke ili ne venu el siaj loĝejoj, ĉar mi ege forte draŝos ilin, por ke vi denove ne volu reiri al la fantomoj. Dio sanigu vin! La forsendita renegato kaŝis sin en sian mantelon kaj klopodis malaperi inter la popolamaso. Post la evento sinjoro Ladislao Magyari triumfe reiris al la paroĥejo, sub kies vinberlaŭbo lia kolego sidadis silente ne partoprenante la batalon.



Miĥaelo Apafi 1. (1632-1690), regnestro de Transilvanio. Gravuraĵo. Portreto.
<https://dka.oszk.hu/html/kepoldal/index.phtml?id=46141>

2. La ora kaftano

La Ŝ-familio estis unu el la plej riĉaj kaj famaj familioj de Valaĥio. La intendanto ordonis al dekdu bojaroj kaj en kvindek kvar vilaĝoj kolektis la imposton, ekz. la dismon, ĉiujare po naŭ monatojn loĝis en Istambulo kaj prenis la piedingojn de la sultano, kiam li volis eksidi sur ĉevalon. Dum milito li aliĝis al brigado de paŝao de Macedonio kunportante du mil lancojn havantajn soldatojn. Li povis demeti la pantoflojn de la sultano, kiam tiu paŝis en la eksteran kortegon de la serajlo. Apud tiuj avantaĝoj la sorto de la pli juna frato ne estis brila. Li devis esti aŭ pastro aŭ komercisto, aŭ devis fari bonan geedziĝon, ĉar la prestiĝo de la familio ne povis lasi, ke li estu ĉevalisto.

Komence de la 1600-aj jaroj Georgo Ŝ. estis la unuanaskito de la familio, pri kiu ni havos ne multe da problemoj. Sed ni plie parolos pri Miĥaelo Ŝ. duanaskito, kiun frue sendis la familio al Bukareŝto³⁷ por esti tie pastro. Sed la junulo ne estis saĝa kaj en la sciencoj ne atingis progreson. Li jam preskaŭ kadukiĝis en la lernejo pro la lernado, kiam li edziĝis kaj lia filino iĝis fraŭlino de iu vicdiakono kaj atingis etan setlejon de Valaĥio, kie li iĝis pastro. Li pene vivis multe da jaroj, kulturis la teron kaj manĝis polenton.

En la unua jaro de la geedziĝo naskiĝis lia filineto, sed tiu estis la sola. Li jam kaj lia edzino pacience kolektis ilian havaĵon, dirante, ke post ilia morto la filino havu iomete da havaĵoj. Ili ŝparis unu groŝon el ĉiuj forintoj por aĉeti por la filineto bovinon.

Ĉi tiu bovino estis ilia ĉefa deziro. Se ili havus bovinon, tiam ili estus la plej feliĉaj homoj en la tuta mondo. Ili havus buteron kaj kazeon kaj eblus vendi el ili. La bovidon li vendus al la buĉisto, kiu el la viando redonus kelkajn kilogramojn okaze de la Paskofesto. Unu bovino donas plezuron: matene por trinki, konduki sur la kampon, aŭskulti ĝian sonorilon, vespere hejmenporti tiun, karesadi tiun, kaj la filineto kaj la eta Maria donos al ĝi polenton. Bone estus aĉeti bovinon! Miĥaelo jam plantis arbon, al kiu la bovino (nomota Ĉako) povos froti sian flankon kaj la eta Maria kolektos pecojn de la polento kaj por la bovino kaj por la bovido.

Kaj kiam la groŝoj estis kolektitaj por aĉeti la bovinon, tiam ili ĉiutage demandadis unu la alian: kiakolora estos tiu? Ĉu bruna? Ĉu blanka? Ĉu bunta? Ili divenis jam ĝian nomon. Ili faris apud la domo arbofolian draŝejon por ĝi. Subite okazis, ke iu vagabonda ŝejko mortbatis la en Istambulo loĝantan unuanaskiton de sia familio, lian fraton, ĉar tiu sur la strato tuŝis lian vestaĵon. La malfeliĉa popo iutage ricevis longan leteron el Drinapoly³⁸, en kiu oni komunikis, ke li heredis post la pli aĝa frato ĉiujare sepdek mil ormonerojn kaj li estas posedanto de la familia bieno.

– Ho, ve, kiom ili priploris la bovinon, kiun ili ankoraŭ ne aĉetis!

Sinjoro Miĥaelo kaj lia familio forlasis tiun setlejon kaj surĉare veturis al Bukareŝto (unuafoje li estis sinjoro en sia vivo). Tie li transprenis la dokumentojn de la familio, okupis la grandan bienon, pri kiu li nenion sciis pli frue.

Apud Rumnik³⁹ la familio havis praan loĝejon, en kiun sinjoro Miĥaelo translokiĝis. Tiu praa domo estis kaduka kaj malkomforta. La malnovaj posedantoj loĝis nur ekster la lando kaj nur kelkfoje venis por viziti. Sed ĝi estis palaco por la nuna loĝanto, kiu

³⁷ Pri Bukareŝto bonvolu legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Bukare%C5%9Dto>

³⁸ Drinápoly, alinome Edirne estas turka urbo: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Edirne>

³⁹ Rumnik estas setlejo en Rumanio.

alkutimiĝis al sia lignokabano kaj malbone fartis en la grandegaj ĉambroj. Unu parton de la palaco li lasis esti malplena, ĉar sufiĉis por ili la alia parto.

Li alkutimiĝis al la malfacila laboro kaj kiel milionulo nur polenton manĝis kaj dum festo maiza kaĉo estis la tagmanĝo.

Li frue ellitiĝis kaj kune laboris kun siaj laborantoj kaj se el inter la feljako, kiujn li devintus doni al la bienservistoj, iu feljako ekplaĉis al li, tiam li ne donis tiun al la bienservistoj, sed ties koston donis al la bienservisto. Li portis botojn faritajn el novaj bovidledo. Kaj unu bovidledan ĉapon li portis multajn jarojn. Li havis multekostan ĉevalon, kies kosto estis kvindek taleroj.

Siajn ekonomojn li forsendis, ĉar tiuj iradis en kaleŝo kaj portis bekeŝojn el martespelto kaj sur la bekeŝoj estis delikataj peltoj. Anstataŭ la forsenditaj ekonomoj li dungis bienservistojn, al kiuj li instruis la prirespondadon.

Post la morto de sia edzino sian filinon li sendis al la kantoro de la najbara vilaĝo por lerni la alfabeton, dum du hajdukoj ŝin akompanis defendante ŝin de la hundoj.

Kiam la filineto iĝis plenkreskulino, tiam ŝi povis fari la mastrumadajn laborojn. Kelkfoje venis iu aroganta juna bojaro, kiu dezirus edzinigi ŝin, kaj ŝia patro jam preskaŭ aprobis tion.

Lia monsumo treege forte pliiĝis kaj li pro tio teruriĝis. Eĉ la centonon de sia jara enspezo li kapablis elspezi. Jam li aĉetis multe da bovinoj, porkoj, sed ankaŭ tiuj portis profiton kaj la interezo de la kapitalo konstante plimultiĝis. Li estis malesperiĝinta, se li pensis je tiu granda monsumo, kiun li ne kapablis elspezi, sed li ne volis esti avara.

Li ŝatus esti sinjoro, magnato, sed ne kapablis efektiviĝi tion. Kiam li volis konstrui palacon, tiam li serĉis la pli malmultekostajn eblecojn kaj pagis por ĝi malmulte da mono. Kvankam tio estas fakto, ke ĝi ne iĝis palaco. Kiam li aranĝis gasteakcepton, tiam li invitis la plej malriĉajn bojarojn kaj la bezonatajn vinojn, viandojn, panojn, mellojn li ne devis aĉeti, ĉar tiujn enhavis lia deponejo. Li malesperiĝis, kiam li pensis pri tio, kiel kapablis malŝpari la prauloj siajn enspezojn kaj faris ŝuldojn. Tio restis enigmo por li kaj li cerbumis konstante, kion li faru pri la plimultiĝinta monsumo. Finfine li ekhavis bonan penson. – En la ĝardeno de lia kaduka palaco estis plantita laŭ lia ordono multe da belaj, utilaj plantoj: bazilio, lavendo luipolo, lupolo, krokuso kaj melopepo. Por la ĝardeno estis respondeca unue la ĝardenisto, kiu estis bienservisto. En iu jaro estis en la ĝardeno grandegaj melopepoj, kiuj similis al kvindekklitra barelo. La najbaroj gavis tiujn melopepojn kaj tiu jam menciita aroganta bojaro diris, ke eĉ la turka sultano ne vidis saman melopepon en sia vivo!

Ĉi tio donis ideon al sinjoro Miĥaelo. Li decidis, sendi unu melopepon al la turka sultano kiel donacaĵon. Li elektis la plej belan globan melopepon, kies ŝelo estis samkolora kiel la haŭto de homo. Li faris sur tiun malhelverdajn striojn kaj metis sur tiun turbanforman ĉapon. Li faris etan truon, forigis ĝian internan parton kaj metis en la melopepon verajn ormonerojn. Li metigis la melopepon sur sian plej bonan ĉaron kaj jungigis al la ĉaro ses bovojn, elektis sian plej bonan saĝan bienserviston, klarigis al li, kien, al kiu, kion li diru kaj ekirigis lin al Istambulo al la sultano.

Post tri semajnoj la ĉaro atingis Bizancon. La maljuna bienservisto diris, ke li portas donacaĵon al la sultano. Tiu facile povis iri antaŭ la sultanon, kisis la randon de la mantelo de la sultano kaj demetis la kovrilon de la melopepo kaj metis tiun antaŭ la altranga divano.

La sultano furioziĝis ekvidante la donacaĵon.

– Ĉu mi estas porko, nekredanta hundo, ĉar vi portis al mi melopepon? – diris la sultano kaj tuj ordonis al la bejo forportigi la melopepon, ĵeti tiun al la tero kaj la portanto ricevu sur ties plando cent bastonbatojn, poste senkapigi la sendinton.

La bejo plenumis la ordonon, en la korto ĵetigis alteren la melopepon kaj ne povis sufiĉe miri la elfalantajn ormonerojn dum lia gapado. Sed la malfeliĉa bienservisto tamen ricevis la cent bastonbatojn. La bejo reiris al la sultano kaj anoncis, ke la melopepo estis ĵetita alteren, la cent bastonbatoj estis pagitaj, la silkoŝnureto estis pakita, sed en la melopepo estis multe da ormoneroj.

La sultano iĝis gaja kiel la ridetanta printempa ĉielo kaj la silkoŝnureton li ne forsendigis. Li ordonis doni al la bastonita bienservisto kaj al la sendinta bojaro la plej pompajn kaftanojn kaj transdoni la favoron de la sultano.

La bienservisto estis saĝa. Nome sian kaftanon li vendis en Bukareŝto al iu brokantisto, sed la kaftanon de sinjoro Miĥaelo li hejmenportis, rakontis al li siajn sortoturnojn kaj transdonis al li la leteron de la sultano pri la favoro.

Sinjoro Miĥaelo estis gaja pro la donacaĵo de la sultano, surmetis la kaftanon, kiu estis farita el drapo de Tibeto kaj estis ruĝa. Sur ĝi estis or- kaj silkofloroj teksitaj kaj sur ĝiaj randoj estis multe da orpasamentoj pro kiuj ne videblis la drapo. Sur la anguloj de la kaftano estis broditaj tulipoj, rozoj, papilioj kaj juvelŝtonoj.

Sinjoro Miĥaelo tute alie fartis ĉar la sultano sendis al li ankaŭ leteron. La sultano skribis al li, ke li la kaftanon portu. Tio estis ordono kaj povas esti, ke la sultano vizitos lin por konvinkiĝi ke vere li portas la kaftanon. Kaj certe la sultano koleros, se li ne portas la kaftanon. Nu, tiun li devas porti!

Nu, jes! Sed la orkaftanon ne eblis porti kune kun la ledofeljako, la rimenŝuoj, la bovidfelĉapo. Do, li devis voki la tajloron de Tergoviste⁴⁰ kiu faros silkodolmanon, veŝton, broditajn ŝtrumpojn. Li devas aĉeti en Braŝŝo belan zonon kaj en Ibrail⁴¹ sandalojn kaj pantoflojn el marokeno, kaj en Tekuŝ marteskalpakon kaj al tiu ardeoplumon.

Ĉi tiujn ornamajn vestaĵojn portante li jam ne povis sidi surĉaren kaj sur malmulte-kosta ĉevalo. Li devis portigi el Besarabio⁴² pompajn ĉevalojn kaj el Transilvanio ornamitan kaleŝon. Sed la kaleŝon kaj la ĉevalojn li ne povis meti en simplan draŝejon, li devis konstrui por tiuj ĝustan lokon. Sed la stalo kaj draŝejo estis pli belaj ol la kastelo. La pli lasta estis kaduka, ruina. Pro tio li devis konstrui novan, modernan, pompan kastelon.

Ĉi tiel ŝanĝiĝis ordo de la mondo pro la orkaftano.

Estis konstruita la kastelo, kiu havis orkradojn, verandojn, vestiblojn kun kamenoj kaj ŝtuparoj. En la ĝardeno oni faris vitrodomon, ĉe la anguloj rondbastionojn, meze de la ĝardeno laŭforman turon kaj interne oni pentris verdan arbaron kaj birdojn havantajn kurban nazon.

En la novan kastelon oni ne povis enmeti la malnovajn lignobenkojn, pro tio li devis aĉeti brakseĝojn, orumitajn kanapojn, marmortablojn. Tiutempe tiuj estis modaj.

⁴⁰ Pri Tergoviste, rumane Târgoviște vi povas legi en la vikipedio:

<https://eo.wikipedia.org/wiki/T%C3%A2rgovi%C8%99te>

⁴¹ Ibrail estas rumania urbo, pri kiu vi povas legi, ĉe:

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Br%C4%83ila>

⁴² Besarabio estas historia teritorio en sudorienta Eŭropo, kiun limigas la rivero Prut okcidente, la rivero Dnestro oriente kaj la Nigra Maro sude. Pri ĝi pli abunde bonvolu vidi la artikolon ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Besarabio>

Li devis aĉeti tapiŝojn de Levantenio⁴³, sur tiuj devis stari kandelinoj. La tapiŝojn la bienservistoj ne rajtis piedtreti per iliaj kotaj botoj, pro tio li devis dungi ekonomojn. Li devis dungi kuiriston, ĝardeniston. La lastaj portis kaktajn. La belan filinon, Maria li ne lasis labori en la kuirejo kaj en la ĝardeno. Li venigis por ŝi francan edukistinon, de kiu ŝi ellernu la bonan konduton, guston, brodadon kaj lernis muziki per harpo. Kaj kiam la bela eta Maria iĝis belaspekta kaj kleriĝinta, aminda, tiam li ne povis toleri, ke iu aroganta bojaro flirtadu ĉirkaŭ ŝi, kiu kapablas paroli nur pri siaj hundoj kaj virtuoze drinkadas. Jes, la sinjoro ankaŭ forsendis tiun.

– Ne al vi estas koncerna mia filino! Ŝia edzo povas esti nur iu princo. Sed ankaŭ tio estas egala, kiun princon mi elektas por ŝi. Princo Bosnya⁴⁴ ne estas sufiĉe elita. Princo Ghyka⁴⁵ estas ĝusta, sed ankaŭ tiu estu dankema por mia filino. Mi havas pli multe da monoj, ol lia lando kaj mi povus aĉeti liajn domojn de Moldavio tiel ke nur la homoj restus por tiu. Do, ne kaŝrigardu ĉirkaŭ mia filino.

... Ĉiuj povas vidi, ke ĉi tiujn aferojn kaŭzis iu orumita kaftano.

⁴³ Pri Levantenio: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Levantenio>

⁴⁴ Herceg-Bosna estis horvata teritorio, nun temas pri ĝia princo:
https://en.wikipedia.org/wiki/Croatian_Republic_of_Herzeg-Bosnia
https://eo.wikipedia.org/wiki/Bosnio_kaj_Hercegovino

⁴⁵ La nomon Ghyka, de la valaĥia princo, bonvolu prononci: gika.

3. Tri virgulinoj

Ĉio okazis tiel, kiel sinjoro Miĥaelo pensis. Kiam aperis la blazona flago sur la turo de la nova kastelo, tiam disvastiĝis la famo pri la beleco de Maria, pri la granda havaĵo de ŝia patro. Pro tio la plej elitaj ĵupanoj, vojevodoj, princoj venis sur orumitaj kaleŝoj, sed la patro decidis, ke el tiuj eĉ ne unu estos ŝia edzo, sed li atendos tion, ĝis princo de Moldavio venos por ŝi. Lia decido estis fiksa.

La reganta regnestro de Moldavio heredinta multe da ŝuldoj kaj liaj kaosaj aferoj – la konstanta tatara ĉantaĝo, la donacadoj de paŝaoj, malriĉado de la popolo – estiginta pli komplika lian situacion, kiam li ekaŭdis la famon, ke en Valaĥio estas bela kaj klera fraŭlino edziniginda. Tiu eksciis, ke ŝi havas bonecan koron, nobelan blazonon kaj kelkajn milionojn valoran dotaĵon kunporteban.

Tiu tuj ekiris al ŝia kortego kunportante siajn nuptoatestantojn, fianĉamikojn por rigardi la fianĉinon en Rumnik. Tie la patro tre kare akceptis tiun kaj tiu estis kontenta pri la patro kaj fianĉino. Tiu petis la manon de la virino, okazis la fianĉiĝo kaj ili decidis la tempopunkton de la geedziĝo, kiu estu dum la post paskaj semajnoj.

Sinjoro Miĥaelo ne havis alian zorgon, ol fari la plej bonajn aferojn. Li invitis por partopreni la geedziĝon elitulojn de Moldavio, Bosnio, Serbio kaj Transilvanio. Li ne hezitis inviti iun kuiriston de reĝo Ludoviko la 14-a por aranĝi la manĝaĵojn de la geedziĝo. Certe sinjoro Nikolao Bethlen miros, ke ankaŭ alia homo konas la manĝaĵojn de la franca reĝo.

Tage de la geedziĝo Miĥaelo klopodis ĉion aranĝi. Jam fru-matene li surmetis sian orkaftanon, la ardeopluman kalpakon kaj sian rimenon. Li diradis la ordonojn, akceptis la gastojn kaj ĝojis ekvidante la ornamitajn kaleŝojn kun la en ili sidantaj elitaj gastoj. Ilin akompanis la hajdukoj portantaj ornamajn vestaĵojn, kiuj helpis elkaleŝiĝi la damojn. La silkovestaĵoj siblis, la glavoj tintadis kaj la belstaturaj figuroj iradis sur la verandoj.

Sinjoro Miĥaelo kuradis tien kaj reen, estis kaj humila kaj fiera. Li ĉiujn tiel akceptis, ke li estas feliĉa, ĉar oni honoris lin per la vizito, sed lia diro perfidis, ke certe neniu havas pli pompan kastelon, ol la lia.

Poste li kuris en la ĉambregon de la fianĉino, kie Marian vestis la fraŭlinoj de Vieno. Li metis perlojn sur ŝiajn kolon, brakon. „Ĉi tiun ĉenon metu sur ŝin!” – ordonis la patro. „Ĉu sur vian hararon vi nenion metas?” – demandis la patro. Se tiujn juvelojn ŝi metus sur ŝin, tiam ŝi ne kapablus movi sin – venis la rimarko.

Poste la bona sinjoro kuris en la manĝejon. Tie la servistinoj jam primetis la tablojn. En kvin longaj ĉambregoj tabloj estis laŭ du vicoj.

Ĉi tie sidos la fianĉino! De ŝi dekstre en brakseĝo sidos la patriarko, de ŝi maldekstre sinjoro Miĥaelo Apafi sidos sur ledoseĝo. La fianĉo sidos de la patriarko dekstre sur senapogila seĝo. Tie sidu Paŭlo Béldi kaj lia edzino unu apud alia. Aranka ilia filino sidu inter ili. Paŝao Ahmed kaj bejo Feriz sidu sur sofoj, por oni ne devas doni forkon kaj tranĉilon. La diakono sidu sur tiun fortan benkon, ĉar tiu ne rompos sub tiu. La tridek tri popoj ricevu apartan tablon, ĉar ili hontas manĝi antaŭ la aliaj. Metu sur la arĝentpladojn florkronojn. Antaŭ sinjoron Miĥaelo Teleki ne metu vinon. Al paŝao Ahmed metu ŝorbetan tason, ĉar tiu el ĝi drinkas la vinon kaj kredas, ke tiuokaze li ne pekas kontraŭ la Korano. Antaŭ la sinjorinojn metu kristalglasojn de Venecio. Antaŭ la sinjorojn metu festan pokalon, sed al Teleki kaj Bethlen metu pli belajn, kaj al la aliaj pli fortajn. Nome la lastaj kutimis ĵetadi ilin al la muroj. Al la fianĉo metu la plej sveltan glason por ke ĝi ne rompiĝu pro la multe da tintigo de glasoj.

Jam la gastoj alvenis, sed oni atendis la familiojn Apafi kaj Teleki, kiujn oni nepre volis vidi ĉe sia tablo. Li maltrankvile rigardadis al sia kortego kaj atendis la sonon de kanono kiu devis signi ilian alvenon.

Finfine la sono de kanono aŭdeblis. Miĥaelo iris al la pordego por akcepti ambaŭ plej elitajn gastojn. Ili ordonis al la gardistoj, kiuj estis en la turo signi per trumpeto la alvenon de la tre atenditaj gastoj. La aliaj gastoj volontaj vidi la geelitulojn iris al la balkonoj kaj la verandoj. Subite sur la vojo aperis du kaleŝoj, kiuj inter rajdantoj kaj satelitoj iris al la kastelo.

Ĉiuj rekonis la kaleŝojn de la regnestro kaj lia ĉefkonsilisto kaj la trumpetoj sonis ĝis la kaleŝoj atingis la korton de la kastelo. Miĥaelo tuj klopodis malfermi la pordon de la kaleŝo demetante la ardeopluman kalpakon. Sed li treege surpriziĝis, ĉar iu gaskona junulo elkaleŝiĝis. Li ne vidis en la kaleŝo la regnestron. Li pensis, ke la regnestro ekvidante la kastelon elkaleŝiĝis kaj perpiedis ĝis la kastelo, kiel li kutimis fari.

La junulo ekskuzis sin kaj prezentis sin:

– Mi estas Imre Thökölly⁴⁶, kiun la regnestro sendis al vi por partopreni la feston kaj por diri sian bedaŭron, ĉar la regnestro estas graveda. Krome li ne povas persone aperi, ĉar paŝao Ali devigas lin ne aperi. Cetere li deziras ĉion bonan al vi.

Sinjoro Miĥaelo ne sciis bonan respondon, ĉu ĝoji, ĉu bedaŭri kaj turnis sin al la alia kaleŝo, sed Thökölly⁴⁷ daŭrigis:

– Ankoraŭ mi volas diri al vi, ke sinjoro Miĥaelo Teleki hazarde ricevis ordonon por ekiri kun la transilvaniaj armeoj al Hungario. Pro tio sinjoro Teleki sendis al vi sian filinon, Floran. Li bedaŭradis pro la senindulga ordono, pro kiu li ne povas premi vian manon. Kaj se vi premas mian manon, tiam mi transdonos al Teleki tiun manpremon.

La bona sinjoro estis kortuŝita pro la ideo de la junulo kaj brakumis tiun kaj kisadis. La junulo apenaŭ kapablis liberiĝi de li. Poste lian laŭfaman fianĉinon, Floran, kaj la junulon, li kondukis inter siajn gastojn kaj prezentis al ili sian filinon, kiu jam portis pompajn fianĉinajn vestaĵojn.

Maria estis svelta bruna filineto, ŝia vizaĝo estas blanka kiel la lilio, ŝiaj okuloj estas timeme fermitaj. Ŝi paŝis kondukate de siaj damoj inter la gastojn. Ŝia hararo estis ornamita de fajnaj perloj. Ŝiaj orienta vestaĵaro, hontema rigardo, fieraj brovoj pliigis ŝian belecon.

Inter la gastoj staris iu viro. Li estis altstatura, havante larĝajn ŝultrojn, fieran rigardon, li estis simila al la iama greka junulo Antinoo⁴⁸. Lia longa malhela hararo pendis sur la ŝultrojn. Liaj brovoj kaj lipharoj donis decidan esprimon al lia olivverda vizaĝo. Tiu estas la fianĉo.

La patro de la fianĉino kondukis al siaj gastoj la nun alvenantajn gefianĉojn kaj tuj prezentis ilin al princo Ghyka kaj diris, ke kunĝoje li plenumas la komision de Thökölly kaj transdonis la kisojn kaj manpremojn de la regnestro. Ĉi tiu faro naskis en la junulo aŭdacan personon.

Ĉiuj brakumadis la junulon kaj fine li iris al la tremetanta fianĉino, kiu ne kuraĝis rigardi lin, sed francmaniere salutis lin. Poste li turnis sin al la gastoj kaj petole diris:

⁴⁶ Pri Imre/Emeriko Thökölly vi povas legi ĉe:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Emeriko_Th%C3%B6k%C3%B6ly

⁴⁷ Pri grafo Emeriko Thökölly abunde vi povos legi ĉe:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Emeriko_Th%C3%B6k%C3%B6ly

⁴⁸ Pri Antinoo estinta duondio, vi povas legi en la vikipedia artikolo:

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Antinoo>

– Kaj ĉar iĝis plenumita la komizio, la sendo de la kisoj, pro tio mi kredas, ke mi povas transdoni la fratajn kisojn de sinjorinoj Teleki kaj Apafi al la ĉarma fianĉino.

Kaj la junulo impertinente, kiel li kutimis konkeri la virojn kaj virinojn, iris al la fianĉino kaj kisis ŝian frunton. Ŝi iĝis ruĝa! Li faris tion ege tenere kaj petole, ke la gastoj nur ridetis. Kaj li diris kunestime ŝercadante fiere al la gastoj:

– Mi esperas – li diris kaj prenis la manon de Flora Teleki – ke la ĉeesto de mia fianĉino estas garantio de tiu estimo kiun mi donis dum mia misio.

Nun ĉiuj gastoj komencis ridi. Emeriko faris multe da petoloj, kiujn li faris ege aminde, kaj neniu koleris lin.

Sed Maria kaj Flora restis ruĝaj plu. Nome la virinoj ne komprenis faron de Emeriko. La fianĉo ĝisduone ridante, ĝisduone ĉagrene tordadis sian lipharon kaj diris:

– Mord' de hundo! Tiu pli frue ekkisis mian fianĉinon, ol mi!

Sed jam venis la estimindaj sinjoroj, eksonis la sonorilegoj, la fianĉamiko okupiĝis pri la gefianĉoj kaj komenciĝis la festa ceremonio, post kio neniu pensis pri tiu ŝerca okazintaĵo.

Sed ambaŭ damoj ege ofendiĝis pro la facilanima ŝerco. Unu damon vundis la dorno de rozo, la alian la mordo de serpento.

Dum la unu kaj duonahoroj de la ceremonio de la geedziĝo la patriarko, la diakono kaj la tridek tri popoloj pie faris siajn laborojn. La kantistoj kunlaboris. Ni maldiskrete eksciis, kion enhavas tiuj du sigelitaj leteroj, kiujn iu heroldo ĝuste nun portis al Emeriko Thököly kaj pro kiuj li forte estis malpacienca. Sed oni diris al li atendi, ĉar la grafo estas en la templo.

Iu letero alvenis de Miĥaelo Teleki kaj ĝia enhavo estas la sekva:

„Kara mia filo-sinjoro! Ĉio estas enorde. Niaj armeoj havante okdek mil soldatojn forlasante Gyulafehérvár-on jam atendas la armeon de paŝao Ahmát por unuiĝi kun la tendaro de Küprili. La batalo estas jam ne nuligebla, definitiva. Ankaŭ nun la gloron havos Transilvanio, porti la flagon en ĝi ĉe la antaŭo. Klopodu postatingi nin kaj dumvoje bonvolu defendi mian filinon Flora. Dio benu vin!” P.S La regnestrino atendas ĉi tie la benon de Dio. La regnestro nun finis belan eseon pri la 300 – jaran vojon de la kometoj.” Dato, subskribo M.T.

La alian leteron iu virino skribis kaj videblis, ke tiu virino ne nur skribi kapablas, sed kapablas batali per glavo. La enhavo de tiu letero estas la sekva:

„Mia kara amiko! Mi ricevis vian leteron kaj klopodas respondi. La skribitajn landajn aferojn mi ne tro akceptas. Kiu amas min, tiu estu kapabla oferi sin kaj morti. (La amo koncernas ne min, la funebran vidvinon, sed la alian funebran vidvinon, kiu estas via patrino.) Mi prijuĝas la homojn laŭ iliaj faroj. Vian ekscelencon mi prijuĝas bona, kion atestos la estonteco. Vian ekscelencon mi estimas:

Ilona⁴⁹

P.S: Mi pasigos la somerumadon en banejoj de Mehádia.”⁵⁰

⁴⁹ Pri Ilona/Helena Zrínyi bonvolu vidi la vikipedian artikolon:
https://eo.wikipedia.org/wiki/Helena_Zr%C3%ADnyi

⁵⁰ La nomo de la banloko devenas el la hungara virnomo Mihály. Ĝi poste estis nomita kune kun la apuda malnovega kuraca kaj banloko de Rumanio: Herkulesfürdő. Pri ĝi vi povas legi ĉe: <https://hu.wikipedia.org/wiki/Meh%C3%A1dia> /kaj/
https://eo.wikipedia.org/wiki/B%C4%83ile_Herculane

Fine de la geedziĝa ceremonio oni povis vidi pli gajajn vizaĝojn, ol antaŭ la ceremonio. Nome la fianĉo ĝojis, ĉar li havis jam sian fianĉinon, la fianĉino ĝojis, ĉar ŝi havis sian fianĉon. La kantoro ĝojis, ĉar la ĥoro bele kantis, kaj la maljunaj sinjorinoj unu semajnon parolos pri la vidindaĵoj, kaj ĉiuj ĝojis, ĉar ili povos manĝi, drinki dum unu tuta semajno.

La nupto-festantaro gaje parolante iris reen el la kapelo al la kastelo kaj estis bone aranĝite, ke ĉiujn damojn iu viro akompanis al la festa tablo al ŝia seĝo. Nur la estimindaj popoloj kaj kaj ĉeestantaj turkaj ĉefsinjoroj ne devis akompani damojn. Nome paŝao Ahmed kaj bejo Feriz ne povis esti ĝentilaj pri la virinoj.

Unue Emeriko Thököly akompanis nome de la regnestro la patrinon de la fianĉo, principinon Ghyka. Poste Paŭlo Béldi akompanis la fianĉinon. Sinjorinon Béldi akompanis sinjoro Miĥaelo, la dommastro. Sed li akompanis samtempe la belan Aranka. Tiu aminda infano estis kunludanto de la societo, kiu ŝercadis, estis gaja kaj ne timis pro la paliĝo de sia vizaĝo.

Bejo Feriz staris ĉe la sojlo serioze dum Aranka ne venis. Aranka rimarkis lin. salutis lin afable kaj bejo Feris melankolie ĝemetis kaj postiris la knabinon.

La fianĉo akompanis la belan Floran Teleki.

Kiam oni alvenis en la ĉambregon estiĝis malpli grandaj societoj, inter kiuj estis la plej kara societo la societo de Flora, Maria kaj Aranka.

La tri virgulinoj brakumis unu la alian, ja la virinoj estas pli proksime al la amikeco, ol la amo.

La plej aĝa estas Flora Teleki kaj la plej juna estas Aranka. Maria estas bela greka fraŭlino. Flora estas konkeranta belulino havante palan vizaĝon kaj saĝajn trajtojn. Ŝi havas altan fruntan same kiel sia patro. Ŝiaj lipoj same ridetas, simile al tiuj de ŝia patrino. Ĉe idoj de familio Teleki eblas trovi la menson de la praavo kaj bonecon de la praavino, mikse kun ŝtatvira spirito kaj liberalismo. Bedaŭrinde estas, ke ĉi tio spiritmiksaĵo ne komenciĝis jam ĉe la pli frua naskito!

La vizaĝo de Aranka estas tute aliaforma, estante ĉiam infaneca, trankvila, havante ridetantajn okulojn, dum ŝi paroladis kun siaj amikinoj kaj kisadis tiujn.

Maria estas belega, rava fianĉino, havante grekajn trajtojn, kies okuloj estas larmaj. Ĉu ili estas larmoj de la ĝojo, aŭ la malĝojo? Kiu scias tion?

Bonvolu sidiĝi al la tabloj, miaj sinjoroj kaj sinjorinoj! – diris fortvoĉe la dommastro.

Li feliĉe kuradas tien kaj reen por sidigi la gastojn sur iliajn lokojn. Thököly, reprezentante la regnestron, sidas apud Maria, la fianĉino, kaj kontraŭ ili sidas Flora kaj la fianĉo. Aranka kaj la bejo sidas unu kontraŭ alia.

La festa festeno komenciĝis kaj daŭris, ni laŭdu la du kuiristojn, sed ne menciu la manĝaĵojn. Mencio de la manĝaĵoj ĉagrenus la satigitajn kaj la malsatajn homojn. Ni ne interesiĝas pri la manĝaĵoj.

Kiam la senfinaj salutoj por drinki je ĉies sano komenciĝis, ĉiuj iĝis pli gajaj, ol pli frue. La fianĉino mallaŭte paroladas kun sia juna najbaro. Pri kio ili paroladas? Certe pri bagatelaj aferoj, pri belaj ĝardenoj, nederlandaj tulipoj, galanterioj de la damoj de Luksemburgo, multe da petoladoj, per kiuj li kapablis amuzi la fianĉinon sen tio, ke la tutan societon li amuzus.

La fianĉo same ĝentile komencis la paroladon kun la bela Flora, sed la parolado ĉiam rompiĝis, kvankam ambaŭ estis kleraj. La parolado estis senanima kaj la princo iĝis serioza, vidinte, ke Emeriko vigle paroladas kun lia fianĉino, kaj vane klopodis amuzi sian najbarinon; la kontraŭa rido forpelis lian rideton. Fine Flora tute silentiĝis

kaj la fianĉo devis turni sin al la patriarko, kiu sidis apud li, kaj kun tiu paroladis pri enuigaj aferoj.

Kiu aŭskultus la stultaĵojn? Kiu volis scii, kio okazas sur la fundo de la maro? Kelkaj citristoj komencis kanti heroajn malĝojajn kantojn, dum ili muzikis. La muziko kaj la kantoj estis pli laŭtaj, ol la paroladoj de la gevoj.

Paŝao Ahmed ĝis nun ne parolis, sed drinkante vinon el la suka taso kaj havante pli bonan humuron turnis sin al la citristo-kantisto kaj alparolis laŭte:

Ne kantu tiun malĝojan kanton, prefere kantu iun kanton de nia poeto, la ama Hariri, aŭ el Gulistan.

Efike de tio bejo Feriz ruĝiĝis. Kial? Neniu sciis tion.

– Ĉu vi konas la kanton „Plendoj de la amantoj”? – demandis la paŝao la muzikiston.

– Ĝian melodion mi konas, sed la tekston ne.

– Ho, tiun bejo Feriz surskribos, donu al li pergamenon kaj skribilon.

Bejo Feriz unue hezitis, sed la virinoj petpetegis skribi la tekston de la bela kanto. Fine li kapitulacis kaj komencis skribi la tekston de la kanto.

Kiuj ne drinkas vinon, tiuj ebriiĝas pro la belaj virinaj okuloj. Bejo Feriz dum la skribado rigardis la vizaĝon de Aranka. Pro tio Aranka fermis la okulojn, ne ridetis, sed tamen sentis la aman rigardon kaj kaŝis sin ĉe sia patrino honteme, maltrankvile de antaŭ la rigardo de bejo Feriz.

Feriz la tekston de la kanto transdonis al la muzikisto-kantisto. La gastoj atentigis unu la alian petante silenton por aŭskulti.

La muzikisto komencis kanti la kanton de la turka poeto:

„Tri belulinoj staras kune, kune staras brakumite.

La afabla luno, la lumanta suno, la brilanta stelo.

Multaj adoras la sunon, aliaj la lunon, mi mian stelulinon.

Se l' suno subiĝas, adorantoj dormiĝas;

Se la lun' subiras, kredantojn sonĝo ravas;

Sed se l' stelo defalas, homo mortas tiam;

Se mia stelo falus, Mashallah! do mortu mi...”

Al la gastoj plaĉis la kanto kaj petis la kantiston daŭrigi tiun:

„Tri belaj fraŭlinoj staras kisant unu la alian.

Ho, belaj fraŭlinoj, ŝtelistoj de paradizo!

La kiso estas la plej dolĉa mielo de edeno,

Alaho metis ĝin sur viajn lipojn por feliĉigi virojn,

Kaj vi ŝtelas la kison por vi mem.

Ho, belaj fraŭlinoj ne interkisadu antaŭ viroj!”

Ĉiuj iĝis gajaj efike de la kanto kaj oni kredis, ke tiu kanto estiĝis okaze de ĉi tiu festo.

– Tio estas nekredebla – diris Paŭlo Béldi al la paŝao, – ke ĉe vi oni faras ne nur sagovergon el la kano, sed ankaŭ skribilon por la amaj poetoj.

– Ho, en la manoj de niaj poetoj ankaŭ la glavo same resonas kiel vibras la kordo de la harpo – respondis Ahmed – kaj se ni faras laŭrkronon sur la tempiojn de Hariri, tiam ni tion faras pro tio, ke ni kovru la vundon, kiun li ricevis en batalo.

Feriz embarasite kovris sian frunton per sia turbano. Sed multe da gastoj rimarkis tiun movon kaj de nun la juna turko iĝis ĉies ŝatato, ĉefe tiu de la damoj. Ĉe la fino de la nuptofesto ankaŭ Thököly gapante spertis, ke lia bela najbarino ĝoje paroladas pri la turka poeto, kiu bone uzas kaj la glavon kaj la harpon.

De nun la juna grafo malmulte paroladis kun la fianĉino kaj ofte rigardis la vizaĝon de Aranka Béldi, kiu enbarasite sidis apud sia patrino, kvazaŭ ŝi volus kaŝi siajn infanecajn ĉarmojn.

La nuptofesto finiĝis kaj Thököly ĝentile adiaŭis sian najbarinon, kiu malaperis kun sia amikino Flora en iu fenestro-niĉo. Li volis renkontiĝi kun Aranka, sed dumvoje multe da gastoj salutis lin kaj fine Aranka prenis la brakon de sia patrino kaj babiladis kun la princo, la fianĉo, nome apud iu edziĝinta viro ŝi ne sentis sin endanĝeriginte.

Thököly afable flatante iris al ili kaj malrapide proksimiĝis al iu fenestro-niĉo, kie la princo paroladis kun sinjorino Béldi kaj fine Aranka-n li kapablis ridigi per petolaĵoj.

La princo iĝis furioza kaj preskaŭ forgesadis pri si mem. Estis feliĉo, ke la sinjorino rimarkis la furiozon inter la du viroj kaj salutante ilin kune kun sia filino foriris el la ĉambrego. La princo ekprenis la manon de Thököly kaj diris al li kolereme:

Se al vi ne sufiĉas via fianĉino, tiam estu sufiĉa la mia, sed ne klopodu ĉiujn fraŭlinojn ruze allogi.

Thököly miskomprenis la primokantajn vortojn kaj milde, sed malestime respondis:

– Mia bona amiko, via vivprincipo estas erara, mi vidas, ke via galo krevis, vi estas kolerema kaj delonge farigis por vi flebotomion. Tranĉigu angion!

La princo furioziĝis, spasme premis la manon de Thököly kaj murmuris:

– Por mi mem, aŭ por aliulo. Kiam estu la operacio, la duelo?

– Tio estos morgaŭ matene. – Thököly tiris la ŝultron.

– Ni renkontiĝos ĉe la krucifikso.

Ambaŭ viroj ege mallaŭte parolis kaj la gastoj ne povis aŭdi ilin, nur bejo Feriz aŭdis, kvankam li estis ĉe alia angulo de la ĉambrego. Li staris kun plektitaj manoj sed agla okule atentis ĉiun movon de la vizaĝoj de sinjorino Béldi kaj Aranka kaj ambaŭ viroj. Kiam ambaŭ viroj manpremis, la bejo antaŭ ilin paŝis:

– Ĉu vi volas dueli pro Aranka Béldi?

– Kia demando estas tio nun? – diris la princo rifuzante.

– Tiu ne estos duelo, ĉar estas tri viroj. – diris Feriz kaj foriris.

– Kiom ŝercemaj estas ĉi tiuj seriozaj homoj. – diris Thököly en si mem – ili serĉas la malbonon, malĝojon. Mi kapablas gajigi ilin, sed ne malbonigos ilian amuzon.

Simila duelo ne estas menciita en la almanakoj. Tri viroj unu kontraŭ alia kaj du viroj kontraŭ unu viro! Tio estas mirinda!

Subite iu heroldo venis al Thököly, dirante, ke li portas du urĝajn leterojn al li.

– Ĉio estas enorde! Estu la leteroj ĉe vi, morgaŭ mi legos. Mi ne malbonigas mian humoron, ne interesas enuigaj aĵoj.

Li amuzis sin ĝis noktomezo. Poste li iris en sian ĉambron kaj ordonis al la servisto veki lin fru-tagiĝe.

4. Tri viroj

La servisto de Thököly, ne kuraĝis dormi kaj antaŭ la heliĝo vekis sian mastron.

Emeriko vestis sin, estis mishumora post la nokta diboĉado.

– Ĉi tie estas la leteroj, mia sinjoro. – diris la servisto.

– Lasu min trankviliĝi, mi ne okupiĝas pri viaj leteroj – diris Emeriko kolere – mi ne havas tempon por legi tiujn. Seligu mian ĉevalon kaj la koĉeroj preparu sin kaj kun la kaleŝo atendu min ĉe la krucifikso. Kaj eksciu, ĉu la maljuna dommastro jam ellitiĝis.

La servisto denove metis en la aktujon la leterojn kaj murmurante foriris. Dume Emeriko metis sian glavon en la glavington. La servisto post mallonga tempo revenis, anoncanta, ke la dommastro, Miĥaelo jam ellitiĝis frue-matene, ĉar la gastoj ege frue foriris. Ankaŭ la princo kaj la turkaj sinjoroj foriris. La fianĉinoj nur tagmeze postiros ilin.

– Estas bone – diris Emeriko – atendu min kun la ĉaroj ĉe la ĉardo de Dragumil. Kunportu malvarman rostaĵon kaj vinon ĉar dumvoje ni matenmanĝos.

Poste Emeriko rapidis al la patro de la fianĉino, kiu larmante brakumadis kaj kisadis lin, kiu same brakumadis tiun. Fine plorante ili adiaŭis.

Thököly rapide surĉevaliĝis, nome li jam aŭdis, ke liaj kontraŭuloj antaŭis lin, kaj li hastege postgalopis ilin. Sinjoro Miĥaelo gapis post li, kiel li galopegis sur la kruta monta deklivo kie baldaŭ li malaperis en la arbaro. Unu servisto akompanis lin de malproksimo.

Emeriko, atingante la krucifikson, jam ekvidis siajn kontraŭulojn. Bejo Feriz kunportis kirurgon de paŝao Ahmed, Thököly kunportis la matenmanĝon, sed la princo kunportis nenion.

– Bonan matenon – salutis la grafo ilin deĉevaliĝinte.

La bejo kapbalancis, sed la princo montradis sian dorson.

– Ni iru en la arbaron por serĉi ĝustan senarbejon – proponis Thököly, kaj la aliaj postsekvis lin dum la servistoj kondukis la ĉevalojn de siaj mastroj. Ili atingis iun senarbejon, ĉirkaŭ kiu estis frakseno. Tie la princo mansignis al la servistoj resti malproksime. La tri viroj senvorte demetis siajn mantelojn kaj antaŭpreparis sin por skermi.

Ĉiuj tri viroj estis ege fortaj, kavaliraspektaj figuroj, estis kreitaj por estri armeojn. La princo estis kapabla lukti sola kontraŭ divizio. Li portis broditan ĉemizon, kaj eblis vidi liajn dikajn muskolojn, kiuj estis malmolaj, liaj pugnoj estis similaj al glavego.

Dum apero de bejo Feriz montriĝis nur sia neĝblanka turktipe larĝa ĉemizmaniko kaj lia mallarĝa tre fleksiĝema ŝtalglavo, sed, ne videblis liaj muskoloj. Sed ĉe la unua movo farita facilmove susurige la glavon, jam estiĝis okulfrapaj la malmolaj muskoloj. La damaskan glavon forte turnante li pruvis, ke li kapablas uzi tre lerte sian glavon. Lia vizaĝo estis serioza.

Nur Emeriko pensis, ke ĉi tiu afero estas facilanima amuzo kaj ridetante preparis sin por dueli. Liaj brakoj estis blankaj kiel tiuj de virino, li estis svelta kaj sur li ne videblis la forto de viro. Lia glavo estis kiel glavo de armilfarejo de Now – Castle, farita el ŝtalo, iomete klinita kaj ĝia fino estis pli maldika.

– Kamaradoj – diris Emeriko al siaj kontraŭuloj – tri viroj volas dueli kaj ĉiuj havas du kontraŭulojn. Pro tio ni faru ordon, laŭ kiu ni batalos.

– Mi samtempe duelos kontraŭ du – diris la princo fiere.

– Ankaŭ mi batalos kontraŭ du – diris ankaŭ Feriz.

– Do, ĉiuj batalos kontraŭ du – klarigis Emeriko – tio estos amuza kaj nova speco de duelo, sed tio ne estas kavalireca. Mi proponas, ke ĉiuj skermu kontraŭ ĉiuj kaj la venkanto skermu kontraŭ la tria kamarado.

– Ankaŭ tio estos bona, sed tuj komencu la duelon – diris la princo malpacience kaj atendis la kontraŭulon.

– Atendu, mia amiko! Vi ne povas scii, ĉu mi, aŭ Feriz komencos la duelon.

– Ej! Mi ne kiel spektanto venis ĉi tien! Min ne interesas la bejo!

– Sed min vi interesas! – interparolis Feriz.

– Nu, jes, parolu! – diris Thököly – Mi ne scias, kiel mi ofendis lin. Sed li alvokis por dueli. Tion mi devis plenumi. Plie mi ne volas scii la kaŭzon. Povas esti, ke tio estas tenera kaŭzo.

– Ne diru plu! – interparolis Feriz – Decidu la sorto!

– Vi diris ĝuste – respondis la grafo – kaj prenis tri monerojn: unu estas oro, alia estas arĝento kaj la tria estas kupro. Kaj li turnis sin perpete al la turka kirurgo:

– Prenu la monerojn kaj ĵetu supren. La oro estas la princo, la kupro estas mi. Kiuj du moneroj montras samforman bildon, tiuj duelos.

La kirurgo ĵetis supren la monerojn kaj la oro kaj arĝento montris samforman bildon. La princo ĉagrene mansignis al Feriz:

– Do, venu unue!

Li rapide volis dueli kontraŭ Feriz, ĉar li volis dueli kontraŭ Thököly. Thököly proponis al la kirurgo kolekti la monerojn kaj prepari sin por bandaĝi.

– Kial? – diris la princo moke – mi duelos ĝis la lasta sango.

Poste la princo kaj la bejo staris unu kontraŭ alia. Longtempe ili rigardis unu la alian, kvazaŭ ili volus mortigi unu la alian nur per siaj okulsagoj, sed poste subite samtempe atakis unu la alian. La princo per senindulga kurego atakis la bejon, kvazaŭ en mallonga tempo li volus neniigi lin kaj multe da batoj donis plenforte per sia glavo al li, sed la bejo ne moviĝis, nur defendis sin per sia damaska glavo kaj ambaŭ glavoj fajreris.

La princo iĝis treege furioza.

– Fia bubaĉo! – li kriegis grincante siajn dentojn kaj daŭrigis la donojn de la ege fortaj bategoj sur la bejon, pro kiuj Feriz falis sur genuon.

Subite la princo rimarkis, ke sango elŝpruciĝis de ie sur sian vizaĝon. Efike de tio li ĉesigis la duelon. Dum la duelo li ne rimarkis, ke li ricevis vundon. Dum la nesingarda skermado la glavo de la bejo ektranĉis lian artikon, kie la glavo vundis la gravajn angiojn. Li devis defaligi sian glavon. Thököly saltis al li.

– Princo, vi estas vundita!

– La kirurgo rapidiris al li por bandaĝi la vundon. Kiam la sango elŝpruciĝis kiel fontano, la princo forte paliĝis. Sed kiam la kirurgo bandaĝis la vundon, la princo iĝis ekscitita kaj kriis al Emeriko:

– Mi havas ankoraŭ unu manon! Mi estas kapabla skermi kontraŭ vi! Donu al mi mian glavon! Mi skermos ĝis lasta sango!

– Ne maltrankviliĝu, princo! – diris Emeriko ĝentile – la malfeliĉo nun estis kontraŭ vi, sed post via saniĝo mi skermos kontraŭ vi.

Subite la princo kapturante falis sur la ŝultron de sia servisto. Tiuj portis lin al lia kaleŝo kaj hejmenportis lin. La vundo de la princo estis pli danĝera, ol tion ili pensis. Povas esti, ke tio estas mortiga.

Nur Emeriko kaj Feriz restis sur la skermejo. La bejo staris sur la skermejo kaj senvorte permane vokis Emerikon veni por skermi.

– Pardonu min, brava kamarado – diris la grafo – vi estas laca kaj la lukto ne estus egala inter ni. Mia servisto kunportis al ni malvarman manĝaĵon, manĝu ni tiun, iom ripozu kaj poste ni povos skermi.

Al bejo Feriz plaĉis la senĝena propono kaj li demetis sian glavon al iu arbo, ekkuŝis sur la gazonon, kien la servisto metis la rostaĵon kaj fruktojn, kaj kunportis la lagenario forman ladbotelon, en kiu estis vino. Emeriko redonis la ladbotelon al la servisto kaj proponis:

– Drinku la vinon, kiu estas en la ladbotelo kaj poste portu al ni freŝan fontoakvon, ĉar bejo Feriz ne drinkas vinon kaj ni havas nur unu trinkujon. Do, ankaŭ mi trinkos nur fontoakvon por lia ŝato, por esti tute egalaj.

Al la bejo plaĉis ĉi tiu kamarada konduto kaj volonte akceptis la inviton manĝadi kaj trinkis la akvon el la ladbotelo.

Ĉirkaŭ lia tempio videblis iu maldika cikatro, kiun la turbano ne tute kovris.

– Ĉu vi ricevis tiun vundon de hungaro? – demandis la grafo.

– Ne. De iu italo, – respondis la bejo – sur la insulo Candia⁵¹.

– Mi tuj pensis tion. Nome hungaro ne tranĉas per la pinto de la glavo. Tiu tranĉo estas tranĉo de itala majstro.

– Certe malamikoj estis apud vi dekstre, maldekstre kaj kontraŭ vi kaj vi defendis vin samtempe de ĉiuj flankoj per cirklotranĉoj kiujn vi prezentis nun ĉe la skermado. La antaŭ vi estanta malamiko neatendite levis sin en la selo kaj lia glavo per glavopinto vundis vian frunton.

– Tio okazis tiel. Ĉi tiel instruis la skermadon Basanella al siaj disĉiploj.

– Pri tio estu singarda, ĉar tiu bato estas preskaŭ sendefendebla. La glavo rapide batas kiel serpo. Vi povas defendi vin nur tiam, se subite vi retiras vian kapon.

– Vi pravas – diris la bejo ridetante kaj prenis sian glavon – ni povas skermi.

– Bone estas – diris Thököly kaj same prenis sian glavon kvazaŭ li prenis ludilon kaj tiun donus al virino.

Ili iris al la skermejo.

– Mi dirus ankoraŭ ion – diris Thököly amikece – se vi skermas kontraŭ unu homo, tiam ne tiel skermu, kvazaŭ vi skermus kontraŭ dek homoj, ĉar vi frue estos laca. Prefere nur movu la glavon.

– Mi dankas pro la instruo – ridetis la bejo.

Feriz alian homon riproĉintus, sed Emeriko kiel kamarado parolis al li, kvazaŭ li nur volus ŝercadi, lin li ne riproĉis. Ili komencis la skermadon. La bejo impete atakis sian kontraŭulon kvazaŭ li volus rekompenci la karan instruadon. Sed Thököly trankvile, ridetante skermis kvazaŭ li ludus kun la bejo. Li ege facilmovigis skermis kaj tute ne fortostreĉis, facile defendis sin, sed ne unufoje atakis reen. Pro tio la bejo nevole ĉesigis la skermadon kolerante.

– Vi nur provokas min. Kial vi ne reatakas?

– Vi ankaŭ duoble ricevus, kion instruis al vi Basanella. Vi skermas ege impete.

– Dum la duelo estas ege nervige, se la kontraŭulo estas noblaanima.

Ĉar Thököly estis tre trankvila skermanto, pro tio la bejo forte atakis Emerikon. Sed Thököly defendis sin. Tiujn frapojn per subglitigo de sia glavpinto li facile

⁵¹ Iraklio greke Hérakleion, itale *Candia*, turke *Kandiye*, dum tempo de la otomana imperio urbo estis en Grekujo, ĝi estis la plej granda urbo de insulo Kreto. La milito Candia (kandia, Iraklio)) finiĝis per turka venko: [https://eo.wikipedia.org/wiki/Iraklio_\(urbo\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Iraklio_(urbo))

flankenŝovis, sed dume li frapis ete reen, apenaŭ rimarkeble. Pro tiu movo sur la frunto de la bejo aperis brulsenta ruĝa linio.

La turka junulo surpriziĝis, ĉesigis la skermadon ĉar sentis la sangon flui sur lian vizaĝon. Li ne rimarkis la bategon de la grafo. Thököly deĵetis sian glavon, prenis blankan tukon, forigis la sangon kompate de la vizaĝo de la bejo kaj li ektimante diris:

– Ĉu mi diris pravon? Mi diris, ke vi estu singarda pri ĉi tiu batego.

Vidante la finon de la skermado la kirurgo kuris al la bejo kaj diris al li konsolante:

– Nu, tio ne estas danĝera, nur la haŭto estas vundita. Post tri tagoj la vundo cikatriĝos.

Thököly ĝojante premis la manon de la bejo, dirante:

– Ekde nun ni restos bonaj amikoj. Mi diras je mia Dio, ke volante mi ne donis kaŭzon koleri min.

– Mi tre ĝojos – respondis Feriz serioze – ke mi povos esti via amiko, sed se vi volas fari daŭran amikecon, tiam akceptu mian konsilon: neniam iru al tiu fraŭlino, kiun vi ne amas, por amigi vin; sed se vi amas ŝin, tiam feliĉigu ŝin.

– Je mia honorvorto mi diras – diris Emeriko – el inter tiuj damoj mi nenium amas kaj ne volas amigi min.

Feriz ekridetis kaj kapbalancante diris:

– Certe vi forgesis, ke inter tiuj estas via fianĉino!

Thököly embarasate mordadis siajn lipojn pro la lang-eraro kaj ne respondis al la bejo, sed ili trabrakumis unu la alian, paciĝis kaj Emeriko transdonis al la bejo sian kaleŝon por veturi al Ibrail. Emeriko surĉevaliĝis, adiaŭis la bejon kaj forgalopis al la intermonto de Bozza.

La servisto pensis, ke lia mastro havos jam tempon por legi la portitajn leterojn. Pro tio li demandis sian mastron.

– Nu, kie estas tiuj leteroj? – demandis Emeriko pigre.

– Jam estas tri leteroj.

– Kiel tiuj multobliĝis?

– Fraŭlino Flora sendas la trian, kiam ŝi venis per kaleŝo antaŭ duonhor.

– Do, Ĉu ŝi iris antaŭen? Kion ili skribas?

Unue li legis leteron de Teleki. Li rapide legis tiun, kvazaŭ tiu ne estus interesa. Sed kiam li legis tiun, ke li devas defendi fraŭlinon Flora, li pensis, ke li klopodu plenumi tiun proponon.

Poste li komencis legi la leteron de Helena.⁵² Tiun li plurfoje finlegis. Pro tio li ruĝiĝis, ĝemetis kaj kaŝis la leteron en poŝon de sia vestaĵo. Li meditis. Poste li ŝirmalfermis la trian koverton. Li trovis en ĝi nur ŝian gefianĉan ringon, sed leteron ne.

Emeriko kelkajn minutojn gapis prenante la leteron, ankaŭ lia ĉevalo ekhaltis, lia kapo suben kliniĝis.

Post kelkaj minutoj li rektiĝis kaj laŭte kriis por aŭdu ankaŭ aliaj:

– Dio mia! Ĉi tiu letero venis en la ĝusta tempo!

La koverton li forĵetis, la alian leteron elprenis el sia poŝo kaj la ringon metis en ĝian koverton poste remetis tiun en sian poŝon. Lia vizaĝo ruĝiĝis kaj returnante la kapon de sia ĉevalo bonhumore diris al siaj servistoj:

Mi ne reiros al Transilvanio, sed iros al Mehadia...

⁵² La virina nomo Helena havas la hungaran nomoriginalon: Ilona. Ĉi tie temas pri grafino Ilona Zrínyi, pri kiu vi povus legi ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/Helena_Zr%C3%ADnyie

5. Landaj zorgoj

Kelkaj semajnoj pasis ekde Thököly foriris el Rumnik post la lego de la tri leteroj. Tiutempe Miĥaelo Teleki ankoraŭ restadas en Gyulafehérvár kaj ne iris al Déva⁵³ kun armeoj de Transilvanio. Li malbone fartas de multaj tagoj, pro la febra stato li estas pala kaj ĉiuj partoj de lia korpo ege doloras, kiam li ekmovas. Li pretendus trankvilon, sed ĉiam iuj venis al li por aranĝi diversajn aferojn. Sed kiam la plendon farantoj foriris, tiam venis la delegitoj de la regnestro kaj la turko.

Ankaŭ nun Naláczi estas ĉe li, kiu staras ĉe la fenestro, kaj Teleki sidas en sia brakseĝo. Sinjoro Teleki frostotremas pro la febro kaj la dentoj klakas, lia vizaĝo estas pala, la spiro estas varmega.

Apud li la juna Ĉerei, la paĝio, staras kaj en iu angulo malĝoje sidaĉas iu, kvazaŭ li timus ion. Post la malhelo ni ne kapablas ekkoni tiun, sed Teleki diras lian nomon kaj riproĉas tiun sed ne rigardas lin.

– Ĉu vi estas majstro Szénási⁵⁴, la ege mallerta stulta homo?

– Mi petas humile ...

– Petu nenion. Mi donis al vi kompate oficon por eduki la popolon kaj vi per superstiĉoj frenezigas tiujn.

– Mi tiel pensis, ke ...

– Kion vi pensis? Ĉu vi pensis, ke vi faris al mi servon?

– Tion diris al mi sinjoro Naláczi.

Naláczi fartis ĝenate.

– Nu, kiom freneza vi estas – interparolis Teleki – nome Naláczi povis diri al vi, sed mi ne scias, kion diris al vi sinjoro Naláczi, ke vi devus mencii la miraklojn de Dio kaj por entuziasmigi la homojn por ami unu la alian por ke la homoj estu fidindaj unu al alia. Sed vi teruradis la homojn per superstiĉoj kaj profetaĵoj.

– Mi tion pensis, ... (li ne kapablis fini la frazon.)

– Ĉu tion, ke ĉar mi varbas armeojn, bone estos al mi, se mi predikas pri la milito?

– Kaj mi tion dezirus, se oni la glavojn kaŝus sub la teron?

– Pardonon.

– Malaperu!

– Mi ne volas vidi vin aliokaze. Post tri tagoj foriru el Transilvanio, aŭ mi portigos vin de ĉi tie, sed tion vi ne dankos.

– Kion mi faru – petpetege demandis Szénási – se vi nun forsendas min?

– Faru, kion vi volas fari. Iru al la departemento Szatmár⁵⁵, estu lakeo de sinjoro Kopp, aŭ estu skribisto de Kászonyi⁵⁶. Mi ĝuste nun skribos al la lasta kaj mencios al tiu vin kaj la leteron vi povas porti al tiu.

– Kio okazos, se ili ne dungos min?

– Restu tie ankaŭ tiam, se iom ajn da mono ili donos por ne malsatmorti. Sed malaperu de ĉi tie rapide.

⁵³ Pri Déva vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Deva>

⁵⁴ La nomon Szénási bonvolu elparoli: senaŝi.

⁵⁵ Pri la estinta hungara nun rumania departemento Szatmár vi povas legi ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/Distrikto_Satu_Mare

⁵⁶ La nomon Kászonyi vi povas elparoli: kasonji.

La magistro tremetis kaj viŝadis la larmojn.

– Mia sinjoro – diris Naláczí post la foriro de la magistro – vi malsaniĝos pro la ekscito.

– Ĉi tio estas la traktmaniero pri ĉi tiuj homoj: riproĉi ilin pro ĉio, ĉar ili perfidas nin. Persekuti ilin, se ni ne volas, ke ili trompu nin.

– Mi ne tiel komprenis. Al via ekscelenco damaĝas la ekscito.

– Male la ekscito vivigas min. Se mi ne ĉagreniĝus pri io, tiam mi estus ege malsana. Prenu ĉi tiujn kelkajn talerojn kaj donu al tiu nenifaranto kaj diru al li, ke mi ege koleras lin. Li klopodu paciĝi kun si mem kaj ankaŭ mi forgesos pri li. Diru al li, ke li atendu ĉe la pordego, poste donu al li ĉi tiun leteron kaj diru, ke li forlasu Transilvanion. Diru al li krome, ke mi ne konas tiujn aferojn, kiujn li faris en Kolozsvár, ja se mi konus tiujn, tiam mi ekpeligus lin el la lando per skurĝo. Tiukaze li rapidos por foriri.

Naláczí⁵⁷ ridis kaj foriris. Teleki estis laca, metis sian kapon sur sian kusenon kaj petis sian paĝion forte froti liajn kolvertebrojn per iu flanelo. Sed dume la regnestro envenis. Ties vizaĝo estis kolera pro la kompatio. Jam ĉe la pordo li komencis riproĉi sinjoron Teleki.

– Kial vi ne enlitiĝis, ja mi ordonis tion? Kial vi estas malobeema? Kial vi ne vokas doktoron? Kial vi ne tranĉigas angion sur vi?

– Mi ne estas malsana, sed mi estas iomete ekscitita. Mi al kutimiĝis al tio.

Ej, sinjoro Teleki, vi vane parolas al mi, ja vi estas ege malsana. Vi estas anima malsana kaj tio kaŭzas la malsanon de la korpo. Ĉu kristano povas fari tion? Vi estas malsana pro tio, ĉar mia pli juna kuzino ne sukcesis pri sia geedzeco. Kvazaŭ ŝi ne estus kapabla trovi pli bonan edzon, ol sinjoreton Emeriko.

– Sed min ne interesas tio.

– Vi estas malbona kristano. Vi ŝatas nek Dion, nek homon, nek vian familion, nek min.

– Mia sinjoro! – Teleki diris petpetegante.

– Se vi ŝatus nin, tiam vi ripozus, enlitiĝus kaj nur sana ellitiĝus.

– Sed se mi enlitiĝas ...

– Kaj dume ankaŭ aliaj povas ripozi. Ne okazos tragedio, se tri tagojn vi ripozos en la lito: Nu, ek! Mi ne foriros ĝis vi enlitiĝas!

Kion fari!? Teleki devis obei kaj devis enlitiĝi, ĉar la regnestro ordonis tion.

– Vi ne povas ellitiĝi sen mia permeso – diris la regnestro kaj diris al Ĉerei: – Ne permesu ellitiĝi al via mastro. Ĉi tio estas mia ordono. Li ne rajtas fari malfacilan laboron, skribadon, legadon. Mi donas al vi permeson malpermesi la menciiton al via mastro. En ĉi tiun ĉambron krom mi, la doktoro kaj la familianoj ne povas enpaŝi. Ĉu vi bone ekkomprenis tion? Kaj vi, sinjoro Teleki, kovru vin bone kaj frotigu vin per flanelo, trinku ŝvitigilojn kaj metu sur vian kolon mustardon. Vespere lavu viajn piedojn en varmega akvo, en kiun vi metu salon kaj branon kaj sur viajn tempiojn metigu hirudojn. Ĝis la doktoro venos, tiujn pilulojn glutu.

Kaj la regnestro donis al li skatoleton da medikamentoj. Tiuj medikamentoj estis modaj tiutempe.

– Ĉio estos enorde, mia sinjora moŝto. Vespere mi venos denove al vi.

⁵⁷ La nomon Naláczí vi povas elparoli: nalaci.

Post ĉi tiuj la regnestro trankvile foriris pensante, ke li bone teruris sinjoron Teleki. Sed kiam la regnestro foriris, Teleki tuj diris al Ĉerei ke li portu la hodiaŭajn leterojn. Sed la paĝio meditis, kaj rigardis sian mastron, dirante:

– Sed la regnestro ordonis ... – diris li al Teleki admonante.

– La regnestro ŝatas ŝercojn – interparolis Teleki – ankaŭ mi ŝatas tion, se mi havas tempon. Malsigelu la leterojn kaj legu al mi.

– Kion diros la regnestro?

– Mi ordonas al vi, ne la regnestro. Legu tiujn kaj ne kompatu min, se vi aŭdos min ĝemi.

Ĉerei rigardis iun sigelon kaj ne kuraĝis ĝin rompi.

– Mia sinjoro, tio estas la sekreta sigelo.

– Rompu tiun kuraĝe. Por vi ne estas danĝeraj tiuj sekretoj, vi estas infano kaj ne devas timi tion.

Ĉerei rompis la koverton, kaj rigardante la leteron ekvidis la surskribon: „Leopoldo.”

Teleki aŭskultis la enhavon de la letero.

„Majesta regnestro! Mia sincera ŝatanto!

Mi eksciis de barono Kopp kaj Kászonyi, ke vi estas mia bonfaranto kaj helpas la aferon de la kristanoj. Mi klopodos helpi, ke la kristanoj gardu siajn rajtojn kaj liberecojn. Nome tiuj estas la danĝerigitaj, ĉar eksplodis la nuna turka milito kaj la turka imperio volas okupi miajn teritoriojn. Sed mi esperas, ke la reĝoj kaj regnestroj kaj Dioj helpas malhelpi tion. Cetere mi certigas vin kaj la nobelojn de Transilvanio defendi dum vi restas miaj bonfarantoj. Por gardi la bonan rilaton mi konfidis kaj sinjoron Kopp kaj sinjoron Kászonyi ke ili gardu la bonan rilaton. Mi deziras al vi sanon kaj feliĉon:

Leopoldo”

Ĉerei⁵⁸ timante rigardis la pordon, fenestrojn, estante scivola, ĉu iu ne subaŭskultas?

(Nu, post la foriro de Thököly multo ŝanĝiĝis, pri kio neniuj sonĝis.)

– Nu, legu la alian leteron.

Ĉerei nun komencis forte ŝviti malsigelante la koverton. Nome sur la letero li ekvidis la subskribon de la ĉefveziro, kiu skribis la leteron al la regnestro de Beogrado:

„Via plej majesta regnestro!

Kun sincera estimo ni anoncas al vi, ke fortikaĵon de la sultano, Nyitra⁵⁹-n la nekredema malamiko ĉirkaŭbaris kaj por helpi niajn bravulojn kontraŭ la fortikaĵo ekirigis la atakon. Pro tio aliĝu al niaj armeoj sen malfruado. Ni kredas, ke vi helpos la grandpotencon havantan sultanon, kaj tiam tiu donacos al vi favoron abunde. Paco estu al tiuj, kiuj obeemas al Dio.

La ĉefveziro”

⁵⁸ La originala formo de la hungara familionomo estas: Cserei/Ĉerei.

⁵⁹ Pri Nyitra (Nitro) bonvolu legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Nitro>

Ĉerei frostotremis finlegante la leteron, same kiel lian mastron Teleki. Li kaŝrigardis maltrankvile la vizaĝon de Teleki, kiu havis nur rimorson, en liaj tempioj moviĝis la angioj.

– Portu al mi – diris Teleki al la paĝio mallaŭte – glason da akvo, metu en ĝin rabarbo-pulvoron por trinki.

Ĉerei kredis, ke lia mastro ne aŭdis la tekston de la letero, rapide portis la akvon, trinkigis lin kaj kovris lin. Sed Teleki denove frostotremis. Li iĝis febra.

Ĉerei volis kuri por la doktoro.

– Kien vi iras? – demandis Teleki – portu inkon kaj pergamenon, skribilon kaj skribu, kion mi diktas.

La paĝio obeis gapante.

– Tiru tiun tablon, sidiĝu apud ĝin kaj skribu tiun, kiun mi diras.

La paĝio tremetante skribis. Teleki balbutante diktis la frazojn.

„Majesta ĉefveziro! Mia plej kara mastro!

Ni ekkomprenis, ke kontraŭ la malamikoj de la sultano, kiuj sieĝas la fortikaĵon de Nyitra, ni klopodu unuiĝi kun armeoj de tiu, sed ni kapablus plenumi, se ni havus sufiĉe da furaĝo. Sed se ni havus sufiĉe da furaĝo tiam ni obeus. Krome tiu famo komencas disvastiĝi, ke al la limo de Transilvanio malamika armeo proksimiĝas. Pro tio ni devas esti singardaj. Dum ĝusta tempo ni informos vin kaj petas la favoron de Dio por vi.

Teleki”

Ĉerei ĝemetante pensis, ke la respondo estos, ke furaĝo estos tie abunde. Sed Teleki sciis, ke la lando havas malmulte da furaĝoj pro la inundoj, kaj la turka armeo ne havas sufiĉe da furaĝo. Teleki pro tio ne klopodis unuiĝi kun la armeo de la sultano, sed la turkoj rapidas por unuiĝi. (Ĉi tiel ŝancas aferoj de la mondo pri la fojnostako.)

– La duan leteron skribu al barono Kopp kaj estiminda sinjoro Kászonyi al la ĉefkomandanto de fortikaĵo Szatmár – daŭrigis Teleki kaj diktis la tekston al Ĉerei kaj dume tiu aŭdis la ĝemon de Teleki pro la febro.

„Mi ĝojis pro via celo, ke vi klopodas okupi tiun pordegon, kie niaj malamikoj povas ataki nin. Dio helpu vin en la intereso de tiu afero! Se vi farus tian batalbruon, kiu povus liberigi nin por foresti de la turka militiro, ni estus ege dankemaj. Cetere ni devus armeon doni kontraŭ la kristanaro, nur kies nomo estos militarmeo. Ni petas la favoron de Dio por ambaŭ vi.

P.S: La heroldo de ĉi tiu letero estu via heroldo.

Teleki”

Ĉerei gapis sian mastron, kiu entuziasme diktis la leterojn, ne interesis lin lia febra stato.

– Skribu la sekvan leteron al sinjoro Ladislao Ebéni, vicgubernatoro de Kolozsvár.

„Ni klopodas komuniki al vi, povas esti, ke la fortikaĵkomandantaro de Szatmár atakos Transilvanion. Povas esti, ke tiu ĉi estas nur falsa alarmo, sed estus bone, se viaj armeoj estos pretaj por defendi la urbon. Mi ne sendas al Hungario armeojn, ĉar mi ne volas lasi sen defendo Transilvanion. Pro tio estu ege singarda.

Teleki”

Ĉerei⁶⁰ finis la skribadon trankvile.

- Nun portu tiujn leterojn al la regnestro por subskribi tiujn.
- Sed tiu vangofrapos, ĉar mi lasis vin dikti. – diris la paĝio ektimante.
- Vi povas suferi por la patrujo. Ankaŭ mi ricevis vangofrapon, sed tamen iĝis plenkreskulo.

Kaj Teleki kovris sin. Estis feliĉo, ke Apafi estis en ĉambro de la regnestrino kaj pro tio li ne ricevis vangofrapon. Apafi subskribis la leterojn kaj en ĝusta tempo ĉiuj ricevis tiujn. Ĉu la leteroj estis sukcesaj? Tion ni spertos laŭ la efikoj de la leteroj pli malfrue.

Küprili blasfemis kaj promesis, ke akiros furaĝon perforte! Li baldaŭ donos al ili decan porcion da batoj.

Barono Kopp kaj Kászonyi ridetis kaj la gubernatoro de Kolozsvár murmuris: „Mi ne bedaŭras, sed vi ne bedaŭru!”

Kiam sinjoro Ebéni legis lian leteron, li metis tiun flanken kaj murmuris: „Se mi akceptus ĉiun falsan alarmon, tiam mi ĉiam varbus la soldatojn. Tio ŝajnas tiel, ke Teleki havas neniun aferon, krome ke li skribadas al mi leterojn, ĉar li enuas.”

⁶⁰ La nomon Cserei vi povas elparoli ĉerei.

6. La tago de Nagyvárád⁶¹

En la intereso de la klarvido ni devas diri, ke en ĉi tiu tempopunkto du gravaj lokoj estis en Hungarujo proksime al Transilvanio: Nagyvárád kaj Szatmárnémeti⁶². Tiujn oni povas nomi Pordegoj de Transilvanio. Tiuj povis esti bonaj azilejoj, se ties ŝlosiloj estis ĉe Hungarlando, sed se pri tiuj disponis fremda potenco, tio estis danĝera afero.

Tiutempe la fortikaĵo de Szatmárnémeti estis okupita de la germana armeo, la fortikaĵon de Nagyvárád la turkoj okupaciis, jene la germana blazono ĝuste tiel minacis kiel la turkaj duonlunoj. Tiuj loĝantoj, kiuj loĝas en tiuj setlejoj, tiuj estas inter la du fortikaĵoj, ne povas scii, de kie venos la malamiko, ĉar ĉiuj armilanoj estas malamikoj. Ili devas kaŝi de antaŭ la kurucoj, turkoj, imperiestranoj la tritikon, bovon kaj edzinon. La bona amikeco estas multfoje pli multekosta, ol la malamikeco. Nome se la Szatmár-anoj ekscias, ke iu donis bonkore fojnon, grenon al la Nagyvárád-anoj patroladantoj, sen sufero pro ricevita kapofrapoj, tiam la aliaj Szatmár-anoj al la Nagyvárád-anoj aplikas punon. Sed se la turkoj eksciis, ke iu kare akceptis la Szatmár-anojn, tiam la turkoj forbruligis la domojn de la Szatmár-anoj por ke ĉe ili ne troviĝu plu soldatoj de Szatmár. Kaj la tieajn fraŭlinojn ili kunportas perforte en siajn haremojn por ne paroladi plu kun la soldatoj de Szatmár.

Estis ankoraŭ iu tria malamiko. Tiu estis la bando de la betjaroj kaj rabistoj. Ili loĝis de la marĉo Eĉed ĝis la marĉo Alibunar⁶³, kiuj ne serĉante kaŭzon rabis kaj bovarojn, prirabis domojn, kaj solajn homojn. Inter la vojrabistaj membroj de la ĉiunaciaj rabistbandoj estis foj-foje iu feliĉa fraŭlo, kiu faris nekredeblajn krimojn laŭ la famoj de klaĉoj, kaj tiu iĝis estro de la bando. Multfoje la membroj de la bando ankaŭ ne konis tiun, pro kiuj tiu havis prestiĝon inter la bandanoj.

En tiuj jaroj simila figuro estis Francisketo Kökényesdi, pri kiu oni parolis multspecajn eksterordinarajn aferojn. Tiu estis misfama ĉefo de rabistbando, kiu havis sep batalionojn, faris nekredeblajn krimojn, li vivis multfoje en remparitaj terfortikaĵoj, kiuj estis neatingeblaj por la malamikoj, kaj havis tiajn deponejojn, kie li havis la rabbitajn ĉevalojn. Tiuj ĉevaloj bone kuris kaj blekis ekkoninte de malproksimo la malamikon, kiam ili flaris ilian odoron. Li estis fortegulo kaj eĉ la ĝendarmo ne kapablas atingi kaj venki lin. Liajn kaŝejojn neniuj povis atingi.

Sed tiu, kiu laŭ la onidiroj volas ekkoni tiun bandoestron, tamen ne povas ekkoni lin. Sinjoro Kökényesdi⁶⁴ ne estis giganto, ne estis magiisto, kiu kapablas malaperi de antaŭ la ĝendarmoj, nur kelkaj ĝendarmoj vidis post li fatamorganon. Li estas iu pia malaltstatura maldika burĝo de Hódmezővásárhely⁶⁵, kiu havas kvin domojn, du farmojn kaj honore pagas la porcion. Tiu havas bovarojn, ĉevalarojn, pri kiuj li kapablas pruvi ke ili ne estas ŝtelitaj.

Sed ĉiuj scias, ke la bovarojn, ĉevalarojn li akiris ne de nomo de Dio kaj li estas la misfama estro de la armilhava elektita teamo de rabistoj. Kiu estus kapabla tiun pruvi? Ĉu iu vidis lin rabi? Ĉu iu rekonis lin dum rabado? Ĉu li ne havis ĉiam alibion?

⁶¹ Pri la iam hungara, nun rumania urbo vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Oradea>

⁶² Pri Szatmárnémeti vi povas legi ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/Satu_Mare

⁶³ Pri la marĉo de Alibunár, vi povas legi en la artikolo: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Alibunar>

⁶⁴ La nomon Kökényesdi bonvolu elparoli: koekenjeŝdi.

⁶⁵ Pri la hungara urbo Hódmezővásárhely vi povas legi ĉe:

<https://eo.wikipedia.org/wiki/H%C3%B3dmez%C5%91v%C3%A1s%C3%A1rhely>

Kiam disvastiĝis la famo, ke li rabis en la tuta departemento Máramaros⁶⁶, tiam li havis alibion kaj atestantojn, laŭ kiuj li plugis semis sur sia farmo kaj la juĝisto ne povis konsideri la aŭtentikon de la atestoj.

Ĉu neniu aŭdis, ke en Vásárhely kaj en ĝia limo iu ŝtelus en lia nomo, aŭ aĉetus ŝtelitajn brutojn en lia nomo? Ĉiuj konis lin, kiel honestan, pian mastrumanton, kiu faris la laborojn de la farmo. Kiujn li vizitis, tiuj neniam vidis lian vizaĝon kaj persekuti lin neniu volis. Tiu estu kuraĝa, kiu volas postiri lin en la prerio, aŭ en la marĉo. Kiam jam multe da homoj persekutas lin, tiam li translokiĝas al pli malproksime estanta departemento, sidiĝas sur sian pelton apud sian ĉevalon, dum tio liaj persekutantoj vidas lin, sed ne povas persekuti, nome tie estas la posedaĵo de la paŝao de Temesvár⁶⁷.

Ankaŭ tio okazas ofte, se la partioj ne kapablas venki kontraŭ sia kontraŭulo, tiam aperas aliaj nome de Kökényesdi, al kiuj oni diras la diskutantan aferon, kiuj provokas la departementojn kaj tiuokaze la rabistoj faras precizan laboron. Se la germanoj pagas, tiam ili prirabas la turkojn, se la turkoj pagas, tiam ili prirabas la germanojn. Kiam ni diras turkon, aŭ germanon, tiam devas kompreni tiujn hungarajn kaj valaĥiajn setlejojn, kiujn posedas la turkoj, aŭ germanoj. Sed ni daŭrigu la historion.

Tiutempe en la gardistaro de la fortikaĵo de Szatmár estis iu centestro, laŭnome Ladislao Rákóczi⁶⁸. Nome kiam la edzo de Helena Zrinyi iĝis papisto, tiam la familio Rákóczi en Vieno iĝis edukita kaj li inter ili ricevis imperiestrajn oficirajn oficojn, kiuj estis ege ŝatataj pro sia braveco. Same iĝis ankaŭ Ladislao Rákóczi la centonoestro de muskedistoj. En lia centurio estis ĉefe hungaraj fraŭloj, pro kio ni ne devas paroli pri tio, nek pri tio, ke la regnestro de Transilvanio havis germanajn regimentojn en siaj pli gravaj fortikaĵoj: en Kolozsvár kaj en Székelyhid⁶⁹.

Tiu okazis, ke Ladislao Rákóczi, kiu estis bonkora, silenta, bela kaj bonstatura fraŭlo, enamiĝis al Kristina, filino de Adamo Rhédeí, kiu loĝis en Rékas. Ŝia patro konsentis pri la geedzeco kaj li ofte vizitis ŝin el la fortikaĵo de Szatmár. Liaj kamaradoj akompanis lin kaj en Rékas ĉiuj akceptis ilin kare kaj gastame.

La paŝao de Nagyvárad eksciis, ke iu terbienulo de Rékas (Rekaŝ) sian filinon volas edzinigi al iu germana oficiro kaj oni diris ankaŭ tion, ke la fraŭlino estas treege bela. Efike de tio dum iu nokto paŝao Hali kaŝiras kune kun siaj spahioj el Nagyvárad al Rékas, surprizante la Rékas-anojn forbruligas la domon de Adamo Rhédey, lasas la spahiojn prirabi, Adamon batigas per skurĝo, ligigas al putforko kaj sur sian terurantan filinon superkaptis apud sin mem sur sian ĉevalon kaj el la brulanta setlejo regalopis al Nagyvárad.

Ladislao Rákóczi sekvatage alvenis por partopreni la geedziĝon, sed nur la brulantan setlejon vidis. La geservistoj, kiuj kaŝis sin de antaŭ la spahioj, diris al li la noktajn okazintaĵojn kaj, ke paŝao Hali forrabis lian fianĉinon.

La senvorta fianĉo nenion diris, nome hungara homo ne parolas, se li iun malbonon havas, sed reiris al la gubernatoro kaj petis lin por povi iri kune kun sia centono por ataki la fortikaĵon de Nagyvárad.

⁶⁶ Pri la iam hungara loko Máramaros vi povas legi ĉe:

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Maramure%C5%9Do>

⁶⁷ Pri Temesvár vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Timi%C8%99oara>

⁶⁸ La hungara virnomo László esperantonome estas Ladislao.

⁶⁹ Pri Székelyhid vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/S%C4%83cueni>

La gubernatoro vidis la deciditan volon de la fraŭlo, kiu ankaŭ sole atakintus la turkon. Pro tio la gubernatoro promesis, ke la tutan gardistaron li donos al la fraŭlo, sed li konvinku la nobelojn de la ĉirkaŭaĵo batali kontraŭ paŝao Hali.

Tiujn nobelojn estis facile konvinki, ĉar la turkoj tiujn prirabis, ĉies parencojn murdis, aŭ forrabis iliajn fraŭlinojn. Ili tuj aliĝis al la prestiĝon havanta armeo.

Ĉi tio estis tiu entreprenado, pro kio Teleki skribis al la barono Kopp, ke pro tio ne okazis la militiro de Hungario kaj tiel li faris kvazaŭ li helpus paŝaon Hali, kiu havis danĝeron pro kio li defendas la landon. Sed li la saĝa konsilisto pensis ankaŭ pri tio, se sinjoro Kopp volus ataki la fortikaĵon de Kolozsvár, tiam li informos sinjoron Ebéni por antaŭprepari sin kaj sian gardistaron por defendi la fortikaĵon.

Sed sinjoro Ebéni⁷⁰ saĝe flankenĵetis la leteron de Teleki, tamen la Szatmár-anoj ekkomprenis, ke al Teleki plaĉus, seili ne lasus ripozi magistron Szénási. Pro tio la magistron ili sendis por serĉi sinjoron Kőkényesdi.

La turkoj okupis la urbon Nagyvárad kaj en tiu tiel ennestigis sin, kvazaŭ ili volus atesti la muzulmanajn tradiciojn, laŭ kiuj ili neniam forlasu memvole tiun lokon, kiun ili okupis, kaj tie konstruis templon. La historio ne konas multe da kazoj, kiam la turko transdonus iun fortikaĵon, sed nur tiam, se oni devigis transdoni ĝin.

De la jaro 1660, kiam paŝao Hali okupis la fortikaĵon, tiam inter la fortikaĵo kaj la malnova urbo estiĝis nova turka urbo ĉirkaŭbarita de forta lignotabulbarilo. Nur malvastaj pordegoj estis, kiuj estis la enirejoj. En tiu nova turka urbo loĝis komercistoj, kiuj vendis la aĵojn forrabitajn de la gardistaro. Ili vendis tiujn bovojn, sklavojn, kiujn la spahioj forrabis. Ili forportis la rabitajn aĵojn ĝis Bagdad, kiujn la paŝao Hali kolektigis. En Hungarujo tiutempe ili rabis bovarojn, sklavojn. Sed la belaj fraŭlinoj estis serĉataj kaj la muskolajn fraŭlojn oni serĉis por laborigi. La lastajn la paŝao malmultekoste vendis al la komercistoj de Erzurum⁷¹ kaj tiuj multekoste vendis al ili la vestaĵojn kaj incensilojn.

Ĉi tiel iĝis ĉiam pli kaj pli fama la bazarplaco de Nagyvárad. Tie estis dense unu apud alia konstruitaj domoj, inter kiuj eĉ ne strato estis kaj tra la domoj de la najbaroj iris la homoj en siajn domojn. Inter la domoj estis multe da ornamaĵaĉoj kaj brilajaĉoj, pendantaj orientaj tapiŝoj kiuj kovris la malpuraĵojn. La kunĉarpentitajn domojn kovris pompaj ŝtofoj orientaj. Sur la stratoj estis multe da malpuraĵoj kaj senmastraj hundoj. Se en la malvastaj stratetaĉoj du dromedaroj renkontiĝis, tiam ili ne povis preterlasi unu la alian.

Ĉar en la ĉirkaŭbarita urbo la rabitaj bestoj jam ne havis lokon, pro tio sur la bordo de la rivero Pece, kie estis iu ĉirkaŭbarita placo, baŝkiroj gardis la bestojn per longaj lancoj kaj treege ili devis atenti, ĉar ili sciis, ke Kőkényesdi estas ruza kaj kapablas dekumi la bestarojn. Kőkényesdi estis pli ruza, ol Ali de Egiptio, kiu estis kapabla vendi al la germanaj oficiroj la ĉevalojn de paŝao Hali, spite de tio, ke la ĉevaloj estis en fermita loko. Sed laŭokaze ne nur la ĉevalon, sed ankaŭ mem la ĉevaliston li kapablis forŝteli.

Okazis multe da similaj aferoj, sed mi mencias nur kelkajn okazojn.

Kőkényesdi iris al bordo de la rivero Pece portante inversigitan pelton surkape grandan ĉapon kaj enmane nodbastonon, kie iu kurdo gardis la plej ŝatatan ĉevalon de Hali. La nomo de la ĉevalo estis Ŝebdiz.

- Ho, kiom bela estas via ĉevalo! – diris la ĉevalaristo al la kurda fraŭlo.
- Tiu estas bela, sed ci hundo ne meritas tiun!

⁷⁰ La nomon Ebéni, bonvolu elparoli ebeni.

⁷¹ Erzurum estas urbo en Turkio: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Erzurum>

– Sed mi forŝtelos tiun hodiaŭ nokte!

La kurdo pensis: „Ankaŭ mi estos tie!” Poste la kurdo surĉevaliĝis kaj prenis la longan lancon pensante: Venu nun, se vi volas akiri tiun ĉevalon!

– Sed mi ne nun forŝtelos tiun – diris Kökényesdi – mi atendos ĝis mateno.

Kaj li sidiĝis sur la bordo de Pece kaj kaŝis sin en la pelton. La kurdo nur gapis lin konstante, ĉar li timis, ke la ĉevalaristo faros iun superstiĉon. Sed tiu ne moviĝis, sed sekrete rigardis la kurdon.

Dume vesperiĝis. La kurdo iĝis jam dormema pro la malhelo kaj fine ekenuis pri la afero.

– Malaperu! – kriis la kurdo.

Kökényesdi ne respondis. La kurdo atendis plu, rigardis la ĉevalariston, sed jam apenaŭ estis kapabla resti veka.

– Foriru! Ĉar mi trapikos vin per mia lanco.

Sed la pelto de la ĉevalaristo ne moviĝis. La kurdo iĝis furioza, deĉevaliĝis, iris al la bordo de Pece kaj sian lancon puŝis en la figuron. Li surpriziĝis, ĉar li vidis bastonon, kiu estis pikita enteren, kaj sur ĝi la pelto kaj la ĉapo estis metitaj. Nome Kökényesdi elŝoviĝis el la pelto kaj kaŝis sin. La kurdo ankoraŭ ne konsciiĝis kiam aŭdis vipobatadon kaj vidis, ke Kökényesdi, sidante sur Ŝebdiz, saltigas la ĉevalon eĉ super lian kapon trans la kavon, dume alkrias al li:

– Ne estas larĝa ĉi tiu kavo por ĉi tiu ĉevalo!

Alifoje la makedonoj de la setlejo Saraĉ ĉirkaŭprenis la dormejon de la rabisto, kiam li dormis en iu ĉardo. Li subite surĉevaliĝis, sed ĉie vidis turkojn galopantajn vid-al-vide al li. Ĉe la limo situis larĝa lago. Oni pelis lin al la lago. Kökényesdi ensaltigis en la lagon. La turkoj ĉirkaŭstaris la lagon pro kio la ĉevalaristo nenien povis fuĝi. Feliĉo estis, ke la lago ne estis profunda kaj lia ĉevalo ne devis naĝi. Li subite ekvidis dikan turkan soldaton. Li ekgalopis al direkto de tiu ĵetante longan lazon kaj kriadis:

– Hodiaŭ vi mortas, pagano, ankaŭ tiam, se vi havas cent animojn!

La turka soldato ĉagreniĝis, ĉar la betjaro ĝuste lin volis mortigi kaj alkriis:

– Ne min ataku hundo, sed ilin!

La turko ne diris ion alian, sed flankeniris. La ĉevalaristo vidante la estiĝintan liberan vojon por fuĝi, do li kiel uragano forgalopis al la prerio kaj malaperis de antaŭ la okuloj de la turkoj. Ili ne estis kapablaj por persekuti lin.

Magistron Szénási oni informis pri tio, kie estas trovebla Kökényesdi. Oni diris, ke li troveblas en Demecser⁷², kie la fama paŝao kantonmentis. Oni kondukis la magistron al Kökényesdi, kiu rakontis al tiu, ke la sinjoroj de Szatmár sendis lin al la betjaro por peti tiun por helpi ilin kontraŭ la turkoj.

Kökényesdi sidis komforte ĉe iu fojnamaso, rigardis la magistron, kiu ne kuraĝis rigardi la betjaron. – Kiam Szénási finis la parolon, la betjaro kolere kriis al la magistro:

– Mia sinjoro! Vi mensogas! Vi estas spiono! Vin mi pendumas. ...

Szénási, kiu ne konis la ecojn de la betjaro, terenfalas pro timo. Poste Kökényesdi supereme ridetante diris:

– Nu, ne timu, ja mi ne manĝas vin, sed diru al la sinjoroj, ke ne vin ili sendu al mi, ĉar oni kredas nek vian nunan diron nek tion, se vi diras la veron. Poste diru al ili, ke ili ne mesaĝadu al mi per aliaj, ĉar min ili facile povas trovi en Püspökladány⁷³. Ili iru

⁷² Demecser estas hungara urbo: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Demecser>

⁷³ Pri la hungara urbo Püspökladány vi povas legi ĉe:

<https://eo.wikipedia.org/wiki/P%C3%BCsp%C3%B6klad%C3%A1ny>

en la plej lastan domon kaj demandu: „kie estas la gastejo de Barátfa?” La dommastro informos vin. Kaj nun malaperu, foriru hejmen treege rapide kaj ne rigardu reen.

La magistro hejmen atingante raportis pri sia vojaĝo, transdonis la mesaĝon al la sinjoroj, pro kio ili sendis sinjoron Raining, ĉefkvartirmajstron, Johanon Topay, leŭtenanton de tribunalo, kaj Ladislaon Rákóczi al Püspökladány.

La sinjoroj forveturis al Püspökladány, kie ili devis atendi la vesperon ĉe la domo de la juĝisto, kvankam Raining kaj Rákóczi prefere tage voluntus renkontiĝi kun Kökényesdi. Dum la atendado Raining scivoleme demandis la juĝiston: „ĉu estas malproksime la gastejo de Barátfa?”

La juĝisto kapbalancis, dirante, ke ĉi tie ne estas tiunoma gastejo. La kvartirmastro tion pensis, ke la juĝisto certe estas fremdulo ĉi tie kaj demandis kelkajn lokajn maljunulojn, sed tiuj tie respondis la samon, ke ĉi tie sur la prerio ne estas gastejo de Barátfa. Sed se estus tie gastejo, la prerio de Barátfa ne ekzistas.

– Nu, se ĉe la lasta domo oni ne konas tiun betjaron, tiam ni povas hejmeniri. – diris Raining en si mem.

Post la malheliĝo li demandis la mastron de la domo, kiu trankvile sidadis ĉe la pordo.

– Donu la Dio bonan vesperon, mia sinjoro! Kie estas la gastejo de Barátfa?

La dommastro unue bone observis la demandanton, poste diris al tiu:

– Bonan vesperon! En tiu direkto!

– Ni deziras iri tien. Bonvolu montri al ni la vojon – petis Topay.

La dommastro prenis la manon de la demandanto kaj montris al iu subĉiela fajro de paŝtistoj.

– Tie lumas ties fenestro.

– Kiu vojo kondukas tien?

– Unu estas pli proksima, la alia estas pli baldaŭa.

– Kion signifas tio?

– Kiu iras sur unu vojo, tiu povas erari, kaj kiu iras sur alia vojo, tiu povas submarĉiĝi.

– Konduku nin tien – interparolis Rákóczi kaj metis ormoneron en la mankavon de la dommastro.

La dommastro rigardis la ormoneron kaj redonis ĝin al Rákóczi, dirante, ke li donu prefere al li kupromonon, kiu ne estas falsaĵo.

Poste la dommastro kondukis la sinjorojn tra la marĉo en la marĉakvo irante. La akvo atingis ilian talion. Ili vidis akvajn birdojn sidantaj sur siaj nestoj. Fine ili forlasis la marĉon kaj ekvidis la fajron de paŝtisto, kiu lumigis figuron de iu staranta rajdisto.

La dommastro ne iris plu kaj la sinjoroj rajdis al la fajro. Sed subite la fajro estingiĝis kvazaŭ iu ĵetintus malsekajn kanojn sur ĝin.

Topay salutis la rajdiston levante la ĉapon kaj iris pli proksimen.

– Vi venis triope – menciis la rajdisto singarde – sed ne gravas. Mi neniun timas, eĉ se vi kunportintus pli multe da homoj. Nome en miaj selarkoj estas pistoloj, per kiuj eblas pafi dek ses kuglojn. En la kugloj estas magneto kaj la kuglo atingas la homojn ankaŭ tiam, se mi celas al tiu.

– Ĉio estas enorde, sinjoro Kökényesdi – diris Topay. – Ni ne pro tio venis, ke vi pafadu al ni. Sed ni petas vin fari aŭdacan faron: neniigi la sovaĝan paganon malamikon.

– Ho, mia sinjoro, mi faras tion ankaŭ sen vi. En la fortikaĵo de prerio de Baboĉa⁷⁴ estas puto, kies profundeco estas 110 klaftoj. Tiu puto estas plenigita de turkaj kranioj. Mi trankviliĝos nur tiam, se sur la kraniojn mi faros turon el la samaj elementoj, kaj la turalteco estos same 110 klaftoj.

– Mi kredas tion, sed vi havus nun ne nur gloron sed ankaŭ predon.

– Mi havas jam sufiĉe da gloro. Oni konas min ankaŭ eksterlande. Mi iĝus kolonelo de la franca reĝo ĉe iu lazon ĵetanta regimento se mi volus; kaj nun, kiam la angla reĝo aŭdis, kiel mi elboris la fundojn de la Tiso-riveraj ŝipoj, li rekomendis al mi gravan oficon por varbi subakvan regementon kiu detruos sub akvonivelo. Mi konas jam tiujn aferojn, kiuj por mi estas infanludoj.

– Mi scias, mia sinjoro. Sed nun vi havos ankaŭ multe da kaptaĵakiraĵo..

– Min ne interesas la predoj. Se mi volas havi multe da ormoneroj kaj fajnaj perloj, tiam mi havu tiujn.

– Ĉu vi vere havas multe da trezoroj? – interparolis Rajning scivole.

– Ĉu mi volus tiujn trezorojn? – diris Kőkényesdi, nome li sentis, ke li trovis adekvatan kontraŭulon. – Rigardu la deponejon en la groto de Silice⁷⁵, kie la stako de arĝento estas dumetra. Sed rigardu la deponejon de Halaŝ, kie estas kaŝitaj diamantoj, rubenoj, fajnaj perloj, eĉ mi ne konas ties kvanton.

– Ĉu oni ne forrabas tiujn trezorojn?

– Tiujn oni ne kapablas forrabi, ĉar la enirejoj estas kaŝitaj kaj neniuj kapablas ek trovi. Se min oni tro turmentus, eĉ tiam mi ne kapablus malsekretigi la lokojn de la enirejo. Nome la ventomovata sablo konstante kovras la enirejojn. Nur unu besto trovas tiujn: tiu besto estas mia ĉevalo. Sed ĝi ne perfidas la sekreton kaj se alia eksidas sur ĝin, tiam ĝi ne ekiras.

– Kiel vi akiris tiujn trezorojn? – demandis Raining gapante.

– Do, tiujn donis Dio – respondis Kőkényesdi tirante la ŝultrojn kaj brovojn.

– Ĉu li donis tiujn? – demandis la germana sinjoro malkomprenante.

– Jes, vere Dio donis tiujn – diris Kőkényesti – kiam la vento apud mian kampon de Demecser pelas iun naĝantan marĉon, tiam sur ĝi densa herbaro estiĝas kaj poste la vento denove plupelas tion sur la transan bordon, kie oni falĉas la herbon kaj faras staketojn. Kaj nokte alia vento venas kaj pelas al mi la marĉon kaj mi forportas la staketojn, ja tiujn Dio donis al mi.

– Tio estas saĝa afero – diris Topay⁷⁶ – tio estas vere saĝa afero, sed ni demandas vin: ĉu vi venus al ni por helpi ataki la turkon de Nagyvárád? Kiom da ormonoj vi petus por la helpo?

– Do, tion estas malfacile diri, ĉar se mi volas kolekti miajn deksep batalionojn, tiam mi devas manĝigi, drinkigi kaj devas pagi tiujn.

– Ĉu vi havas deksep batalionojn? – demandis mirante pri tio Rajning. – Ĉu vi havas sufiĉe da lokoj por la soldatoj?

– Do, la soldatoj estas dise-mise en la lando. Nome estas multe da ruinaj fortikaĵoj kaj grotoj en la montaro Bük⁷⁷, Bakony⁷⁸. Estas tie en Bodókvár⁷⁹! Babocsavár!

⁷⁴ Pri Baboĉa vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Bab%C3%B3csa>

⁷⁵ La glacian groton de Silice au Lednice, slovake Silická l'adnica, vi povas trovi en la teritorio de la slovakaj karsto.

⁷⁶ La familionomon Topay bonvolu eldiri topai.

⁷⁷ Pri ri la montaro Bük vi pova slegi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/B%C3%BCkk>

⁷⁸ Pri la monto Bakony vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Bakony>

Leányvár!⁸⁰ Földvár! Jákóvár! Adorjánvár! Csekevár! Hajnácskő⁸¹, Vaškő⁸², Bélkő⁸³, Kékkő,⁸⁴ Borostyánkő⁸⁵! Kaj estas multe da ruinaj fortikaĵoj en la prerio! Tie estas ankaŭ kanonoj. Kaj estas Abaliget⁸⁶, Semiluka, Balikaluka. Kaj estas la insuloj de la marĉoj, arbaroj kaj la sablodunoj. Tiuj menciitaj lokoj estas bonaj aziloj por la malriĉaj fraŭloj. Sed oni povas neniigi la fraŭlojn facile, se ili ne unuiĝas.

– Ĉu facile? Tio tute ne estas certa. Eĉ dek homoj ne kapablas venki unu mian homon. Certe vi memoras, kiam mia leŭtenanto defendis sin dum viaj dudek kamaradoj antaŭ groto de Abaliget. Kaj kiam viaj ducent homoj okupis la enirejon, tiam ili kuregis por ekkapti lin, kaj enfalis en iun profundan kavon. Ĉiuj tie mortis. Ankoraŭ nun tie estas iliaj ostoj. Sed kiam apud la marĉo de Mustonga du mil rajdantoj atakis nin, tiam ni iris en iun profundan valon kaj super ni estis morta marĉa aero, kiu kapablas mortigi la homojn. Sed super la valo jam estas freŝa aero. Kaj ni per longaj kanoj suĉis la freŝan aeron. La kontraŭuloj vidante, ke ni vivas, atakis nin, sed la morta maĉa aero mortigis ilin. Ĉu vi memoras tiun kvin montetojn apud la setlejo Atyás? Tiujn ni faris. Kvincent turkoj atakis nin, ni estis kvin kamaradoj. Ni lotumis el inter ni iun, kiu surmetis kamparanan vestaĵon kaj alsidis ĉaron. Ni metis sur la ĉaron barelon da vino, kiun mi forte venenis. Ni ekirigis la ĉaron en la tendaron de la turkoj. La turkoj haltigis lin kaj demandis: „Kion vi portas”? La turkoj demandis: „Ĉu la vino ne estas venenita?” Li neis, kaj li drinkis el la vino. La turkoj drinkis post li la tutan vinon. La turkoj jam matene estis senvivaj. Ili estas sub la kvin montetoj. Ankaŭ aliajn aferojn ni faris.

– Tiuj estas belaj aferoj, sinjoro Kökényesdi – interparolis Topay – kaj tiujn ni konas. Sed ni dezirus scii la monsumon por via servo.

Kökényesdi pripensis.

– Nu, ĉar temas pri vi kaj mi ne volas peti multe, mi kalkulas: se mi ekiras kun la dek sep batalionoj, tiam mi petas por bataliono po mil talerojn. Tio estas po homo unu talero. Mi havas neniun profiton, nur la koston de la mortintoj. Tio estas sume dek ses mil taleroj.

– Tio ne okazos tiel kiel vi diras, sinjoro Kökényesdi. Ne portu ĉi tien dek sep mil homojn, nur po cent homojn en bataliono. La aliaj restu hejme kaj vi ricevas sepcent kupro-forintojn.

– Tju! – eksaltis la rabisto – Ĉu vi kredas, ke mi estas cigana vojevodo, aŭ valaĥia latrono, kiujn oni povas pagi per kupromono? Por ĉi tiom da mono mi ne entreprenas laboron, nenien iras, prefere dormas.

– Ja vi havas multe da monoj – interparolis Raining naive.

⁷⁹ En la hungara lingvo la vorto: vár = fortikaĵo.

⁸⁰ Leányvár (leAnjvAr), estas vilaĝo en Hungario en la regiono Meza Transdanubio,. La nomo signifas fraŭlinofortikaĵo: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Le%C3%A1nyv%C3%A1r>

⁸¹ Ankaŭ en Hajnácskő alinome Ajnácskő (nun en Slovakio) estis fortikaĵo, unue menciita en 1344.

⁸² La nomo Vaškő montras vilaĝon en la nuna Rumanio, kie la roko kaŝis ferminejon.

⁸³ La monto Bél-kő estas la komencanta membro de „la montarĉeno” ĉrkaŭzonanta la Bükk-altebenejon.

⁸⁴ Kékkő estas malgranda urbo en Slovakio. La urbo noma signifo estas en ĉiuj lingvoj Blua Ŝtono..

⁸⁵ Fortikaĵo de Borostyánkő iutempe apartenis al Hungario, nun estas parto de Aŭstrio: https://eo.wikipedia.org/wiki/Bernstein_im_Burgenland

⁸⁶ Pri Abaliget vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Abaliget>

- Ej, tiun ne estas permesate elspezi – diris kolere la rabisto.
- Kial ne? – demandis Raining.
- Ĉar tiun ni ne povas elspezi ĝis tiu atingos centmiloble mil forintojn.
- Kion vi faros pri tiu mono tiuokaze?
- Ni aĉetos de la tatara reĝo stepon havantan abunde densan paŝtejon, mi kunportos miajn homojn, ni estigos imperion. Ni aĉetos belajn sinjorinojn de la turkoj kaj estos memstaraj.
- Nu, tiu milsepcent forintoj sufiĉos por aĉeti stepon el Tatarlando – ridis Topay, al kiu tre ege plaĉis la naiva vizaĝo de Raining kaj flanken ŝovis la germanan sinjoron.
- Ne kun ĉi tiu sinjoro parolu, sinjoro Kőkényesdi, ja li estas nur akompananto, kaj ni pagos. Ni bone konas unu la alian.
- Kial vi ne diris tion pli frue – demandis la rabisto – tiuokaze mi ne parolintus multe. – Kiu estas la aĉetanto?
- Ĉi tiu nia juna amiko – diris Topay – kiu estas Ladislao Rákóczi. Vi certe konas lin.
- Mi treege konas lin. Mi portadis lin en miaj brakoj dum lia infanaĝo, sed en la malhelo ne rekonis lin. Mi instruis unue rajdi. Nu, nur por lia ŝato mi faras vian peton, de li mi akceptas la milsepcent talerojn.
- Mi diris mil sepcent forintojn.
- Mi diris talerojn kaj ne iras batali por malmulte!
- Nu, mi vidas, ke ni devas solaj batali kontraŭ la turkoj – diris Topay ŝajnigante kvazaŭ li volus foriri – ĉar ni donas eblecon por prirabi la urbon Nagyvárád kaj ankoraŭ unu kaj duonmil talerojn. Nu, ni iru hejmen!
- Ĉu vi volas, ke mi estu senbatalo? – demandis la rabisto hezitante.
- Mi donas al vi la mil sepcent talerojn – diris Rákóczi ĉesigante la marĉandadon. La rabisto ekkaptis la manon de la junulo kaj ekskuis tiun ĝojante.
- Ja mi sciis, ke vi estas la plej brava homo. Do, se post unu semajno vi sendos al mi tiun monon al la domo de tiu ĉi brava homo, tiam dum la sekva semajno mi estos kun miaj deksep batalionoj apud Nagyvárád.
- Kaj se ni antaŭpagas – diris maltrankvilante Raining – tiam eblas, ke vi ne estos apud Nagyvárád.
- La rabisto fiere malestime rigardis la germanon.
- Ĉu vi kredas, ke mi estas trompanto de la lando? – demandis la rabisto la aliajn.
- Ĉi tie jam oni bone konas min, estu ege trankvilaj.
- Kaj la rabisto turnis sin kaj forgalopis en la malhelon. La tri sinjoroj denove akompanigis sin al Püspökladány⁸⁷.
- Kőkényesdi estas mirinda homo – diris Raining apenaŭ rekonsciiĝinte pro la surprizo.
- Sed ni ne devas kredi tion, kion li diris – respondis Topay.
- Ĉu ne? – diris Raining surprizate. – Ĉu li ne havas kontakton kun la francoj?
- Ankaŭ lia avo ne aŭdis pri la francoj.
- Sed li parolis pri multe da trezoroj.
- Li vidis tiujn eĉ neniam kaj pro tio li diris, ke li vendos sin multekoste.
- Sed li menciis multe da fortikaĵoj, deksep batalionoj kaj multajn batalojn.

⁸⁷ Püspökladány estas hungara urbo:

<https://eo.wikipedia.org/wiki/P%C3%BCsp%C3%B6klad%C3%A1ny>

– Li diris tion pro tio, ke ni miru pri tio. La rabisto ne estas freneza por loĝi sur la prerio en ruina fortikaĵo, male vivi en la setlejo kiel sinjoro kaj anstataŭ la deksep batalionoj li havas nur mil sepcent homojn.

– Kaj pro tio vi donis al li mil sepcent talerojn. Ja li nenion donas el tiuj taleroj al siaj fraŭloj, sed ordonas al li akiri predon laŭdezire.

– Ĉu la aĉetenda prerio estas nur trovaĵo kaj ne li instruis Ladislaon Rákóczi rajdi? Ja li edukiĝis en Vieno en sia infanaĝo.

Raining kapbalancis kaj indignis.

Post unu semajno ili sendis al Kökényesdi la priparolitan monsumon. Sed Raining timis, ke Kökényesdi forgesos la limdaton. Pro tio li ne hezitis iri al Vásárhely al Kökényesdi. Sinjoro Kökényesdi estis en la draŝejo kaj pikadis per pajlero siajn dentojn.

– Bonan tagon, mastro! – salutis lin Raining.

– Se ĝi estas bona tiam manĝu! – murmuris Kökényesdi.

– Ĉu vi ne konas min?

– Ne.

– Ĉu vi ne memoras kion vi promesis en Barátfa?

– Kie estas tiu?

– Ĉu vi ne ricevis la mil sepcent talerojn?

– Kial mi ricevintus tiujn?

– Sed ne ŝercu, ĉar la limdato alvenis.

– Kia limdato?

– Kiam vi devos aperi ĉe Nagyvárad kunportante tiujn mil deksepcent rajdantojn.

– Nur ĉi tiujn ses staloservistojn mi povas sidigi sur ĉi tiujn ses bovidojn.

– Nu, tio estas ege malĝoja! – diris Raining kaj kolereme iris reen al Debrecen. Tie li tuj iris en la ĉambron de Rákóczi, dirante: „Kökényesdi bone superruzis nin”, sed jam tie estis Kökényesdi.

– Ĉu vi estas jam ĉi tie? – diris surprizate Raining.

– Jes, sed aliokaze eksciuj via ekscelenco, kiam mi estas hejme, tiam mi ne estas hejme.

Estis la antaŭpentekosta vendredo. Estis vesperiĝo, en la regiono estis silento, nur la imamoj respondadis unu al alia el la turoj de la moskeoj kaj el la tombejoj la hundoj bojis unu al alia. Tiuj ege simile hurlis.

Sur la bastionoj de la fortikaĵo kelkaj gardistoj iras-venas ege pigre, super la pordego videblas la duonfiguro de iu tataro, kubutumanta sur la kornicon, prenante sian pafilon antaŭpreparita por pafi. Sed mi ne scias, kiel tiu povas pafi al iu, kiu estas ege proksime, nome la pafilo estis ege longa, la pafilon oni devas fiksi, la meĉon ekbruligi singarde. ke la kuglo ne trafu la propran okulon.

La tataro fikse rigardis la nokton serĉante iun proksiman figuron, celante per la pafilo kaj blovante la meĉon konstante. Kiam tiu tataro ĉi tiel „sinamuzas”, tiam kvazaŭ videblus iu rajdanta figuro proksimiĝi al la urbo. Tiukaze la otomanaj gardistoj laŭordone devas mortpafi la proksimiĝanton.

La tataro nur atendis, ke tiu figuro venu pli proksimen kaj tiu gardisto la pafilon metis sur la kornicon kaj komencis celi. Sed la rajdanto tien kaj reen moviĝis sur la ĉevalo kiel ĉevalaristo kutimis fari sur ĉevalo.

– Alaho senharigu vin, ebria nekredanto! – li murmuris en si mem, ĉar li vane celadis, la ĉevalaristo ĉiam ŝanĝis sian lokon. – Atingu en la inferon sepdekoble, ĉar vi ne restas senmova. Mi ne kapablas mortpafi vin.

Sed la figuro, la rajdanto venis tute al la pordego.

– Ne venu jam pli proksimen – kriis la tataro – nome mi ne kapablas mortpafi vin.

– Ĉu? – diris la rajdanto – kial vi ne diris pli frue. Ne tiel celu, ĉar vi mistrafos.

La ĉevalaristo estis Kőkényesdi, sub kiu la ĉevalo tiel dancis, ke la tataro ne kapablis celi sur lin.

– Mi portis leteron al paŝao Hali, kiun sendis la defterdaro⁸⁸ de Lipa al la paŝao. – diris la ĉevalaristo – kaj dum la ĉevalo saltadis serĉis tiun en sia poŝo – ransprenu ĉi tiun, se vi ne volas lasi eniri.

– Nu, ĵetu tiun supren – murmuris la gardisto – poste iru malrapide, por ke mi mortpafu!

– Mi dankas al vi, estiminda hundkapa brava sinjoro, ekkaptu tiun, kiun mi ĵetas supren.

Tiam la ĉevalaristo ĵetis pergamenrulaĵon sur la kornicon. Sed la tataro ne rimarkis, ke ne nur la pergamenon li ĵetis, sed iun kaptomaŝon kaj nur rimarkis, ke la kaptomaŝo jam estas ĉirkaŭ lia talio. Poste Kőkényesdi subite turnis sin, spronis sian ĉevalon kaj komencis galopeci,

La tataron la kaptomaŝo detiris de la kornico, kunportantan la pafilon, kaj meĉon, kaj tiris fulmorapide transsaltante – senhalte.

La tataro vane klopodis haltigi la tiradon, komencis kriadi forte, kion la gardistoj de la fortikaĵo ekaŭdis. Ili vidis, ke ilian kamaradon iu tiregas malkonfortmaniere. Ili estis – proksimume dudek soldatoj – postrajdis la ĉevalariston.

Sed la ĉevalaristo galopegis antaŭ ili tiregante la kriegantan tataron. Kiam li atingis iun salikarbon, tie li turnis sin, je lia ekfajfo kvindek buboj eksaltis el la genistaro rajdante kaj atakis la turkojn pelantaj la estron Kőkényesdi. La turkaj soldatoj rekuris al la pordego, eniris en la fortikaĵon kaj kriis, ke alvenis la rabistoj de Kőkényesdi, kiuj galopis al la brutaro kaj kelkcentojn da brutoj forpelis.

Pro la bruego kelkajcentoj da spahioj startis por peli la aŭdacajn rabistojn. La rabistoj galopadis apud la rivero Kőrös, sed post ĉirkaŭ mil homaj paŝoj haltis kaj kontraŭbatalis la spahiojn. La spahioj spertis dum la batalo, ke la nombro de la rabistoj plimultiĝas, ĉar tiuj el la salikarbaro venas por batali kontraŭ ili. Subite kvincent rabistoj aperis por helpi siajn kunulojn. El la fortikaĵo vidante tion, elkuris la turkoj por helpi la spahiojn. Kaj la gardistaro de la fortikaĵo klopodis molesti la homojn de Kőkényesdi. Sed subite aŭdiĝas la batala alarmo kaj transnaĝiginte la riveron Kőrös aperas la baronaj armeoj tuj ekatakantaj la turkojn kaj dume de Váradolaszi aperis ankaŭ infanterio de departemento Szatmár estrita de Ladislao Rákóczi⁸⁹.

– Antaŭen! – kriis la junulo ekkaptante la flagon kaj kuregis al la fortikaĵo kiel unua paŝante sur la sieĝŝnureskalon.

La gardistaro de la fortikaĵo alarmis, pafadis sencele. Rákóczi pli frue estis en la fortikaĵo ol la spahioj, kiuj batalis kontraŭ Kőkényesdi. Tiuj volis reiri al la fortikaĵo, sed ĝuste tiam atingis al la pordego de la fortikaĵo rajdantoj de Topay. Ambaŭ armeoj volis okupi la pordegon de la fortikaĵo. Dum la batalo la armeoj kunmiksiĝis kaj laŭ la kriadoj la batalantoj rekonis unu la alian. Subite meze de la urbo iu fajro lumigis la

⁸⁸ Defterdaro estas turko, kiu kolektas la imposton – noto de la tradukisto.

⁸⁹ La hungaran nomon bv. vidi originale: László Rákóczi (rakoci).

vizaĝojn de la batalantoj. Nome Kőkényesdi ĵetis brulantan torĉon sur la tegmenton de iu domo por ke vidu la homoj unu la alian.

Ĉe la lumo la spahioj vidas ke infanterianoj de Rákóczi jam venis en la fortikaĵon kaj iu altstatura juna hajduko metas la flagon de la Virgulino Maria sur la supron de la pordego de la fortikaĵo.

– Ĉi tio estas la tago de la morto! – kriis la agao de la spahioj (Laŭdu tiu, kiu neniam vidis la morton!)

Kaj tiu hajduko batalis ĝis liaj kunuloj fuĝis en la urbon kaj poste morfalis. La hungaroj kuregas post la fuĝantaj spahioj. Kaj subite aŭdeblas nova krio: Hali! Hali! Hali alvenis kun siaj korpgardistoj, bravaj janiĉaroj, mamlukoj, kiuj batalas samtempe per lanco kaj glavo.

Hali venas antaŭe de sia armeo rajdante, lia vizaĝo estas ruĝa pro furiozo. Antaŭ li iu portas la trian ĉevalvoston kaj apud li rajdas du negraj ekzekutistoj tenante glavegojn.

– Venu! venu! Nekredemaj hundoj! Ĉu via teritorio estis por vi malvasta kaj pro tio vi venis ĉi tien por morti? Mi promesas je la nomo de Alaho, ke mi sendos vin en la inferon, vian landon mi neniigos. Venu ĉi tien, porkon manĝantoj! Ĉu vi vendas viajn kapojn? Mi donas unu ormoneron por ĉiuj kristanaj kapoj! Kaj kiu portos unu malliberulon, tiu mortos!

La paŝao furioziĝis, kiam li klopodis aranĝi sian armeon, kiun Topay dispelis. Li klopodis voki aliajn armeojn. Li ordonadis al la turkoj, kiuj denove okupis ĉiam pli kaj pli novajn teritoriojn en la urbo, nome Kőkényesdi kaj liaj grupoj pensis nur pri rabado.

– Mi donas cent ormonerojn al tiu, kiu tiun hundon mortpafas – kriegis la paŝao furioze montrante al sinjoro Topay, sed ĉar oni ne estis kapablaj ekkapti lin, li kriis al li – Kien vi kuras? Rigardu min!

Topay aŭdis la krion kaj mallonge kriis reen al la paŝao:

– Mi vidis vian dorson en Bánffyhungyad!⁹⁰

Pro tiu akra moko la paŝao ne estis kapabla regi sin kaj prenante sian batalfrapilon galopis al Topay, sed el la krucstrato ekiris homoj de Rákóczi dum pafaro kaj per bajonetoj atakis la turkojn. En la malvasta strato la turka rajdantaro mensperdinte provis batali, sed kontraŭ la bajonetoj la glavoj kaj lancoj ne estis taŭgaj.

– Nome de Alaho – kriis Hali – klopodu tiri supren la levponton. Ni povas morti, sed la fortikaĵo restu la nia.

Sed la akompanantoj de Hali ne obeis al la ordono kaj kiam iu kuraĝa batalanto per sia musketo mortigis la ĉevalon de Hali, tiam li surgrimpis sur la ĉevalon de sia ekzekutisto kaj forfuĝis malantaŭ la ekzekutisto.

Iu juna hungara rajdanto postsekvis ilin. Hali ne konis lin, sed lia furioza vizaĝo montris al li, ke tiu estas malamiko. La junulon ne nur la sopiro de la batalo entuziasmigis, sed ankaŭ alia afero. Li ne timas la pafon, baton.

La junulo estis Ladislao Rákóczi, kiun la malesperiĝo entuziasmigis kaj li galopis mezen de la malamikaro kaj klopodis atingi pli proksimen al Hali. La aliaj turkoj ne lasis atingi la paŝaon, sed la rigardo de la junulo ensorĉis ilin.

Fine ili atingis la levponton, kiu kondukas tra la kavo de la fortikaĵo. La levponto estis levebla per ĉenoj al la turo, sur kies supro ankoraŭ videblis la stumpigita statuo de la reĝo Ladislao la 1-a.

⁹⁰ Pri Bánffyhungyad vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Huedin>

Hungaroj kaj turkoj samtempe atingis sur la levponton kaj la batalantoj apenaŭ estis distingeblaj. Eblis vidi nur la turbanojn, kaskojn, ĉapojn, felĉapojn, kaj rektajn kaj kurbajn glavojn kaj flagon kun Virgulina Maria kaj flagon kun duonluna ĉevalvosto.

De la pordego de la fortikaĵo estis direktitaj al la levponto du kanonoj, kiuj estis plenigitaj per obusoj. La tie estantaj turkoj ne volis alkanonadi tion, ĉar inter la tie batalantaj hungaroj estis multe da turkoj. Ĉiuj hungaroj havas kontraŭulon, kontraŭ kiuj ili batalas. Rákóczi batalas nun kontraŭ tiu turko, kiu portas la ĉevalvostan flagon kaj dum la batalo ambaŭ klopodas ekkapti la flagon unu de la alia, batante.

– Pafu ĉi tien! Nenifarantoj! – kriegis Hali al la artileriistoj. – Ne kompatu la hungarojn kaj turkojn, eĉ se vi povas mortpafi ankaŭ min.

Sed la artileriistoj ne volis mortpafi siajn kunulojn. Pro tio Hali ordonis al ambaŭ ekzekutistoj por mortigi la artileriistojn. Sed ili levis la kanontubon kaj pafis en la aeron. Dume sur la levponto obstine daŭras la batalo. La janiĉaroj ne moviĝas kaj per siaj glavegoj tranĉadas la malamikojn. Subite nun kelkaj germanaj soldatoj klopoddas grimpi sur la levponton por forigi la janiĉarojn. Sed neatendite la levponto falas en la akvakavon, en kiu ili daŭrigas la batalon. Dume la germanoj rimarkas iun turbanon portantan kapon tiam ili tiun trapikas per siaj lancoj.

Dume ambaŭ batalantoj estis jam lacaj, iliaj glavoj estis rompita kaj per du manoj ili volis perforte akiri la flagojn furioze. La turka batalanto premis sian ĉevalon per la genuoj. Sekve de tio la ĉevalo komencis baŭmi kaj la turko estis pli alta, ol Rákóczi. Li volis elĵeti la junulon el la selo, aŭ perforte akiri la flagon.

Sed en la sama momento en la turo iu blanka virinfiguro aperis, ŝian nigran hararon blovas la vento kaj ŝian vizaĝon lumo de la fajro lumigas.

– Jesuo helpu vin, Ladislao! – kriis la fraŭlino, kiun la junulo ekaŭdis, rekonis, rigardis al la turo kaj ekvidis sian fianĉinon. Lia forto pliiĝis kaj kiam la turko delasis la flagon de Rákóczi, tiam li ekkaptis la buŝferon de la ĉevalo de la turko kaj la rajdanton kaj ĉevalon puŝis en la profundan akvakavon.

– Ne estas helpo, nur ĉe Dio! – kriis Hali malesperiginte, kiun liaj homoj kunportis el la batalejo.

– Ladislao, mia karulo! – aŭdiĝis la voĉo de la fraŭlino al tiu viro, kiu batalis anstataŭ dek viroj, de kiu liajn tri ĉevalojn oni mortpafis kaj per la tria glavo batalis.

Li staris jam sur la levponto kaj lia karulino ĵetis blankan tukon al li, kiun li montradas kiel signon de la triumfo. Sed subite iu kuglo trafas la koron de la junulo, kiu mortas ĉe la piedoj de sia karulino. Nome el la turo iu bela blanka figuro saltas suben ŝrikante sur la levponton. Tiu estas la fianĉino, kiu ĵetis sin sur la kadavron de sia karulo kaj tie ilia sango unuiĝis. Kvankam ili ne povis brakumi unu la alian, tamen iliaj animoj brakumis unu la alian.

Ĉi tiu kortuŝa sceno treege surprizis la la sieĝantojn pro kio paŝao Hali havis tempon suprentirigi la levponton por savi la fortikaĵon kaj la restaĵan armeon.

De tiuj turkoj, kiuj restis ekster la fortikaĵo, Kökényesdi mortigis: soldatojn, komercistojn, dromedarojn, azenojn, nur la ĉevalojn ne. Li prirabis la fortikaĵon, forbruligis la lignodomojn, kiuj flamis kiel iu ŝtiparo. La fortikaĵon kovris la fumo kaj la flamoj. La estiĝanta vento portis la fumon kaj la flamon al la fortikaĵo.

Paŝao Hali povas gluti la fumon sen piptubo. – diris Kökényesdi dum li plezure rigardis la pompan fajron.

Oni portis Ladislaon Rákóczi kaj lian karulinon en la familian kripton de Rékas (Rekaŝ) kaj entombigis ilin unu apud alia.

7. La monaĥo de Szentkút⁹¹

De Kolozsvár je unu-taga vojo troviĝis tiutempe iu fama klostro, kies ruina turo ankoraŭ nun staras. Iam la grandan korton ĉirkaŭprenis larĝa forta ŝtonbarilo. En tiu korto havis lokon la popolo vizitanta kermeson.

Nome apud la klostro estis iu miraklofonto, kio somere kaj vintre estis sekiĝinta, sed al kiu printempe kaj aŭtune el inter la rokoj abunde fluis la akvo, kaj poste denove malaperis la akvo de la fonto.

Printempe kaj aŭtune multe da suferantaj homoj venis al la fonto, kiuj estis gelamuloj, psike malsanuloj, seninfanaj virinoj, ĉar la kuracefika akvo kuracis ilin kaj tiuj sane forlasis la fonton. Sur muro de la preĝejo videblis lambastonoj, kiujn la lamuloj lasis tie. Krome multe da riĉaj homoj metis sur la altaron multe da or-, kaj arĝentjuveloj kiel dankojn pri la fonto ilin kuracinta.

La plej granda parto de la konstruaĵo estis rezervita por la riĉaj gastoj. La plebo en la korto restadis en tendoj. Malantaŭ la konstruaĵo estis belega ĝardeno, kiun la monaĥoj bele zorgis, kie eblis vidi multe da interesaj plantoj.

Tempe de nia historio jam nur unu eklezia patro vivis en la klostro, kiun la plebo nomis monaĥo Gregorio. En Transilvanio ĉiuj konis lin. Li estis altstatura viro havanta nigran pendolan barbon, maldikan vizaĝon kaj grandegajn mankavojn. Liajn korpopartojn kovris lia nepompa kapoto. Li ne portis ĉapelon kaj lia frunto ne estis sulka. Lia voĉo estis forta kaj lia kantado estis tondranta, simila al la ĉiela, ke ĝi pli valoris ol kantado de la tuta ĉeestantaro de la Di-servo.

Printempe kaj aŭtune liaj kelo kaj nutradejo estis malfermitaj por ĉiuj kaj el la donaĵoj de la riĉuloj ankaŭ la malriĉuloj ricevis. Se serboj, armenoj, kalvinanoj, unitarianoj iris tien, tiam li tiujn regalis per ĉiaj belaj kaj ĉiaj bonoj.

Ankaŭ lian kolegon sinjoron Ladislao Magyari li regalis abunde, kiu havis belegan filineton, adoleskantineton, Piroŝka, kiu estis ĉiam pala kiaj estas la pulmomalsanuloj. Ŝia patro por fortiĝi portis ŝin al Szentkút.

Monaĥo Gregorio treege ĝojis kaj siajn plej elegantan ĉambron donis por sia atestimata amiko. Li la ĝardenisto, kuiristo, vinologo devis scii, ke per kiuj floroj, manĝaĵoj kaj vinoj li regalu liajn atestimatajn gastojn.

La pastroj Gregorio kaj Magyari estis similaj homoj. Ili estis bonhumoraj, bonkoraj kaj bonkapaj, kiuj jam matene frue komencis diskutadi pri la dogmaj demandoj: kies religio estas pli feliĉiga, beatiga kaj dum la diskutado ili drinkadis kaj lacigis unu la alian per citaĵoj. Sed finfine ili interkonsentis, ke ĉiuj religioj estas bonaj tie, kie ankaŭ la homo estas bona.

Dume la bela pala Piroŝka kun siaj kunulinoj amuzis sin en la ĝardeno, aŭ apud la fonto kaj laodoro de floroj kaj la bonfaranta fonto akvo kaj la freŝa aero ruĝigis ŝian vizaĝon. Magyari ĝojis pro tio. Li pensis kiom ŝia patrino ĝojos, kiam ŝi vidos sian filinon, kiu beliĝis kaj ŝia paleco de la vizaĝo ĉesis. Kaj kiam ambaŭ pastroj nokte longtempe paroladis, diskutadis, tiam Piroŝka komforte dormis.

Iuvespere la du pastroj sidadis parolante, kiam iu frapadis sur la pordego. Laŭkutime post vesperiĝo post sunsubiro oni fermis la pordegon de la klostro. La monaĥoj devis esti en la klostro kaj la popolo devis esti en la korto de la klostro. La gardanta monaĥo anoncis, ke kvar strangaj monaĥoj petas permeson enveni en la klostron.

⁹¹ La nomon bonvolu elparoli sentkut. La signifo de la nomo Szentkút estas: sankta puto.

– Memkompreneble ili povas enveni. Vi devas ilin konduki al ni – diris pastro Gregorio – kaj ni donos al ili refreŝigaĵojn.

Post kelkaj minutoj envenis la kvar monaĥoj, kiuj portis kapoton, la kapuĉo estis metate surkapen kaj nur la okuloj kaj barboj videblis. Ili klinis sin antaŭ la estimindaj pastroj. Gregorio ekstaris kaj kare salutis ilin latine:

– Bonvenon nome de la Sinjoro!

Ili klinadis sin senvorte.

– Bonvenon nome de Dio! – ripetis Gregorio pensante, ke la gastoj ne aŭdis la salutadon.

Sed ili ankaŭ nun ne respondis. Pro tio Gregorio mirante demandis:

– Non exaudistis nomen gloriosissimi Domini, fratres amatissimi?/ Ĉu vi ne aŭdis la nomon de la plej glora Sinjoro, amegataj fratoj?

Pro tio iu alparolas:

– Ni ne komprenas ĉi tiun lingvon, pia monaĥo.

– Kiaj monaĥoj vi estas? Kiun religion vi havas? Ĉu vi estas grekoj?

– Ni ne estas grekoj.

– Ĉu vi estas armenoj?

– Ne.

– Ĉu vi estas arianoj⁹²?

– Ne.

– Ĉu vi estas patarenoj?⁹³

– Ne.

– Do, kiuj vi estas?

– Ni estas rabistoj – ili kriis kaj kaj deĵetis la kaputon kaj kapuĉon, montrante tranĉilojn, pistolojn. – Mia nomo estas Francisketo Kőkényesdi – diris fiere la porparolanto.

Magyari eksaltis el sia seĝo kaj volis batali kontraŭ la rabistoj por defendi sian solan filinon. Sed Gregorio ekkaptis lian mantelon por retiri lin kaj diris al tiu mallaŭte: „Estu trankvila!”

Poste Gregorio turnis sin al la rabistoj.

– Nu, spite de tio, ke vi estas rabistoj, vi estos miaj gastoj kaj manĝu, trinku, kion vi volas.

– Sed tio ne estas tiel. Ja niaj 1600 homoj estas ekstere de la klostro kaj ili estas malsataj – soifaj – konata estas, ke sentrinke nur la maljunaj profetoj anoncis la vorton.

– Estu ankaŭ al ili laŭ ilia deziro.

– Krome estas sciita afero, ke en via kapelo estas multe da or- kaj arĝentsanktuloj, al kiuj bone estas preĝi. Sed ĉar ni ne havas tempon por veni ĉi tien ĉiutage por preĝvokadi, ni kunportos tiujn, ke tiuj helpu nin survoje.

– Vi estas sprita monaĥo, kiu povus rifuzi vian peton?

– Ni scias ankaŭ, ke en via kelo estas multaj bareloj plenigitaj per ormoneroj kaj arĝentmono. Ni kunportos la superflujajn trezorojn.

⁹² Pri la Arianoj, arianismo, bonvolu legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Arianismo>

⁹³ La patarenoj estis membroj de la hereza movado funkcia en Norda Italio en la 12-13 jarcentoj. Pri ĝi vi povus legi en la Katolika leksikono de Velence-Hungara: <http://lexikon.katolikus.hu/V/Velencei.html>

– Nu tion vi povas kunporti – pensis Gregorio, ja li sciis, ke en la kelo nenio estas.
– Ne pensu, via ekscelenco, ke ni ne konas la torturkonfesigon. Nome se vi volus sekretigi iun valoraĵon, tiam ni torturos vin. Pro tio estos bone, se vi ĉiujn valoraĵojn montros al ni.

Gregorio tiom pie ridetis, kvazaŭ li aŭskultus anekdotojn.

– Ĉu vi havas ankoraŭ iun deziron?

– Jes, mi havas. En la klostro nun estas multe da homoj, viroj, virinoj. Mi ne promesis fraŭlecon, pro tio ni kunportas la ĝustajn hominojn.

Magyari jam estis ege furioza kaj volis ekstari, sed Gregorio ne lasis.

– Por Dio, miaj fratoj – diris Gregorio petpetegante al la rabistoj – ne faru tiun malicaĵon. Plie kunportu la sanktulojn de la altaro, sed ne batu tiujn senkulpulojn, kiuj apud Dio trankvile ripozas.

– Ne diru tion, Gregorio – kriis la rabisto antaŭprenante siajn tranĉilojn, – ĉar cetere ni forbruligos la tutan klostron. La rabisto havas kvar sakramentojn: vinon, monon, fraŭlinon kaj sangon! Estu dankema, se por ni estas sufiĉaj la vino kaj mono, fraŭlino kaj ne sopiras la sangon!

– Tio okazos tiel! – alparolis alia rabisto batante sur ŝultron de Magyari – Ĉu vi konas min?

Magyari rekonis surprizante kaj abomenante tiun bubon, kiu estis Szénási.

– Ni scias bone – diris la bubo malice, ridaĉante – ke vi portis ĉi tien vian filinon. Ni venĝos la peladon de la diablo.

Se la pastron Magyari Gregorio ne ekkaptus, tiam Magyari atakintus la fiulon. Magyari tremetis tutkorpe pro la senbrida furiozeco. Sed Gregorio estis trankvila, ridetante giris la fingrojn.

– Atendu, miaj fratoj! Ni certe povas marĉandadi. Vi bone scias, ke mi havas monon kaŝitan, sed la kaŝejon neniuj konas en la klostro krom mi. Tiun vi ne estos kapabla ektrovi. Ankaŭ tion vi povis aŭdi, ke ekzistas martiroj, kiujn oni turmentis, torturis, sed ne diris tiun vorton, kiu estis fremda por tiuj. Nu, ankaŭ mi estas tia homo. Kiel ajn vi torturos min, mi ne diros la sekreton, la kaŝejon de la mono. Do, nun elektu. Se la monon vi volas akiri, tiam ne batu la hominojn. Aŭ vi povos ricevi malsanajn almozulinojn kaj ne ricevos la monon. Elektu!

La kvar rabistoj komencis inter-konsiliĝi. Ili tiel decidis, ke Gregorio donu al ili la monon kaj poste ili povos atingi la plenumon de la alia deziro.

– Nu, bone, ja vi estas bonaj homoj – diris Gregorio – prenu ĉi tiujn torĉojn kaj venu post mi en la kelon por transpreni la monon kaj poste neniun bati.

– Ne parolu multe! – diris Kökényesdi moroze. – ĉio okazos laŭ la regulo de la rabistoj: iu malbona movo sekvigos la morton. Du rabistoj portos la torĉojn antaŭe, inter ili iru Gregorio, post ili mi iros kaj malantaŭe iru magistro Szénási kiu akompanos la alian pastron. Se iu pastro faros iun malbonan movon, tiu ricevos baton surkape. Nu, ek!

Ĉio okazis tiel. Du rabistoj iris antaŭe portante la torĉojn, post ili iris Gregorio kaj Kökényesdi enmane prenante ponardon kaj malantaŭe iris Magyari, kiun hastigis Szénási, minacante lin per hakilo.

Ili iris ĝis la enirejo de la kelo. Gregorio surmetis la kapuĉon kaj nenien rigardis. Li flankenŝovis la serurojn de la klap-pordo kaj lasis antaŭeniri ĝentile la torĉojn portantajn rabistojn.

Kiam ambaŭ rabistoj iris malsupren, tiam Gregorio la klap-pordon ĵetis sur la kapojn de la rabistoj, kiuj ruliĝis ĝis la lasta ŝtupo. Sekvamamente li returnis sin al Kökényesdi, rapide ekprenis liajn du manojn kaj kriis al Magyari:

– Kaptu vi la vian, kaptu la magistron!

Kökényesdi ege surpriziĝis, poste puŝpikis al Gregorio, sed la ponardo ne atingis korpon. Li denove ne estis kapabla puŝpiki ĉar Gregorio forte prenis liajn manojn. Tiujn ege forte tordinte li tiris al sia brusto, forprenis la ponardon kaj la aliajn armilojn kaj tiregis lin kun si sur la klap-pordon, por ke la sube estantaj rabistoj ne povu levi tion.

Preskaŭ en la sama momento sinjoro Magyari kaptis la magistron kaj terenĵetis, kiel li lernis en Nagyenyed⁹⁴, kiam li estis tie studento. Dume ankaŭ li falis sur tiun, pro kio la hakilo elfalis el la mano de Szénási, kiu poste lasis, ke la bona pastro prediku al li moralinstruon.

Kökényesdi spertis, kia la nuna estas, en tian kaptilon li neniam trafis. Li luktis ege bone ĉiam, sed tian fortan homon kia Gregorio estas, li ankoraŭ ne vidis. Gregorio estis kapabla sen perforto forpreni ĉiujn armilojn de Kökényesdi. La rabisto provis fortiri la pastron de la klap-pordo sub kiu la du rabistoj vane bruegis. Li volis sin liberigi, sed vane provis, li ne sukcesis. Fine li mordis la manon de Gregorio. Efike de tio Gregorio iĝis furioza kaj ekkaptis la hararon de Kökényesdi, lin prenis kiel leporeton pro kio tiu ne estis kapabla denove mordi.

– Ne saltetadu, mia sinjoro, ja vi ne povos mordi min! – diris Gregorio.

Pro la sensukcesa ago la rabisto kapitulaciis.

– Vi povas vidi, ke vi ĉiuj volas fari maljustan aferon – riproĉis Gregorio la rabiston, tenante tiun en la aero. – Ĉu vi ne timas pri via vivo? Ĉu via animo ne akuzas vin, ĉar en sankta loko vi volis rabadi? Ĉu vi ne pensis pri la infero tiam, kiam alvenis en nian klostron?

– Lasu min liberiĝi, foriri, demonia pastro! – stertoris la rabisto furioze.

– Vi ne povas foriri ĝis vi konfesos viajn pekojn – respondis Gregorio, kiu ankaŭ nun tenis en la aero la rabiston – pentu viajn pekojn!

– Mi pentas miajn pekojn.

– Ĉu vi ne plu kulpos?

– Ne.

– Ĉu vi ne ŝtelos alian fojon?

– Eĉ ne skarabon.

– Ĉu vi ne blasfemos?

– Neniam.

– Nu do, mi lasos vin foriri, sed unue kolego Magyari bonvolu kolekti la ponardojn kaj hakilojn, kiujn bonvolu elĵeti el la klostro.

Dume sinjoro Magyari kunligis la manojn kaj piedojn de la magistro, kaj la armilojn elĵetis el la klostro. Nun jam Gregorio metis sur la teron la konvertitan rabiston, kiu konfesis siajn pekojn. La rabisto apogis sin al la muro.

– Nu, vi, inferana pastro, jam manĝu min, se jam vi kuiris min.

– Ho, mia kara frato – diris Gregorio, karesante la vizaĝon de la pia „ŝafido” – kredu min, ke estas pli granda ĝojo vidi iun konvertiĝintan kulpanton, ol cent senkulpantajn homojn.

⁹⁴ Pri Nagyenyed vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Aiud>

– Vi estas diablo kaj ne pastro. Nome se vi estus homo de Dio, tiam vi ne estus kapabla venki kontraŭ Kökényesdi, kiu sen armiloj kutimis venki kontraŭ armeoj.

– Vi atakis min per hakilo, ponardo kaj mi atakas nur kun nomo de Dio, kiu lasis Davidon, la pastoron de ŝafoj ekkapti la leonon, kiu manĝas la ŝafojn, kaj ankaŭ min lasas beni la homojn. Kaj kiun mi benas, tiu estu benita.

– Mi dankas vin pro la beno. Pendumigu min, ja mi meritas tion, ĉar mi lasis min kapti de iu pastro.

– Ho, mia frato! Kiel vi povas supozi pri mi tiun mondan kruelecon? Dio ne ĝojus pro morto de la kulpulo.

– Tiam lasu min foriri.

– Mi ne povas fari tion, ja nur ĝisduone vi konvertiĝis. Prefere vi restos ĉi tie en la klostro kaj vi fastos kaj preĝos. Vi tiel purigos vian animon.

La rabisto furiozis pro kolerego.

– Mi volas pendumi min.

– Tion vi ne faros, ja iu pia monaĥo ĉiam estos apud vi, kiu instruos vin kanti psalmojn.

La rabisto grincigis siajn dentojn kaj piedfrapadis rigardante sangosoife kiel hieno, kiu volas disŝiri la bestodresiston, sed ne kuraĝas fari tion. Krome – daŭrigis Gregorio – kiel unuan provon vi preĝos tuj iun Dion timantan preĝon.

– Ĉu mi preĝu?

– Nu, ne tute preĝu. Sed ĉar povas okazi, ke viaj homoj maltrankviliĝos pro via longa foresto, vi ekstaros ĉe la malfermita fenestro, trankviligos ilin kaj petos ilin hejmeniri.

– Tio estos bona – diris Kökényesdi pensante, ke liaj homoj efike de lia sola vorto malkonstruos la klostron kaj li saltos al siaj homoj.

Sed nun Gregorio flustris ion al pastro Magyari:

– Dum Kökényesdi parolos al siaj homoj, vi jungigu la ĉevalojn al la ĉaro kaj kiam eblos kunportu vian filinon al Kolozsvár kaj informu sinjoron Abéni, ke rabistoj kaj Szatmár-anoj atakis la landon. Mi vidis ĉe iu kaptita bubo iun kaskon sub la kapuĉo. Hastu por defendi la ĉefurbon de la lando kontraŭ la rabistoj, nome de Dio!

Ambaŭ pastroj manpremis, poste Gregorio kunportis la rabiston en sia sino al iu malvasta helica ŝtuparo supren. Estis vespero kaj malhelo kaj la rabisto tute ne sciis, kien portas lin la pastro. Fine la pastro perkape levis klap-pordon, super kiu estis pli hele, ol sur la helica ŝtuparo. Tie estis fenestro, kiu estis simila al pordo. Antaŭ la fenestro la pastro metis la rabiston por stari sur la piedoj.

La rabistoj unue pensis, ke li kuraĝe elsaltos el la fenestro, sed kiam tiu paŝis sur la kornicon de la fenestro, tiam li konsterniĝis ekvidante la profundecon sub li, kiu estas cent metroj. Super ili pendis sonorilegoj. Do, li divenis, ke li estas en la turo de la klostro.

– Do, kara mia filo – diris pastro Gregorio – vi staru sur la kornicon kaj fortvoĉe voku viajn homojn ĉi tien. Poste diru al ili kion mi sufloros al vi. Sed Dio gardu vin diri ion alian, ĉar en la sama momento mi elpuŝos vin el la turo kaj dum mallonga tempo vi atingos la subon de la infero.

La rabisto tremetante ekstaris sur la kornicon. Tie li perdis la kuraĝon kaj ne malemis la morton. Li sentis, ke en tiu situacio ne helpas lerteco kaj aŭdaco. Antaŭ li estis la profundeco, malantaŭ li estis la fortega viro, kiu povas depuŝi lin subite. Liaj ĉiuj ostoj frakasiĝos ambaŭkaze. La rabisto timante tiriĝis al kolono de la fenestro, sentis, kvazaŭ la turo moviĝus kaj kvazaŭ iu instigus lin salti malsupren el la turo.

Homoj de la rabisto jam venis al la klostro, rimarkis sian estron en la turo kaj hurlis.

– Diru al ili tion, kion mi diras – ordonis Gregorio, kiu kaŝis sin en la turo – sed ne diru alion.

La rabisto tremetis, kapturiniĝis kaj diris la vortojn de la pastro:

– Miaj karuloj! (komenciĝis la parolo.) Trezorojn de la pastroj ni kolektis, tiujn ni metis sur ĉaron en sakoj.”

La rabistoj ĝojkriis.

– Sed la vinon kaj manĝaĵojn la piaj monaĥoj ne en la klostro deponas, sed en siaj keloj de la setlejo Egereŝ.⁹⁵ Pro tio tuj ducent homoj iru tien kaj transprenu tiujn.

La rabistoj ankaŭ nun jesis.

– Pri la hominoj mi devas diri jam terurante, ke en la klostro antaŭ tri tagoj komenciĝis la pesto, de kio la homoj nigriĝis ĉar ĉiuj infektiĝis, kiuj estas en la klostro. Pro tio mi ne proponas veni en la klostron, ĉar tie estas multege da agoniantoj kaj ankaŭ miaj kunuloj mortis. Min nur la turka talismano, la sepoble bruligita tero kaj etaj fingroj de la suĉinfano nevidinta la mondon gardis de la morto.

(Ĉi tiujn ilojn Gregorio trovis en la poŝoj de Kőkényesdi.)

La rabistaro, ekaŭdante la terurajn famojn, komencis disiĝi de la klostro.

– Pro tio vi ne povas forporti la trezorojn ĝis tiujn mi purigis, ĉar mi ne volas infekti vin.

La rabisto fidele interpretis la vortojn de Gregorio kaj ektimigis siajn homojn pro kio tiuj volis diskuri.

– Kaj nun anstataŭ atako de Kolozsvár, kiu ne estus sukcesa, alie ni agos: Ducent persona grupo kaŝu sin en la arbaroj de Magyargorbo⁹⁶, Viŝta⁹⁷ kaj Szucsag⁹⁸ kaj ne montru sin sur la landvojo. Dume kvarcent homoj nokte iru al la landvojo de Kórod⁹⁹ kaj la aliaj iru en la arbaron de Gyalu¹⁰⁰ kaj Szászfenés¹⁰¹. La defendantoj de Kolozsvár tiel ekscios, ke venos la malamiko. Tiam la grupoj sur la landvojo de Korod turnu sin, kaj la aliaj ataku la ne defenditan urbon kaj prirabu tiun. Tiel faru tion kaj nenie montru vin.

La rabistoj kriegante jesis. Kőkényesdi havante kapturiniĝon reiris en la turo al la brakoj de Gregorio, dum la rabistoj bruegante disiris en la arbarojn. Post unu horo nur kelkajn kriegojn eblis aŭdi el la malproksimo. .

En la klostro la popolo aŭskultis la aŭditajn vortojn. Neniu komprenis, krom Magyari. Gregorio akompanis la estron de la rabistoj en la kelon, kie estis la kunuloj de Kőkényesdi. Kaj li enŝlosis ilin. Poste la estimindaj pastroj povis konsoli kaj brakumi unu la alian.

– Ni povas esti dankemaj al Dio kaj al vi, ĉar liberigis nin. – diris Magyari dankeme prenante la manojn de sia filino.

– Nun ni liberigu la urbon Kolozsvár – diris Gregorio. Mi tuj ekiros ĉevaldorse.

⁹⁵ Pri la setlejo Egereŝ vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Aghire%C8%99u>

⁹⁶ Pri Magyargorbo vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/G%C3%A2rb%C4%83u>

⁹⁷ Viŝta estas setlejo en Rumanio.

⁹⁸ Pri la sikula setlejo en Rumanio, vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Suceagu>

⁹⁹ Pri Kórod vi povas legi ĉe: [https://eo.wikipedia.org/wiki/Coroi_\(Corois%C3%A2nmartin\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Coroi_(Corois%C3%A2nmartin))

¹⁰⁰ Pri la setlejo Gyalu vi povas scii, ke ĝi estis grava setlejo jam ankaŭ en la Romia imperio, ĝi havas ankaŭ fortikaĵon – noto de la tradukisto.

¹⁰¹ Szászfenés estas rumania setljo kun ruinoj de fortikaĵo.

- Ĉu ĉevaldorse? Kio estos pri via filino?
- Ŝi restu apud vi kaj vi gardu ŝin!
- Sed ekpensu. ...
- Ŝi estos en la plej bona loko, kie Dio defendos ŝin kaj viaj pugnoj.
- Kio okazos, se la rabistoj rimarkos sian trompiĝon kaj furioze atakos la klostron?
- Tiukaze mi pli rapide venos ĉi tien por defendi la klostron, kie estas mia filino.

Magyar kisis la frunton de sia filino. Ŝi estis pli pala, ol iam. Kaj li lasis sian filinon ĉe Gregorio. Li prenis sian glavon, surĉevaliĝis, malfermigis la pordegon de la klostro kaj forgalopis sur la landvojo.

Gregorio vokis la ĉeestantaron de la Di-servo en la kapelon. La homoj kantis dankeme al Dio. Poste Gregorio iris en la predikseĝon, kie li faris predikon petante defendi liajn altarojn kaj fajrejojn. Finfine kiam li levis la grandegan flagon de la templo, kiun okaze de procesio tri homoj kutimis porti, tiam la popolo iĝis ekscitita. Se en tiu momento la rabistoj estintus antaŭ la klostro, tiam la homoj kuregus kontraŭ la rabistoj kaj per la lambastonoj kaj bastonegoj dispelus ilin!

8. La ektimiĝo de Nagyenyed¹⁰²

Dum la pastroj prenis glavojn kaj la lamuloj, kripluloj prenis lambastonojn por defendi siajn altarojn kaj templojn, sinjoro Ebéni, ĉefkomandanto de Kolozsvár silente dormis. La brava sinjoro estis fama pri tio, se iu vokis lin pro io kaj vekis lin, tiam li respondis, ke „tio ne estas ebla”, kaj dormis plu.

Magyari jam bone konis la kutimon de Ebéni kaj nokte hejmen alvenante ne volis paroli kun Ebéni, sed malfermigis la templon kaj ordonis sonorilegi.

La vekita popolo aŭdante la sonorilegon tuj klopodis veni en la templon. Tie la atestimata sinjoro raportis pri la eventoj, kiuj okazis en la klostro. Li parolis pri la danĝero, kiu surprizis ilin kaj instigis ilin defendi sin kuraĝe.

Sinjoro Ebéni ĉi tiel eksciis la proksimantan danĝeron, pri kiu informis lin homoj al li kuregantaj. Sinjoro Ebéni ektimante vekigis kaj ellitiĝis. Li subite ne sciis la farendojn. Kion fari? La popolo kriadis, kuradis sur la stratoj tien kaj reen, la hajdukoj tamburis, la rajdantoj galopis dise-mise. Ebéni preskaŭ frenezigis. Feliĉo estis, ke Magyari alvenis al li.

– Kio okazas? Kio estas la malbono? Kion ni faru, mia atestimata sinjoro? – demandis la ĉefkomandanto:

– Ne estas granda malbono, sed tiu proksimiĝas – respondis Magyari – nome unu grupo da rabistoj, kiu havas mil sepcent homojn estrantajn de iu paŝao invadis en Transilvanion. Inter ili estas honestaj rajdantoj el la gardistaro de Szatmár. Nun jam ili estas proksime al Kolozsvár. Ili estas en kvar grupoj, sed en unu grupo estas nur kvarcent homoj. Pro tio tiujn rabistojn la germana brigado de la regnestro kapablas neniigi. Nur la regnestron ni devas informi, sed nun tiu amuziĝas en Nagyenyed.

– Vi pravas – jesigis Ebéni la vortojn de la pastro – ni faru laŭ tio.

Kaj Ebéni vicigis al la pastro kiel aranĝi la farendojn. Poste la pastro foriris por aranĝi aliajn farendojn. Kaj Ebéni vokigis iun rapidan heroldon, ĉar li estis embarasita, li ne trovis skribilon kaj verŝis la inkon sur la pretan leteron. Pro tio li petis buŝan mesaĝon transdoni al la regnestro:

– La Szatmár – departementanoj kaj dek sep mil batalionoj da rabistoj unuĝis kaj invadis en Transilvanion, ili ne estas malproksime de Kolozsvár, sed tiun urbon ni defendos.

Ebéni jam modifis la fakton kaj mesaĝis ne nur pri kelkaj rajdantoj, kiuj unuĝis kun la gardistaro de Szatmár.

La heroldo klopodis eliri el Kolozsvár kaj alvenante al Radnót pensis, ke la banditoj jam povas esti ĉe Kolozsvár. Pro tio li alvenante al la regnestro, ne rigardante la benitan staton de la regnestro, diris al li la sekvan mesaĝon:

„La gardistaro de Szatmár kaj deksep mil batalionoj da banditoj invadis Transilvanion kaj sieĝas la urbon Kolozsvár, sed sinjoro Ebéni certe defendados.”

La regnestro preskaŭ svenis pro la vortoj. Apafi subite eksaltis kaj ordonis al Andreo, al la fidela servisto, porti per kaleŝo la regnestro al Gyulafehérvár, ĉar la armeoj de Szatmár kaj deksep batalionoj atakis la urbon Kolozsvár kaj certe oni mortigis sinjoron Ebéni pro kio li ne povas defendi la urbon.

¹⁰² Nagyenyed (nadjenjed) estas urbo en Rumanio, pri kiu vi povos legi ĉe:
<https://eo.wikipedia.org/wiki/Aiud>

Andreo antaŭpreparis la kaleŝon portinta en ĝin la gravajn pakaĵojn de la regnestrino kaj enkaleŝigis sian sinjorinon, kiu ektimis la nekonatan danĝeron. Sur la korto staris gapadantaj homoj kaj iuj demandis Andreon: „Kio estas la malbono?”

– Ho, ve, la Szatmar-anoj kaj deksep mil banditoj invadis Transilvanion, jam la urbon Kolozsvár neniigis kaj ili iras al Enyed respondis li.

La popolo ekvidante la kaleŝon de la regnestrino, kiu kuris rapide al Gyulafehérvár, la popolo ekkuris dise – mise pene portante siajn aĵojn, portante siajn infanojn, kaj peletante siajn bovojn, bovinojn kaj vekriis.

Tiutempe en Nagyenyed agrable pasigis la tempon bejo Iffim, kiun oni sendis kontraŭ la regnestro, ke tiu iru al Hungarlando el Transilvanio. La regnestro ne volis kredi al Teleki, ke ili devas resti en Transilvanio.

Bejo Iffim ĝuste tiam sidis en sia banujo aŭdante la bruegon de la terura kurado. Li tuj eksaltis el la banujo, enkovris sin per bantuko kaj kriis al la kuranta popolo: „Kio okazis? Kien vi kuras?”

– Ho, ve, mia sinjoro! – respondis iu – la armeo de Szatmár kaj dudekses mil banditoj invadis en Transilvanion, dumvoje okupis ĉion kaj proksimiĝas al Nagyenyed.

Por bejo Iffim sufiĉis aŭdi ĉi tiun novaĵon. Tuj li fortigis ĉirkaŭ sia talio la bantukon kaj senturbane kaj sen io alia kuregis en la stalon, saltis sur senselan ĉevalon kaj forgalopis forlasante la urbon Nagyenyed sen adiaŭo kaj alveninte al Temesvár li disvastigis la famon, ke la armeoj de Szatmár okupis la tutan Transilvanion.

Do, Teleki atingis la celon. La armeoj restis en Transilvanio. Sed li atingis ankaŭ ion alian. Li nur petis sinjoron Kászonyi fari insidan atakon, sed Kászonyi sendis la banditojn de Kökényesdi kontraŭ li. Ĝis Kolozsvár ili detruis Transilvanion.

Kvankam pastroj Gregorio kaj Magyarai ekkaptis la estron de la banditoj, tio ne ŝanĝis la aferon, nome la superruza aventuristo samnokte faris tunelon el la prizono kaj kune kun siaj kunuloj fuĝis.

Sekvatage matene Gregorio rimarkis la fuĝon de la malliberuloj. Li ege ektimis, pensante pri tio, ke la banditoj revenos. Pro tio li kolektis la pilgrimantan popolon, metigis la pleje necesajn aĵojn sur ĉarojn, la nutraĵojn, trezorojn de la altaro. Poste li kondukis ilin inter la montojn kaj kaŝiĝis en la groto de Balina. Li po unu portis la malfortulojn trans la rapide fluantan montan rivereton. Li lokis ilin en la grandega rokoĉambrego, kiu servis kiel rifuĝejo ĉiam por la popolo kontraŭ la tataroj. Supre de la rokoĉambrego estis granda fendo por la fumo kaj trans la ĉambrego fluis rivereto, kiu certigis la trinkeblan akvon por la popolo. Dum unu horo la kuŝejoj pretiĝis el herbaro, el arbofolioj kaj en la bakfornoj, sur fajrejoj eblis fari la manĝaĵojn. Ĉe la fino de la ĉambrego estis farita la altaro, sur kiu estis trovitaj ĉiuj apartenaĵoj.

Dume Kökényesdi rapidis postatingi siajn armeojn por kolekti, kiujn Gregorio disigis. Li ne volis, ke la Kolozsvár-anoj kaptu ilin. Li ordonis Szénási-n (senanaŝin) kolekti liajn erarvagantajn homojn, kiuj estis senditaj al vinkeloj de Egereŝ, kaj ili sieĝu la klostron.

Sed kiam Szénási revenis kun la ducent malsataj homoj, tiam trovis nur la malplenan klostron, pro kio li forbruligis ankaŭ la tegmentaron.

Poste li ĉe la lumo de la klostro skribis ironian leteron al Teleki, en kiu li informis lin, ke atako de Transilvanio okazis kaj ankaŭ aliokaze li volonte plenumos liajn ordonojn. Ĝuste kiam valaĥo-cigano forportis la leteron, galopis al la brulanta klostro iu rajdantaro, kies estro estis Kökényesdi. Szénási rekonis lin.

– Ni estas malvenkitaj! – kriis Kökényesdi. – Ni estas ĉirkaŭbaritaj! Ĉiuj pastroj iĝis soldatoj kaj bonege batalas per la glavo. La kalvinana pastro, la monaĥoj, la serba popo, la unitarianoj kunportis dudek mil homojn kontraŭ ni. Studentoj, majstroj,

kamparanoj atakis nin. Mia armeo batalis kontraŭ la botistoj. Kamparanoj kaj nobeloj pelis la kurantajn banditojn. La kaptitojn kaj malliberulojn oni forprenis. La kalvinana Josuo konstante pelas kaj neniu povas liberiĝi.

La estro de la banditoj tiel kondukis kiel estroj de banditoj kutimas kaj ĉe venko kaj ĉe malvenko. Li kuras antaŭe, sian armeon li forlasas kaj klopodas savi sin.

Kiam li rajdante findiris la mesaĝon al Szénási, tiam li forgalopis forlasante la magistron kaj la infanterion.

La vulpo estas tiam la plej ruza, kiam ĝi falas en la kaptilon. La hipokritulo, kiu havis malbonon, sciis, ke li ne povas saviĝi, ĉar la rajdantaro ĝis Nagyvárad postatingos kaj mortigos lin. Malfeliĉo estis, ke li ne estis kapabla rajdi kaj pro tio ne povis savi sin.

Jam ĉie eblis aŭdi la trumpetojn de armeoj de Transilvanio, ĉie videblis la danĝeron signantaj fajroj kaj eblis vidi kurantajn homojn de Kökényesdi. Tiuj timigadis unu la alian kriegadante. Tiuj ne kuraĝis iri al la neĝmontaroj pro la valaĥoj, sed ĉe la landvojo ili timis la germanajn dragonojn.

Szénási malesperiĝinte tuj surmetis dumvoje akiritan kamparanan vestaĵon, grimpis sur iun arbon kaj kiam li ekvidis rajdantaron, kriis al ili:

– Dio benu vin, miaj sinjoroj!

Tiuj rigardis sur la arbon kaj petis lin degrimpi de ĝi.

– He, ĉu ankaŭ vi kaŝis vin de antaŭ la banditoj?

– Ho, ve, miaj karaj sinjoroj! Tiuj ne estis banditoj, sed germanaj soldatoj en hungaraj vestaĵoj, kiujn oni sendis de Szatmár. Gardu vin peladi ilin, ĉar la germanoj kaj Szatmár-anoj komune atakos vin. Mi aŭdis ilian parolon, ĉar mi komprenas ilian lingvon, sed mi ŝajnis kvazaŭ mi ne komprenus, kiam iu peladis min. Ili diris, ke ili ricevis ordonon de la dragonoj de Kolozsvár invadi la urbon. Miaj sinjoroj! Ĉio estas ebla!

La sinjoroj konsterniĝis, ja la informo ne estis malreala. Kaj ĉar okazis, ke la kaptita patrolanto nur la germanan lingvon parolis, rapide kiel la fajro disvastiĝis la famo, laŭ kiu la dragonoj interkonsentis kun la malamiko kaj volis ilin kapti. La studentoj eksciis la famon de la nobelaj sinjoroj, kaj la studentoj pludiris tion al la metiistoj. Kiam sinjoro Ebéni kaj la pastroj rimarkis tion, tiam jam preta estis la ribelo en la armeo. La nobelaj sinjoroj urĝis, ke oni devas forpreni de la germanoj la glavojn kaj ĉevalojn kaj la studentoj volis ataki la germanojn. Sed la botistoj estis la plej saĝaj, ĉar ili volis atendi ĝis la germanoj kuŝas por dormi kaj poste kunligi ilin.

Szénási nun turnis sin, ekvidis la dragonojn, kiuj kolopodis plenumi la ricevitan ordonon. Szénási iris al ili:

– Miaj sinjoroj! Estas malbono! Ĉu vi vidas tie la hungarajn sinjorojn? Rigardu, kiom ili skuas siajn pugnojn minacante. Gardu vin! Iu diris al ili, ke vi interkonsentis kun la Szatmár-anoj kaj ili ĉiumaniere volas mortigi vin.

Vere ili povis aŭdi la minacadojn. Pro tio la germanaj soldatoj ege malesperiĝis. Ili diris, ke ili batalas por Transilvanio kaj tio estas la premio, ke oni kvalifikas ilin kiel perfidulojn. Pro tio ili kolektis siajn armeojn, sonigis retiriĝon kaj kreis por si sian defendan pozicion. Dum unu horo ribelo okazis en la armeo de Ebéni. Kaj li kaj lia kuranta grupo facile povis rifuĝi de antaŭ ili. Ebéni tutnokte suferis ja delegitoj de hungaroj kaj germanoj venis al li por postuli kompenson. La piaj pastroj kuris tien kaj reen inter la homoj por silentigi ilin, dirante, ke nek la hungaraj sinjoroj, nek la germanaj sinjoroj volas bati unu la alian. Je tagiĝo la sinjoroj paciĝis kaj estis konvinkitaj, ke la tutan embarason iu artifika aventuristo faris, kiu pro tio estis kapabla rifuĝi de antaŭ la pelantoj ĝis la landlimo, kie ili ne postatingos lin.

9. Damofiro

– Ho, mia ŝatata Peŝto! Vi estas bela, juna urbo, diamanto de mia lando, kiun ĉiuj hungaroj kuname mencias kaj pro kiu ili ne estas feliĉaj, ĝis ili ekvidas vin. Se la hungaro ekvidas viajn tegmentojn, tiam vi estos fieraj. Se iu evento – ĝojo, aŭ malĝojo – okazas inter viaj domoj, tiam tio estas okazaĵo de la lando. Se iu kuraĝus diri, ke ekzistas pli bela urbo en la mondo ol Peŝto, ties damoj estas pli belaj, ol tiuj de vi, tiam tiu suferos riproĉon.

Kial mi ŝatas vin? Mi scias. Mi longtempe estis malproksime de Vi. Mi trankvile vivis en fremda lando, ĉe vi danĝero atendis min. Tamen mi revenis al vi. Mi ploris ekvidante vin kaj kisis vian teron.

Mi ofte meditas pri via estonteco, mi vidas vin post jaroj, jardekoj, dum kiuj vi beliĝis... La pompa Danub-borda panoramo plilongiĝis, la palacaro spegulas sin en la rivero Danubo. En la marmora haveno ŝipoj venas – iras. Aliloke iu granda bazaro malfermiĝas, en kiu la komercistoj de la mondo vendas majstroverkojn de la industrio. Denove aliloke estas servemaj konstruaĵoj: hospitaloj, domoj de malriĉuloj, internulejoj de trovitaj infanoj, rifuĝejoj de mutuloj kaj frenezuloj...

Aliloke estas ejoj de la amuzo kaj arto, teatroj, cirkoj kaj akademio por pentristoj kaj skulptistoj, kies formo similas al la Panteono. Poste ni vidas lernejojn, muzeojn, bibliotekojn, kiuj gardas trezorojn de la scienco kaj literaturo.

En Rákoš¹⁰³ nova fabrikurbo konstruiĝis. En la urba bosko¹⁰⁴ estas pompa popolĝardeno, sur la insulo Diána estas hoteloj, kiujn ege ŝatas la eksterlandanoj. La insulo Margareta¹⁰⁵ estas vera paradizo! Keloj de Kőbánya¹⁰⁶ estas ĉe la fino de la urbo.

En la granda vendoplaco, en la placo Széna¹⁰⁷ estas pompaj artezaj putoj, kies akvoj falas sur marmornimfeojn. Kaj super tiuj leviĝas la turoj de la katedraloj.

Nun komencas vesperiĝi, la sonorilejoj eksonas. La sonorilegsono disvastiĝas super la urbo intermiksiĝanta per ia anonima zumado. Kaj subite milionoj da lumoj lumas: la gasolampoj komencis lumi. Estas mirindaj la lumoj de la Ĉenponto, la pompa tunelo ĝis la Diomonta urboparto, kie estas palacoj de la plej riĉaj.

Kion mi vidas nun? Ĉu miaj okuloj blindiĝas? Ĉu feino de la imago naskis la pliantaŭajn vidaĵojn? Ĉu nun regas la rilatoj de la pli fruaj jarcentoj?

Kiom forlasita loko estas ĉi tiu? Ĉie estas marĉoj, en la malproksimo estas iu malriĉa setlejo, kie unu oleolampo ĉagrenas la trankvilon de la nokto. La setlejo ne havas turon de templo, nur iun ruinan minareton.

Kie ĝi estas nun? Kion signifas ĉi tiu malĝoja vidaĵo?

¹⁰³ La teritorio ricevis sian nomon pri la rivereto transfluanta la setlejon. La rivereto estis nomita pri la kankro vivinta grandnombre en ĝi.

¹⁰⁴ Pri la Urba Bosko de Budapeŝto vi povas legi ĉe: [https://eo.wikipedia.org/wiki/Urba_bosko_\(Budape%C5%9Dto\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Urba_bosko_(Budape%C5%9Dto))

¹⁰⁵ Pri la insulo Margareta vi povas legi ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/Insulo_Margareta

¹⁰⁶ La kelaro de la Kőbánya noma parto de Budapeŝto estas elformita el pluraj ŝtonminejoj, kies tunelojn kunligite formiĝis la kelosistemo, uzita al pluraj celoj: ekz, konservo de vinoj, legomoj, estis ene ankaŭ loĝejoj, dum la mondmilitoj ja ĝi servis kiel rifuĝejo... laŭ la priskribo de la hungarlingva vikipedio: https://hu.wikipedia.org/wiki/K%C5%91b%C3%A1nyai_pincerendszer

¹⁰⁷ La nomsignifo de la placonomo Széna estas: fojno

Ĉi tio estas Peŝto meze de la 17a jarcento. Ni ne paroladu kaj ne spiradu, singarde ĉirkaŭrigardu, ĉar ĉi tie estas malbonodoraĉo kaj en la malvastaj stratetaĉoj rabistoj, kaŝmurdistoj enbuskas.

Neenie estas iu sendifekta domo, la stratoj estas malvastaj, ĉiu kvina domo estas ruinaĵ, la domoj estas neprizorgitaj. Nur kelkaj etaĝaj domoj estas ĉe la vendoplaco, kie estas domoj de riĉaj serbaj komercistoj. Ĉirkaŭe de la strato Kígyó¹⁰⁸ estas la vendoplaco pri porkoj, kie estas certigita la kotbanejo. Tio estas la sola vendoplaco de Peŝto. De la strato Király ĝis la strato Nagyhíd estas iu kavo, en ĝi multe da herbaĉoj kaj tie la domoj estas ĉirkaŭbaritaj de heĝo. Sur la loko de la lasta ruina domaĉo estis la iama amuzejo. Sur la loko de la iama komerca halo estas iu budo el lignotabuloj, en kiu nun estas deponejo. De tie ĝis la korto-Almay estas granda profunda lago, en kiu la ranoj ĉiuvespere koncertas. Sed trans la lago nur estas malfekundema dezerto. Loke de la hungara nacia teatro estas neprizorgitaj legomejoj kaj loke de la Tereza urbo estas la turka tombejo. Ĉe la bordo de Danubo kuŝas albordigitaj kelkaj malnovaj barkoj kaj estas ponto inter la du bordoj por la turkaj armeoj. La ponto estas sur pramoj kaj barĝoj. Sur la stratoj nur kelkaj homoj vagadas, mallaŭte parolante, aliaj ne komprenas ilin. Nome ili estas armenoj, serboj, germanoj, kiuj estas metiistoj. Hungaran homon ni ne vidas, ja tiuj ne venas al Peŝto. Sed se oni ordonas al tiuj veni ĉi tien, tiam ili hejme faras testamenton kaj donas dankon al Dio, se ili povis montri la dorson al Peŝto, kie furiozis la pesto.

Nu, ĉi tio estas la setlejo Peŝto en la mezo de la 17a jarcento.

Dum ĉi tiu tempo Hadĵi Baba, la plej fama komercisto pri malliberuloj de Istambulo eksciis pere de siaj interrilatoj, ke somere en Peŝto granda turka tendaro kolektiĝos. Antaŭ ol liaj kompanianoj ion ekscius pri tio, li metigis siaj varojn sur ŝipon kaj sur la Nigra Maro kaj Danubo li veturgis la valorajn varojn ĝis la fino al Peŝto ankoraŭ antaŭ la alveno de la tendaro.

Tie sur la bordo de Danubo li ankris sian ŝipon, ornamis la ŝipon, metis sur ĝin orientajn tapiŝojn, florojn, sendis antaŭen de la ŝipo saracenajn eŭnukojn, kiuj tamburis kaj muzikis per diversaj instrumentoj. Pro tio ankaŭ la montoj de Buda eĥis.

La turkaro tuj hastis en la bastionojn de la fortikaĵo de Buda kaj ekvidante la troornamitan ŝipon estis scivolaj kion ili vendas sur la ŝipo. Multe da turkoj boatis al la ŝipo. La turkoj ekscitiĝis ĉar sur la ŝipo oni vendis la plej belajn damojn de la mondo!

Kiam la unua turko ebriiĝis vidante la belegajn varojn, li hastis en la fortikaĵon por porti monon por la aĉeto. Dumvoje li informis multe da turkoj pri la vidaĵo sur la naĝanta paradizo. Post nelonge aro da turkoj boatis rapide al la ŝipo volantaj aĉeti el inter la belegaj varoj.

Paŝao Hasan, la tiama veziro de Buda, ekvidante la homamason ekkomprenis ĝiajn kaŭzojn, sendis sian favoraton, bejon Iffim por malpermesi al la popolo la aĉetadon, ĉar unue la veziro volas elekti kaj aĉeti la plej belajn varojn por sia haremo.

Bejo Iffim tuj kuris por anonci la malpermeson en la urbo kaj ĉar la boatoj malaperis, li eksidis en drapiritan barketon de la veziro kaj boatis al la ŝipo de Hadĵi Baba. La homkomercisto rimarkis la proksimiĝantan drapiritan ornamitan barketon, tuj venis sur la ferdekon, ĵetis sin vizaĝalteren, atendis por paŝi la bejon Iffim sur sian ŝultron antaŭ ol paŝi sur la ferdekon.

La bejo humile informis la komerciston, ke li venis por elekti el la ekspoziciitaj varoj por la veziro de Buda, la ĉefveziro de la hungariaj paŝaoj.

¹⁰⁸ La signifo de la nomo Kígyó estas: serpento.

Hadĵi Baba denove ĵetis sin vizaĝalteren kaj benis la leviĝantan sunon, la akvon kaj remilon, kiuj portis la bejon, kaj li ankaŭ la patrinon benis, kiu naskis tiun ŝuiston, kiu faris tiujn pantoflojn, kiujn la bejo portis, kiam li paŝis sur lian ŝipon.

Li kisis la manojn de la bejo kaj poste kiel estimo-esprimon vangofrapis tiun eŭnukon, kiu kuraĝis stari tro proksime al la bejo. Poste li enkondukis la bejon en la ĉambregon de sekretoj de la sekretoj.

Ornamitaj tapiŝoj kovris la enirejon, kiujn flanken tirante oni povis vidi malhelruĝan silkan kurtenon. Nun jam aŭdeblis iu kara kanto kaj babilado. Kaj kiam la silka kurteno estis flanken tirita, tiam videblis iu blanka muslina vualo. Jam ili povis vidi ĉion en la ĉambrego, sed en la ĉambrego estantoj ne povis vidi la vizitantojn.

Dekkvar damoj ludis kaj ŝercpetolis unu kun alia kaj inter la tapiŝoj kaŝante sin, poste malkaŝante, ili kaptoludis, ludis pelludon. Poste iu muzikis per mandolino, kelkulinoj dancis kantante agrablan melodion. Aliaj balanciĝis de trabo al trabo.

Ĉiuj estis treege junaj inoj, kiuj estis elektitaj el la belegulinoj de multe da landoj. Ne eblis elekti el ili, ĉar unu estis pli bela, ol la alia.

Bejo Iffim multfoje vidis tiajn, sed nun ridetis kaj laŭdante la komerciston batadis la ŝultron de tiu.

– Hadĵi Baba, vi ŝtelis ilin el la paradizo.

Hadĵi Baba metis la manojn kruce sur la brusto kaj skuis la barbon humile.

– Mia sinjoro! Ĉi tiujn knabinojn mi edukis. Eĉ ne unu memoras sian patrinon. Mi edukis ilin de ilia infanaĝo. Mi ne vendas plenkreskajn malliberulinojn, ja ili ploras ĉiam, spitemaj, frue maljuniĝas kaj malbenigas la aliajn virinojn. Mi aĉetas la knabinojn en ilia suĉinfanaĝo. Multekosta estas ilia edukado kaj estas laciga. Sed tiu povas ĝoji, kiu povas aĉeti ilin. Vidu, mia sinjoro unu estas tiel perfekta kiel alia. Vidu tiun sveltan lilion, kiu dancas sur la angultapiŝo. Ĉu vi vidis jam similan figuron? Ŝi fleksiĝas dekstren-maldekstren kiel branĉeto de la avelo. Ŝi estas knabino de Georgio,¹⁰⁹ kiun mi aĉetis antaŭ ŝia naskiĝo. Ŝia patro ne havis monon por aranĝi sian geedziĝon kaj petis min aĉeti ŝin, kiu ankoraŭ ne naskiĝis. Hej, mia sinjoro, tiu monsumo estas malmulte da mono, sed povas esti, ke li neniam havintus infanon. Povas esti, ke li havus filon. Certe estas ke tiu mortos. Certe laŭ vi ne estas multekoste, se mi diras kvincent ormonerojn por ŝi. Vidu, nun ŝi forĵetis la pantoflojn. Kiom belaj estas ŝiaj piedoj! Certe vi ne trovas pli belajn, ol ĉe ŝi. Ĉu mi diris kvincent ormonerojn? Ŝia kosto estas sescent ormoneroj.

Bejo Iffim kiel fakulo aŭdis la vortojn de la komercisto.

– Ĉu plie plaĉus al vi tiu ĉastulino, kiu serĉante la solecon sidas sub la rozujo? Nur la rozujoj estis ege multekostaj. Miaj knabinoj ne povas esti sen rozujoj, ĉar laodoro de la rozo instruas la amon al ili. Tiu estas filino de la ĉerkesestro, kiun oni ekkaptis kune kun ŝiaj gepatroj. La edzo mortigis sian edzinon ke ŝi ne trafu nin. Sed sian infanon li ne povis mortigi, ĉar li ne havis tempon. Nome mi aĉetis ŝin. Tiu malĝoja knabino plaĉas al multe da homoj, kiuj ŝatas rozojn kaj ŝatas ruĝigi la palan vizaĝon pere de kiso. Ŝia kosto estas sepcent ormoneroj, sed mi klopodas por vendi, ja ŝi estas ankoraŭ infano.

Bejo Iffim murmuris ion.

Tiu petola damo, kiu balanciĝas, tiu estas ĉina, ŝiaj gepatroj vendis ŝin en la vendoplaco. Ŝiaj staturo, rigardo ne estas allogaj, sed se vi ektuŝas, tiam ŝia haŭto

¹⁰⁹ Georgio estas la alia nomo de Kartvelio, alinome de Gruzio:
<https://eo.wikipedia.org/wiki/Kartvelio>

similos al varmega veluro. Ŝia kosto estas kvincent ormoneroj nur al vi, sed al la aliaj estas duobla kosto.

Bejo Iffim kapbalancis jesante.

– Ĉu vi vidas tiun blondulinon, kiu kombas sin per orkombilo, kies bukloj estas belegaj? Mi aĉetis ŝin ĉe la nordaj insuloj. Certe vi ne vidis, blankvizaĝan damon, kiu portas blondajn buklojn.

– Jes, sed tiu vizaĝo estas ŝminkita – diris bejo Iffim suspekteme.

– Ĉu? – kriis Hadĵi Baba indignante. – Ĉe mi ne estas ŝminkitaj vizaĝoj. Venu kaj konvinkiĝu pri tio.

Kaj Hadĵi Baba forigis la muslinvualon kaj ambaŭ paŝis en la ĉambron.

La ludantaj damoj ekvidante la virojn, ŝrikante kaŝis sin inter la tapiŝojn kaj iliaj kapoj scivole videblis. La damo de Georgio fiere daŭrigis la dancon, la ĉina damo pli petole balanciĝis, la belegulino de la nordaj insuloj lasis fali siajn buklojn sur la ŝultrojn. Kaj nun iun sunumitan vizaĝon havanta ciganino en franĝa vestaĵo, kun plektita hararo ornamita per rubandoj, scivole ekstaris antaŭ la bejon, observis tiun, enmanigis la kaftanon de la bejo, kvazaŭ per siaj fingroj ŝi volus konstati la valoron de la silka kaftano. Fine la negrino – kiu ankoraŭ estas infano – kun orbraceletoj surmane kaj surpiede per bruletanta ambro parfumigis ĉirkaŭ la gaston kaj sincere ridetis al li.

La komercisto pravis. Ĉi tiuj malfeliĉulinoj ne konis honton. Indiferente, aŭ bonhumore ili rigardis al la aĉetisto kaj klopodis esti belaj, esperante, ke tiu forportos ilin kaj aĉetos por ili perlojn kaj sklavojn.

Hadĵi Baba kondukis la bejon al la blondulino. Li salivis la randon de la kaftano kaj frotis ŝian ruĝan vizaĝon kaj la tolo restis blanka.

– Ho, mia sinjoro! Mi ne vendas ŝminkitajn vizaĝojn havantajn virinojn. Pro tio mi havas prestiĝon antaŭ la ŝaho, emiro kaj ĥano. El mia haremo devenas tiuj knabinoj, damoj, kiuj atingas la plej ŝatatajn ŝahojn kiel edzinoj. Ĉe mi ne estas hinduaj bajaderoj, pro tio, ke ili betlon maĉas kaj la dentoj estos oranĝflavaj. Ili orumas siajn brovojn. Tio estas sakrado por ŝanĝi tion, kion Alaho kreis tre perfekte! La saracena knabino estas bela, ĉar nigra, la grekulino, ĉar ŝi estas bruna, la polino, ĉar ŝi estas pala, la itala, ĉar ŝi estas ruĝa. Ŝatataj estas la blondaj bukloj, la nigraj, la bluaj okuloj estas ekscitaj. Tiujn Dio kreis por ĝojigi la homojn.

Dum la komercisto tiom tro entuziasme parolis pri siaj varoj, la bejo Iffim en ĉiun ĉambregon enrigardis, la drapiraĵon flanken tiris kaj moroze rigardis la damojn, kiuj pompajn orientajn vestaĵojn portis, nenifaris sur siaj kuŝejoj aŭ kantis.

Hadĵi Baba postiris lin kaj pri ĉiuj knabinoj diris multe da bonaĵoj. La bejo devis esti firmdecida por elekti la taŭgan knabinon.

Iffim, la bejo jam atingis la finon de la ĉambrego kiam li enrigardis en iun etan ĉambron, kie li ekvidis iun damon, kiu estis izolita de la aliaj. Ŝi portis simplan lanovualon, nur ŝia kapo videblis. Kiam la bejo ekvidis ŝian kapon, tiam li ege surpriziĝis.

Tio estis la vizaĝo de la reĝino en la lando de la beleco! Li ankoraŭ ne vidis tiajn ekscitajn okulojn. Ŝia frunto ankaŭ sen diademo radiis dignon. Ŝia vizaĝo estis impulsigema, sovaĝa kiel tiu de Diana, kiun oni surprizis dum banado. Ŝi timigita estis kiel la kuranta Dafna.¹¹⁰ Sed poste meditante rigardis kiel Sappho, kiun oni trompis ĉe la maro, kiu ŝian amon estingis.

¹¹⁰ En la helena mitologio Dafna estis nimfo, filino de la riverdio:
<https://eo.wikipedia.org/wiki/Dafna>

– Komercisto! – diris la bejo rekonsciiĝinte – vi volas trompi min. Kial vi ne volas montri ĉi tiun el ĉielo ŝtelitan belegulinon?

– Mia sinjoro! – diris la komercisto ektimante – tio estus bona, se vi ne volus elekti ŝin.

– Hadĵi Baba! Gardu vin. Se al alia vi volas vendi ŝin, aŭ volas gardi ŝin por vi, tiam vi riskas vian vivon. Je la barbo de mia patro mi ĵuras, ke mi ne estas inda rigardi tiun hominon.

– Ĉu ŝia staturo havas iun difekton? – pensis Iffim kaj li montris al la damo por forigi sian vualon.

Liaj okuloj vibris, apenaŭ volis kredi la vidaĵon, ĉar tiu estis la figuro de iu feino. Tiu estis ege perfekta, kvazaŭ tiun skulptisto skulptintus el marmoro. Ĉirkaŭ ŝia talio estis arĝentzono, kiu montris, ke ŝia haŭto estas pli blanka, ol la arĝento.

– Estu malbenita via lango, malica babilemulo! – diris la bejo – vi nur babilemas kaj ne montras al mi la belecon de la paradizo. Kiom kostas ĉi tiu damo?

– KREDU min, ŝi ne estas taŭga por vi.

– Ĉu? Homkapa hundo!! Ĉu vi kredas, ke mi estas almozulo, kiu ne kapablas pagi la petitan monsumon? Mi venis por aĉeti al paŝao Hasan, kiu anstataŭ la petita sumo donas duoblan sumon.

Kiam la damo ekaŭdis ĉi tiujn vortojn, ŝia vizaĝo iĝis serena, ŝi ridetis, siaj okuloj brilis al la bejo Iffim kaj efike de tio la okuloj de la bejo ege vibris.

– Ho, mia sinjoro – diris la komercisto klinante sin ĝisteren – ŝia kosto estas malalta, ĉar mi vendas ŝin al malriĉa homo (muŝhir) por cent dinaroj.

– Vi estas Dio-blasfemanto. Vi aĉtaksas la majstroverkon de la Kreinto! Petu por ŝi dek mil dinarojn, aŭ vi ricevos sur viajn plandojn samkvantajn bastonbatojn.

La komercisto ĵetis sin surteren antaŭ la bejo.

– Ne aĉetu ŝin, mia sinjoro, ĉar malbonon vi farus, se vi volus porti ŝin al haremo de via mastro.

La bejo tion pensis, ke ŝia voĉo estas malbonaĉa kaj pro tio la kosto estas malalta. Li ordonis al la damo kanti.

– Ne petu ŝin por kanti, mia sinjoro – petpetegis la komercisto.

Sed la damo prenis la mandolinon kaj komencis muziki kaj samtempe kanti iun araban aman kanton:

„En la rozboskoj Ŝirazaj,
Sub la lunradioj palaj,
Tra l' sonĝoj de koroj ardaj,
Naskiĝas la vera amo.

Sur frosta Altaja monto,
Eĉ sur sanga eŝafodo,
En flam' de malama koro,
Ne mortos la vera amo.”

La bejo ne povis fari ion alian, sed eksaltis kaj komencis vangofrapi, bategi la komerciston, ĉar tiu volis konvinki lin ne aĉeti tiun damon.

La komercisto toleris la bategojn kaj kiam la alia ĉesigis la bategojn, tiam denove diris:

- Mi denove proponas tion al vi, ke vi ne aĉetu por via mastro ĉi tiun damon.
- Kian difekton ŝi havas laŭ vi, scienca strigo? Diru racian aferon, ĉar se vi mensogas, tiam mi pendigos vin sur la maston kaj vi estos ŝildo.
- Mi diros tion, mia sinjoro, se vi aŭskultos min. Ne mi estas la unua mastro de tiu damo. Jam ŝi havis kvin mastrojn, kiujn mi konas. Tiuj jam mortis de veneno, glavego aŭ silko-ŝnureto. Ŝi, kien ajn enpaŝis, tien portis la malfeliĉon. Ŝi loĝis ĉe turkoj, tataroj, hungaroj, kiujn atingis la malbonŝanco. Iblis, la Malbona spirito loĝas en ŝi, nek la Profeto, nek la Mesio, nek la Idoloj havis potencon super ŝi. Kiu brakumas ŝin, tiu prefere naskiĝintus kiel blindulo.
- Mi petpetegas denove, ke vi ne aĉetu tiun hominon, ne portu ŝin en la palacon de paŝao Hasan.
- La bejo skuis la kapon.
- Mi sciis, ke vi estas fihomo kaj stultulo – li diris al la komercisto kaj mansignis al la fraŭlino kovri sin per sia talaro kaj sekvi lin.
- Mia atestanto estas Alaho, ke mi admonis vin. Mi estas senkulpa – balbutis Hadĵi Baba.
- La fraŭlino sekvos min kaj sendu iun por via mono – atentigis la komerciston bejo Iffim.
- La Profeto vidu mian animon, mia sinjoro. Se vi volas kunporti tiun fraŭlinon, tiam mi ne donos ŝin por mono, nur kiel donacon. Mi ne volas atingi tion, ke al tiu altranga homo mi donis ŝin por konstanta mono, kiu havos multe da danĝeroj.
- Akceptu ŝin kiel donacon por via mastro.
- Mi forgesis demandi: kiel oni nomas ŝin?
- Mi diros, mia sinjoro, sed kiam vi eldiros ŝian nomon, tiam diru: „la illah, il Allah!/Ne estas alia Dio, nur Alaho!” Nome ŝia nomo estas nomo de la diablo kaj ankaŭ ŝi estas diabla virino.
- Diru tion kaj ne babilaĉu!
- La nomo de la damo estas „Azraële”... Alaho estas potenculo!...

10. La Amazondandaro

Post tri tagoj Azraële atingis paŝaon Hasan. Vespere de la tria tago Hadĵi Baba sidadis sur la ferdeko de sia ŝipo. Li plezuris, ekvidante la belan lunlumon. Li vidis ĉirkaŭe de la insulo Margareta boatojn meze de la Danubo kaj de tempo al tempo aŭdis korŝirajn ŝrikadojn. La ŝrikadoj ripetiĝis, pro kiuj lia koro kunpremiĝis.

Pli malfrue la boatoj malaperis, ĉesis la ŝrikadoj kaj sub rozlaŭboj de la ĝardeno de la fortikaĵo aŭdiĝis revada kanto. La komercisto rekonis la kanton de la odalisko, li aŭskultis longtempe, sed tiel ŝajnis, kvazaŭ li aŭdus ŝrikadojn.

Sekvatage vizitis lin bejo Iffim, kiun la komercisto akceptis bonkore: li portigis la akvopipon kaj en tasoj malvarman fruktosukon. Ĉi tiel ili sidadis pipfumante silente, ne paroladante. Post unu horo Hadĵi Baba rakontis:

– Nokte mi vidis boatojn naĝi apud la insulo kaj mi aŭdis ŝrikadojn.

Post la rakonto ili daŭrigis la pipfumadon, trinkadis fruktosukon kaj estis silente unu – kaj – duonhoron. Poste la bejo Iffim ekstaris, manpremis kun Hadĵi Baba kaj preparante sin por foriri diris:

Tio estis la ŝatataj damoj de la paŝao Hasan, kiujn oni metis en ledosakojn kaj ĵetis en la riveron Danubo. Hadĵi Baba kapbalancis, kio signifis ke tio estis atendebla.

Post nelonge la diversaj armeoj komencis kolektiĝi al Peŝto. Alvenis de Beogrado la estranta agao kaj sur la kampo de Rakoŝ faris tendaron. Bone estis videblaj la senĉese marŝantaj soldatovicoj de armeoj. Sur la ponto marŝis la soldatoj kaj tie estis la pezaj kanonoj kaj ĉaroj kune kun la okmilnombra gvarDio. Post la armeo de la agao venis paŝao Izmail kunportante dek ses mil janiĉarojn. Li faris tendaron antaŭ la reĝa palaco. La bandon de la tatara ĥano oni peletis apud urbon Vác¹¹¹ por okupi tie lokon por sia tendaro. Li havis kvar dek mil homojn. Baldaŭ alvenis princo Ghyca akompanate de 6000 rajdantoj. Tiel sume la turka armeo certe havis cent mil soldatojn inkluzive grupojn de paŝao Hasan.

Do, Hadĵi Baba faris bonan vendon de siaj varoj tute laŭ sia plaĉo, ja li havis multe da turkaj aĉetantoj. Komencer li tiel pensis, ke li portigas novajn belegajn varojn el Beogrado kiujn li povos vendi dum la tendumado. Sed li estis scivola kiom da tagoj daŭros la kolektado de la armeoj. Pro tio li demandadis la bejon Iffim.

La bejo respondis sincere. Li diris, ke kiu volis veni, tiu jam alvenis. La regnestro de Transilvanio ruze ne volis veni kaj nur paŝao Kuĉuk kaj bejo Feriz alvenos, sen kiuj la armeo ne volas ekiri.

Hadĵi Baba aŭdante la nomojn treege surpriziĝis.

– Vi faris min mortinto, mia sinjoro. Mi reiros ankoraŭ hodiaŭ al Istambulo kunportante mian ekspedaĵon.

– Ĉu vi frenezumas?

– Ne, mia sinjoro, sed mi estos bankrota, se mi atendas ilin ĉi tie. Mi neniam volas loĝi samloke kun tiuj bravaj viroj. Gardu ilin Alaho! Mi havas du domojn ĉe Bosporo por esti en Azio, se ili estas en Eŭropo, kaj se ili estas en Azio, tiam mi povas esti en Eŭropo tre malproksime unu de la alia.

– Vi parolas mistere.

– Ĉu vi ne aŭdis famon de bejo Feriz?

¹¹¹ Vác estas hungara urbo apud la rivero Danubo. Pri ĝi vi povas legi ĉe:
<https://eo.wikipedia.org/wiki/V%C3%A1c>

- Mi aŭdis pri li, ke li estas bravulo.
- Ĉu vi ne aŭdis pri la amazondandaro, kiu lin sekvas en la bataloj?
Bejo Iffim ekridis.
- Ja vi facile ridas, mia sinjoro, ĉar vi ne aĉetas-vendas damojn kiel mi. Sed vi devas scii, ke bejo Feriz estas danĝera homo por tiuj, kiuj havas damojn.
- Mi neniam aŭdis tian econ pri li.
- Sed mi jes, mi aŭdis tion. Tiu estas magion havanta junulo, en kies okuloj talismano estas kaŝita, surfrunte estas feinliteroj kaj li sorĉe parolas. Sur kiun ajn tiu surrigardas, aŭ kiu ajn aŭdas ties vortojn, tiu estas ĝiseterne delogita. Tiu similas al tiu homo, sur kiun la Luno lumas kaj kiu estas devigata sekvi la Lunon. Ho, multe da sinjoroj altrangaj malbenis tiun momenton, kiam bejo Feriz forrabis siajn plej belajn damojn.. Ankaŭ paŝao Hasan priploras sian ŝatatan bajaderon, Zaida-n, kiu sur silkoŝnurego malleviĝis el la fortikaĵo en la maron kaj naĝis al la ŝipo de bejo Feriz. Iunokte mian pli junan fraton Kutub Almuman, kiu estis same komercisto pri virinoj, dum lia sonĝo liaj damoj ŝnurligis kaj ĉiuj forfuĝis post bejo Feriz.
- Kion li faras pri tiel multe da damoj?
- Ho, mia sinjoro, ĝuste pro tio estas terura ĉi tiu historio. Ĉar se li amus tiujn damojn, tiam mi dirus: li estas saĝulo kaj gustumadas la paradizon. Sed tio estas terura, ke li ne amas ilin.
- Ĉu li estas kompatinde malfeliĉa, aŭ senmensa?
- Li amas kristanan fraŭlinon, kiu estas malproksime de ĉi tie kaj li sopiras ŝin konstante. Kiam li iris unuafoje batali, tiam li vidis ŝin unuafoje. De tiam li antaŭ la bataloj nome de ŝi tiras la glavon el la glavingo. Tio estas bela honorigo por iu kristana fraŭlino. Ĉu ne?
- Kio okazas pri tiuj damoj, kiujn li malestimas?
- Ili surgenuas al la piedoj de la bejo kaj petpetegas ame proponante sian amon, aŭ sian vivon. Lia respondo estas: "Vi ne kapablas ami tiel kiel mi. Via amo estiĝas en la ombro de rozoj, sed mia amo dum batalo. La kantisto de via amo estas la najtingalo, sed la mia estas la tarogato¹¹². Vi sopiras la ebriigajn kisojn, la sekretajn plezurojn, sed mia sopiro estas la glora morto. Se vi volas ami min, tiam amu kiel mi. Estu ĉiam apud mi kaj mortu tie, kie mi." Ho, mia sinjoro, la junulo ensorĉas la koron de damoj, kiuj forgesas, ke la damoj estas ludiloj de la viro. Ili portas glavon, sed ili brakumadon sopiras, portas kirason sur siaj mamoj, kiuj amon meritis. Kaj ili akiras vundojn sur sian vizaĝon, sed meritis nur kisojn.
- Ĉu tiuj damoj vere batalas, aŭ vi diras fabelon?
- Ili faras miraklojn, mia sinjoro. Ili neniam kuris de antaŭ la malamiko, sed multfoje venkis. Unue ili fascinas la malamikon kaj poste per glavo mortigas. La malamiko vidante ilian belecon ne defendas sin kaj lasas sin masakri. Sed bejo Feriz scias, ke ili pli furiozas, ol la viroj. Se la bejo vidas, ke la spahioj estas lacaj pro la batalo, tiam ili iras helpi la spahiojn kaj la damoj amazonaj fascine kuregas post la juna bejo por defendi lin per sia korpo ne lasante, ke kuglo trafu lin. Ili neniam kapablas forlasi lin. Okaze de venko li iras al la mortfalintaj damoj, kisas ilian frunton, priploras ilin kaj entombigas ilin. Ho, mia sinjoro, tiuj damoj ege envias la kisojn kaj ĉiuj damoj ŝatus ricevi tiujn. KREDU min, mi aŭdis iun onidiron: la tataro batalas pro la sangosoifo, la spahio batalas por la salajro, la janiĉaro batalas pro la devigo, la

¹¹²La muzikilo estas 74 cm longa blovinstrumento havanta funebran sonon. Ĝi estas ofte uzata en hungara, rumana kaj serba (sudslava) popolmuzikoj: laŭ la Eo-vikipedia artikolo <https://eo.wikipedia.org/wiki/Tarogato>

mameluko batalas por la gloro, por la araba kredo. Sed tiuj damoj batalas por la amo, ĉar la amo estas la plej forta sento tutmonde. La amo devenas de Alaho, kiu estas la plej forta Dio. Alaho estu benita!

– Ĉu ne ekzistas iu, kiu povas ĉesigi tiun malhonoron? Ĉu la veziroj ne estas kapablaj ĉesigi tiun ĉi malhonoron? Ja la damoj malhonoras la armilojn de la viroj.

– Ĉu la viroj ne postulas redoni siajn malliberulinojn?

– Mia sinjoro! Bejo Feriz estas homo ŝatata de la sultano. Li estas nur en la batalejo, aliloke ne kaj tie batalas tre bone. Se iu volus veni al li por postuli sklavojn, tiam povas esti ke tiu forirus sen oreloj kaj sen nazo. Kiu havus kuraĝon diri al la damoj, ke ili estas virinaĉoj? Ĉu tiuj damoj ne batalas per glavoj anstataŭ kisoj? Ĉu vi vidas dancon, rideton en iliaj tendoj? Ili nur unu kontraŭ alia faras intrigon. Ilia mastro ordonas tion al ili. Se iun damon vi batas, la aliaj atakas vin kiel la svarmo da abeloj. Foje tio okazis, ke iu odalisko provis fuĝi, sed ŝia mastro ŝin ekkaptigis kaj reportis en la serajlon. Tiu malbeliĝis pro la malĝojo. Sed pro la doloro ne mortis, ĉar tiu volis vivi. Sed poste ŝi iĝis memmortiga. Ho mia sinjoro! Diru al tiuj sinjoroj, kiuj de mi aĉetis malliberulinojn, ke ili gardu siajn damojn, ĉar la juna bejo estas magiisto, en liaj okuloj estas talismano. Ne forkaŝu damon de via mastro, ĉar li kapablas ravi ŝin. La diablo ne estas pli terura, ol la virino. Gardu vin, ke la diablo ne vendu vin. Antaŭhieraŭ oni ĵetis en la akvon de Danubo la fifavoratojn, sed postmorgaŭ ... Alaho gardu mian langon, ke mi ne diru, kion mi volis diri. Gardu vin! Gardi virinojn estas la plej malfacila tasko. Se iun ĉirkaŭbaritan urbon vi volas okupi, tiam kaŝu en tiun iun aman damon, kiu montros la sekretan enirejon. La ama virinaĉo kapablas trompi vin, kiel ajn vi saĝas. Mi legis fabelojn pri tiaj aferoj. Ne forgesu, kion mi diris, ĉar se vi forgesas tion, tiam via kapo estas ege senvalora.

Bejo Iffim senvorte ekstaris kaj foriris. Lin ege pripensigis la parolo de la homkomercisto. Hadĵi Baba samnokte levis la ankron kaj matene li havis nek famon nek spuron.

11. La insulo Margareta

Ne iru al la arbustoj!

Ŝipistoj, kiuj per ĉevaloj trentiras laŭ Danubo sian ŝipon en la silenta nokto; pacaj fiŝistoj, kiuj fiŝkaptas; junaj ĉevalistoj, kiuj naĝigas siajn ĉevalojn en Danubo; amaj junuloj, kiuj aŭskultas la melankolian kanton; ne iru al la bordaj arbustoj, kiuj kovras la bordajn boskojn. Tie ne naĝu kaj viajn ŝipojn forportu de tie. Ne rigardu al la insulo, prefere preĝu al viaj patronoj kaj pensu pri tio, kia feliĉo, ke vi havas familion. Nome ĉe la insulo Margareta inter la arbustoj la morto kaŝobservadas vin.

Tie estas la paradizo de paŝao Hasan, kies trezorojn vidi estas egale kun la morto, ja kie estas liaj trezoroj tie estas lia koro. Inter la bordaj arbustoj eŭnukoj staras tenante armilon (pafilon) kaj lasurakve proksimiĝanta viro al neniu rakontos la vidaĵon, ĉar iu eŭnuko lin mortpafas. Multe da panjoj vane atendis sian filon, kiun la sekreta kanto allogis al la insulo. Multfoje oni povis vidi senkapajn korpojn sur la akvo de Danubo kaj junaj kapoj estas sur palisoj sur la insulo.

Se vi vidas promeni, lanti aŭ sin bani blankajn figurojn en la akvo de Danubo, tiam klopodu foriri de tie. Tiuj estas ĝinoj, kiuj estas malbonaj spiritoj kaj belegaj transmondaj figuroj. Kiu ekaŭdas ilian voĉon, tiu estas ege amhava kaj freneziĝas pro la amo.

Piaj junuloj! Forlasu ĉi tiun lokon!

Ili dancas kaj kantas bele. Ili dancas kaj kantas multe pli bele, ol viaj nordaj dancistinoj, kaj kantistinoj. Ĉi tiuj damoj revigas kaj dormigas vin kaj frenezigas per sia amo. Vi ne estas kapabla liberigi vin, ili vendas vian koron per la amo. Ili sopirante rigardas vin, kiu rigardo allogas vin. Ilia movo estas alloga kaj vi sopiradas post ili. Kaj fine vi terenĵetiĝas antaŭ ili kiel la tigro faras vidanta la proksimiĝon de la fianĉino de la vento.

Ho, junuloj, tuj forlasu ĉi tiun lokon! Kiu forlasas tiun, tiu restas juna, sed kiu restas ĉi tie, tiu ne estos maljuna, ĉar li junaĝe mortas.

Ĉio montras ĝuon, la paradizo havas belegajn damojn, inter ili estas prosperantaj kaj velkantaj. La prosperantaj estas karaj, sed la velkantajn oni elĵetas. Sed en la porcelansiteloj de Azraële ofte videblas kapo de iu odalisko, kiu estis hieraŭ freŝa kaj viva.

Ho, tiu damo estas vera demono. Paŝao Hasan jam ne estas homo, nur peco de vakso, kiun tiu demono formas, direktas. Li vidas nur ŝin kaj nur aŭdas ŝian voĉon. La paŝao ne rekonas la aliajn homojn, eĉ ne rekonas la diferencon inter la tarogato kaj trumpeto. Neniu kuraĝas mencii liajn erarojn, ĉar oni ne volas perdi sian kapon. Nome Hasan volas sekretigi siajn erarojn, ĉar li timas, ke oni ne permesos estri la tutan armeon.

Sed bejo Iffim pli bone vidas kaj aŭdas, ja li ĉiam moviĝas ĉirkaŭe de Azraële kaj ĉar li estas fidela favorato de paŝao Hasan, pro tio li ne bedaŭras, ke li havas bonajn okulojn kaj orelojn. Sed Azraële bone scias ĉi tion kaj ankaŭ, ke la kapo de la bejo ne estas endanĝerita kiel la kapoj de la dorlotantaj homoj, kiuj dorlotadas la paŝaon.

La paŝao tre atendis la finon de la vespera preĝo, kiam li forsendis siajn agentojn kaj enboatigis. Tiun kurtenan boaton oni konas sur la feininsulo. Li boatigis sin en la kaŝitan paradizon, kie inter ducent damoj atendis lin la plej bela mortema damo, Azraële. Ŝi staras en la halo de la feina kiosko, tra kies orkradaro disvastiĝasodoro de sudregionaj floroj kaj sur la supro de la statuoj estas incensiloj, kiuj faras ebriigan odoron.

Nur bejo Iffim povas akompani la paŝaon ĝis la kiosko.

La paŝao brakumis la odaliskon kaj promenis inter la bonodoraj arboj, kie sur la vojoj estis ŝutitaj gruzeroj. Sur la arboj birdoj nestas. La bejo akompanas ilin, lasante malmulte da distanco kaj vidas iliajn movojn kaj aŭdas ĉiujn iliajn voĉojn, vortojn.

Dum la promenado falko flugas super ili kaj sur poploarbo tiu malleviĝas.

– Rigardu, mia sinjoro! Tie estas iu bela falko! – kriis bejo Iffim.

– Ho, ve! bona bejo! Ja tio estas ne falko, sed palumbo.

– Azraële! Mi vidis bone! Tie sur iun poploarbo ĝi malleviĝis.

– Kaj nun vi diris poploarbo anstataŭ juglandarbo. Ej, ej! Brava bejo, vi ion drinkis kaj malboniĝis via vido.

– Mi tiel pensas, ke ĝi estas poploarbo – diris la bejo embarasita kaj ne komprenis, kial ŝercadas la odalisko.

– Nu, rigardu, mia sinjoro – parolis Azraële al la paŝao – tie estas sur iu arbo iu birdo. Ĉu tiu arbo ne estas juglandarbo kaj tiu birdo ne estas palumbo?

Hasan vidis nek arbon, nek palumbon, sed ŝajnigis kvazaŭ li konus tiujn kaj diris, ke lia damo pravas.

– Fakto estas, ke ĝi estas juglandarbo kaj la birdo estas palumbo.

Bejo Iffim ne komprenis la ŝercon.

– Mia sinjoro, ĉu ni ne povas iri al la rozbosko?

Azraële miris pri tio kaj diris:

– Kie vi vidas ĉi tie rozboskojn?

– Turnu vin kaj ankaŭ vi vidos tiujn.

– Ĉu tiuj? Ja tiuj estas fraksenoj havantaj ruĝajn berojn,

Hasan ekridis kaj la bejo ege miris pri tio pro la ŝercoj de la damo. En la sama momento sur la bordo de Peŝto aŭdeblis kanonpafo.

– Aĥ! – alparolis la paŝao ekhaltante – tio estas kanonpafo.

– Jes, mia sinjoro – diris Iffim – de Peŝto.

– Ne de Peŝto – diris Azraële – sed de Óbuda (Malnova Buda). Tio signas la fermon de la pordegoj de la urbo.

– Mi aŭdis bone.

– Pardonu min, bejo, sed vi malbone aŭdas kaj malbone vidas kaj mi estas maltrankvila pro vi. Kiu povus pafi de Peŝto, ja la tendaro marŝis hieraŭ al Buda?

– Povas esti, ke nova tendaro alvenis, kiun ni atendis.

– Ni venu – diris Azraële prenante la manon de Hasan – tuj ni ekscios la veron.

Sur la transa bordo videblis la tendaro de bejo Feriz. Liaj soldatoj ĝuste tiam starigis la tendojn. Surborde rajdantoj moviĝis, antaŭe rajdis la bejo Feriz. La fifavorato kaj fifavoratino tuj rekonis lin.

Nur Hasan vidis neniun kaj nenion, ĉar en la malproksimo li vidis nur bluan kaj flavan kolorojn.

– Ĉu mi pravis? – diris Iffim triumfe. – Tio estas la tendaro de bejo Feriz kaj li rajdas antaŭe de siaj rajdantoj,

Sed Iffim konsterniĝis pro sia diro, ja Azraële ne povas vidi la bejon Feriz. La odalisko ekridis kaj brakumis la kolon de Hasan:

– Aĥ! Laŭ tiu ĉi brava bejo la transbordan akvon portantaj damoj estas milita tendaro.

Iffim nun konsterniĝis, ĉar li ekkomprenis la celon de la ŝercoj de la odalisko.

– Mia sinjoro! Ordonu al via sklavino ne primoki min. Tie estas la tendaro de bejo Feriz kaj ne permesu rigardi la virojn sen vualo.

– Bona bejo, vi konsternas min – diris Azraële ŝajnigante ektimon kaj pro tio ankaŭ Hasan ektimis.

– Kie estas la tendaro de Feriz? – demandis Hasan.

– Ĉi tie sur la bordo, kie estas la tendoj.

– Tiuj estas certe la disfalditaj toloj, kiujn la damoj blankigas.

– Sed mi aŭdas ankaŭ la sonojn de trumpetoj signantaj la vespersignalon.

– Mi aŭdas gajajn kantojn de tiuj damoj.

La bejo iĝis furioza.

– Mia sinjoro, ĉi tiu sinjorino primokas min.

– Vi fantazias – dirias Azraële ektimante. – Vi estas sorĉita kaj vidas ne ekzistantajn aferojn. Bonvolu ne protesti, ĉar ĉi tiun sorĉon ankaŭ aliokaze vi havis. Memoru, ke kiam vi fuĝis el Transilvanio, tiam vi diris, ke malamiko persekutas vin. Ankaŭ tiam vi havis sorĉon. Via eŭnuko, kiu nur pli malfrue venis post vi, asertas, ke nenie estis malamiko kaj pensis, ke vi freneziĝis. Do, sorĉo montris la malamikon al vi. Pro tio vi forfuĝis kaj ĉi tie disvastigis famon pri la malamiko.

La bejo Iffim paliĝis. Li devis kapitulacii, ĉar ĉi tiu diabla damo pravis.

– Ĉu tio okazis tiel, Iffim? – diris Hasan kolere.

– Pardonu lin, mia sinjoro, li estis sorĉita kiel ankaŭ nun – konsolis lin Azraële.

– Vi pravas. – li balbutis nevole.

– Sed mi rompos la sorĉadon – diris la samon kaj iris al la bordo de la akvo de Danubo por malsekigi sian manon kaj akvon ŝprucis sur vizaĝon de la bejo. Kaj ŝi murmuradis superstiĉajn frazojn. – Kaj nun rigardu kaj vidu.

La bejo faris ĉion laŭ la ordono.

– Kiuj estas sur la bordo de Danubo?

– Junaj knabinoj – respondis la fifavorato.

– Kiuj estas tiuj blankaĵoj?

– Disfalditaj tolaĵoj.

– Ĉu vi aŭdas jam la kanton de la knabinetoj?

– Jes.

– Nu, vidu, mia sinjoro, la miraklojn – diris Azraële turnante sin al Hasan – ĉu ne estas mirige, ke kie Iffim vidas malamikojn, tie estas nur belaj knabinetoj.

Alaho faras la miraklojn, sed mi tiel opinias, ke la okuloj de Iffim estas malbonaj, ĉar li kredas, ke la knabinetoj estas soldatoj.

Iffim ne kuraĝis diri, ke male la okuloj de la paŝao estas malbonaj, ĉar tiuokaze li mortigus lin. Hasan kredis, kion lia damo diris al li, kiu primokas lin kaj lian fifavoraton. Ŝi sciis, ke Hasan ne perfidos ŝin, ke li ne vidas kaj Iffim ne kuraĝos refuti la sorĉadon, ĉar tiuokaze la paŝao ekscios la famon pri la malamiko.

Dume transborde de Danubo Feriz kun ordonoj aranĝis la lacan armeon, plurfoje galopis sur sia araba ĉevalo. La odalisko konstante rigardis la junulon, aŭdante liajn ordonojn kaj pro tio ŝi iĝis ĉiam pli kaj pli ekscitita.

– Mi treege ŝatas aŭskulti kantojn de tiuj knabinetoj. Ĉu vi ne, mia sinjoro? – Ŝi demandis la paŝaon Hasan.

– Ankaŭ mi – li respondis rapide.

– Ĉu vi ne volas sidiĝi apud min sur la bordon?

La paŝao sidiĝis apud la odaliskon, kiu ĝisduone kliniĝante en lian sinon, plektis ŝiajn brakojn ĉirkaŭ la kolon de la paŝao. Sed dume ŝi konstante atentis la bejon Feriz.

– Rigardu, mia sinjoro – ŝi diris kaj montris al Hasan la kontraŭbordon – inter la aliaj estas tie iu svelta knabineto, kiu promenas laŭ la bordo. Ŝiaj okuloj brilas kiel la fajro, kiu estas svelta kiel kano. Ŝi estas ĉarma kaj svelta. Kial mi ne povas brakumi ŝin kiel mian fratinon? Kial mi ne povas diri al ŝi, ke „mi amas”, kiel mi ne povas diras al ŝi: „Mi entuziasme admiras vin!”

Poste ŝi premis al sia brusto la paŝaon, kisis lin multfoje. Li estis feliĉa pro la plezuro kaj ĉion vidis, kion ŝi diris al li. Li ne suspektadis, ke tiu kiso kaj brakumado ne por li estas, sed por iu junulo, pri kiu lia ŝatata damo konfesas amon antaŭ li.

Bejo Iffim staris malantaŭ ili kaj gapante kapbalancis, memorante la vortojn de Hadĵi Baba: „Vi aĉetis la diablon, gardu vin ne vendi vin!”



Milita marŝo de la turkaj armeoj ĉe Buda. Desegnaĵo de Samuel Grilbaum
<https://dka.oszk.hu/html/kepoldal/index.phtml?id=25921>

12. Unu stelo en la infero

Silentas la ombroj de la nokto, kiuj gardas la dormantojn kaj defendadas ilin de la fantomoj. Ĉiuj ripozas kiel abelo inter florpetaĵoj. Ĉio dormas silente, nur la steloj kaj la flamanta amo estas vekaj.

Kiom silenta medita kanto aŭdeblas el inter la bordaj salikoj! Kvazaŭ la najtingalo havus voĉon de homo por kanti la amajn sopirojn. Tio estas Harriri, la poeto, kiu estas bejo Feriz, leono de la bataloj tenanta glavon. Li vespere, kiam la tendaro silentiĝas, demetas sian kirason, surmetas burnuson kaj prenante iun liuton kantojn komponas kaj fine la tarogato muzikas veksinalon.

Multe da palaj damoj aŭskultas la revadantajn kantojn kaj pli forte paliĝas.

Ĉe la bordoj de la insulo Margareta silente eŭnukoj iradas malrapide tenante longajn pafilojn. Ili kelkfoje haltas, se ili vidas brueton de suspekta boato apud la bordo. Inter tiuj la plej vigla estas la kaduka Majmun, kiu dormas nur ĝisduone. Pli frue li gardis haremojn. Li sidiĝis sur la bordon kaj li rimarkis mesaĝkolombon. Li nun alvenis al la insulo, pli frue li akompanis bejon Iffim en Transilvanion kaj odaliskon Azraële nun unuafoje vidis, kiam ŝi rakontis al li sian aventuron. Liaj okuloj similis al aglo kaj rimarkis ankaŭ iun skarabon flugantan. Sed nun subite iu batis sur lian ŝultron. Li ektimante turnis sin kaj ekvidis la odaliskon Azraële.

– Damno estu sur tiu kantanto! Mi atentis la kantanton kaj ne rimarkis vin. Kion vi faras dum la malhela nokto? Kiel vi povis forfuĝi el la haremo?

– Ho, mi petas vin, ke vi ne faru bruegon! – diris la odalisko – hieraŭ vespere mia sinjoro kaj mi boatadis kaj ni perdis mian orbraceleton, kiun li donis al mi kiel donacon. Se li rimarkos, ke tiu ne estas ĉe mi, tiam li mortigos min. Ho, lasu min serĉi tiun en la akvo!

– Vi estas freneza fraŭlino. Ĉi tie estas profunda la akvo kaj vi dronos en la akvo.

– Mi ne bedaŭras mian vivon, sed devas serĉi tiun braceleton ankaŭ, se mi mortos. Kial mi vivu, se mi perdas la favoron de mia sinjoro?

La odalisko diris tiujn vortojn ege malesperiĝinte. La eŭnuko pro tio konsterniĝis.

– Ja se nur estus iu, kiu povas fari ĉi tiun laboron.

– Bone estus, se iu povus serĉi tiun braceleton. Mi donus al tiu tri aliajn braceletojn.

– Mi serĉos tiun braceleton, – diris Majmun, estis emociita pro la malavareco.

– Ho, iru en la akvon serĉi la braceleton – petpetegis la damo surgenuante antaŭ la eŭnuko kisantemane lian manon. –

– Ĉu vi ne timas droniĝon? Nome se vi droniĝos en la akvo, tiam mi estos duobla kulpantino antaŭ la veziro.

Majmun emociiĝis pro la tenereco de la damo.

– Ne havu zorgon pro mi. En mia junaĝo mi estis perlofiŝisto ĉe insuloj de Hindujo kaj longtempe kapablis esti en akvo eĉ ankaŭ nokte mi vidas en la akvo. Sed montru tiun lokon, kie falis la braceleto en la akvon.

Azraële ĵetis en akvon alian braceleton kaj montris la lokon.

– Ĝuste tie falis en la akvon tiu braceleto. Se vi portos tiun al mi, tiam ankaŭ la alian braceleton mi donas al vi.

Majmun konvinkiĝis, ke tio ne estas ŝerco. Li demetis la vestaĵaron kaj armilon sur la bordon kaj subakviĝis.

Post kelkaj minutoj la eŭnuko ektimante naĝis super la nivelon de la akvo kaj perdante la sinregon kuregis al la bordo.

– Ho, ĉi tiu estas malica loko! – li diris – Sur la akvofundo estas multe da homkapoj!

– Mi scias tion! – diris la odalisko trankvile.

La eŭnuko konsterniĝante rigardis ŝin kaj gapis, ĉar la petpeteganta damo nun fiere staris antaŭ li.

– Tiuj kapoj estas la kapoj de viaj kunuloj – diris Azraële al la eŭnuko, – al kiuj mi ordonis ion pasintnokte, sed ili ne plenumis la ordonon. Pro tio mi akuzis ilin antaŭ la veziro, kiu pro tio senkapigis ilin.

– Kio estis tiu ordono?

– Naĝi al la transbordo kaj ĉi tiun girlandon transdoni al iu junulo.

– Ha! Ja vi estas perfidulino!

– Ne havu zorgon pro tio! Ĉu vi aŭdas kanti tiun kantiston inter la transbordaj salikoj? – Mi petas vin naĝi al tiu kaj transdoni ĉi tiun girlandon. Sed se vi ne faros tion, tiam ankaŭ via kapo estos sur la akvofundo inter la aliaj. Sed se vi faros tion, tiam vi estos riĉa de mi dum via estonta vivo. Elektu, aŭ vi estos feliĉa, aŭ mortos malfeliĉe.

– Sed mi povos mortigi vin! – diris la eŭnuko grincigante sian dentaron.

Azraële ridis.

– Vi estas stulta besto. Dum vi estis en la akvo, mi metis teron en la tubon de via pafilo kaj vian ponardon kaŝis. Se vi provos kii, tiam vian kapon jam hodiaŭ mi metos al viaj piedoj.

La odalisko forte ekkaptis la brakon de la eŭnuko. Efike de tio la eŭnuko siblante klinis sin antaŭ ŝi.

– Kion vi ordonas?

– Mi jam diris tion.

– Sinjorino, ĉu mi ludas kun mia kapo?

– Prefere vi ludu kun tiu, ol mi.

– Kion vi faras? Vi volas perdi vian vivon, ja vi agas je via perejo. Multe da homoj mortis pro tia krimo.

– Multe da homoj mortis pro la amo kaj multe da homoj amas. Sed vi ne povas kompreni tion. Ĉu vi aŭdas la kanton sur la transa bordo?

– Mi aŭdas tre bone.

– Ĉu vi neniun amas?

– Ĉu mi povas ami iun?

– Kaj tamen vi emociiĝis efike de la kanto, ja vi ne rimarkis miajn paŝojn.

Eĉ la najtingalo ne kantis pli bele, ol tiu junulo.

– Ĉu vi aŭdis pri la feinoj, kiuj sidas sur la koralinsulo kaj allogas la ŝipistojn inter la dentojn de la centkapa Rok?

– Ĉu tiu kantisto estas unu el tiuj feinoj? – demandis Majmun terurate.

– Mi ne scias tion, sed sentas, ke mi mortos, se mi ne povas iri al tiu. Mi volas iri al tiu, volas brakumi lin kaj volas kisi lin. Portu min al la transa bordo.

La eŭnuko tremetadis antaŭ la odalisko. Sed li iĝis suspektema, kio regis lian animon.

– Nur unu boato estas sur ĉi tiu insulo – diris Majmun al la odalisko. – kaj en ĝi bejo Iffim kutimis dormi atentante kaj gardante ke ne fuĝu iu odalisko dum Hasan dormas.

– Ho! Kial mi ne kapablas naĝi? – kriis Azraële doloreme.

– Ĉu vi volas transnaĝi ĉi tiun riverregon?

– Mi tuj transnaĝos tiun.

– Vi subakviĝos, ja vi ne povas naĝi.

– Vi naĝos kun mi. Mi prenos vin kaj vi naĝos.

– Vi estas freneza! Pli frue vi volis mortigi min kaj nun vi petas mian helpon. Se mi subakviĝas nur du minutojn, tiam vi dronos. La riverego estas senindulga kaj dronigas tiun, kiu ne povas naĝi.

– Mi ne timas la morton. Portu min al la transa bordo.

– Vi deziras frenezaĵon. Ankaŭ bona naĝanto povas droni kaj se vi ektimos de iu akvoondo, tiam vi perforte prenos miajn manojn. Tiukaze mi ne estos kapabla naĝi kaj ambaŭ dronos.

– Se vi teruriĝas, lasu min droniĝi.

– Ne, tion mi ne faras. Vi estas freneza, sed mi konscias pri miaj agoj. Reiru en la kioskon de la veziro dum li ne rimarkas vian foreston. Mi ne perfidas.

– Ĉu vi ne venos kun mi? – demandis la odalisko.

– Se mi iros kun vi, mi ne vidu la sunon! – diris Majmun kaj sidiĝis sur la bordon.

– Bone estas, kompatinda sklavo – kriis Azraële malesperiĝinte. – Do, mi iros sola! – kaj ŝi ĵetis sin en la akvon rapide.

Majmun ne estis kapabla malhelpi la fuĝon de la damo, sed ektimante postsaltis ŝin kaj ekkaptis la hararon de la damo. Sed ŝi kun siaj brakoj brakumis la eŭnukon kaj subakvigis tiun, poste ŝi kriis:

– Portu min al la transa bordo, aŭ mi dronigos vin kaj min!

La eŭnuko malesperiĝinte baraktis, sed konvinkiĝis, ke li ne povas liberiĝi de la damo. Li perforte leviĝis el la akvo kaj droniĝante kriis:

– Mi portos vin tien!

La damo nun jam ne prenis lian brakon, sed ekkaptis lian hararon kaj trankvile diris al Majmun:

– Klopodu naĝi. Se vi volas fari ion alian, tiam pensu pri tio, ke mi ne timas la morton, kaj se vi kunportas min sur la akvofundon, ankaŭ tiam vi mortos. Rapidu!

Majmun rapidege naĝis. Kiu rimarkus ilin dum la malhela nokto? La eŭnuko naĝis kaj tiris la odaliskon. La akvoondoj kelkfoje kovris ŝian vizaĝon kaj kelkfoje ŝi tremetadis. Kial? Ĉu pro la timo, aŭ pro la amo? Ĉirkaŭ ŝi kaŝrigardis la morto, la akvo muĝis, en la silento kantoj aŭdiĝis. La nigra kaj blanka korpoj videblis sur la akvonivelo.

Super ŝi la steloj brilis, ili estis inter la ĉielo kaj infero. La vivo de la damo dependas de iu tremetanta voĉo.

– Ĉu la bordo estas ankoraŭ malproksime? – demandis la odalisko, ja ŝi kuŝis surdorse. kaj ne povis vidi la bordon.

– Ĉu vi timas?

– Mi timas, ke mi ne povas vidi la junulon.

– Tuj ni estos ĉe la bordo, ĉar nun la rivero estas larĝa pro la inundo.

Post kelkaj minutoj la piedoj de la saraceno sentis teron kaj super la kapo de la damo estis branĉeto de salikoarbo. Ŝi ekkaptis tiun kaj leviĝis el la akvo.

Ŝia leĝera vestaĵaro malseke alteniĝis al ŝia korpo, kio estis tiel centoble fascina. Ŝia longa kaphararo malordiĝis, pro kio ŝi ligis la displektiĝintan kaphararon ĉirkaŭ sian talion. Li mallaŭte tremetante elpaŝis el la arbustoj kaj ekvidis la junan kantiston, kies voĉo allogadis ŝin. Ŝi apenaŭ spiris kaj ŝia koro estis maltrankvila.

La juna kantisto sidis sub iu tilio kantante, lia kapo estis en liaj mankavoj. Apud li estis la liuto, li meditis, kvazaŭ atendante respondon de lia kanto.

– Nun vi povas paroli kun tiu – diris Majmun al la fraŭlino. Sed Azraële staris senvorte, apogis sin al la plorsalikarbo kaj senmove rigardis la junulon.

– Do, rapidu paroli kun li, ja la nokto tuj finiĝos kaj ni devas reiri. Kial vi hezitas, ja vi volis vidi la junulon.

La odalisko mute suspiris.

– Tion vi diris, ke volas tiun brakumi, kisadi tiun. Kaj nun vi nur staras kiel iu fascinata vivaĵo.

La odalisko falis sur siajn genuojn kaj kovris sian vizaĝon.

– Ĉi tiu fraŭlino tute freneziĝis – murmuris la saraceno – se vi nur volu plori, tiam vi povus plori ankaŭ sur la alia bordo.

La fraŭlino metis la manojn sur sian bruston, ridetante rigardis al la ĉielo kiel pentofaranta kulpanto, kiun rigardis la anĝeletoj de la ĉielregno.

Nun en tiu momento malproksima klarionsono aŭdeblis en la silento. Efike de tio la kantisto iĝis militestro. La klariono signis la unuan alarmon, kiu aŭdeblis de Buda kaj poste la veksinalon. Hariri iĝis bejo Feriz, prenis sian glavon kaj rapidege malaperis inter la salikoj de la bordo. Li forgesis kunporti sian liuton.

– Nu! Tiu foriris. – kriis la saraceno ekkaptante la brakon de la fraŭlino. – Rapidegu, ankoraŭ vi povas postatingi.

La fraŭlino ekstaris, ekscitite rigardis la malaperintan junulon. Kaj ŝi prenis la kunportitan girlandon kaj malrapide paŝis antaŭen kaj kiam la junulo malaperis, tiam ŝi kuregis al la liuto, premis tiun al sia brusto, kisis tiun kaj tremetante pro plezuro falis surteren apud la liuton. Poste la girlandon ŝi fiksas ĉirkaŭ la liuton. En la girlando estis floroj: Rozo, kiu signifas laŭ lingvo de la floroj: „Mi amas vin, mi estas feliĉa. „La dua floro estis la Kalcedona sileno: „Flamanta amo”: „Mi forbrulas pro vi.” La tria estis floro de granatujo: „Neniam mi forgesas vin.” La kvara estas la floro de Ipomeo: „Mi forvelkas pro la senespera amo.” La kvina estas la Balzamino, kiu signifas: „Mi ne kuraĝas proksimiĝi al vi.” Kaj la sesa, la blanka kolora floro havas la nomon Kapselo¹¹³ kaj ĝi signifas: „Ĉu mi vivu, aŭ mortu?”

La odalisko ligis la girlandon per siaj hareroj, kio signifis, ke „mian vivon mi konfidas al vi.” Nome la turka virino ne kutimis doni siajn harojn al fremduloj, ĉar ŝi kredis, ke pro tio la fremdulo povus esti freneza, aŭ povos mortigi ŝin.

La fraŭlino tion pensis, ke la junulo revenos por la liuto, kaj tial siajn larmojn ŝi fluigis sur la girlandon por ke li pensu tiujn kiel rosogutojn. Post nelonge ŝi serĉis la piedspurojn de la junulo kaj tiujn kisis, poste deŝiris unu folion de la tilio, sub kiu sidis Feriz. La arbfolion ŝi metis inter siajn mamojn, pro kio ŝi feliĉiĝis kaj kontentiĝis.

Majmun gapis ŝin. Ĉu pro ĉi tio ŝi venis ĉi tien, riskante la danĝeron!

– Klopodu fari la magion ĉar proksimiĝas la tagiĝo kaj la tendaro de Buda vekiĝas.

Azraële aman kison ĵetis al tiu pejzaĝo, al kiu Feriz foriris. Poste ŝi reiris al Majmun kaj ordonante diris al tiu:

¹¹³ La latina nomo de la kreskaĵo nomita kapselo estas: Apsella bursa pastoris noto de la tradukisto.

– Restu ĉi tie, kalkulu ĝis sescent, ne rigardu min kaj tiam mi revenos.

Majmun laŭte kalkulis. Kaj Azraële finiris sur la digo de Danubo kaj atingante la kluzon forton streĉite duone levis tiun. La liberiĝinta akvo ekinundis sub la kluzo.

Ŝi kuregis reen al la saraceno.

– Nun ni iru reen al la insulo.

Ambaŭ renaĝis sur la muĝanta rivero, ŝi prenis la hararon de Majmun kaj inter ŝiaj mamoj estis la folio de tilio, kiu donis al ŝi grandan trankvilon. Sur la insulo Azraële pridonacis la saraceno kaj diris al li:

– Tagiĝe via mastro, bejo Iffim ordonos al vi akompani lin kaj paŝaon Hasan al la transa bordo sur la ponto, kie estas nun la tendaro de bejo Feriz. Vi tie neniun trovos, sed vi iru tien, kie ni estis. Se vi vidos tie florkronon, aŭ girlandon, tiam ĝin portu al mi.

Majmun gapis pri tio, sed estis en silento. De kie ŝi povus scii ĉi tiujn aferojn?

La odalisko reiris en la kioskon, kie la paŝao profunde dormis, kvazaŭ li trinkintus opion. Post noktomezo la kokoj kokokriis kaj en la tendaroj la imamoj kantis. La favoratino de paŝao Hasan vekigis inter la brakoj de la veziro. Li ne sciis, kial malvarmaj estas ŝiaj manoj kaj kial ŝi kisas tiom ege ame.

La odalisko rakontis sian sonĝon: „mi naĝis en riveroj, ĉar allogadis min kantantaj feinoj.” Pro tio Hasan ridetis kaj diris: „Dormu ankoraŭ kaj daŭrigu viajn sonĝojn!”

Jam estis antaŭtagmezo, kiam la paŝao elvenis el sia kiosko kaj ekvidis bejon Iffim, kiu jam atendis lin.

– Ĉu vi ne rajdas al la transa bordo por konstati la lokon de la tendaro de Feriz?

Azraële bone sentis, ke Iffim vokos la veziron al la transa bordo por vidi, ĉu knabinetoj estas tie, aŭ rajdantaj soldatoj. Ankaŭ tion ŝi sciis, ke tage li kunportos la saraceno.

Hasan lasis sin akompani de Majmun al la transa bordo. Kvankam bejo Iffim miris pri tio, ke neniue estas el inter la soldatoj de Feriz. Tiuj devis foriri pro la inundo de la akvo kaj fari alilokan tendaron sur bordo de Peŝto.

Kaj bejo Iffim volis deŝiri sian barbon pro furiozo, sed ĉar la veziro ĉeestis, li ne povis fari.

Kaj Majmun, kvazaŭ li serĉus la vojon serĉis la lokon de la hieraŭa rendevuo kaj ektrovis sub la poploarbo la florkronon. Li kaŝis tiun sub sian burnuson kaj portis ĝin al Azraële.

La florkrono estis plektita el du ŝosoj. Unu estis ŝoso de laŭro, la alia ŝoso de rozo. La fraŭlino akceptis la respondon: „Suferu, se vi volas venki!”

13. Szentgotthárd¹¹⁴

Belega somera vesperiĝo estis: surĉiele pompis unu duonluno kaj cent aliaj duonlunoj estis videblaj dise-mise sur la montetoj. La turka tendaro kantonmetis inter la montoj de la rivero Rába.¹¹⁵ Tio estis skribita en la veron antaŭdiranta kalendaro de la urbo Kaŝša, ke tiu duonluno estos:

„Al la germanoj dezira,
Al la turkaro utila,
Al la hungaroj stabila,
Tiu, kiu ne malsanos,
Pro la bona sano famos,
La ĉiel' lin akompanos.”

La astrologoj forgesis sciiĝi ĉu ekzistas tempoperiodoj, dum kiuj la homo mortas ankaŭ sen malsano. Paŝao Küprili ripozinte sin ĉe la ruinoj de la fortikaĵo de Zerin¹¹⁶ marŝis al la limo de Ŝteyr¹¹⁷ kaj ĉe Szentgotthárd renkontiĝis kun la armeoj de la veziro de Buda.

Paŝao Küprili havis ĉefe rajdantaron, ĉar la infanterio terplenigis la fosaĵojn ĉirkaŭ Zerin. La komandanto de fortikaĵo de Zerin ne kapitulacis, la fortikaĵon li ne donis al la turkoj, dirante: „Se por unu forinto oni donas dek piastrojn, tiukaze por unu hungaro oni povas doni dek turkojn.” Kaj ĉar la bravulo kalkulis la mortintojn por la sescent hungaroj, estis mortigitaj sesmil turkoj.

Poste Küprili la imperiestrajn armeojn de Romo persekutis, sed tiuj ne volis batali kaj dum la turkoj marŝis al la bordo de Rába, la imperiestranoj sur la alia bordo klopodis foriri. La armeoj de la paŝao de Buda devus persekuti la imperiestranojn kaj unuiĝi kun la paŝao de Érsekújvár¹¹⁸ por malhelpi la rifuĝon. Sed Hasan preferis rapidi al la rivero Rába por esti li la venkanto kaj ne Küprili.

Ĉi tiel renkontiĝis ambaŭ tendaroj la 30-an de julio ĉe la pitoreskaj montoj de Szentgotthárd, kie ili faris tendaron sur la dekstra bordo de la rivero Rába okupinte la montosuprojn, de kie bone videblis la ĉirkaŭaĵo.

Tiuj bravaj sinjoroj havis bonan guston, nome ĉi tiun landon ili ekamis. Ĉie estis flaviĝintaj plugkampoj ĉar la terurata popolo ne faris la rikolton. Ĉi tie estis kaj vitplantejoj sur la montoflankoj kaj arbaroj. Tiu regiono donis riĉecon, kie la rivero Rába fluegas. Sur iu montoflanko estas la kolonhalo de la abatejo de Szentgotthárd. Apud ĝi situas ĉarma vinberprodukta monto kaj malhela arbaro por amuzo kaj

¹¹⁴ Szentgotthárd estas urbo en Hungarujo. Pri ĝi vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Szentgotth%C3%A1rd>

¹¹⁵ Pri la rivero Rába vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/R%C3%A1ba>

¹¹⁶ La lokon: fortikaĵon de Zerin kaj la hungaroj kaj la kroatoj konas, ja ĝi estas la nova fortikaĵo de la kontraŭturka heroo Nikolao Zrínyi, situanta apud la rivero Mura, nomita: Novi-Zrin, hungare Zrinyiujvár, Új-Zrínyivár): <https://eo.wikipedia.org/wiki/Steyrkroate>

¹¹⁷ Pri la setlejo Steyr vi povas legi en la vikipedia artikolo: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Steyr>

¹¹⁸ Pri la urbo Érsekújvár apartenanta al Slovakio, vi povas legi ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/Nov%C3%A9_Z%C3%A1mk

malproksime videblas la turoj de kvin vilaĝoj. Kvazaŭ la subiranta suno kovrus per orvualo la regionon, nome la nebulo malleviĝis sur la regiono por ĝin beligi.

– Vi estas nekredanta hundo! – kriis paŝao Hasan al la kamparano, kiu ĉeestis sola en tiu klostro, kiun la monaĥoj forlasis. Tiu kamparano akceptis la timindajn gastojn, la akompanantojn de Hasan. – Via lando estas tre bela, vi ne meritas loĝi en ĝi. Sed vi ne estos ĉi tie sinjoroj. Mi promesas tion. Ja ĉi tie ankaŭ la kamparano estas sinjoro. Ja vi manĝas panon kaj drinkas vinon. Vi portas du vestaĵojn unu sur alia. Nu, tio estos alia, se mi estos via mastro.

– Bonvenon, mia sinjoro! – salutis lin la pia kamparano deprenante la ĉapon. – Donu Dio, ke vi loĝu ĉi tie grandnombre, manĝu miajn brutojn kaj mi konstruos viajn domojn.

Tiu homo estis tombfosisto.

Paŝao Hasan kaj lia akompanantaro okupis la klostron. En ties antaŭhalo staris multe da kaptitaj pastroj kaj juĝistoj, kiuj devis porti el la vilaĝoj manĝaĵojn akaparaĵojn. Tiuj aĵoj neniam sufiĉis, pro kio ili estis survove konstante al la vilaĝoj por kolekti kaj porti la manĝaĵojn en la klostron. Kelkuloj jam longtempe faris ĉi tiun laboron.

La nombro de la turka armeo estis pli ol centmil. Meze de la tendaro estis la klostro kaj tie kantonmetis la ŝatataj mamelukoj de la paŝao Hasan kaj la belaj saracenoj, kiuj ĉiam duonnude batalas. Ili al neniuj donas amnestion kaj ne petas tiun. Apud ili troviĝas la rajdantaro de paŝao Kuĉuk, kiu estas disciplinita armeo. Nome ĉiuj dormas apud sia ĉevalo. La antaŭgvardioj estas lokitaj precize, la ĉaroj apartigitaj. Disdivido de la manĝaĵoj, manĝigo de la ĉevaloj, la vespera preĝo okazas laŭ trumpetado. Ekstere de la tendaro neniuj vagadas. Apud la tendaro trovas la brigado de la amazonoj, kiuj tuj ĉirkaŭbaris sin. Tie estas la belaj feinfinguroj, kiuj forfuĝis el la ĝardeno de la plezuroj al la batalkampo. Bejo Iffim certe ne atentigis la turkajn sinjorojn, kiuj aĉetis la damojn de Hadĵi Baba por gardi sin ne lasi sorĉi sin. Jen, tie estas la bajadero de Georgio, kiu dancas kiel la fleksiĝema arbobranĉo. Nun ŝi estas la gardostaranto de la malamiko tenantas longan pafilon. Tie estas la virga knabino, kiun ŝia mastro ne klopodis vendi, ĉar ŝi estas infano. Ŝi havas tomahokon, ŝia vizaĝo estas ruĝa, instruita kaj pri amo kaj pri batalo. Tie estas la ĉina damo petola, kiu balancas sin sur iu belega ĉevalo, sian hararon kovras kasko. Tie estas la ciganino, kiu ne fluton tenas enmane, sed batalan klarionon.

Apud la tendaro de Kuĉuk staras la armeo moldava, kiu pli forte timas sian aliancon, ol la malamikon. Trans la klostro rezidas la janiĉaroj de paŝao Izmail, kiuj pli ordonadas al la veziroj, ol akceptas iliajn ordonojn. Trans la vitoplantejoj havis lokon dise-mise la rajdantaro de Küprili Ahmed. Kie videblis fumaro, tie estis la tataraj patroladantoj, kiuj ne apartenis al la ĉeftendaro. Finfine eblis vidi fine de la tendaro la ŝargĉarojn, sur kiuj estis la akiritaj predoj. Inter ili estis diversaj kanonoj, kiujn bubaloj tiregis. Multe da kurieroj venis – iris portante mesaĝojn.

Kuriero de Küprili alvenis al Hasan por anonci, ke la malamika armeo sur la transa bordo inter du arbaroj faris tendaron. La francaj solduloj kaj la germana helparmeo alvenis al ili. Estus bona ŝanco nokte ataki tiun malamikan armeon antaŭ ol ili aranĝus siajn vicojn subite.

– Via sinjoro estas freneza – respondis Hasan. – Kiel mi povas flugi tra la rivero? Antaŭ ni estas la rivero Rába, sur tiu ni devas fari pontojn, kiu bezonas du-tri tagojn. Krome ni devas atendi la alvenojn de la kanonoj. Do, iru reen kaj diru al via sinjoro: „Se ni devas batali, tiam mi, per klariono blovigsignalos la alarmon.”

La kuriero ege miris pri tio, ja li ne sciis, ke Hasan estas miopeca kaj nur vidas la riveron Rába sed ne scias, ke tie kie ili staris tiam, la rivero estis mallarĝa, pro kio eblas konstrui ponton dum du horoj.

Kiam la kuriero de Küprili foriris, alvenis la delegito de Kuçük al Hasan por anonci nome de sia mastro, ke la batalon ne eblas prokrasti, ĉar la fojno ne alvenis por la ĉevaloj.

Hasan furioze turnis sin al la kaptitaj pastroj kaj juĝistoj:

– Kial vi ne portis fojnon?

El inter ili la plej saĝaj ĝentile respondis al Hasan:

– Somere ne pluvis, mia sinjoro. La Kreinto ne donis pluvon el la nuboj.

– Kion mi diris? – diris Hasan – diru al paŝao Kuçük por doni al la ĉevaloj nubon, ĉar la fojno de hungaroj restis ĉe la nuboj.

Ĉi tiu delegito eĉ ne foriris kiam alvenis la delegitaro de la janiĉaroj. Ili jam perforte postulis konduki ilin por batali, ĉar ili ne volas konversacii kun la malamiko.

– Ĉu? – demandis Hasan moke. – Ĉu ankaŭ ĉe vi elĉerpiĝis la fojno? (La janiĉararmeo estis infanterio.)

– La gloro elĉerpiĝis – diris iu kuraĝa delegito. Jam ni ne volas rigardi la malamikon nenifare.

– Palisumu la ribelantajn hundojn sur iu alta monteto por vidi ilin la tuta tendaro. Tiukaze ili ne devas rigardi la malamikon nenifare!

La korpgardistoj furioze senarmigis la delegitojn de la janiĉaroj kaj malliberigis ilin en kelon de la klostro dum kiam oni antaŭpreparos la palisojn.

Paŝao Hasan estis tre furioza kaj ĝuste en tiu tempo alvenis Balló, la delegito de Apafi. Hasan apenaŭ volis ekkoni lin, kvankam multfoje vidis lin. La paŝao koleris la transilvanojn kaj furioze kriis al Balló:

– De kie vi venas? Kiu lasis vin veni al mi? Kiu portis ĉi tien?

– Küprili sendis min – respondis Balló ĝentile.

– Küprili estas stulta, sentaŭga homo, ĉar li permesis vin por veni al mi senkatene.

Li certe bone scias, ke mi estas delegito de Transilvanio kaj mi venas nome de la regnestro.

– Ĉu nome de la regnestro? Ĉu en botoj de la regnestro? Ĉu vi portis soldatojn?

– Mia ekselenc sinjoro...

– Nu! Ĉu vi portis tiujn? Ĉu vi portis monon?

– Mia ekselenc sinjoro...

– Eĉ monon vi ne portis! Kial vi venis? Ĉu vi pagis la imposton?

– Mia ekselenc sinjoro...

– Ne diru al mi ĉiam, ke „mia ekselenc”. Plie espondu: ĉu jes, ĉu ne?

– Ankoraŭ ne, sed...

– Kial ne?

– Ĉar la lando estas malriĉa kaj Dio batas nin.

Tion aranĝu kun Dio kaj preĝu, ke ne mi batu vin. Nu! Kial vi venis?

Ballo kuraĝe diris:

– Mi venis petpetegi por malpliigi la imposton.

Hasan unue ne kapablis respondi.

– Ĉu vi freneziĝis kaj ankaŭ via lando estas freneza? Ĉu vi havas rajton postuli, ke ni malpliigu la imposton?

– Mia ekslenca sinjoro, la imposto estas kvinoble pli granda, ol estis la pagita imposto en tempo de Gabrielo Bethlen.

– Sed Gabrielo Bethlen estis bravulo ĉar pagis imposton en arĝento, kaj en milita glavo. Li pagis dekkvar mil talerojn kaj ni batalis kune. Vi devas pagi okdek mil talerojn kaj povas labori hejme. Tiu mono estas ege malmulte por Transilvanio, ja Transilvanio estas riĉa lando. Tesaloniko pagas duoble multe.

Ballo iĝis fiera pri sia lando.

– Mia sinjoro! Tesaloniko estas konkerita provinco, sed Transilvanio estas libera lando.

– De kie vi estas ne sciante, ke Transilvanio ne estos konkerita kiel la aliaj? – kriis Hasan – kiam estos dufoje plenluno, tiam certe turka paŝao sidos en la regnestra trono de Transilvanio. Mi ĵuras je la Profeto.

– Ankaŭ la Grand-sinjoro ĵuris je la Profeto kaj je la Korano, ke li neniam molestos Transilvanion.

La dignoplenaj vortoj de Ballo, la delegito, igis furioza la paŝao Hasan.

– La grandsinjoro, la nuna sultano ne meritas memori pri tiu ĵuro de la fama Sulejmano, ja ne tio okazos, kion li diris, sed la volo de siaj veziroj. Ne konfidu sin al tiu sultano, ĉar ni havas la potencon. Via lando estas la plej obstina lando, kiu havas nur sinjorojn kaj tion pensas, ke viaj kamparanoj estas pli bravaj, ol la aliaj popoloj. Se ni ne estas bonaj, tiam vi iras por peti helpon de la germanoj. Se vi batalas apud ni, tiam mortigas la germanojn, sed se vi batalas apud la germanoj, tiam vi mortigas la turkojn. Se vi ekvidas viajn kunulojn, tiam vi ne volas renkontiĝi unu kun alia. Sed mi humiligos vin kaj vi ne estos pli bonaj, ol la aliaj, kiuj robotas kaj se vi ricevos ankaŭ ornamajn mantelojn kaj pantoflojn kaj dolmanojn, tiam mi tiujn detiros de vi. Se la germanoj jesuitojn portas en viajn templojn, tiam mi portos en tiujn ĉevalojn.

Ballo malesperiĝinte diris kaponlevante:

– Tiukaze portu novan loĝantaron por Transilvanio. Nome tie vi trovos mortigitajn hungarajn homojn, sed humiligitajn hungarojn tute ne.

Pro ĉi tiuj vortoj Hasan tiregis sian glavon el la glavingo por propramane senkapigi la aŭdacan delegiton. Sed siaj mamelukoj malhelpis lin, dirante, ke ankaŭ lin ili palisumos kune kun la janiĉaroj.

– Starigu la palison antaŭ mian fenestron por vidi tiun aŭdacan lupon, kiam li sidos sur la paliso.

La armilanoj portis la delegiton, Ballo en la kelon inter la janiĉarojn. Iun palison oni ĝuste tiam ekmetis antaŭ la fenestron de Hasan, kiam malantaŭ ili subite iĝis forta kriado. La janiĉaroj eksciante, ke siajn kunulojn oni volas palisumi kaj ilia peto estas rifuzita, ili amase ekribelis. Ili senarmiligis siajn kontraŭstrari volantajn oficirojn, unu parto de la janiĉaroj kuregis al la klostro dum la klarionado, alia parto de la janiĉaroj atakis la saracenojn, kiuj gardis la palisojn, kaj post kelkaj momentoj la akzekutistojn oni povis vidi sur la palisoj.

Dume la mamelukoj de Hasan, kiuj preparis sin por kontraŭataki, kuregis panike sur la korton de la klostro kaj klopodis fermi la pordegojn de la klostro antaŭ ol atingas ĝin la furiozaj janiĉaroj. Ili ege malfacile sukcesis fermi la pordegojn de la klostro kaj prepari sin por defendi la klostron kontraŭ la ribelantoj.

La ribelantoj blokadis la klostron kaj pafadis per pafarmiloj, sagopafiloj al la fenestroj de la klostro. Hasan furioze kaj tremetante kuris en la turon de la klostro kaj ordonis al siaj korpgardistoj defendi la pordegojn ĝis alvenos korpuso por subpremi la ribelon. Sed korpuso ne venis helpi. Hasan malesperiĝis, ĉar la armeo de Küprili ne venis helpi, kvankam ili vidis, ke Hasan havas danĝeran situacion. Ankaŭ la moldavoj nur staris sur la montetpinto, sed ne venis helpi, male ĝojis, ke la turkoj mortigas la turkojn. Paŝao Ismail prefere montris sin okupata retiri sian armeon. Hasan ne esperis la helpon de Kuĉuk kaj Feriz, ĉar ili estis liaj malamiko.

En la sekva momento la ribelantoj ekvidis tiun palison, kiu estis fosita antaŭ la fenestro de Hasan. Ekvidante ĝin ili laŭte kriegis:

– Ho, tiun palison Hasan starigis por si mem. Ni palisumu la paŝaon Hasan!

Hasan teruriĝis pensante pri la diferenco inter lia sido sur la trono de Transilvano, kaj sur la pinta paliso, dum li murmuradis en si mem damnadante.

– Ĉi tiu fripona kristano certe preĝis kontraŭ mi al sia Dio mortigi min.

Li tremetante maŝligis la ŝnuregon de la sonorilego ĉirkaŭ sian kolon por tiu kazo kiam la ribelantoj iros en la turon kapti lin, tiam li malsupren saltos kaj strangolos sin.

Jam estis nokto. La sieĝantoj komencis meti kelkajn brulantajn pinarbojn ĉirkaŭ la klostron, ili tamburis kaj ĉe la lumo de la brulantaj pinarboj kriegis kaj pafadis al la klostro.

Sur la supro de la turo flirtis la flago de la danĝero, sed kontraŭ tio helpo tute ne alvenis. Kelkfoje iu sonorilego eksonis pro la alpuŝiĝo de iu kuglo.

Hasan tremetante kaŝis sin malantaŭ la ĵaluzion de la fenestro. Subite li aŭdis teruran kriegon, kiun nur la fanatikaj janiĉaroj kapablas fari en la minuto de la morta triumfo, kiam ili ne vidas plurajn mortojn antaŭ si mem, kaj ne lasas vivantulojn malantaŭ si. Kiam ili kapablas mortigi ĉiun. La sieĝantoj ektrovis la kelon de la klostro, kie iliaj kunuloj estis malliberigitaj. Ili disrompis ties pordon, liberigis siajn kunulojn kaj la delegiton de Transilvanio. La delegito klopodis tuj forlasi la klostron.

La janiĉaroj ekvidante la sangajn korpojn de siaj kunuloj, iĝis pli furiozaj, ol pli frue. La ĉefo de la liberigitaj malliberuloj kriegante prenis hakilon kaj kuregis antaŭ la movoplena homamaso kaj volis frakasi la klostropordegon, sed la ĝi estis farita el forta fero. Dume la mamelukoj barikadis tiun, kaj trabojn, ŝtonojn ĵetadis sur la janiĉarojn. Kelkfoje iu mameluko defalis de la tegmento, dum la falo kuglo mortigis lin, kaj la sieĝantoj disŝiris lin, lian kapon ili reĵetis inter la mamelukojn.

– Retiriĝu! – kriis la ĉefo de la janiĉaroj – kuregu por alporti kanonojn. Sube de la monteto mi vidis du kanonojn. Tiregu tiujn ĉi tien, por detrui la murojn de la klostro!

La janiĉaroj tuj ĉesigis la sieĝon kaj ili foriris. Iĝis silento. Sed tiu silento estis pli minaca, ol la pli frua bruego. Sed baldaŭ aŭdiĝis iu rulbruego, kio ĉiam pliproksimiĝis. La janiĉaroj tiregis la pezajn kanonojn, kies rulbruegon oni povis aŭdi ankaŭ en la kvara setlejo. Ili kondukis la kanonojn apud la klostron. La distanco inter la kanonoj kaj klostro estis kvindek paŝoj. La kanonojn ili direktis al la pordego.

– Ne estas helpo, nur ĉe Dio! – kriis Hasan malesperiĝinte kaj demetis la turbanon, ke la ribelantoj ne rekonu lian kadavron.

En la sekva momento aŭdiĝis iu trumpetsignalo kaj aperis la rajdantaro de paŝao Kuĉuk inter la ribelantoj. Dume bejo Feriz kaj liaj spahioj ĉirkaŭprenis la ribelantojn. Paŝao Kuĉuk elingigis sian glavon kaj iris antaŭ la kanonojn kie haltis.

– Ĉu vi estas kreduloj de la Profeto, aŭ estas fajron adorantoj, aŭ estas fetiĉon adorantoj kaj atakas kredulojn de Alaho? – demandis Kuĉuk la rebilentojn.

Je la alparolo la ĉefestro de la ribelantoj ekparolis:

- Ni estas janiĉaroj, floroj de la ĝardeno de la Profeto, kiuj la herbaĉon neniigas.
- Mi konas vin, sed ankaŭ vi konas min. Vi estas bonaj soldatoj, sed ankaŭ mi estas bona soldato. Kial vi mortigas unu la alian nome de Alaho? Vi priplorus min, se mi mortfalus de vi, sed ankaŭ mi pli plorus vin, se vi mortfalus de mi. Ĉu ĉi tio estas la gloro? Ĉu ni batalu unu kontraŭ alia antaŭ la malamiko? Ĉu la glavo ne estas malbenita, ĉar vi ne la malamikon mortigas?
- Sed la glavo estas malbenita, ĉar ni ne batalas kontraŭ la malamiko.
- Kion vi volas fari?
- Ni volas batali.
- Ĉu vi trovas malamikon nur inter vi reciproke?
- Nia malamiko estas la estro, kiu estas ĉe la veziro. La tuta tendaro volas batali, sed tiu timas la batalon. Mi volas mortigi lin, poste mortigos la malamikon.
- Kial ne la malamikon vi mortigas unue?
- Ĉu ni povas batali solaj kontraŭ la tendaro de la malamiko? Ja la aliaj n nur nenifaras.
- Do, mi batalos kun vi kontraŭ la malamiko.
- Ĉu vi batalos kun ni?
- Ankaŭ mi kaj ankaŭ mia filo kaj niaj brigadoj.

La furiozegaj ribelantoj ekĝojis efike de tiuj vortoj, kiuj vokis ilin batali. Ili batalos kun Kuĉuk kaj Feriz. Ja tiuj volas helpi al ili. Ili diris unu al alia ĉi tiun famon kaj la kanonojn tiregis sur la bordon de Rába. Ili tuj portis trabojn, pramojn por konstrui ponton.

La tendaro de la malamiko trovis starlokon sur la transa bordo inter du arbaroj. La tendarloĝantoj ne estis singardemaj, ĉar tiun bordoparton ili tute ne gardis.

La janiĉaroj naĝante portis la pramojn, trabojn, kaj komence de la nokto la ponto estis farita sur kiu la janiĉaroj piediris al la transa bordo.

La germana-hungara tendaro rimarkis la planon de la janiĉaroj kaj tri regimentoj havante muskedojn ekiris kontraŭ la janiĉaroj. Tiuj kuraĝe atakis kontraŭ ili kaj ĝis la ponto premis reen tiujn defendinte sin kontraŭ la ĉiam novaj trupoj.

Dume pretiĝis la alia ponto, sur kiu la rajdantaro de Kuĉuk atakis de malantaŭo la germanan-hungaran armeon. Tiu ege surpriziĝis kaj klopodis reiri al sia tendaro sed ĉar neniu venis helpi ilin, ili forĵetadis la armilojn kaj retiriĝis.

En la sekva momento el ambaŭ trupoj iĝis embarasita tumulto. La kristana infanterio ne kapablis retiriĝi pro la spahioj de Kuĉuk. La batalo daŭris nur kelkajn minutojn, la flagojn oni volis akiri kaj fine tri mil kristanoj mortfalis. La muzulmanoj triumfebrie kriegis, ja ili okupis la bordon kaj sur la malamikajn tendojn metis la duonlunajn flagojn, ja tiuj restis malplenaj.

La kristana armeo preskaŭ neniigis. Se Küprili estus helpinta al paŝao Hasan kontraŭ Kuĉuk, tiam kristanoj tute neniigintus. Sed ambaŭ ĉefestroj estis obstinaj. Küprili hieraŭ volis batali, sed Hasan rifuzis lin, nun li indiferente rigardis la teruran batalon. Hasan volis atingi ke Kuĉuk malvenku kontraŭ la janiĉaroj, en la de ili komencita batalo ne permesita de li. Kvankam li tute ne vidis la batalon el la turo tamen de la klostro, li aŭdis la kriegojn de la janiĉaroj, kredante, ke la janiĉaroj malvenkis, anstataŭ lia iro por helpi, li komencis preĝi por la janiĉaroj, ke la Profeto lasu eniri tiujn en la paradizon.

– Mia sinjoro! – kriegis al Hasan bejo Iffim. – Surĉevaliĝu, prenu la glavon kaj ekiru batali. Kuĉuk batas la malamikon, okupis iliajn tendojn kaj la tendojn prirabis. Ne lasu, ke Kuĉuk havu la gloron kaj sola neniigu la kristanojn.

La paŝao Hasan nenion aŭdis. Iffim malesperiĝinte ekkaptis la ŝnuregon de la sonorilego kaj komencis sonorigi, pro kio Hasan preskaŭ elsaltis el la turo.

– Hastu, mia sinjoro!

Hasan eksaltegis. Se li estus aŭdinta, ke oni batas homojn de Kuĉuk, tiam li daŭrigus la preĝon. Sed li aŭdis, ke Kuĉuk venkos sola sen li. Tio instigis lin por batali. Li ĉesigis la preĝon, entuziasmigis ĉiujn muzulmanojn ekiri kun la spahioj, derviŝoj batali.

– La klarionoj anoncu, ke hodiaŭ estas la tago de la gloro!

Subite la turka tendaro vigliĝis, oni kuregis al la ponto. La ponton inundis multe da soldatoj. Kelkuloj ŝajne falis en la akvon. Tiuj klopodis naĝi, naĝigi sin sur la dorso de ĉevaloj. Sur la ponto oni tiregis la kanonojn. Nun videblis, ke tie estas multe da muzulmanoj. La turka armeo havis multe da armiloj. Apud la turka armeo videblis, ke la kristana tendaro estas malgranda kiel insulo en superakvo.

Meze de la turka armeo estis videbla la paŝao Hasan kaj lia akompano. Ĉirkaŭ li estis dudek ĉevalvostaj flagoj kaj elitaj kirasaj trupoj, apud li estis la armeo de Ismail, la paŝao kaj la armeoj de Moldavio. Paŝao Kuĉuk estis jam en la okupita tendaro.

Nun antaŭ la kristana tendaro bejo Iffim portas la ordonon de Hasan al Kuĉuk.

– Restu tie, ne iru antaŭen ĝis nova ordono. Bejo Feriz kaj lia brigado retiriĝu al la transa flanko de la armeo.

Hasan ne povis toleri, ke Kuĉuk kaj Feriz, patro kaj filo, helpu unu la alian; tial li disigis ilin unu de la alia. Tiuj obeis. Kuĉuk ordonis retiriĝon kaj Feriz iris al la maldekstra flanko de la armeo.

Sed nun aŭdeblis alarmo. La muzulmana armeo terure kriegante, sangosoife, furioze atakis la kristanan tendaron. Laŭ ŝajno la sorto de la kristanoj estis decidita. Sed nun io okazis! Subite la sieĝantoj abrupte ekhaltis. Antaŭ ili estis profunda kavo, kiun la kristanoj fosis nokte kaj en la subo de la kavo ili starigis pintajn palisojn. La unuaj sieĝantoj teruriĝis ekvidante la palisojn. Ili ekhaltis. Sed ili ne kapablis halti longtempe, nur kelkajn minutojn, ĉar iliaj kunuloj tumultis antaŭen kaj enpuŝis la antaŭe starantajn homojn en la kavon, kiuj falis en la pintajn palisojn, aspektis kvazaŭ oni palisumus ilin. Tuj aŭdeblis ŝrikoj de la homoj el la kavo kaj post unu momento la kavon plenigis la kadavroj kaj la vivantoj. La vivantoj sur la kadavroj de siaj kunuloj piedtretis antaŭeniĝante al ĝia transa bordo. Nun la kanonoj de la kristanoj ekpafis al la muzulmana armeo. Kaj la fajrerĵetaj grenadoj flugis al la sieĝantoj, kiuj staris antaŭ la kanonoj de la kristanoj. Tiuj kanonoj komencis kanonadi al la turka armeo.

La muzulmanoj terurate kuregis reen forlasante la mortintojn kaj vunditojn. Tio estis abomeninda vidaĵo. Vidi la bravulojn sange konvulsianta kiel la vermoj, estis terure. Poste pli novaj armeoj aperis, kiuj piedtretis sur la kadavroj. La venkitaj armeoj estis senditaj malantaŭen kaj la pli novaj ripozintaj armeoj venis batali kontraŭ la kanonoj. Ili kuraĝe kuregis antaŭen kriante la nomon de Alaho. Nun sub la piedoj de la mohamedanoj iu kaŝita grenado eksplodis. Pro tio homaj korpopartoj kaj fumo flugis al la ĉielo. Ankaŭ la dua atako estis rebatita. Sed sekvis la tria, poste la kvara atako, kiuj estis pli furiozaj, ol la unua kaj la dua estris. La kristanoj malesperiĝinte batalis, ja ĉiuj turkaj armeoj batalis kontraŭ ili. Sed ĉar Kuĉuk ne ricevis batalordonon, nome Hasan volis venki sola, nur Kuĉuk ne batalis.

Hasan kaj lia akompanantaro direktis la batalon. Li sieĝigis ĉirkaŭbaritajn lokojn kaj donis ordonojn al tiuj militestroj, kiuj jam mortfalis. Neniu kuraĝis diri al li: „Vi aŭdas la mortokriojn de viaj homoj! Ili mortfalis! La kristanoj mortigas viajn homojn per la kanonoj.”

Jam la dekan atakon komencis la turkaj armeoj, kiam Hasan sendis heroldon al Küprili kun la mesaĝo: „Vi povas reiri al Paphlagonia¹¹⁹. Ni venkis sen vi. Diru hejme, kion vi vidis.”

Küprili ektimis, ja ankaŭ li volis helpi la triumfon. Pro tio li kaj lia rajdantaro faris ponton por iri al la transa bordo. Sed en la sama momento paŝao Ismail ekirigis la dekan atakon de la turkoj.

Montecuccoli,¹²⁰ la estro de la kristanoj, rimarkis la volon de Küprili. Li diris al siaj estroj, se ili atendos la alvenon de Küprili sur la transa bordo, tiam ili estos venkotaj.

Jam nur unu obuson ili havis por defendi sin. La vortojn de Montecuccoli sekvis silento. La homoj iĝis palaj. Sed tiuj vortoj havis kuraĝon. La armeo havis tri heroojn: markizon Brianco, la franko, jam mortfalis. Sed Toggendorf, la germano, kaj Petneházy, la hungaro ambaŭ estis firme decidiĝintaj. Toggendorf anoncis sin ĉe Montecuccoli:

– Se mi devas elekti inter du mortoj, tiam prefere mi elektos la morton antaŭen atakante, ol la morton dum retiriĝo.

– Vi ne pravas, kamarado – diris Petneházy, entuziasmante. – Ni elektu inter la morto kaj gloro! Kiu serĉas la gloron, tiu povas trovi triumfon.

– Vi volis tion – diris Montecuccoli trankvile kaj tiris la glavon el la ingo kaj ankaŭ aliajn bravulojn sendis al la randoj de la armeo. Li restis antaŭ la ĉefarmeo. Poste li donis ordonon por forigi la ĉaro-barikadojn.

Okazis la lasta kanonpafo kaj ekiris rapidege la kirasuloj de Toggendorf kaj la husaroj de Petneházy. La lasta tuj galopegis kontraŭ la armeon de princo Ghyca. La princo nur atendis, ke iu ataku lin, nome li estis devigita batali malgraŭ siaj kristanaj emocioj. Li, vidante la armeojn de Petneházy, senbatale forlasis la batalejon surborde de la rivero Rába.

La kurego de la armeo de Ghyca kaŭzis kaoson en la turka armeo. Hasan ne vidis la kuregon de la armeo de Ghyca, ja li havis malbonan vidkapablecon, li estis miopa kaj neniu kuraĝis diri al li, ke la Moldavianoj forkuris.

Paŝao Ismail klopodis kuregi al la loko de la armeo de Ghyca, sed estis pli rapidaj la kirasuloj de Toggendorf, ol la armeo de Ismail. Ismail post kelkaj minutoj trovis sin inter la kirasuloj kaj la hungaraj husaroj. Dumbatale Ismail defalis de sia ĉevalo. Iu husaro detranĉis lian kapon kaj ĝin pikis sur la pinton de sia lanco, levante ĝin antaŭ la teruritaj turkoj.

La janiĉaroj tute malfortiĝis, ili provis batali malesperiĝinte, ili provis rifuĝi, sed ne kapablis forkuri, ĉar la infanterio malhelpis ilin.

Ĉion ĉi Hasan ne vidis, ĉar inter la janiĉaroj kaj li estis ducent metroj da distanco.

– Alaho havu gloron! – li levis siajn brakojn kaj kriegis. – Ni venkis! La kristanoj kuregas kaj ĵetadas siajn flagojn. Iliaj plej fidelaj bravuloj mortfalis. Aliaj kuras pale kaj lace.

¹¹⁹ Paphlagonia – Paflagonio estas praa regiono en Norda Anatalio:
<https://en.wikipedia.org/wiki/Paphlagonia>

¹²⁰ Grafo Montecucoli (montekukolli) estis aŭstra militestro, batalsciencisto:
https://hu.wikipedia.org/wiki/Raimondo_Montecuccoli

La akompanantaro de Hasan konsterniĝante aŭskultis liajn vortojn. La kristana armeo jam mortigis la janiĉarojn.

– Kantu glorigan kanton al Alaho! Tamburu! Klarionadu! Forbruligu iliajn templojn!

– Ĉiujn kristanojn mortigu!

– Vi freneziĝis, mia sinjoro! – kriis bejo Iffim kaj ekkaptis la buŝferon de la ĉevalo de Hasan. – Via armeo malvenkis, la janiĉaroj mortis, la armeo de Ghycya jam forkuris. La kapo de Ismail estas sur pinto de lanco!

– Ne pravas! – kriegis Hasan ekster si mem. – Venu kun mi! Ni iru! Ni venkis!

Kontraŭe liaj veziroj ekkaptis lin, perforte ili deprenis la glavon el lia mano, sian ĉevalon bridis, kiu volis kuri post la kurantoj.

– Kie estas miaj flagoj? – li stentoris malesperiĝinte.

Tiuj belaj flagoj havantaj duonlunojn defalis el la manoj de la luktantoj. La bravuloj havantaj arĝentkirasojn, surturbane ardeoplumojn, glavojn kun diamantaj preniloj mortfalis.

Nun la batalo prenis novan turnon. La persekutantoj iĝis persekutatoj. Antaŭ unu horo la sorto de la kristanoj estis duba, sed nun la sorto de la turkoj iĝis duba.

Küprili, vidante la malvenkon, restis sur la transa bordo. En ĉi tiu pereiga danĝero du grupoj kontraŭstaris al la persekutantaj kristanoj: Kuĉuk kaj lia brava filo.

Ili staris sur du flankoj de la armeo, sed jam ili ne atendis novan ordonon, sed ili aperis sur la batalejo. Kuĉuk haltigis la armeon de Petneházy kaj bejo Feriz ekiris kontraŭ la armeo de Toggendorf.

Ho, la amazonoj luktis apud siaj ŝatatoj. Ili entuziasmigis ilin kaj fortigis iliajn brakojn. Ili batalis tiel, kiel leonino apud sia leonparo. „Kiom juna infano...”-pensis Toggendorf, kiam li mortbatis ŝin per sia glavo. Li ankaŭ ne konjektis, ke en la kiraso estis virino, kiu oferis sin por sia estro.

La amazonoj elsangadis. Mortfalis la norda blonda knabino, la ĉina fraŭlino, la negra infano.

– Ne batu la aliajn! Batalu kontraŭ mi! – kriis Feriz kolere al Toggendorf. – Tiuj estas virinoj!

Dum Toggendorf terurate retiregis la glavon, li ne kapablis deturni tiun baton, kiun iu knabineto donis al li. La bato trafis lian ĉevalon, kiu tuj mortfalis. Bejo Feriz furioze atakis la kirasulojn, kiuj vidis sian estron defali de la ĉevalo kaj klopodis retiriĝi. Dum la kaosa batalo la dekstra mano de Feriz vundiĝis. Poste li prenis la glavon en la maldekstran manon kaj retiriĝis kelkajn paŝojn. Toggendorf akiris novan ĉevalon kaj denove preparis sin por ataki, sed en la sekva momento aŭdeblis klarionado, kiu ordonis la retiriĝon de ambaŭ tendaroj.

La armeoj aŭdante la signalon ĉesigis la batalon, kvankam kelkuloj ankoraŭ plu batalis. Sed pli malfrue ankaŭ ili retiriĝis. Ambaŭ armeoj laciĝis. La kristanoj havis kvar mil mortintojn, la turkoj havis dek ses milojn. La lastaj perdis prestiĝon, flagojn kaj kanonojn. Sed bejo Feriz havis la plej grandan perdon, nome mortfalis la amazondandaro. Pro tio la turka armeo ne komplete neniigis, nur la amazondandaro neniigis tute.

Sur la batalejo nur la mortintoj kaj agoniantoj restis. Kelkaj ĉevaloj ankoraŭ suferis, kelkaj spahioj rigardis al la ĉielo adiaŭante la teran vivon, kie ili forlasis siajn tendojn, edzinojn, infanojn, kiujn ili ne povos vidi plu. La nokto kovris ilin. La steloj ridetis vidante ĉi tiujn teruraĵojn. La pejzaĝo estis silenta. Nur kelkaj banditoj galopis sur la batalejo por rabi juvelaĵojn de la mortintoj.

– Țu vi scias, kiu iradas nokte sur la batalejo vundite, serĉante siajn ŝatatajn mortintojn kaj ektrovante tiujn kisas ilian palan vizaĝon?

Tiu estas la malĝoja Harir, kiu ne kapablis kanti, ĉar li kisis la vizaĝon de la mortintoj.



Batalo ĉe Szentgotthárd. Batalbildo. 1664. La bildo estas preparita laŭ kuprogravuraĵo.
Ĝia devenloko estas Aŭstrio.

<https://mek.oszk.hu/00800/00893/html/img/nagy/3399.jpg>

14. La persekutata virino

Ĉu povas esti, ke vi jam forgesis ŝin, la karan belan Marian, la edzinon de la valaĥia princo? Ho, ve! Ŝi estas feliĉa!... Kvankam ŝia edzo estas malproksime, tiun malĝojon forgesigis iu proksimiĝanta nova ĝojo, la patrineco.

Ŝi sidas en la ĝardeno de sia kastelo dum la vespera krepusko. Ŝi sonĝas pri la feliĉa estonteco. Apud ŝi ŝiaj korteganinoj faras infanvestaĵojn ornamite ilin per koloraj rubandoj. Ŝi ridetas vidante tiujn vestaĵojn.

Kiam la kamparaninoj promenas sur la strato kunportante siajn bebojn, tiam ŝi forprenas la bebon, luladas en sia sino kaj kisadas tiun. Ŝi estas baptopatrino de ĉiuj novnaskitoj kaj tre amas ilin. Ĉiutage ŝi iras en la templon kaj antaŭ Sankta Virgulino Maria preĝon, por ke Dio donu tiun ĝojon de la patrineco ankaŭ al ŝi kaj ke la bebo de la kamparanino havu feliĉon. Ŝia feliĉa sufero kaŭzas palecon sur ŝia serene rozkolora vizaĝo kaj tiu sufero povas esti kelkfoje dolĉa.

Post la batalo de Szentgotthárd princo Ghyca (gika) sendis heroldon al sia edzino por diri, ke ŝi ne maltrankviliĝu, ĉar ŝia edzo vivas kaj baldaŭ hejmenalvenos.

Pro tio Maria trankviliĝis kaj estis dankema al Dio. Ŝin ne interesis, ke la turkoj malvenkas kaj malpliĝis la gloro de la turka sultano. Ŝi tre ĝojis, ke ŝia edzo restis vivanta kaj restis vivantaj ankaŭ la edzoj de la malriĉaj valaĥaj virinoj. Ŝi tuj informis tiujn virinojn pri tio, ke iliaj edzoj vivas. Kvankam la turkan armeon la malamiko preskaŭ neniigis, la edzoj baldaŭ hejmenalvenos.

Ŝi senlime ĝojis, ke ŝi baldaŭ povos vidi denove sian edzon. Ŝi atendis lin de mateno ĝis vespero ĉiutage. Nokte ŝi vekiĝis pro bruetoj, se ĉevalo galopis sur la strato, aŭ ŝi aŭdis klarionadon. Ĉiam ŝi kredis, ke ŝia edzo alvenis.

Iunokte ŝi vekiĝis aŭdante frapeton sur la pordo de sia ĉambro. Je ŝia demando: „Kiu estas tie?” Ŝia edzo respondis. Ŝi, aŭdante voĉon de sia edzo, ege surpriziĝis, ĝojis kaj apenaŭ povis fari ion. Ŝia edzo senpacience respondis: „Malfermu la pordon, Maria!”

Ŝi lasis lin eniri kaj brakumis, kisadis lin. Sed ŝi tuj rimarkis, ke liaj kisoj estas frigidaj, liaj brakoj tremetas dum la brakumadoj. Ŝi konsterniĝinte rigardis lin kaj maltrankviliĝis.

– Mia kara edzo! – ŝi alparolis tremetante – Kiom frigida vi estas! Vi brakumas min, nin frigide!

La princo ekkomprenis doloreme la atentigon kaj suspiris.

– Tio estas ege malbona por mi.

Liaj manoj tremetis, kvankam li estis kuraĝa, muskola viro.

– Kio okazis? Kion malbonan vi havas? – ŝi demandis maltrankvile.

– Nenion – diris la princo kisante ŝian frunton. – Estu trankvila! Ne maltrankviliĝu! Enlitiĝu! Mi havas kelkajn aferojn por aranĝi! Poste mi venos al vi kaj ni parolados.

Maria obeis, enlitiĝis, sed ankaŭ poste ŝi tremetis. Kial? Ŝi ne sciis. Sed certe ŝia edzo havas iun grandan malbonon, ja li frigide parolis kun ŝi.

Post kelkaj minutoj ŝia edzo ekstere mallaŭte parolis kun iu, poste li revenis en la ĉambron, sian glavon tenante enmane. Li serĉis ion kaj turnis sin al Maria:

– Ĉu la ŝlosiloj de la trezorejo estas ĉe vi?

– Jes, tiuj estas en mia ŝranko.

La princo prenis la ŝlosilojn, kunportante tiujn foriris. Maria plifaciliĝis. Do, li havas nur financajn problemojn. Dank' al Dio. Certe oni postulas imposton. Sed ja mi helpas al li.

Post nelonge la princo revenis kaj iomete pensante alparolis:

– Maria! Ĉu vi havas monon?

– Mi havas tion. – respondis Maria – Mi havas dek mil talerojn. Ĉu mi donu tiujn?

– Ne. Ili restu ĉe vi. Sed gardu tiujn kaj viajn juvelojn.

– Kial?

– Ĉar – diris la princo balbutante – povas esti, ke ni devos tuj veturi.

– Ĉu veturi? Ĉu en mia gravedeco? – demandis Maria turnante sin al sia edzo.

Ghyca ekkomprenis la situacion de sia edzino.

– Ne! Ni iros nenien! – Li kriis ekster si mem kaj ĵetis sian glavon sur la tablon. – neniel ni veturos!

– Kiun malbonon vi havas? – kriis Maria terurate. La princo fiere ridetante paŝis al ŝi, brakumis ŝin kaj kuraĝigis ŝin:

– Nenion timu! Mi havis unu personon kion fari, sed jam tio ne interesas min. Mi diris nenion.

– Sed vi estas maltrankvila.

– Tio jam pasis. Nun jam sonĝu pri mi kaj pensu pri mi.

La edzo dorlotante kisadis sian edzinon, liaj manoj jam ne tremetis, lia vizaĝo jam ne estis pala kaj liaj kisoj jam ne estis frigidaj.

Sed nun la virino estis frigida. Ŝi ŝajnis dormon, trankvilon. Kiam la edzo foriris, tiam ŝi ellitiĝis kaj en negliĝo serĉis iun korteganinon. Ili kune iris sur la verandon kaj vokis la fidelan serviston de sia edzo, iun maljunan ĉevaliston de Moldavio.

– Jova! Diru la veron! Kion vi aŭdis, vidis? Kiun malbonon havas la princo?

– Mia sinjorino! Nun estas granda malbono. Dio savu nin! La batalo de Szentgotthard iĝis malvenka batalo, ĉar ni helpis la hungarojn. La turkojn ni neniigis. Ni ne volis batali kontraŭ la kristanoj. Ja ni ne volis kulpi kontraŭ Dio. Nun la veziro de Buda volas savi sin, nome la sultano treege koleras lin, li la princon akuzas pro la malvenko.

– Pro Dio! Kion ĝi povas rezultigi?

– Estus bone, ke vi forirus de ĉi tie, dum la sultano koleras.

– Ĉu mi iru al mia patro al Valaĥio?

– Pli malproksimen.

– Ni povas iri al Transilvanio. Tie ni havas multe da amikoj.

– Sed pli malproksimen. Iru al Pollando.

– Ĉu vi pensas, ke ĉi tie resti estas danĝere?

– Bone estus, se mi erarus.

– Mi dankas pro via konsilo, Jova. Matene mi diros al mia edzo.

– Sed estus bone, ke vi ne atendu ĝis mateno.

Maria paliĝis.

– Kion vi diras?

– Se vi volas fari bonan aferon, tiam tuj nokte ekiru per kaleŝo por esti malproksime kaj longe ne vidu ĉi tiun regionon. Mi ĉie certigos por vi ripozintajn ĉevalojn.

La regnestrino ektimis kaj reiris en sian dormoĉambron por kolekti siajn valorajn aĵojn. Sed sian edzon ŝi ne kuraĝis ĝeni. Male, ŝi enlitiĝis kaj atendis la mateniĝon

angore. Ŝi ne kapablis dormi, sed kimeroj aperis en ŝia animo. Matene ŝi ellitiĝis lace, kapturniĝante ŝi eksidis al la fenestro kaj rigardis la korton.

Sur la korto la vivo vigliĝis, la piedirantaj servistoj iradis sur la verandoj, la ĉevalistoj irigis la ĉevalojn sur la korto, la vilaĝanaj knabinoj portis akvon surkape, iu gaje kantis facilaniman kanton. Ĉiuj ĉi estis treege fremdaj por la regnestrino, kvazaŭ ŝi estus en la fenestro de iu mortkondamnito kaj rigardus la eksteran mondon.

En la sekva momento la pordo malfermiĝis kaj la edzo envenis, salutis sian edzinon. Li portis kompleton el cervoledo, kiun oni kutimis porti dum ĉasado. Li havis polajn sandalojn, sur kiuj estis spronoj.

– Ĉu vi iros ĉasi? – ŝi demandis lin forgesante la kimerojn sentante la brakumon de sia edzo.

– Jes, mi iros ĉasi. Mi estas forte ekscitita kaj mi devas lasi liberan kuregon al mia kolero. Se iu virapro, aŭ urso venos al mi, ĝi spertos mian malbonhumoron. Poste ĝi se restos vivanta menciados dum longa tempo nian malagrablan renkontiĝon.

– Ho ve! Dio gardu vin! Ne havu malbonon!

– Ĉu mi? – demandis la princo kaj fiere batis sur sian grandegan bruston.

La virino kiel infano brakumis lin kaj metis lian felĉapon sur lian kapon. Ŝi kisis lian vizaĝon kaj ĉion forgesis, kion ŝi aŭdis nokte. En la mondo estas plej forta la infana kredo, ja ŝi kiel infano amis sian edzon. La princo foriris, Maria postrigardis lin.

Dum foriro la princo sur la korto ekvidis iun malbelan turkan soldaton, kiu miksiĝis inter la servistojn, sed tiuj ne atentis tiun. Post kelkaj minutoj la princo atingis la korton kaj ordonis porti sian ĉevalon.

Post kelkaj minutoj la turka soldato paŝis antaŭ la princon kaj transdonis al li iun ĉifitan leteron. La princo malfermis ĝin. Lia vizaĝo iĝis pala, li demetis sian felĉapon kaj klinantan sin salutis la malbelan turkon.

– Ho ve! La regnestro de Moldavio klinante sin salutis iun turkan serviston kaj li, la fierulo, submetiĝas antaŭ iu turka servisto! Kial? Maria surprizate rigardis la scenon el la fenestro de la kastelo. La princo lasis unue eniri en la kastelon la turkan soldaton, sed tiu orgojle mansignis, ke la princo iru antaŭe.

Maria subite ekkomprenis la enigmon. Ŝi tuj kuris al sia ŝranko, en kiu ŝiaj monujoj estis. Ŝi pensis pri tio, ke la turko volas kunporti ŝian edzon, pro tio ŝi devas korupti la turkon por lasi fuĝi sian edzon.

Sed subite la ĉevalisto venis en ŝian ĉambron, pro kio ŝi ektimis kaj ekploris.

– Ĉu la turko volas kunporti mian edzon? – ŝi demandis tiun.

– Jes, mia sinjorino – balbutis la ĉevalisto. – Kial vi ne foriris?

– Ni donu al li monon.

– La monon tiu ne akceptas. Se tiu foriras sen la princo, tiam oni senkapigos tiun.

– Indulga Dio! Kion fari?

– Mia mastro flustris al mi kelkajn vortojn. Mi devas porti vin al Transilvanio. La mastro restas ĉi tie apud la turkoj. Mia mastro ĉi tie espereble ne vane trenos la tempon ĝis ni atingos la ponton de la rivero Szeret¹²¹. La ponton ni forigos post nia transiro. Tiam la princo portigos sian stalonon Gryllus kaj kiam ili atingos la neniigitan ponton, tiam li transsaltigos la riveron kaj la turkoj restos tie. Poste Dio donos novan konsilon.

¹²¹ La rivernomon Szeret bonvolu prononci seret. Temas nun pri la maldekstraflanke alfluanta rivero de Danubo en Rumanio. Pli abunde pri la rivero vi povas legi ĉe:

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Siret_\(rivero\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Siret_(rivero))

Maria kolektis siajn trezorojn en sian vojaĝvalizon kaj helpe de Jova iris sur la kaŝita ŝtuparo en la kapelon por preĝi por sukceso de ŝia edzo. Antaŭ la kapelo jam atendis ŝin la kaleŝo kaj la kvar belegaj stalonoj. Ŝi enkaleŝiĝis kaj laŭ la kaŝitaj vojoj foriris.

Dume la princo klopodis restigi la malagrablan turkan gaston kun liaj akompanantoj. Unue li regalis ilin per manĝaĵo, drinkaĵo, dirante, ke li ne povas lasi ilin foriri, malsate-soife. Poste li ekdonacis ilin: ĉiuj turkoj ricevis glavon, aŭ pokalon. Ĉar ĉiuj donacaĵoj havas historion li pridiris tiujn poste li rakontis pri la posedantoj de la donacaĵoj, kiuj mortfalis de la turkoj. Li ĉiam diris: „estu benata la nomo de la sultano Mohamed kaj Alaho!” Kaj poste ĉiuj turkoj diris similan.

Post paso de unu horo oni portis al la princo lian stalonton, Gryllus¹²². Antaŭ la surĉevaliĝo la princo volis rakonti la belan historion pri sia ĉevalo, sed la estro de la turkoj ne lasis rakonti tion, dirante:

– Surĉevaliĝu, via ekscelenco, ja vi povas rakonti tion dumvoje.

Nu, tamen la princo surĉevaliĝis sed plendadis, ke li estas tute laca pro la rajdado, li ne kapablas rajdi kaj preskaŭ defalas de la selo. Pro tio la estro de la turkoj ligigis la piedojn de la princo al la piedingo kaj diris moke:

– Se vi ŝanceliĝas en la selo, tiam apogu vin al mi.

(Ja mi apogos min al vi – pensis la princo – sed tiam vi ne restos sur via ĉevalo.)

La estro de la turkoj rajdis tuj apud la princo tenante la eltiritan glavon kaj la aliaj turkoj rajdis malantaŭ ili.

Kiam ili proksimiĝis al la ponto, la vojo iĝis pli mallarĝa, ol antaŭe. Pro tio nur du homoj povis rajdi unu apud la alia. La princo rimarkis la neniigitan ponton kaj la signon la blankan tukon ligitan sur la apudvojan arbon. Li jam sciis, ke la kaleŝo de lia edzino transiris la ponton antaŭ ĝia malbonigo.

Nun la princo ŝajnis sin, ke li estas ege malforta, pro kio petis al la estro de la turkoj:

– Venu pli proksimen por ke mi apogu min al vi.

La estro klinis sin al la princo kaj la princo batis per la pugno sur la kapon de la estro, pro kio tiu defalis de sia ĉevalo. Tiam la princo instigis sian ĉevalon: „Kaj nun galopu, Gryllus!”

La brava stalono rapide forgalopegis el inter la turkoj. Tiuj furioze postkuregis lin kaj rapide rajdis al la ponto. La princo sen armilo kaj spronoj sidis sur sia ĉevalo, kaj liaj piedoj estis ligitaj al la piedingo. Sed kvazaŭ la stalono sentus, ke la vivo de ĝia mastro dependas de ĝi mem, ĝi rapide galopegis.

La turkoj rimarkis, ke la lignotabuloj de la ponto mankas kaj terurate kriegis al la princo: „Haltu!” kaj bridis siajn ĉevalojn. Nun Ghyca returnis sin al la turkoj kaj sian ĉevalon premis per siaj genuoj. Li transsaltigis la riveron kvazaŭ li flugus kaj ridante kriis al la turkoj: „Nun venu post mi!” Kaj li mansignadis per sia felĉapo al la turkoj.

La turkoj terurate bridis siajn ĉevalojn, ĉar ili ne volis postiri la princon. Iu turko provis transsaltigi la riveron, sed la salto ne sukcesis kaj la turko kaj lia ĉevalo falis en la riveron sur la rokojn.

La princo sur la transa flanko de la rivero liberigis sin de la ŝnuregoj kaj ankaŭ la restaĵojn de la ponto li neniigis por ke la turkoj ne kapablu postiri lin al la transa bordo.

¹²² La ĉevalnomo bonvolu prononci: grilus.

Tie li denove surĉevaliĝis, forgalopis lasinte la furiozantajn turkojn. Post kelkaj horoj li postatingis la kaleŝon de sia edzino. Li sidigis unu ĉevaliston sur sian stalono kaj sendis tiun al la regnestro de Transilvanio por ke tiu lasu ilin transiri Transilvanion en la imperion de la romia imperiestro. Poste li sidiĝis en la kaleŝon apud sian edzinon, kiu tute trankviliĝis.

Li tiel kalkulis, ke la turkoj aŭ elektas alian vojon, aŭ novan ponton faras super la rivero Szeret por daŭrigi la persekutadon de Ghyca. Sed dum tio ili akiras plurtagan avantaĝon ĉar en Transilvanio la turka sultano de Moldavio jam certe ne povas ordoni.

Ĉi tiel ili esperadis, kiam ili vidis la neĝmontarojn de Sikullando kaj ĉiam pli kaj pli ili trankviliĝis. Ja tiu lando estis por ili la rifuĝejo.

Jam ili vojaĝis en la intermonto de Borgo kie la vojo serpentumis sur la monto-flanko, poste ĝi denove kondukis en la valon, kie fluas iu monta rivereto apud la vojo, kiun postsekvas danĝera vojo. Sur tiu pasas tiu kaleŝo, kiu portas la gravedulinon.

Sur ĉi tiu vojo neatendite aperis iu rajdanto galopinta kontraŭ ili, kiun Ghyca tuj rekonis. Tiu estis la ĉevalisto, Jova, kiun pli frue li sendis al la regnestro de Transilvanio.

Jova estis tro laca kaj same estis senforta Gryllus, la stalono, kiu tremetis. Jova atentigis la princon Ghyca:

– Ne iru plu, mia sinjoro – kriis li al la princo – mi venas de Szamosujvár, kie la regnestro kantonmentas. Mi diris al li vian mesaĝon. La regnestro responde kriis:

„Diable! Ne venu ĉi tien via mastro, ja lia alveno povas esti danĝera por ni ĉiuj. Ĝuste hodiaŭ venis ĉi tien bejo Olaj, kiu laŭ ordono de la sultano volas ekkapti vian princon Ghyca.”

La princo serioziĝis kaj tremetis. Poste li rigardis malantaŭen pro aŭdo de bruoj. Sur la sama vojo polvonubaro aperis.

– Tie miaj persekutantoj venas post ni – li ĝemis malesperiĝinte. – Ni ne povas fari ceteron, ol morti.

– Mia sinjoro! Ankoraŭ iu ebleco estas por savi vin. Ĉi tie estas iu mallarĝa pado nur por piedirantoj. Piaj sikuloj kaj valaĥoj akompanos vin ĝis Polujo. Kial vi ne fuĝis al Polujo?

– Ĉar ĉi tie estas mia edzino! – li diris doloreme. – Ŝi ne povas veni kun mi.

Maria estis unu momenton senkonscia, sed poste aŭdante pri la danĝera situacio, eĉ ankaŭ tion aŭdante, ke sia edzo povas liberiĝi kaj rifuĝi, ŝi rapide elkaleŝiĝis kaj perforte petpetegis al li:

– Kuregu, savu vin, iru inter la montojn!

– Ĉu mi lasu vin kapti de miaj malamikoj, kiuj kapablas mortigi vin?

– Ili ne suferigos min. Kial ili persekutus iun virinon, ja mi al neniuj kulpas? Dio gardos min. Mi iros en Transilvanion, kie loĝas miaj amikinoj, kaj iliaj edzoj estas bonaj patriotoj. Tie estas la bonanima regnestro kaj sinjorino Béldi kaj filino de Miĥaelo Teleki, Flora. La lasta estas mia bona amikino. Ili helpos min. Kaj mia patro estas riĉulo, do niaj persekutantoj ĝoje akceptos lian monon anstataŭ mi. Tamen se mi devus morti, tiam mi mortos por vi. Savu vin, rifuĝu por mi!

Ghyca iomete pensadis.

– Estas en ordo. Mi savos min por savi vin.

Li trabrakumis sian palan edzinon dum liaj larmogutoj falis sur ŝian frunton. Li pensis, ke li neniam revidos sian edzinon.

– Rapidu! – ŝi diris al sia edzo. – ankaŭ mi volas rapidi, ĉar mi volas esti baldaŭ inter kristanoj, kiuj estas bonaj amikoj. Sed kuregu, ĉar mia koro fendiĝos, se oni mortigos vin antaŭ mi.

– Venu, mia sinjoro! – diris la ĉevalisto kaj perforte kunportis la princon, kiu apenaŭ kapablis forlasi sian edzinon.

Maria tuj enkaleŝiĝis kaj ordonis ekiri. La princo lasis sin kunporti per la ĉevalisto sur la mallarĝa pado, sed li priatentis la kaleŝon ĝis tiu malaperis.

– Rapidu, mia sinjoro! – instigis la servisto lin – sur la montosupro ni povos ripozi.

Ghyca tre malfacile povis antaŭeniri, lasis sin konduki sur la roka montoflanko. Dio kaj la tie estantaj arbustoj gardis lin, ke li ne defalis de la montoflanko.

Post duonhoro ili atingis la montosupron, kie ili vidis belegan panoramon. Li ekvidis tiun serpentuman vojon, sur kiu la kaleŝo de Maria veturis. Li, ekvidante la kaleŝon, denove havis vivemon kvazaŭ li vidus sian edzinon kaj kius ŝin.

Sed nun subite li aŭdis laŭtan paroladon. Sub la kruta montoflanko galopis rajdantaro. Tiuj estis liaj persekutantoj. Tiuj videblis en la malproksimo kiel formikoj. –

– Ho! Li havis emon por piedtreti tiujn formikojn.

– Ĉu vi volas persekuti ŝin?

– Mi malhelpos tion.

Kaj li malsuprenrulis iun grandegan rokon sur la kruta montoflanko inter la turkojn. Tiu grandega roko terure rapide ruliĝis malsupren kaj la princo vidis, ke tiu roko mortpremas kaj rajdanton kaj ĉevalon.

Poste la princo ekirigis la duan kaj la trian rokojn. La turkoj kuregis reen kvazaŭ ilia menso estus irinta promeni, savis sin grimpante sur la alian montoflankon. Tie ili pensadis, kiel ili povus iri malantaŭ la princon.

La princo divenis tiun intencon kaj reteni ĝin, li sendis la ĉevaliston sur la transan montoflankon por fari bruegon. La princo bone planis, ja la turkoj aŭdante la bruon pensis, ke tie troviĝas la homoj de Ghyca, ili rifuĝis de antaŭ tiuj sur la montosupron.

– Tiuj tie restos ĝis vespero – pensis la princo – kaj ne postatingos la kaleŝon de Maria.

Li pravis. Nome la turkoj ne povis iri plu kaj kriadis al la nevidebla malamiko minacante tiun per la kolero de la sultano: „La sultano koleros, se nin vi ne lasas pluiri.” Kiel respondo kelkaj rokoj falegis suben. Por atendi la finon de la rokfalegoj la turkoj demetis la selojn de siaj ĉevaloj kaj lasis tiujn paŝtiĝi. Dum tio ili faris fajron kaj sidiĝis por ripozi.

Dume la persekutata virino atingis la unuan sikulan vilaĝon kie aĉetis ripozintajn ĉevalojn kaj tuj pluiris. Ŝi tutnokte veturis kaj matene atingis al Szamosujvár. La regnestro jam ne estis tie. Oni diris, ke li rapidante retransloĝiĝis al Kolozsvár.

Maria denove ŝanĝis ĉevalojn. Post tritaga-trinokta veturado senripoze, malsate, malesperiĝinte ŝi veturis ĉiam plu. Ekirante de Szamosujvár ŝi memoris, ke de Dés¹²³ ŝi facile atingus Hungarion, kie la fortikaĵkomandanto donus al ŝi perfektan rifuĝejon. Sed jam estis malfrue. Kion fari? Ĉu ŝi iru reen? Ĉu povas esti, ke ŝi renkontiĝos kun siaj persekutantoj? Sed nun jam ŝi devas iri antaŭen.

Ĉi tiu ideo pli frue estus liberiginta ŝin, sed nun jam ŝi devis vojaĝi tien, kien sia sorto ordonis iri.

Vesperiĝis, kiam ŝi atingis al proksimeco de Kolozsvár. Kiam la koĉero ekvidis la turojn de la urbo, li konsolante diris al sia sinjorino, ke ili baldaŭ alvenos. Maria iom

¹²³ Dés estas urbo en Rumanio: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Dej>

senŝarĝiĝinte proponis al la koĉero ne peli la ĉevalojn tiom forte, sed la koĉero ne obeis, ĉar rigardante malantaŭen li vidis rajdantaron. Do, estis sama distanco inter Kolozsvár de la kaleŝo kaj inter la persekutantoj de la kaleŝo.

Ili devis rapidegi. La koĉero pli forte instigis la ĉevalojn, kiuj plenforte galopegis sur la ŝtona vojo pro kio la hufferoj de la ĉevaloj fajreris. Maria kaŝis sin en angulon de la kaleŝo kaj preĝis al Dio.

Ŝi havis fortan vivemon. Kvankam ŝi estis en danĝera situacio, kontraŭe ŝi povis toleri la lacecon. Ŝi preskaŭ senkonsciiĝis, sed tamen ŝi povis instigi la koĉeron, kriante: „Rapidu, rapidu!” Kaj la noblaj ĉevaloj galopegis.

15. Bejo Olaj

La regnestro ĝuste staris sur la verando de sia palaco kaj babiladis kun sia edzino, la regnestrino. Ŝi suferis multe dum la lastaj tagoj. Post la teruraj tagoj de Nagyenyed ŝi naskis filineton kaj la naskaj suferoj influis la sanon de la patrino kaj la infano.

Ankaŭ Apafi estis zorgoplena, ĉar li maltrankviladis por sia lando, sed la popolo ne maltrankviladis por li.

Li konstante estis maltrankvila, la turkoj konstante tiranis lin kaj la eksterlandanojn ne interesis liaj plendoj. Laŭ la elituloj li estis tirano sed kontraŭe la popolo kantis satirajn kantojn pri lia malforteco. En lia familio estis iu malsana virino, kiu estis vivemon havanta virino, ĝis li iĝis regnestro.

Malsana edzino estas ĉiopova super sia edzo. Se tiam Anna estus petinta de sia edzo, ke li forlasu sian regnestran palacon kaj reiru en la silentan kastelon de Ebeŝfalva, kie li ne havus landon, sed havus elizeon: certe li estus farinta por ŝi.

Kiam ĉi tiel meditis la regnestro sur la verando, tiam subite iu kureganta kaleŝo rompis lian mediton. La kaleŝo tuj iris en la korton de la palaco kaj ekhaltis antaŭ la ŝtuparoj de la palaco. Tuj la pordo de la kaleŝo malfermiĝis pala virino rapide elkaleŝiĝis surkuris la ŝtupojn kaj antaŭ la gregnestroj ŝi terenfalas dirante: „Mi estas Maria Ŝturdza!”

– Pro Dio! – kriis la regnestro – kial vi venas ĉi tien? Vi neniigas kaj min kaj la landon kaj nin.

La malfeliĉa virino ne kapablis respondi pro la tuta senforteco. Sinjorino Apafi vokis kriante siajn korteganinojn, kiuj levis la svenintan damon kaj ties vizaĝon komencis akvumadi.

– Mi ne permesas porti ŝin en mian domon – kriis Apafi – ja ŝi neniigos nin.

Sinjorino Apafi dignoplene rigardis sian edzon.

– Kion vi volas fari pri ŝi? Ĉu vi volas elĵeti ŝin antaŭ ŝia persekutantaro? Kio okazintus pri mi, se ankaŭ min oni elĵetus en sama stato kaj mi ne ricevus rifuĝejon?

– Sed la sultano koleros min!...

– Sed la posteularo malhonoros vin.

– Ĉu vi volas atingi, ke mi perdu miajn vivon kaj tronon pro iu sinjorino?

– Prefere perdu tiujn pro iu sinjorino, ol mortigi ĉi tiun sinjorinon. Se vi fermas viajn ĉambrojn antaŭ ĉi tiu sinjorino, tiam mi malfermas miajn ĉambrojn antaŭ vi. Tiukaze vi povas diri al la sultano, ke mi estas la kulpa.

La regnestron surprizis la decidita sinteno de lia edzino. Li apenaŭ estis kapabla respondi. Laŭ li ĉi tiun aŭdacan sinjorinon ne interesis la landaj aferoj kaj sorto de la homoj.

La persekutatan damon ankaŭ li treege kompatis, sed bejo Olaj venis je ordono de la sultano kaj volas kapti la damon. Kion fari? Se la virinon li ne akceptas, tiam li estos malhonorita de la popolo, sed se li akceptas ŝin kaj donas al ŝi rifuĝejon, tiam la sultano neniigos lin.

La regnestro ĉi tiel pensadis en si mem, kiam iu pordisto anoncis, ke ĝuste nun kelkaj turkaj rajdistoj rajdis antaŭ la palacon kaj interesiĝis: „kie estas la valaĥia princino?”

Apafi malesperiĝante apogis sin al la marmorkolono, sed Anna ordonis al siaj korteganinoj, ke la senkonscian princinon ili portu en iun internan ĉambron kaj voku

ŝian kuraciston. Poste ŝi iris al la balkono kaj vidante, ke la turkoj volas veni en la korton de la palaco kriis al la pordistoj:

– Fermu la pordegojn!

Apafi dezirus diri alian ordonon, sed la pordegoj estis fermitaj antaŭ la turkoj. Tiuj komencis frapegi sur la pordegoj. Vidante tion sinjorino Apafi sur la balkono starante kriis al la turkoj:

– Sentaŭguloj! Kial vi frapegas sur la pordegoj? Ĉi tio ne estas kazerno, sed palaco de la regnestro. Certe vi ne konas la ordon ĉi tie, ja super pordegoj de via regnestro homkapoj estas metitaj. Se vi al kutimiĝis al tio, tiam viaj kapoj povos atingi ĉi tiujn pordegojn.

La turkoj forte konsterniĝis pro la aŭdacaj vortoj de la regnestro kaj ili ekkomprenis, ke ŝi parolas serioze. Ili cerbumis kaj post kelkaj minutoj foriris. Apafi konsterniĝis:

– Kio okazos el ĉi tio? Tion nur Dio scias.

Post kelkaj minutoj alvenis delegito de bejo Olaj antaŭ la pordegon de la palaco. Ĉar tiu venis sola, la pordisto lasis lin eniri en la palacon:

– La bejo Olaj salutas vin estimplene kaj Vin, la regnestron, ordonas aperi antaŭ li, sed tujege.

Anna iris ĝuste tiam flegi sian gaston, sed aŭdante kaj komprenante la ordonon ŝi kolere turnis sin al la delegito:

– Ekde kiam ordonas la servisto al sia mastro? Ĉu ankaŭ la delegito ordonas al la regnestro?

Apafi diris pian mensogon ke li kial iros al bejo Olaj.

– La kompatinda bejo Olaj estas malsana, ne kapablas ellitiĝi. Li petis min viziti lin. Li estas okdek jara, mi povus esti lia nepo kaj li ŝatas min kvazaŭ mi estus lia infano, do mi ne estas humiligita. Flegu vian gastinon kaj konsolu ŝin. Mi promesas, ke mi liberigos ŝin. Pro ŝi mi humiligos min.

La sinjorino antaŭsentis, ke tiu humiligo ne devus okazi, sed vidis, ke ŝi ne kapablas konvinki lin, lasis iri lin al la bejo. Apafi ne en la regnestra verdvelura kaftano iris viziti, sed en la nobela mantelo. Li pensis, ke la bejon ne la regnestro vizitas, sed, bienulo de Ebeŝfalva. Estis ĉe li la ornama glavo kaj madzo. Li ekiris perpiede akompanate de sia servisto, kiu portis labortagan vestaĵon. Kiam ili atingis la loĝejon de bejo Olaj, la hundoj preskaŭ manĝis ilin en la korto, nome la bejo tre ŝatis la hundojn kaj manĝigis la senmastrajn hundojn.

Liberiginte sin de la hundoj li iris en iun verandon kaj en iun antaŭĉambron, kie estis multe da derviŝoj, kiuj preĝis ege laŭte. Ili kaŭris sur siaj piedoj kaj el grandegaj libroj legis tekstojn.

La regnestro ne alparolis ilin ja estis evidente, ke ili ne devas respondi. Sed li iris en la trian ĉambron. Same ankaŭ tie estis derviŝoj kaj krome araneoj. Meze de tiu ĉambro estis iu ruĝa kuseno, sur kiu sidis grizhara homo portante kaftanon. Ankaŭ tiu legis el granda libro malfacile. Apafi kuraĝis alparoli tiun.

– Homeca bejo Olaj! Signu la paĝon en via libro, fermu tiun kaj aŭskultu min.

La bejo aŭdante la regnestron flankenmetis la libron kaj kare ridetante diris:

– Anĝeloj de la profeto donu al vi feliĉon! La ĉielo gardu vian barbon kaj Izrafil¹²⁴ helpu vin sur via vojo!

¹²⁴ En la Korano: La Libro de Mortintoj, Izrafilon priskribibas tiel, ke Israfilo estas la plej aĝa anĝelo, la muziko-ĉefanĝelo blovanta trumpeton: <https://en.wikipedia.org/wiki/Israfil>

Poste la bejo etendis la manon por kiso. La regnestro ne kisas tiun, se ili estus nur en duopo, sed antaŭ la derviŝoj la regnestro volis montri ke li kisas lian manon. Apafi prenis tiun manon kaj virece manpremis kaj skuis ĝin.

– Ne batu mian manon, mia filo! Mi ne lasas kisi mian manon – kriis bejo Olaj retirante la manon kaj ĉiuj povis vidi, ke Apafi volis kisi manon de la bejo.

– Vi vokigis min, mia sinjoro – diris Apafi – diru al mi vian volon, ĉar multe da landaj aferoj mi havas.

– Ho, mia filo – diris la bejo – malfacile estas esti regnestro kaj vi ŝatus liberiĝi de tio. Sed estu pacienca la sultano ĉesigos vian regnestrecon.

Apafi meditis, ĉar li pensis, ke tiu enkonduko estas sufiĉe malica. Sed li klopodis diveni tiun.

– Ĉu vi aŭdis bejo Olaj, ke la malfeliĉa Maria Ŝturdza ĉe ni petis rifuĝejon?

– Ne gravas, mia filo, – klopodis respondi la bejo kaj mansignis trankvile.

– Sed sen mia scio ŝi rifuĝis en mian palacon – ekskuzis sin Apafi. – mi ne povis ŝin elĵeti el mia domo.

– Vi agis treege homece.

– Ankaŭ vi kompatintus ŝin. Ŝi terenfalas malsana, malesperiĝinte antaŭ miajn piedojn kaj treege petpetegis savi ŝin. Povas esti, ke ŝi mortos.

– Ho, ve, malfeliĉa infano! – kriis bejo Olaj rigardante al la ĉielo.

– Ŝia edzo forlasis ŝin malsana kaj endanĝerigis ŝin – diris Apafi volante ŝin senkulpigi.

– Ho, ve, ŝi estas malfeliĉa infano – diris la bejo skuante la kapon.

– Kaj – aldiris Apafi – ŝi estas graveda.

– Ho ve, kion vi diris?

– Jes, ĉi tiel ŝi atingis mian palacon persekutate de la turkaj soldatoj. Ŝi baldaŭ mortos.

– Alaho estu indulga pri ŝi.

Apafi kredis, ke bejo Olaj havas amikan bonhumoron pri la homoj.

– Mi sciis, ke vi ne koleros ŝin – diris Apafi.

– Mi ne koleras ŝin, mi kompatas ŝin.

– Ja ŝi ne estas kulpa pro sia edzo.

– Tute ne.

– Tio ne estus bona, se ŝi puniĝus pro sia edzo. Tute ne.

– Ĉu laŭ vi la sultano donos senpuniĝon al la malfeliĉa virino?

– Oni ne batos ŝin.

Apafi ne estis naiva homo. Li ekstreme konsterniĝis pro la respondo de la bejo, pro kio li forte maltrankviladis kaj angore demandis la bejon:

– Moŝta bejo! Ĉar vi estas bonhumora, certe vi permesas, ke mi petpetegu vin. – Permesu, ke tiu malfeliĉa sinjorino ripozu en mia domo kaj vi protektu ŝian aferon ĉe la sultano.

– Laŭ la sankta libro oni devas indulgi al la suferantoj. Pro tio mi permesas, ke ŝi ripozu en via domo kaj saniĝu, estu en paco ĝis mi transprenos ŝin je ordono de la sultano.

Apafi kapturniĝis pro la bonvolo de la bejo.

– Kiam vi volos transpreni la virinon? – demandis Apafi.

La bejo trankviligis la regnestron batadante lian ŝultron.

– Ĝis la mateno de morgaŭ mi ne volas ŝin transpreni...

Apafi preskaŭ terenfalas pro la ektimo.

– Ĉu ĝis la mateno de morgaŭ?

– Mi promesis, ke ĝis tiam mi ne ĝenos ŝin.

Apafi ekkomprenis, ke tiu homo, la bejo, ĝis nun ludis kun li. La furiozo fortiĝis en li.

– Sed mia sinjoro, mi ne unu tagon petis por la virino por ripozi.

– Nur Alaho povas plilongigi la vivon, sed alia ne.

(-La pigo piku vin pro viaj diraĵoj! – murmuris Apafi mallaŭte.)

– Kiel vi povas kunporti tiun malsanan virinon, ja ŝi bezonas zorgeman flegadon kaj ne kapablus transvivi la veturadon de Buda?

La bejo pie rigardis al la ĉielo.

– La vivo kaj morto estas skribitaj en la libro de la Torao per ornamaj literoj. Se Maria Ŝturdza devas morti laŭ la sankta libro, tiam la sciencistoj vane preĝas por ŝi kaj vane venas la anĝeloj por defendi ŝin.

Apafi ekkomprenis, ke kun la artifika bejo li devas paroli sincere.

– Brava bejo! Vi scias, ke ĉi tiu lando havas konstitucion. Mi kiel regnestro ne povas decidi en gravaj aferoj. Mi devas aŭskulti la opinion de la konsilantoj. Pro tio nun mi ne povas diri mian volon.

– Bone estas, mia filo! Mi permesas tion, ke vi konsiliĝu pri la afero. Se vi transdonos al mi la virinon, tiam mi transprenos ŝin kaj adiaŭos vin. Sed se vi ne transdonas la virinon al mi, tiam vin kaj viajn homojn mi kunportos anstataŭ ŝin.

Ĉi tiujn vortojn la bejo diris tre afable, karesante kiel avoj parolas kun siaj nepoj kaj ekstarante de sia kuseno karesis la vizaĝon de la regnestro kaj kisis la frunton de tiu. Apafi komencis kaptuŝi. Li sentis kvazaŭ la ĉambro turniĝus ĉirkaŭ li. Li ekiris al la pordo sed apenaŭ estis kapabla foriri, ĉar forlasante la loĝejon de la bejo tamen li sentis, ke li estas regnestro de Transilvanio kaj liaj praŭloj estas unuarangaj nobeloj. Kontraŭe la bejo Olaj estas maleleganta turka leŭtenanto, kiu en sia junaĝo estis pelisto de dromedaro. Ej, do kiel tiu kuraĝis paroli tiom tre superece? Li pensis, kial li ne batis per sia madzo al dorso de la bejo por ellerni la stilon de Transilvanio.

Li volis tuj returni sin por doni krudan lecionon al la bejo.

Sed dume li pensis, ke tiu afero povus esti malagrabla por Transilvanio ĉar bati iun okdek – jaraĝan maljunan homon ne estas gloro. Sed almenaŭ li devas diri sian opinion al la bejo.

Apafi denove iris en la ĉambron de la bejo kaj diris al li kolere:

– Aŭskultu, bejo Olaj! Pro tio mi revenis, ke mi diru al vi...

Bejo Olaj rigardis lin.

– Kion vi volas diri al mi?

– Do, tion... – daŭrigis Apafi – ke kunvoki la konsilantojn de la lando bezonigas multe da tempo. Nome Béldi loĝas en Bodola, Teleki en Gernyeszeg, Cséki en Déva. Ĝis ili kolektiĝas, vi povas fari tion, kion vi volas fari kaj povas resti ĉi tie aŭ povas foriri.

Kaj dume frapfermante la pordon li diris:

... en la inferon.

16. Defendo de virinoj

La nobeloj de Transilvanio havis malĝojon pro ĉi tiu historio. La konsilantoj kolektiĝis je la voko de la regnestro kiu plendis en si mem; la regnestro prefere estus malliberulo de la tataroj, ol regnestro de Transilvanio.

La nobeloj estis malĝojaj kvazaŭ ili devus voĉdoni la kondamnon al morto. Ili senvorte sidis en la ĉambrego. Tie sidis la plej aĝa Johano Bethlen, kaj la pli juna Nikolao Bethlen, Paŭlo Béldi, Gasparo Korniš, Ladislao Csáky¹²⁵, Joĵa Kapi, Francisko Sárpataky. Por la regnestro estis farita nova trono, en kiu li neniam sidis. Apud la trono staris seĝo por Miĥaelo Teleki.

Kiam la gardisto de la ĉambrego anoncis, ke la konsilistoj ĉeestas, tiam alvenis Teleki. Li klopodis konvinki la regnestron jam pli frue pri la ĝusta solvo de la problemo. Naláczí ĝentile salutis ĉiujn, sed neniu ridetis al li. Teleki frigide kondukis la regnestron al la trono. Apafi rigardis la tronon kaj konsternate ekhaltis antaŭ ĝi. Li pensis kelkajn minutojn. Ĉu li forportigu la tronon kaj portigu iun simplan seĝon anstataŭ ĝi? Sed fine li suspiris kaj trovis sidlokon en la trono.

Miĥaelo Teleki kelkajn minutojn staris senvorte kvazaŭ pensante. Nun li ne rigardis la konsilistojn kiel aliokaze, sed rigardis sian ĉapon revadante. Tamen li klopodis alparoli decidite:

– Moŝta regnestro! Estimataj konsilistoj! Dio volas elprovi nian malfeliĉan patrujon. Unu danĝero ankoraŭ ne pasis kaj sekvas alia, pli granda, kiu finiĝas kun fiasko. Mi komencis ĝoji pro la venko de Szentgotthard kaj la sukcesoj de la turkoj. Sed tio ĉesis. Estiĝis paco inter la kristanoj kaj turkoj. Spite de tio tamen ni havas kaŭzon por malĝojadi. Nome laŭ la veziroj de la turka sultano la kaŭzo de la malvenko de la turkoj estis princo Ghyca forlasinta la batalejon kaj laŭ tiuj ankaŭ ni estas kulpaj pro la malvenko de la turkoj. Pro tio la sultano koleras Transilvanion kaj Moldavion. La sultano ordonis ekkapti la regnestron de Moldavio kaj ties familion porti al Istambulo. Transilvanion nur Dio kaj kelkaj amikecaj landoj gardis, ke ni ne iĝis turka administracia tereno kaj ne regas turka paŝao anstataŭ Apafi. La princo de Moldavio liberigis sin kaj sian edzinon, kiujn la turkoj persekutis venante al Transilvanio. Ni informis la princon, ke ili ne venu en Transilvanion, ĉar ili faras por ni danĝeron. Ghyca savis sin inter la montoj, sed sian edzinon ne kunportis. Ŝi alvenis ĉi tien, kion eksciis la delegito de la sultano. Ĉar Ghyca savis sin, la sultano ordonis, ke ŝin oni devas malliberigi. La sultano koleras ne nur ŝin, sed ankaŭ nin. Kion ni povas fari? Ni povas elekti inter du malbonoj: aŭ transdoni al la sultano la virinon, kiu petis helpon de ni, aŭ transdoni la tronon de Transilvanio al tiu paŝao.

– Ankoraŭ ekzistas iu tria solvo. – diris Paŭlo Béldi trankvile. – Mi povas petegi indulgon por la virino.

– Sed vi vane petegos por indulgo – interparolis Apafi – mi jam scias la respondon de la delegito.

– Mi ne de la delegito petegus indulgon, – respondis Béldi – kiu humiligus sin por petegi al iu servisto? Ni petegu indulgon de ties mastro.

Apafi ne respondis kaj ne menciis, ke li jam petpetegis la mastron de la delegito.

– Béldi pravas – diris la juna Nikolao Bethlen – tio estas la sola solvo, kiun ni povas fari. Mi scias, ke la turkoj pro sia kolero forbruligas la urbon kaj ties estrojn senkapigas. Sed mi ankaŭ scias, ke Transilvanio estas en Eŭropo kaj landoj de

¹²⁵ La hungaran familio nomon Csáky bonvolu prononci: ĉaki.

Eŭropo helpas unu la aliajn. Pro tio ni sendu nian peton al la aŭstra, franka, pola delegitoj. Pro tio la sultano ne povas sendi paŝaon en Transilvanion. Kaj ni povas pruvi, ke ankaŭ ni estas kapablaj por defendi nin kontraŭ la sultano. Ja niaj glavoj ankoraŭ ne estas rustiĝintaj.

Sekve de la entuziasmiga parolo de la junulo la aliaj esperadis kaj la vizaĝoj iĝis seriozaj. Sed Teleki malrapide kapbalancis:

– Mi devas diri al vi malĝojajn aferojn! Atentu bone, ĉar mi devas informi vin pri iu grava afero. Eŭropa ne klopodas helpi nian landon.. Tiuj ne interesiĝas pri nia vivo. Ili pretendas nian helpon, sed ili ne helpas nin, se ni pretendus tion. Povas esti, ke mi diras kontrastajn aferojn, sed mi de tempo al tempo multon ellernis, pli multe, ol en la lernejo. Post la batalo de Szentgotthard oni estigis pacon inter la du imperiestroj, sed pri la hungaroj oni tute forgesadis. Sed ĉeestis la frankaj, anglaj kaj polaj delegitoj, kiuj de ni ricevis pli grandan salajron, ol de siaj kortegoj. Se ni devas batali, tiam ni estas elstaraj. Dum la batalo ni povas iri antaŭen, sed premion ni ricevas laste. Kiam Raininger tramarŝis la landon, tiam ni pagis multe da mono por li. Ni petis lin malpliigi la imposton. Kvankam li promesis tion, en Istambulo jam li konsilis al nia delegito pagi la imposton kaj ni ĝoju, ke tiu ne estas duobla. Malfacila estis, sed tamen ni elpagis tiun imposton. Nun la paŝao de Buda dezirus sidiĝi sur la trono de Transilvanio. Post la malvenko li sendas ĉi tien bejon Iffim por kontroli en ĉiuj setlejoj la pagon de imposto: ĉu ni estas kaŭzo de la malfrua pago de la imposto? La paŝao volas scii: kiujn li punu? Ĉu nin, aŭ la popolon?

Ĉi tiun raporton aŭdante la ĉeestantoj konsterniĝis.

– Ho, miaj sinjoroj, ni diru inter ni, ke ni nur ludas la sinjorojn en nia patrujo, sed ni ne plu regas ĝin, ni ne estas jam ĝiaj estroj. Ni ne havas forton, pravon, protekton, sed ni havas sinjorojn. Niaj sinjoroj estas niaj mastroj, kiuj ne estas aliancoj, kiuj povus helpi nin. Sed ĉi tiun sekreton neniu eksciis, ĉar nia regado estas nur ŝajno, kio estas grava por ni kaj tion gardu ni. La potenco volas regadi super ni kaj tiu homo faras bonon por Transilvanio, kiu unue montras kontraŭan opinion... Nia devigo estas ke ni konu kaj gardu tion malmulton kion ni havas. Ni devas gardi la ŝajnon, ke la potenco staranta super ni, ne povu venki nin. Ni ne havas bonan amikon, sed eĉ ni ne estu bonaj amikoj de ia ajn. Ĉu se ni efike de la perforto submetiĝas, tiam la mondo malestimos nin? Ĉu se ni neniĝas, tiam la mondo volas fari ion en nia intereso? La mondo postulas, ke ni estu bonanimaj. Ĉu la mondo estos bonanima pri ni? Jes, sed nur tiel longe, kiel ni defendis la mondon per glavoj. Ni defendis Eŭropon, sed niaj glavoj jam estas rompita, nia lando estas dispecetigita kaj la mondo vidis, ke la paganoj konkeris nin. Tiam jam neniu helpis nin kaj nian landon niaj malamikoj gardas. Ĉu ni estas kulpaj pro tio, ĉar ni ne povas defendi la persekutatojn, kiuj venas al ni por peti rifuĝejon? La sorto punis nin, nia lando jam estas nenies havaĵo. Se ni la menciitan principon de Moldavio ne transdonos al bejo Olaj, tiam tiu devas alvoki al si la armeojn de la paŝaoj de Buda kaj Várad en nian landon kaj estigi el nia lando servisto-provincon de turkoj. Nun helpas neniu kompato kaj homa sento. Nun ni devas fari libervole tion, kion ni ne povas ŝanĝi.

Kiam Teleki finis la parolon, tiam iu gardisto de la ĉambrego anoncis, ke la principo de Moldavio dezirus paroli antaŭ la konsilantaro. Apafi mansignis, ke ŝi ne povu paroli, sed Teleki mansignis ke ŝi povas veni.

Post kelkaj minutoj la gardisto denove demandis, ĉu la principo rajtas enveni, kaj ĉu la korteganinoj povas akompani ŝin. Teleki ankaŭ la lastan demandon jesis kaj diris, ke la principo kaj la korteganinoj povas enveni por helpi ŝin.

La konsilistoj honteme rigardis malsupren. La pordo malfermiĝis. Sed kiam la persekutata virino kaj ŝia akompanaro envenis en la ĉambregon, ĉiuj rigardis la

envenantaj damoj kaj forte surpriziĝis. Ŝiaj akompanantoj estis la plej elitaj damoj de Transilvanio. Edzinoj, filinoj de la konsilistoj akompanis la malfeliĉan sinjorinon. Antaŭe venis la regnestrino kaj sinjorino Miĥaelo Teleki, kiuj helpis la principinon veni en la ĉambregon. Kaj poste venis sinjorino Kapi kun Flora Teleki kaj sinjorino Béldi kun sia filino, poste Sofia Bornemissza, sinjorino Csáky, sinjorino Korniŝ, kaj la maljuna sinjorino Bethlen, la lasta havanta blankan hararon. Ili estis la plej elitaj damoj de la lando, kiuj portis funebran vestaĵon.

La malfeliĉa principino havis palan suferantan vizaĝon kaj iris helpe de siaj helpantoj antaŭ la regnestron. Pro la korpa doloro ŝia beleco malpliĝis, ŝi preskaŭ terenfalas, volis paroli, sed ne estis kapabla. Ŝi tremetis, apenaŭ estis kapabla stari.

– Estu kuraĝa – flustris Anna Bornemissza al la principino.

Tiam la malfeliĉa principino ekploregis kaj ĵetis sin al pidoj de la regnestro, brakumis ties piedojn kaj korŝire plorĝemis:

– Indulgon! ... Indulgon! ...

Ĉiuj konsilistoj estis mutaj, nur la ploreĝon eblis aŭdi longtempe. La regnestro konsterniĝinte sidis sur sia trono, sur kies ŝtupojn falis larmoj de Maria Ŝturdza. Ĉiuj suferis pro tiu sceno, sed neniu kuraĝis paroli.

Teleki estis zorgoplena. Li bedaŭris, ke li lasis okazi ĉi tiun scenon.

– Indulgon! – diris denove la malfeliĉa virino kaj duonsvenante jam ne brakumis la genuojn de Apafi. Aranka Béldi kuris al la malfeliĉa virino por trankviligi ŝin.

Poste Anna Bornemissza paŝis antaŭ la konsilistojn aŭdace. Ŝi rigardis al sia edzo, kiu rigardis sian edzinon preskaŭ senkonscie.

– La peto estas mallonga – diris sinjorino Apafi mallaŭte, sed ĉiuj aŭdis la vortojn – kiu ne ekkomprenis tion? Iu malfeliĉa virino petpetegas antaŭ vi. Ŝi perdis siajn edzon, patrujon, bienon. Ŝi petpetegas por sia vivo. Ŝi petpetegas malsana lasi ŝin vivi trankvile, ja ankaŭ Ĝingis-Hano donus indulgon. Sed ni petas ion pli gravan, ol ŝi. La sorto de Transilvanio dependas de vi, ĉu la loĝantoj de Transilvanio estu feliĉaj, aŭ malfeliĉaj. Ĉu ili estu honestaj, aŭ malhonestaj? Kiuj virinoj portus la nomojn de Csáky, Apafi, Korniŝ, se oni scius, ke ili iun senkulpan virinon transdonis al la paganaj persekutantoj kaj devigis siajn filojn malakcepti la nomon de sia patro? Ne rigardu min satane, sinjoro Teleki. Iu malfeliĉa virino surgenuas antaŭ vi, kiu esperadas, ke ŝi vidas bonajn homojn. Fieraj virinoj de Transilvanio staras nun antaŭ vi, kiuj kredas, ke vi estas patriotoj. Ili petpetegas por indulgo kaj mi kredas, ke niaj filoj estas honestaj.

Teleki vidante la okulojn de la regnestrino, volis durvoĉe respondi.

– Ni nur volas diri la veron kaj ne indulgon kaj honeston!

– Ĉu verecon? – kriis Anna – do, se iu edzo kulpis, tiam lia senkulpa edzino, kiu amas la persekutatan edzon, tiam ŝi puniĝu? Kie estas la vereco? La vereco estas ofte, vole nevole neeblaĵo.

– Kio vi estas? Ĉu vi estas ĉefsinjoroj de Transilvanio, aŭ sklavoj de la turkoj? Ĉu vi estas hungaraj nobeloj, kiuj regas la landon laŭleĝe, aŭ provosoj, kiuj kolektas la imposton de la despoto kaj gardas ties sklavojn? Ĉu ĉi tiu ĉambrego estas ejo de la konsilistoj, aŭ antaŭhalo de bejo Olaj?

La sinjoroj silentis. Respondi ne estis facile.

– Mi atendas la respondon. – decide diris sinjorino Apafi.

– Kion vi faros kun mia respondo? – demandis Teleki.

– Mi ekscios, ke ĉi tiu ejo kie ni nun staras ĉu estas inda por ni?

– Ĉi tiu ejo ne estas inda por ni. Nun ne tiu tempo estas, kiam al la hungaro fiereco estis vivi por Transilvanio. Nun honto estas, ke ni estas la unuarangaj oficistoj de nacio disrompita, forlasita, malpliigintombra. Iam antaŭlonge la fiereco estis la virto de la sampatrujano, nun jam la poltrono estas la konsilisto en Transilvanio. Tion vi bone scias, ja via edzo iĝis regnestro helpe de la turka padiŝaĥo. Kaj ni prefere metu nian kapon al niaj piedoj, ol klini nin humile, akceptante, ke ni estu estroj de iu neniiĝinta popolo. Vi certe pli fiere portas la nomon de via edzo, ol niajn nomojn. Pri ni oni diros ankaŭ skribe, ke mi estis humilaj, ni portis la jugon, kaj agis kontraŭ niaj konvinkoj, sed tion oni jam ne diras, ke nia humilo savis la patrujon. Ni estas viktimoj de la tempo, ni sekretis la ruĝiĝon de pudoro. Sinjorino, vi demandis pri tio, do dividu la honton kun ni.

Sinjorino Apafi paliĝis kaj senkuraĝiĝis.

– Ĉu ni estas ĉi tiaj? Iam la kuraĝo estis la virto de la viro. Nun tio estas la malkuraĝo.

– Se vi akceptis la rangon, tiam vi ne devintus edziĝi, aŭ pro la konsekvencoj devintus mortigi ilin. Ja kio okazis pri princino Ghyca, tio povas okazi pri edzinoj de Csáky, Kornis kaj Béldi. Eraroj de iliaj edzoj ilin portos sur la eŝafodon kaj eĉ Dio ne helpas ilin. Vi diris, ke tio estas bona solvo. Béldi, Teleki, Csáky, Bethlen! Se vi ne kuraĝas mortigi viron, tiam mortigu viajn edzinojn antaŭ ol la sultano kuntrenos ilin en sian haremon.

Kiam sinjorino Apafi diris tiujn vortojn, tiam la filinoj, edzinoj de la menciitaj viroj kuregis al la viroj kaj petpetegis savi la malfeliĉan virinon kaj tiuj viroj larmiĝis, poste komencis ploregi. Nur la ploregon eblis aŭdi en la ĉambrego. Larmoj de la viroj kaj virinoj kunmiksiĝis.

Ankaŭ Teleki ploregis, kiam Judita Veér, lia edzino, kaj Flora, lia filino brakumis lin. Teleki klopodis montri severon spite de la plorego.

La regnestro ne estis kapapabla regi sin, li flanken tiris sin kaj petpetegante diris:

– Ne daŭrigu la parolon, Anna!

– Ho, ve, Apafi!! – kriis ŝi malĝoje – se mi devis morti, tiam mi ne petos vian helpon. Anna Bornemissza havas forton por elekti inter la morto kaj honto. Estu trankvila: se bejo Olaj volas mortigi min, tiam mi ne petpetegas por via helpo. Kaj nun, sinjoroj! Decidu! Sed eksciu! Ĉiuj vortoj eĥiĝos en la kristana mondo!

Teleki fortigis sin, forigis de si siajn edzinon kaj filinon kaj tremetante alparolis:

– Mi ne estas kapabla nei mian emocion, ja mi estas patro kaj edzo. Mi sentas la doloron. Se mi estus nur simpla Teleki, tiam mi povus oferi min por la persekutatoj. Kaj se la konsilistoj estus nur miaj kamaradoj, tiam mi dirus, ke ni prenu glavon, ataku la turkojn kaj savu la principon. Sed nun ne decidu la homeco, ĉar la vivo de Transilvanio dependis de ni. Mia opinio estas, ke la principon ni devas transdoni al la delegito de la turkoj. Mi akceptas kontraŭan opinion de la konsilistoj kaj entreprenas ties konsekvencojn, sed mi savas min. Miaj sinjoroj! Diru viajn opiniojn kaj se vi volas diri kontraŭan opinion, tiam diru!

Nun iĝis morta silento. Neniu diris sian opinion.

– Ĉu neniu alparolas? – demandis gapante sinjorino Apafi. – Ĉu neniu? Do, ni foriru de ĉi tie! Ja en ĉi tiu lando ne estas viro!

Post ĉi tiu amara aserto la regnestro foriris el la ĉambrego. La kamaradinoj postiris ŝin senvorte, adiaŭante la ploron de la princino. Lastfoje forlasis la principon Aranka, kiu estis fenomeno mirinda. Dum la tuta sceno ŝi estis malĝoja, ŝi ne ploris kvazaŭ ŝi kredus, ke la princino saviĝos. Ŝi ne timis, ne hezitis, ĉiam estis apud la princino kaj apogis ŝin. Ŝi kuraĝigis la principon, ĉar ŝi sciis, ke la bona Dio savos ŝin.

Kiam la damoj foriris sinjorino Béldi vokis ŝian filinon sekvi ŝin, tiam ŝi tenere kisis vizaĝon de sia amikino kaj diris al ŝi mallaŭte: „Mi havas esperon, ne timu, mi liberigos vin!” Aranka brakumis tenere la principinon kaj ridetante foriris.

Poste la princino senvorte lasis sin forkonduki de la gardistoj.

La viroj apatie, malĝoje sidis kaj sentis, ke ili estas ofenditaj kaj hontigitaj. Ili estis malĝojaj pro tio, ĉar kvankam ili savis Transilvanion, tamen iun senkulpan sinjorinon ili transdonis al la persekutantaj turkoj.

La silento ankoraŭ daŭris, kiam perforte oni malfermis la pordon de la ĉambrego kaj enpaŝis la delegito de paŝao Hasan, bejo Iffim, flanken puŝante la gardistojn por fari detektivadon inter la regnestro kaj lia popolo.

La impertinenta turka leŭtenanto aĉestimante rigardis la malĝojajn deprimitajn humilajn sinjorojn dum sensalute iris al la regnestro kaj fiere alparolis:

– Mia sinjoro! La paŝao demandas, kial vi sendis malfrue la imposton. Kiuj estas la kulpaj? Ĉu vi aŭ viaj kolektantoj de imposto, aŭ la popolo? Respondu al mi sincere!

La regnestro sulkis siajn brovojn, ĉirkaŭrigardis kaj serĉis ion por ĵeti al la kapo de la bejo. Sed la inkujo ne estis apud li. Teleki donis iun pergamenon al Sárpataki, la juĝisto.

– Skribu nian respondon sur la pergamenon kaj via ekscelenca „umo” aŭskultu tion: – Homeca paŝao Hasan! Ni tre bedaŭras, ke vi okupiĝas pri finitaj aferoj.. Mi ne demandis vin, kial vi alvenis malfrue en la batalejon de Szentgotthárd. Nek vi demandu, kial mi sendis malfrue la imposton. Kie vin oni prirespondigos, tie ankaŭ ni defendos nin. Sed ĝis tiam la ĉielo benu vin kaj la Dio pardonu, ke vi okupiĝas pri malbonoj de aliuloj. Subskribu, sinjoro juĝisto!

Sárpataky la juĝisto poste transdonis la leteron al la regnestro por subskribi. La ĉeestantaj sinjoroj denove gapis. Ja Teleki antaŭ unu momento devigis la konsilantaron transdoni la principinon al bejo Olaj, sed nun subite li sendas la menciitan mesaĝon al la paŝao de Buda.

Teleki sciis bone, ke kvankam la danĝero pasis de Transilvanio, tamen tio atingos la veziron de Buda. La sultano serĉas kaŭzon de la malvenko kaj se tion trovi ne sukcesos, tiukaze la veziro estos la viktimo.

Bejo Iffim staris kiel iu idolo, ja li ne sciis, kio okazis. Li nur rigardis fikse, Apafi kiel subskribis la mesaĝon, oni sigelis tiun kaj transdonas al li.

Bejo Iffim komencis konsciiĝi.

– Ĉu vi kredas, ke mi estas freneza kaj portos ĉi tiun leteron al Buda? – li diris kaj la leteron disŝiris kaj ĵetis sub la tablon kaj daŭrigis:

Skribu alian leteron, ĉar mia sinjoro strangoligus vin ĉiujn.

Teleki trankvile turnis sin al la bejo:

– Se tiu letero ne plaĉas al vi, tiam vi povas reiri al Buda senletere.

– Eksciu, nekredanta hundo, mi ne iros al Buda sen letero kaj vi estos miaj malliberuloj ĝis vi skribos alian leteron! – kriis la bejo Iffim kaj sidiĝis sur la ŝtupoj de la trono de la regnestro.

– Gardistoj! – kriis Teleki ordonante – kaptu ĉi tiun impertinentan sinjoron, metu sur iun ĉevalon, ligu al la ĉevalo kaj pelu el la urbo.

La gardistoj obeemis al la ordono, la bejon kaptis kaj rapide forportis el la ĉambrego. La bejo piedbatis, mordis, sed la senindulgaj gardistoj sur la korto lin sidigis sur la dorson de iu ĉevalo, la piedojn de la bejo kunligis sub la ventro de la ĉevalo. Kaj la gardistoj la bejon sidantan sur la ĉevalo elpelis el la urbo, eĉ el Transilvanio. Al la konsilistoj plaĉis por venĝi iun.

17. Lukto por sia kapo

Dum paŝao Hasan en Buda batalis kontraŭ la armeoj de la germana imperiestro, bejo Iffim antaŭpreparis la triumfarkojn por paradi post la venko. Tiujn li ornamigis per verdaj arbobranĉoj kaj per multekostaj ŝtofoj. Sur tiujn li metigis flagojn, kiujn li forrabis de la germanoj kaj hungaroj. Ili plibonigis la ponton, ke ĝi estu sekura por la kanonoj kaj varĉaroj, kiujn Montecucculi ne forportis. Li certigis en Rakoŝ iun malple-nan vendoplacon, kien oni portos la ĉiurasajn gesklavojn, infanojn kaj fraŭlinojn.

Sed post la antaŭpreparadoj Hasan sendis al li teruran mesaĝon: porti al sekureca loko la bestojn kaj trezorojn de li la paŝao, barikadu la fortikaĵon de Buda, malkonstruu la ponton, ke tiu ne estu taŭga por trafiki. Poste li, bejo Iffim kunportu la tutan haremon kaj venu laŭ la rivero Rába, ĉar povas esti, ke ili ne vidos plu la fortikaĵon de Buda.

Ĉi tiu mesaĝo tute ne plaĉis al la bejo kaj li tuj la haremdamojn sidigis sur ĉarojn kaj ĉe la akva pordego sur iu kovrita koridoro sendis ilin en la fortikaĵon, malpermesante fari bruegon. Poste li ordonis al la turkaj soldatoj unue por dismunti poste forigi la ponton, ke la malamiko ne povu transiri sur ĝi. Krome li ordonis por defendi la fortikaĵon dum lia foresto inter la limoj de la eblecoj.

Ĉe Párkány¹²⁶ li atingis la turkan armeon, kie ambaŭ malamikaj armeoj starante sur ambaŭ riverbordoj kanonadis unu kontraŭ alia, sed ne faris damaĝojn unu al alia. La tendo de la paŝao estis malproksime de la riverbordo, kie la kanonado ne ĝenis la tendaron. La paŝao tre ĝojis ekvidante la bejon Iffim kaj ne povis ĉesigi la kisadon de Azraële. Ŝi estis pli kara kaj bela, ol iam ajn.

– Restu ĉi tie! – ordonis la paŝao al siaj fifavoratoj kaj ĉirkaŭbrakis ilin. – Mi nun iras en mian tendon, kie mi preĝos kun miaj derviŝoj, por prepari min al la min atendanta ege grava tasko. Mi devas kondamni du altrangajn turkajn ĉefsinjorojn, paŝaon Kuĉuk kaj lian filon, bejon Feriz!

Azraële forte teruriĝis kvazaŭ serpento mordintus ŝin.

– Kion ili pekis? – ŝi demandis kaj apenaŭ estis kapabla kaŝi sian teruron.

– Ili batalis spite de ordono de la Profeto kaj malpurigis la turkan duonlunon. Tiun malpurigaĵon ilia sango devas forlavi – diris kaj poste Hasan foriris.

Azraële kaj la bejo restis en la tendo.

– Mi vidis vin teruriĝi – diris la bejo rigardante la vizaĝon de Azraële.

– La morto kalkulas la dektrian homon.

– Kiu estas la dektria?

– Iu, kiu staras apud mi, aŭ malantaŭ mi.

– Malantaŭ vi staras bejo Feriz ekster la tendo.

– Sed vi estas apud mi.

– Sed mi estas ankoraŭ for de la morto.

– Ĉu Feriz ne estas juna?

– Se Hasan diras, ke tiu estas pekanto, tiam tiu homo meritas la morton ankaŭ tiam, se ties barbo nur nun komencas kreski.

– Ĉu vi ne pekis por morti?

¹²⁶ Párkány (parkanj) estas setlejo sur la bordo de Danubo vid' al vide de la hungara urbo Esztergom. Párkány nun apatenas al Slovakio. Vi povas legi pri ĝi abunde ĉe:
<https://eo.wikipedia.org/wiki/%C5%A0t%C3%BArovo>

– Pro mia fidelo mia barbo povas blankiĝi dum mi servas paŝaon Hasan. Apud Hasan mi povos vivi longtempe.

– Ĝis kiam Hasan vivos?

– Ĝis la fino de sia vivo. Sed tio estos ankoraŭ post multe da jaroj.

– Ĉu vi aŭdis la kazon de paŝao Ajas, kiu estis la plej potenca inter la paŝaoj?

– Tiu estis bofilo de la sultano.

– La filino de la sultano iĝis ties edzino. Tiu estis fifavorato de la sultano. Iufoje tiu malvenkis en batalo kontraŭ Zrínyi¹²⁷. Pro tio la sultano koleriĝis kaj lin senkapigis.

– Hm. Mi memoras tion. Tio estis malĝoja historio.

– Ĉu vi memoras historion de la fidela Hiasar, al kiu Ajas ordonis porti sian plej ŝatatan edzinon por adiaŭi antaŭ sia morto. Sed vi portis al Hasan la tutan haremon. Pro tio la sultano rostigis Hiasaron en kupro-taŭro. Nome la ekfavorato havas nenion, ĉion havas la sultano: trezorojn, edzinojn, infanojn. Se iu batas tiujn, tiam tiu batas la sultanon. Ĉu mi ne estas la malliberulino de la sultano en ĉi momento? Kaj la malliberulino povas esti fifavorato dum mallonga tempo.

– Vi parolas malbonajn aferojn.

– La edzino de paŝao Ajas jam tiam estis fifavorato de la sultano, kiam tiun Hiassar-on oni rostigis kaj ŝi ne kapablis savi tiun. Jes li ne faris, ĉar li koleris lin. Laŭ mi ŝi estis amanta, sed la servisto malhelpis ŝian amon... Donu al mi iun mandolinon, Iffim, ĉar mi volas kanti.

La odalisko ĵetis sin sur la kanapon kaj Iffim cerbumadante promenis tien kaj reen, kiel hieno falinta en fosaĵon. Tiu historio, kiun Azraële rakontis, similis al lia historio kaj preskaŭ finiĝis same. Ankaŭ li povis havi saman sorton.

Subite li ekhaltis antaŭ la odalisko, kiu indiferente pinĉis la kordojn de la mandolino.

– Kion vi volas fari? – demandis Iffim.

– Ne demandu, kion vi scias.

– Ĉu vi volas liberigi bejon Feriz?

– Mi liberigos lin.

– Tion vi ne povas fari. Li devas morti, ke vi mildiĝu. Nome se li estas vivanta, tiam vi neniigas nin. Mi ne volas manĝi, drinki ĝis mi ludos kun lia kapo. Nur tiam ni povos dormi trankvile. Aĥ, la diablo ekamis la magianton.

Azraële tremetis kaj falis al la piedoj de la bejo. Ŝi maltrankvilaĝadis pri sia amato, pro kiu ŝi malfortiĝis kaj estis nekonsolebla. Ŝi ploregis kaj brakumis la genuojn de Iffim.

– Ho, estu indulga. Permesu ke mi parolu kun la veziro por li. Mi amas la junulon. Vi certe ne konas la veran amon. Vi amis iujn nur primokante. Ne permesu mortigi lin.

Post la petpetegantaj vortoj Iffim iĝis pli kuraĝa, ol pli frue, kaj ekkaptis la brakon de la odalisko, brutale levis ŝin kaj malice flustris en ŝian orelon:

– Mi donos al vi lian kapon kiel donacon.

Pro kolero pro la aŭditaj vortoj, la odalisko levis sian kapon kaj furioze rigardis la bejon kiel furioza lupo, dum kio ŝia hararo falis sur ŝiajn mamojn. Ŝi ne alparolis, sed ŝiaj lipoj kaŝis tutan inferon, kian priskribi ne eblas.

Hasan revenis. Azraële komencis rideti, ĉar ŝi ne volis, ke la veziro rimarku ŝian koleron. Iffim konfidence iris al Hasan kaj diris al li:

¹²⁷ La nomon Zrínyi bonvolu prononci zrinji.

- Ĉu la sultano scias pri via malvenko?
- Tiu aŭdis pri tio.
- Sendu min por porti donacon al tiu.
- Ne deziru por vi la estimon, Iffim kaj ekkomprenu, ke kiun nun mi sendas al Istambulo, tiun mi sendas al la edeno. La sultano koleriĝas kaj la koleron li povas ĉesigi nur per la sango.

Iffim paliĝis, ĉar li timis, ke lia sango povas ĉesigi la koleron de la sultano.

Tiuokaze vi povas timi tion. La koleron eblas ĉesigi nur per sango de ĉefhomoj. Se mi ne scias doni iun viktimon, tiam mi mortos. Sed mi havas homojn per kies sango mi elaĉetos min. Tiuj estas Kuĉuk kaj lia filo. Se ili ne batalintus, tiam ne estintus malvenko. Ili estas filoj de morto. La pekulo estas la princo de Moldavio. Li forlasis min por batali kaj alpartiĝis al la kristanoj. Ankaŭ li estas filo de morto. Kaj la kvara estas la regnestro de Transilvanio. Li ne helpis nin batali kaj malfrue sendis la imposton. Se li pli frue sendintus tiun, tiam ni havintus monon, aĉetintus fojnon kaj la soldatoj ne urĝintus la batalon kaj ni ne estus malvenkintoj. Vi portu la regnestron de Transilvanio por transdoni lin al mi.

Azraële forte atentis. Iffim ĝoje rigardis ŝin, kvazaŭ li dirus: „Niaj kapoj ne doloros!”

Sed la odalisko jam ne tremetis, kvazaŭ ŝi sciis siajn farendojn. Ŝi brakumis la veziron kaj ame balbutis:

- Ho, Hasan! Mi ege ĝojas vidante la sangon de viaj malamikoj flui.

Hasan sidigis sur sian genuon la odaliskon kaj liaj fingroj karesis ŝian hararon. Iffim estis ege bonhumora, ja li estos sendita al Transilvanio por la regnestro kaj pro tio li komencis turmenti la odaliskon.

- Dum vi estis fore, mia sinjoro, via damo petis de mi iun favoron, sed tion mi ne povis promesi sen via konsento.

Azraële furioze rigardis la bejon kaj atendis maltrankvile, ke li estos kuraĝa perfidi ŝin.

- Kio estas tio, Iffim? – alparolis Hasan afable.

- Iun junulon viaj paŝaoj kondamnos hodiaŭ. Tiu estas la juna bejo Feriz.

- Ĉu? – diris Hasan kuntirante la brovojn, ĉar la odalisko skuiĝis.

- Azraële dezirus vidi la senkapigon de la junulo.

La odalisko paliĝis. Ŝia koro unu momenton ĉesis pulsi, sed poste pli rapide batis.

- Tio estas petola deziro – diris Hasan – sed mi permesas tion. Partoprenu la kunvenon de la paŝaoj, estu malantaŭ la kurteno apud mi kaj de tie vi vidos ĉion.

Azraële kisis la frunton de Hasan dankeme kaj iris malantaŭ la kurtenon.

- Se vi volas sveni – diris Iffim – prenu mian ujon de mosko.

La odalisko ekridegis kaj la bejo kredis, ke ŝi freneziĝis.

- Nun voku la paŝaojn kaj flankentirigu la kurtenojn de la tendo – ordonis Hasan.

Iffim vokis la paŝaojn, kiuj sidiĝis sur la kanapoj. Subite iĝis videbla la ekstera regiono, kie la malamikoj kanonadis de la transa bordo de Danubo. Plej laste alvenis Küprili, la dika, grandstatura, kolera homo, kiu neniu rigardis kaj senvorte sidiĝis apud la veziron Hasan kaj turnis la dorson al li.

Poste proksimiĝanta tambursigno estis aŭdebla. Nome venis Kuĉuk kaj lia filo Feriz gardataj de la gardistoj. Kiam ili estis videblaj, Azraële flustris al Hasan:

- Vidu, de maldekstro venas Kuĉuk, de dekstro alvenas Feriz. Kiom fieraj ili estas! Ili kuraĝigis unu la alian!

Hasan kapbalancis dankante al la odalisko pro la informo de la fifavoratino, ĉar liaj okuloj estis malbonaj kaj li ne vidis ilin bone. Poste li mansignis al Kuĉuk.

– Vi, juna Feriz, restu tie, baldaŭ mi vokos vin.

– Unue vi, maljuna, rigidiĝinta perfidulo venu, kiu kaŭzis la malvenkon de la sultano.

Laŭ la ordono bejo Feriz kuraĝe iris al Hasan kaj kuraĝe diris al li:

– Vi estas perfidulo, ĉar vi portas la veziran postenon, kvankam vi estas blinda kaj ne kapablas diversigi la patron kaj la filon, kaj la malamikon kaj la bonan amikon.

Hasan eksaltis, ĉar ne paŝaon Kuĉuk li aŭdis paroli, sed bejon Feriz.

– Tio ne estas prava! – balbutis Hasan paliĝante.

– Ĉu ne? – diris Feriz krude – tiam diru al mi, kiu regimento marŝas antaŭ via tendo muzikante.

Ĝuste tiam iu tendara orkestro marŝis, sed regimento ne sekvis tiun. Hasan volis ŝajnnigi kvazaŭ li ne estus embarasita:

– Mi tiel pensas, ke vi, ribelanta bubo ne devas prirespondigi min pro iu muzikanta regimento, kiu certe nun alvenis ĉi tien sen ke mi konas tiun. Mi ne devas koni la muzikantojn laŭnome, sed sufiĉas, se mi aŭdas ilin muziki kaj mi vidas ilian flagon.

La paŝaaj gapis unu la alian, ja ili ne vidis flagon kaj regimenton.

– Ĉu ĉi tio estas nia situacio? – alparolis Küprili furioze kaj ekstaris ne rigardante la paŝaon Hasan, sed prenis la brakojn de Kuĉuk kaj Feriz. – Ni iru foren – li diris al la aliaj paŝaaj – kaj vi povas foriri – li diris al la provosoj.

Ĉiuj foriris el la tendo. Hasan kuŝis surdorse sur la kanapo. Sian malsanon, ke li estas miopa, li mem perfidis. Azraële tremetante alvenis de malantaŭ la kurteno.

– Ho, mia sinjoro! Vi ne tiel faris kiel mi diris. Vi faris ĉion inverse.

– Mi estas perdita – balbutis Hasan kaj ekster si kuris al la derviŝoj por preĝi.

Bejo Iffim staris fikse kvazaŭ oni forŝtelintus lian animon kaj poste Azraële iris al li kaj ironie ridetis karesante lian vizaĝon.

– Ĉu vi dezirus, ke mi diru al vi kelkajn bonajn vortojn?

– Mi povas perfidi vin.

– Vi farus tion, se vi sciis „Kiu vivas plue: Ĉu Hasan, aŭ mi?”

Post ĉi tiu sceno okazis parolado de Hasan kaj Iffim, kiu daŭris pli ol du horojn. Azraële ne povis partopreni tiun. Post la parolado Iffim tuj foriris el la tendaro, nome Hasan sendis lin al Transilvanio por informiĝi pri la malfrua pago de la imposto. Poste li devis iri al la regnestro por prirespondigi tiun pro la malfrua impostopago. Estas tute egale, kiu estas la kulpa: ĉu la popolo, aŭ la regnestro. Hasan povas atingi sian planon, okupi Transilvanion kaj tiun aneksi al la turkaj provincoj komplezante al la sultano. Kaj pere de tio Hasan povas ricevi trankvilan regnestran tronon.

Sed samtempe bejo Olaj restadis en la urbo de Apafi por kapti la princon de Moldavio kaj volis kunporti lin al Hasan, kiu ne ricevos silkoŝnuron, se li trovos iun anstataŭ si, kvankam Kuĉuk kaj Feriz jam liberiĝis de Hasan. Sed bejo Olaj sendis informon, ke la princino de Moldavio estas ĉe Apafi kaj ŝi estas graveda, do naskiĝos juna princo. Se oni transdonos al Hasan la princinon, tiam Hasan ne ricevos silkoŝnuron, sed se oni forfuĝigos ŝin, tiam Apafi ricevos la silkoŝnuron. Tio estas lukto de la silkoŝnuro, kiun ĉiuj klopodis eviti, kaj la sultano metos tiun sur la kolon de tiu, kiu restos en la lukto lastfoje: ricevos tiun aŭ Kuĉuk, aŭ Hasan, aŭ Apafi, aŭ princino Ghyca.

Tiun malfeliĉan sinjorinon la nobeloj de Transilvanio oferis por la feliĉo de sia lando kaj kvankam ili ĉion faris por ŝi, tamen ili ne esperis, ke ili kapablos liberigi ŝin.

Kelkajn tagojn post la foriro de Iffim kontraktiĝis la paco inter la sultano kaj la romia imperiestro, dum kio inter Hasan kaj la paŝaoj ne estiĝis interbatado, pro kio li kaj lia armeo retiriĝis al Buda. Küprili retiriĝis ĝis Nándorfehérvár, Kuĉuk iris ataki la fortikaĵon de Székelyhid. Nur bejo Feriz restis en Buda hazarde, ĉar li malvarmumis kaj feбриĝis kaj iĝis en lito kuŝanta malsanulo. Küprili ordonis al li iri al la kiosko estanta en la Víziváros¹²⁸ (nun estas tie la imperiestra banejo).

Sur la najbara monteto, sur kiu estas nun vitplantejoj, estas ankoraŭ nun iu turka moskeo, en kiu turka maljuna grizbarba derviŝo preĝas, legante librojn de la Korano kaj Azorath. Tage-nokte ĉiuj povas tiun vidi, montrantan la dorson al la homoj. La granda libro servas al li kiel lito.

Tiutempe Azraële havis ektimigajn sonĝojn, en kiuj ŝi vidis la paŝaon promeni senkape tien kaj reen. Ŝi petis lin permesi iri ĉiumatene al la maljuna derviŝo por preĝi kontraŭ la satanaj sonĝoj. Hasan emociiĝis, ke la odalisko krociĝas al la muzulmana kredo, kaj permesis iri ĉiumatene al la moskeo kaj de tie veni hejmen nur malfru-vespere. Sed al la akompanantaj servistoj li ordonis atenti ĉiun ŝian agon. La servistoj lasis eniri ŝin al la pia derviŝo. Ŝi portis nigran longan vualon kaj nur la okuloj videblis. La servistoj vidis, ke la maljuna derviŝo akompanas ŝin hejmen. La derviŝo havis grizajn barbon kaj brovojn. La lastaj kovris liajn okulojn. Tiu havis treege grandan turbanon, kiu kovris la orelojn. Tiu ne malŝparis la vortojn, mute montris al la damo la grandan malfermitan libron. Li surgenuis apud ŝin kaj komencis legi la frunton metinte sur la libron. Kaj la derviŝo levante siajn manojn benis la ekstere estantajn sklavojn kaj montris per signoj de mutuloj, ke li iras al bejo Feriz por kuraci lin per preĝo, Feriz malsana kuŝas enlite en la kiosko. Kaj li foriris lamante.

La sklavoj scivole kaŝrigardis ĉe la pordo de la moskeo la preĝantinon, kiu surgenuinte preĝis super la libro. Ŝi havis ŝaton preĝi ĝisvespere. Kaj poste la derviŝo reiris en la moskeon apogante sin sur la lambastono. Poste ili komencis kanti. Post ĝia fino ŝi reiris al la fortikaĵo.

Ĉi tio daŭris dek tagojn. La akompanantaj servistoj kredis, ke Azraële volas ellerni parkere la Koranon kaj ili estis lacaj rigardi ŝian preĝon kaj dume ili klinadis sin entuziasme.

Sed ni lasu ilin gapi ŝin kaj ni iru al bejo Feriz, kiun la derviŝo flegas ĉiutage.

La bona maljuna derviŝo sidas ĉe la lito de la junulo. Nur ili estas en la ĉambro. Aliulo ne estas bezonata tie, kie tiu maldormas. Li forviŝas la ŝviton de la frunto de la junulo kaj ĉiuhore verŝas kuracsukon en la buŝon de la junulo. La junulo ĝemas, la maljunulo scias la kaŭzon. Li certigas la komfortan ripozon por li. Dum dormado per ventumilo li certigas freŝan aeron. Kiam la junulo vekiĝas, tiam li kontrolas la arterion kaj se pro la febro li estas maltrankvila, tiam li kovradas lin kiel lia patrino kaj donas al li limonadon kaj per mustardo malpliigas la varmegecon de la kapo. Se lia vizaĝo estas varmega, tiam sian frunton premas al lia frunto kaj sur tiun larmojn faligas.

Dum la deka tago la junulo komencis saniĝi kaj rekonsciiĝi. Li estis kapabla klare memori. Ankaŭ tiam la maljuna derviŝo sidis apud la lito de Feriz. La bejo memoris tion, ke la maljuna griza viro zorgeme flegis lin, kiu zorgeme maldormetis apud li. Li vidis aman rigardon sub la grizaj brovoj.

– Ĉu vi estis mia fleganto? – flustris la junulo dankeme kaj prenis la manojn de li.

Ho, Feriz bone memoris tiujn manojn. Tiuj karesadis lian frunton, kontrolis la arterion. La junulo dankeme kisis tiujn manojn kaj siajn okulojn pioplene fermis.

¹²⁸ La Víziváros noma loko (signifo: akva urbo) estas urboparto, loĝkvartalo en Budapeŝto: <https://eo.wikipedia.org/wiki/V%C3%ADziv%C3%A1ros>

Kaj li denove malfermis siajn okulojn kaj prenis la kisitajn manojn. Li ĉirkaŭrigardis kaj ekvidis la disŝutitajn barbon grizan kaj la turbanon kaj anstataŭ la maljunulo iu tremetanta fraŭlino sidis apud lia lito. La fraŭlino estis Azraële.

Feriz kredis, ke liaj okuloj blindiĝis. Jam li ne estis dankema kaj li ne prenis la manojn de la odalisko. Liaj trajtoj iĝis pli severaj, ol antaŭe. Li mansignis mute al la damo foriri.

– Kial vi malamas min? Ja vi konas min. Se vi ne konus min, tiam vi ne malamus. Se vi konus min pli bone, tiam vi amus – balbutis Azraële.

La junulo skuis la kapon neante.

– Ĉu? Ĉu vi amas alian? – ŝi demandis tremetante.

Bejo Feriz kapsignis jeson.

Azraële eksaltis, kvazaŭ venena araneo pikintus ŝin. Sur sia vizaĝo doloro videblis. La manon premis al sia koro kaj ĉesis esti fiera. Ŝi ne estis furioza. Ŝia vizaĝo mildiĝis kaj tremetante ŝi falis al la lito de la junulo poste tre mallaŭte flustradis: „Sed mi tamen amos vin!”

Poste ŝi denove surmetis la pseŭdokostumon, la perukon, la turbanon, la signojn de la maljuneco kaj denove la milda, pia derviŝo estis antaŭ la malsanulo, apogante sin sur la lambastono. Kaj tiu forirante benis ĉiujn, kiujn li vidis, ĝis li atingis la moskeon.

Kiam Azraële foriris, tiam Feriz tuj vokigis la derviŝon, kiu konfesis al la junulo, ke la fifavoriatino de Hasan jam ekde dek tagoj venas en la moskeon por preĝi kaj en la pseŭdovestaĵo ŝi flegas sian karan malsanulon dum la derviŝo sub ŝia vualo preĝas, kion la sklavoj scivole rigardas.

La bejo minacis la derviŝon mortigi, se tiu ne konfesos ĉion, sed se tiu konfesos ĉion, tiam li donos donacon al li. La derviŝo ĉion konfesis kaj Feriz malpermesis la daŭrigon de la preĝo.

En la sekvaj tagoj Azraële tediĝis de la preĝado kaj kvankam ŝi iris en la moskeon, tamen ŝi baldaŭ reiris hejmen. Paŝao Hasan la tagojn pasigis en sia moskeo kaj la noktojn en sia haremo, ĉar li pensis, ke iu ajn venos al li, tiu portas malbonajn famojn. Li volis paroli kun neniu. Multe da tagoj li preĝis, dum la noktoj estis ebria. De mateno ĝis vespero li legis la Koranon, ke ĝi konduku lin al la Paradizo. De vespero ĝis mateno li estis inter siaj damoj, aŭskultis kanton kaj tambursonon, banis sin en ambra akvo, vinon kaj opion drinkis, lian korpon la damoj masaĝis per kotono ke li dormu bone. Tio estis la Paradizo por li.

Ofte li havis malbonajn sonĝojn, kiam iu sorĉaĵo premis lian koron kaj kiam li vekigis, li volis vidi ĉion kiel viva kaj ne kuraĝis dormi. Li tiam surmetis la vestaĵon, iris en la ĉambron de Azraële kaj dirigis fabelojn al si mem.

La odalisko regis la animagordon de Hasan kaj povis direkti lian bonan kaj malbonan humoron. La paŝao fidis ŝin. La orientaj sinjoroj kutimis sonĝi pri malbonaĵoj, kiam ili estis ebriaj. Kaj ili ordonis al la saĝuloj klarigi la sonĝojn.

Iumatene li paŝis al Azraële, kiu ĝuste akvumis belan floron, kies grimpotigoj sur ŝnureskalo kreskis al la plafono kaj de tie kreskis al la planko. La dikaj grimpotigoj prenis unu la alian per la spiraltigoj.

– Nokte mi sonĝis pri tiu planto, kiun vi akvumas – diris Hasan, kvazaŭ li dezirus aŭdi proprajn vortojn. – Mi sonĝis, ke tiu planto kreskis sur iun altan arbon kaj de tie pendis la grimpotigoj, sur kiuj orfruktoj pendis. Mi volis deŝiri tiujn. Mi sendis iun barban simion por deŝiri tiujn, sed la simio ne kapablis fari tiujn. Fine kaj la simio kaj la fruktoj defalis de la planto al miaj piedoj. La frukto duonrompiĝis kaj el tiu elfalis unu ruĝa pomo. Kion signifas ĉi tiu sonĝo?

Azraële forigis la flavajn foliojn de la flegata planto kaj post ioma pensado respondis al la paŝao ekstarante apud lin:

– La orfrukto estas la princino de Moldavio, la simio estas la bejo Olaj. Via sonĝo signifas, ke Olaj portos la principon, kiu naskos filon kaj vi ege ĝojos.

Hasan estis kontenta pro la klarigo, sed dume eŭnuko portis leterpergamenon al li. La leteron skribis la paŝao de Várad. Ĝi ne enhavis ĝojigan sciigon. Ali, la paŝao de Várad, informis lin, ke la transilvanoj transdonis Marian Ŝturdza al bejo Olaj kaj kiam bejo Olaj atingis la transpasejon-Király¹²⁹, tiam kaŝitaj figuroj ekatakis lin, liajn homojn mortigis, la kaleŝon de la princino lasis malplena kaj la principon kaj ŝian filon fuĝigis al Pollando, kie la princo restadas.

Hasan treege surpriziĝis finlegante la leteron al Azraële.

– Vi klarigis mian sonĝon malbone – li stentoris al Azraële. – Ĉio okazis inversflanke. – La simio defalis de la arbo kune kun la fruktoj kaj mortfrapis sin.

Nun subite envenis la pordulo kaj anoncis:

– Bejo Olaj alvenis portante la principon de Moldavio.

Hasan eksaltis pro ĝojo. Li kisis la odaliskon kaj poste brakumis la bejon Olaj.

– Do, la simio tamen ne mortfrapis sin!

La bejo ridetante toleris la brakumadon, sed kiam li ĉirkaŭrigardinte en la ĉambro ekvidis la odaliskon ĉe la fenestro li klinis sin antaŭ ŝi.

– Ĉu vi kunportis ŝin? Ĉu vi bone gardis ŝin? – demandis Hasan samtempe.

Bejo Olaj klinis sin antaŭ la odalisko kaj diris:

– Ĉu ni ne enuigos la belegan reĝinon, se ni parolados pri seriozaj temoj?

Azraële rimarkis la celon de la komplimentado, nome la bejo ŝatus forigi ŝin, pro kio ŝi interparolis:

– Kuraĝe vi povas paroli antaŭ mi, brava bejo Olaj, ja kion vi diras, tio ne estas sekreto, ĉar mi vidas la estontecon, sed la sekreton neniu ekscios.

Konfirmante la vortojn de la odalisko Hasan interparolis:

– Kuraĝe vi povas paroli antaŭ ŝi, brava bejo Olaj, ja ŝi estas la radikaro de la arbo de mia vivo. Ŝi estas Azraële.

Bejo Olaj klinis sin antaŭ ŝi. Li aŭdis ĉi tiun nomon kaj pli bonan proponon li ne pretendis. Sed li decidis, ke al Hasan li ne perfidos sekretojn, ĉar la paŝao estas sub ŝia potenco.

– Do, ĉu vi kunportis la regnestran principon? Hasan urĝis la bejon ne estante kapabla regi sin.

– Jes, sed mi prefere dezirus, se la transilvanoj ne transdonus al mi ŝin, sed farintus ribelon por ŝi kaj mortfrapintus min. Tio estintus gloro por mi. Pasis la belaj tempoj, kiam por iu bela fraŭlino la vilaĝo ribelis kaj pro tio mi povis okupi iun tutan departementon. La hungaraj sinjoroj iĝis saĝaj kaj certe fortiĝos en sia lando.

– Mi teruriĝis pro vi, ĉar la paŝao de Várad skribis, ke la akompanantojn de la princino ĉe la transpasejo Király oni ekatakis kaj mortigis.

– Tion mi sciis bone – respondis la bejo Olaj ruze – kiam la valaĥian principon oni transdonis al mi, tiam mi vidis, ke oni flustras al ŝi: „Timu nenion!” La transilvanaj sinjoroj tiel decidis, ke se ni atigos la limon de Transilvanio, tiam ili la principon fuĝigos. Sed mi ne povis tuj forporti ŝin, ĉar ŝi malsaniĝis. Dum ŝia saniĝo nur la korteganinoj povis iri al ŝi. Kiam ŝi komencis saniĝi, tiam mi antaŭpreparigis la kaleŝon kaj la varĉarojn, sed mi sidigis min, la principon kaj ŝian filon sur iun

¹²⁹ La signifo de la nomo Király estas reĝo.

malbonan ĉaron kaj ekiris al Déva. La akompanantoj iris kun la malplena kaleŝo al Nagyvárad. Ilin mortigis la kaŝrigardantoj, sed la princino kaj ŝia fileto estas ĉe mi. Ja bejo Olaj estas maljuna vulpo, kiu estas ruza kiel la vulpo.

Paŝao Hasan tre tre ĝojis.

– Sed bona veziro – daŭrigis bejo Olaj, ne pensu, ke vi povos regi ĉi tiun sinjorinon. Tiun vi malfacile gardos. Ĉiuj viroj, virinoj promesis liberigi ŝin perforte, per artifiko kaj koruptade. Ili akiros dirkon al viaj dormoĉambroj, al la malliberejo faros tunelojn, en vian trinkaĵon miksos sonĝopulvoron, koruptos viajn fidelajn servistojn kaj se ĉio ĉi estus senefika, tiam la sinjorinoj petpetegos por la princino, ja la virinaj larmoj estas la plej forta veneno. Mi nun transdonos ŝin al vi. Alaho premios mian lacecon, se mi transdonas ŝin al vi. Nun jam gardu ŝin kaj kaŝu ŝin. Tio estas la plej granda malbono, ke vi ne povas mortigi ŝin, ĉar vi devas sendi ŝin vivanta al la sultano. Eblas, ke la sultano lasos vin meti la silkoŝnuron ĉirkaŭ ŝian kolon. Kaj nun paco estu kun vi, kaj la Profeto.

Post ĉi tiuj vortoj bejo Olaj iris en la flankan ĉambron kaj de tie akompanis la princinon kaj ŝian manon metis en la manon de la paŝao, rigardis al la ĉielo dirante:

Alaho estas mia atestanto, ke mi transdonis ŝin kaj ŝian fileton al vi!

18. Kontrastoj

La princino staris antaŭ tiu homo, kies vivo dependis de ŝia morto. Maria bone sciis, ke tiu homo ne kompatos ŝin. Se ŝi petus indulgon, tiam li signus, ke ŝi mortu anstataŭ li.

Ŝi staris antaŭ la veziro trankvile, suferante, tenante sian fileton. La infano metis la kapon sur ŝian bruston kaj ankaŭ ŝi metis la kapon sur la kapon de la infano. Sur ŝia vizaĝo bone videblis la patrina tenereco.

Hasan estis surprizita ekvidante ŝian belecon kaj bedaŭris, ke li devos mortigi ŝin. Bejo Olaj pro tio kuraĝigis lin kaj arablingve flustris al li:

– Vi tiel longe gardos ŝin la plej senprobleme, kiel la infano ne estos apud ŝi, ja ŝi ne forfuĝos sen sia infano.

Kvankam sinjorino Ghyca ne komprenis la vortojn, ŝi ja vidis la ruzajn okulojn de bejo Olaj kaj vidis, ke la veziro kaj la bejo ridetas paŝante pli proksimen al ŝi. Pro la efiko de la patrina antaŭsento ŝi tiris al si sian infanon. La malfeliĉa patrino tremetis, kiam Hasan ridetante rigardis la infanon. Ŝi estis malesperiĝinta kaj alrigardis la odaliskon por mildigi sian doloron.

La odalisko ŝajnis, kvazaŭ ŝi ne rimarkus la principon kaj la virojn. Sed kiam Hasan dankeme brakumis la bejon, tiam Azraële interparolis bagateligante:

– Vi faris tiel, kiel iu pene portas ŝarĝon sur sia dorso kaj la ŝarĝon metas ankaŭ sur la bruston por ne kurbiĝi.

Hasan ne komprenante rigardis la odaliskon, sed la bejo konsterniĝis, ĉar li ne estis alkutimiĝinta al tio, ke virinoj interparolas tiam, kiam viroj paroladas. Azraële flegme kuŝiĝis sur la kanapon kaj diris al la sinjoroj:

– Pia Hasan! Vi volas fari du malbonojn! Vi disigas unu de alia viajn malliberulojn kaj kiam vi gardas unu, tiam vi lasas, ke la alian oni povu forŝteli!

Hasan estis embarasita kaj alrigardis la bejon Olaj dum la bejo karesadis sian barbon:

– Se vi lasas alparoli la damon, tiam respondu al ŝi.

Azraële eksaltis kaj aŭdace paŝis inter la virojn, subtakse rigardis la bejon kaj minacante diris:

– Imagu! Hasan akceptas mian opinion kiel unua, nome mi estas sinjorino! La viro donas nur konsilon, sed la sinjorino amas. La sinjorino pli frue sentas la danĝeron ol la viro. Dum la viro estos ruza maljunegaĝe, la sinjorino naskiĝas kiel ruza. Hasan scias tion, ke inter la homoj nur unu homo estas, kies opinion li povas akcepti, kiu maldormas dum lia dormado kaj kiu sonĝas pri lia sorto. Tiu homo estas mi.

Hasan jesis la vortojn de la odalisko. Li brakumis ŝin kaj tiris al si mem.

– Se tiu virino bezonas gardiston, kiu estas maldormema kaj malkoruptebla – daŭrigis Azraële – tiam mi estos tiu. Mi farigos por ni longan ĉenon, kies finoj estos ĉenitaj al la mano de la princino kaj al la mano de mi. Ŝi povas liberiĝi nek tage nek nokte. Mi estos bona gardistino de ŝi kaj de ŝia filo.

La bejo ektimis de la minaca, diabla rigardo de la odalisko, sed Hasan estis emociita pro la fidelo de la damo. Maria estis trankvila, ĉar el la konduto de la odalisko ŝi komprenis, ke sian fileton oni ne disigos de ŝi.

Bejo Olaj palpebrumis kaj rigardis la virinojn kaj diris al Hasan:

– Tamen estu singarda, ja la sinjorino gardas la principon kaj ŝian fileton.

Poste li sidiĝis en sian ĉaron kaj portigis sin al la fortikaĵo de Buda.

Samtempe Hasan vokigis sian oraĵiston por farigi longan ĉenon el arĝento, sur kies finoj estu katenoj el oro por Azraële kaj Maria. La oraĵisto jam vespere portis la ĉenon kaj du pendserurojn. Hasan metis la katenojn kaj pendserurojn sur la manojn de ambaŭ damoj kaj la ŝlosilojn metis al sia rimeno kaj ĉiu tage li kontrolis, „ĉu la ŝlosiloj ĉeestas?”

Poste li sendis ambaŭ damojn en la dormoĉambron de Azraële. Maria toleris tion, ke ŝi estas katenita, sed estis feliĉa, ke sian fileton ŝi povas brakumi. Maria ekkuŝis sur la kanapon kaj komencis preĝi al Dio entuziasme pensante pri sia edzo kaj memoris siajn amikojn. Ŝi brakuminte sian fileton ekdormis. La odalisko apogis sin sur sian kubuton kaj rigardis sian kunulinon, la manojn de la infano ŝi metis sur la kolon de la patrino. Sur la vizaĝo de patrino kaj filo videblis senkulpeco kaj dia fido.

Jam pasis noktomezo, kiam la infaneto komencis bruetadi. Maria vekiĝis, movis la ĉenon. Pro tio ankaŭ Azraële vekiĝis.

– Ĉu vi havis malbonajn sonĝojn? – demandis la odalisko Marian – la tintado de la ĉeno vekis min.

– La ploro de mia infano vekis min – diris Maria milde kaj tiris al si la infanon, kiu brakumis la mamon de sia patrino kaj ridetis suĉinte la delikatan patrin-lakton.

La patrino karesadis la etajn fingrojn de la infaneto. Tiam ŝi ne sentis humiligon. Azraële enviis la plezuron de la patrino, ja vidis, ke tiu estas pli feliĉa, ol ŝi.

– Kial vi ĝojas tiome? – Azraële demandis Marian enviante.

– Ĉar mia infano estas ĉe mi!

– Sed vi estas forigita de la mondo.

– Mian infanon mi amas pli forte, ol la mondon.

– Ĉu vi amas vian infanon pli forte, ol vian edzon?

Maria iomete pensadis la infanon forte premis al si kaj kisis la frunton de la infano.

– Ĉu vi neniam estis patrino? – demandis Maria.

– Neniam – balbutis la odalisko suspirante.

Maria kompatis la malfeliĉan ulinon. Azraële rimarkis la kompaton de Maria, kio ofendis ŝin.

– Ĉu vi scias, ke vi ambaŭ mortos?

– Mi scias.

– Ĉu vi ne timas la morton? Vian filon per silkoŝnuro oni strangolos kaj tiun morta oni pendigos sur vian kolon. Poste oni strangolos ankaŭ vin kaj metos vin ambaŭ en komunan tombon en la malvarman grundon.

– Kaj ni vidos unu la alian en pli bona mondo, ol estas ĉi tiu mondo. – diris Maria.

– Kie? – demandis gapante Azraële.

Maria levis sian bebon al la ĉielo kaj diris:

– Dio estos nia helpanto.

– Kial helpos vin Dio?

– Dio estas la patro de la suferantoj kaj pridonacas tiujn, kiuj toleris la suferon.

– Kiu diris ĉi tion al vi?

Maria metis siajn manojn sur la bruston kaj ricevante inspiron respondis:

Tio estas skribita en mia koro.

Azraële estis embarasita. Ŝi rigardis Marian. Kial ĉiuj ne povas legi la sekretojn de la koro? En tiu estas multe da sekretoj, sed inter la sekretoj ŝi ne vidis amon, kiu klarigus la sencon de la sekretoj. Maria demetis la infanon sur la randon de la kanapo, sed Azraële maltrankvile atentigis sian kunulinon:

– Ne metu la infanon sur la randon de la kanapo, ĉar tiu povas defali. Metu tiun inter nin.

La infano instinkte kaŝis sin al sia patrino. Maria akceptis la konsilon kaj la infanon metis inter ŝin kaj la odaliskon. La infano denove moviĝis al sia patrino. Azraële eksuspiris kaj diris al si mem: „Kial tiu iras al sia patrino kaj ne venas al mi?”

Baldaŭ la patrino kaj ŝia infano ekdormis, ili brakumis unu la alian. Kelkfoje la infano ĝemetadis, Maria diris ion en la sonĝo, kio estis trankviliga vorto. Se ŝia infano demetis la kovrilon, tiam ŝi tuj kovris la infanon senkonscie.

Azraële apogante sin sur sian brakon rigardis la dormantojn. Ŝi ne estis dormema kaj kvazaŭ estus la anĝelo de la morto, kiu venis por la viktimoj, forgesis sian taskon vidante la gedormantojn amantajn unu la alian. Finfine ŝi singarde proksimiĝis al la bebo kaj kisis ties okulon. La bebo komencis plori, sed la patrino kisis la vizaĝon de la bebo, pro kio li dormis plu. „Kial ne ploras la bebo, kiam la patrino kisadas tiun?” – demandis en si mem la odalisko.

Kiam iĝis pli hele, ol nokte, tiam Maria vekiĝis, la manon metis sur la kapon de la bebo kaj komencis preĝi. Azraële rigardis ŝin malklare. Post la preĝo Maria kunmetis la manojn de la infaneto kvazaŭ ankaŭ tiu preĝus.

– Kion vi faras? – demandis Azraële sendorme.

– Mi preĝas.

– Sed vi estas muta.

– Nur mia animo preĝas.

– Ĉu iu aŭdas la preĝon?

– Dio aŭdas tion. – diris Maria montrante al la ĉielo. – Ĉu vi ne kutimis preĝi?

– Kial preĝu la virinoj? Ili ne estas memstaraj. Ili tion faras, kion iliaj mastroj ordonas.

– Se iliaj mastroj estas feliĉaj, tiam ankaŭ ili estas feliĉaj. Se iliaj mastroj mortas, tiam ankaŭ ili mortas. Alaho ne donis al ili animon por ne havi zorgon en la transmondo. En la paradizo la t.n. „huri” (ĉiam juna virino) faras siajn devojn. La virino malaperas kiel la aŭtuna nebulo, ĉar Alaho ne pretendas ilin.

Maria tre kompatis ĉi tiun virinon, kiu ŝajnigis sin pli malbona, ol ŝi aspektis. Azraële glitis pli proksimen kuŝante al Maria kaj diris:

– Ĉu vi kredas, ke iu aŭskultas la mesaĝon de la vermoj, ĉirpadon de la birdoj, preĝon de la virinoj?

– Vere iu ekzistas – diris la juna kristana virino – voku tiun kaj vi sentos la bonecon de tiu.

– Kiel tio povas esti? Kiu ceremonio estas bezonata por ke tiu min rimarku?

– Ne sufiĉas la kunmetitaj manoj kaj la fermitaj okuloj. Vi devas senti elkore tion, kion vi volas atingi kaj devas kredi, ke tiu helpas.

Azraële iomete ruĝiĝis. Subite ŝi surgenuis antaŭ la kanapon, kunmetis siajn manojn kaj balbutis mallaŭte:

– Dio mia! Donu al mi ŝancon por diri, ke mi estas feliĉa.

Ŝiaj okuloj estis fermitaj, kiam malfermiĝis la pordo kaj enpaŝis en la dormoĉambro Hayat¹³⁰, la plej maljuna damo de la haremo, fifavoratino de Hasan, nun servistino de la fifavoratinoj kaj sekreta komisiito de Hasan.

Azraële sciis, ke Hayat portas mesaĝon por ŝi. Hayat kelkajn vortojn flustris en la orelon de la odalisko. La odalisko multe ĝojis aŭdante la vortojn de Hayat. Ŝi eksaltis

¹³⁰ La virinan nomon Hayat bv. elparoli hayat.

surgenuen kaj tremetis kaj ploris pro plezuro. Ŝi kunmetis la manojn kaj diris iun preĝon. Iu nekutima granda ĝojo atingis ŝin, pri kiu ŝi sopiris, sed neniam esperadis. Unue ŝi preĝis al tiu, kiu estis ŝia duonpatro, ĉar por ŝi ne estis transmondo. Tio nun plenumiĝas, ĉar ŝi preĝis por tio.

Ĝojante ŝi turnis sin al Maria, kiu rigardis la odaliskon nekompreneble. Sed la odalisko premis ŝian manon kaj pro la veninta al fiksa konvinko diris:

– Do, tamen estas iu, kiu aŭskultas niajn preĝojn.

Maria preĝvokis kaj ŝiaj preĝoj flugis por sia filo al la ĉielo kaj al kiu ili flugis, tiu estas preskaŭ apud ŝi. Azraële gaje komencis vesti sin kaj helpis Marian por vestigi ŝin kaj sendis Hayat-on al Hasan por mesaĝi: „ankaŭ hodiaŭ mi iras preĝi en la moskeon de la maljuna derviŝo, ĉar mi sonĝis pri Hasan.”

Baldaŭ venis al ŝi mem Hasan por demeti la katenon de la mano de la odalisko kaj vokigis sian portseĝon por porti la odaliskon al la derviŝo. Kaj li kondukis la principinon kaj fileton per la ĉeno en sian ĉambron. Tie li sidiĝis sur la kanapon, prenis sian rozaron kaj murmuris la preĝojn. Sed konstante li prenis la finon de la ĉeno de la principino. Tiutempe li havis multe da tempo por preĝi, ĉar de la malvenko de la batalo neniu vizitis lin: nek senditoj de la sultano, nek la popolo, nek la paŝaoj, nek la almozuloj. Neniu venis al li, kvazaŭ li estus mortinta.

Unue li konsterniĝis pro tio, sed pli malfrue li ordonis al la porduloj lasi neniun enveni al li. Li tion kredis, ke pro lia malpermeso neniu vizitos lin.

Li sciis, ke unu kondamno pri morto jam estas subskribita. Tiun havas li, aŭ la principino. Izrafil, la anĝelo de la morto, jam estas ĉi tie trenante la glavegon.

Hasan sciis tion kaj forte premis la ĉenon de la malliberulino, kiu estis lia elaĉetmono.

19. Eraroj de la amo

Post tiu kompatinda sceno, kiam la virinoj de Transilvanio vane hontigis siajn edzojn, nur Aranka Béldi estis kapabla kuraĝigi sian amikinson kaj nur ŝi ĉirkaŭbrakumis Marian dirinte al ŝi: „Ne timu, ni liberigos vin!”

Ankaŭ la viroj de Transilvanio diris al ŝi la saman, sed la sorto interparolis kaj la kaŝstarantoj nur la akompanantaron kaptis, sed la malliberulinon ne kaj la plano ne sukcesis.

En intereso de solvi la aferon Aranka Béldi petis sian patrinon permesi viziti sian amikinson, Floran Teleki en Gernyeszeg¹³¹. Tie ambaŭ fraŭlinoj konsentis, ke ili skribos leterojn al du kunuloj en Hungarujo.

Unu skribis al Thököly, la alia al bejo Feriz. Aranka skribis leteron al bejo Feriz kaj Flora al Thököly. Ambaŭ legis unu al alia sian leteron.

La letero de Flora havis la sekvan tekston:

„Via Ekscelenco, mia bona sinjoro! Mi skribas leteron al vi, sed devus kovri mian ruĝiĝon de mia vizaĝo. La kaŭzo, ke nun iu estas inter vivo kaj morto. Rememoru tiun momenton, kiam en la kastelo de Rumnik vi vidis tri fraŭlinojn brakumanta unu la alian. Unu el inter la tri fraŭlinoj mi estis. Tiutempe ni promesis unu al alia fidelan amikecon kaj por partopreni en sortoj de unu la alia. Unu el inter ni, Maria Ŝturdza, staras ĉe la sojlo de la morto. Vi certe konas ŝian malfeliĉon. Ni provis liberigi ŝin sed vane. Vi havas potencon kaj certe povas helpi ŝin liberigi. Provu paroli ĉe la sultano. Mi esperas, ke vi povas liberigi la principon de Moldavio. Mi kredas, ke vi faros ĉion en la intereso de Maria Ŝturdza. Via Ekscelenco bonvolu fari tion, ke mi povu arigi mian honordonon ankaŭ per mia forta beno, kiu povos iri al vi vere purakore el la koro de

Flora Teleki”

Flora ĝuste pensadis. Nome Thököly estis tiam la favorato de la sultano, li konas la paŝaojn kaj vezirojn kaj lia vorto estas pli valora, ol longa petpetego. Flora bone konis lin, ja li treege ofendis ŝin kaj ŝi pensis, ke li faros bonon kaj kompensos la ofendon. Pro tio li helpas liberigi la malliberulinon.

Aranka multfoje kisadis sian amikinson, aŭdante la enhavon de la letero. Sed poste la vizaĝo de Aranka serioziĝis.

– Ho, mia letero ne estas same bela kaj mi hontas montri tiun.

Flora riproĉe rigardis sian amikinson, pro kio Aranka montris la leteron al Flora, kaj ruĝiĝis finlegante tiun.

„Noblakora Feriz! Kiam ni estis infanoj, vi diris, ke vi amas min kiel „vian fratinon.” Nun pruvu tion. Mia plej kara amikino, Maria Ŝturdza, estas nun en Buda. Ŝi estas malliberulino de paŝao Hasan. Mi esperas, ke vi kapablas liberigi ŝin. Pri vi mi aŭdis multe da belaj aferoj. Se vi vidos Marian, tiam pensu kvazaŭ mi estus ĉe Hasan. Se vi redonos ŝin al mi por brakumi ŝin, rigardante en ŝiajn ridetantajn okulojn, ankaŭ mi pensos pri vi:

Aranka Béldi”

¹³¹ Gernyeszeg estas vilaĝo en Rumanio. Unue menciita estis en 1319, unue posedis ĝin la familianoj Széchényi, poste la familio Teleki. Ĝia fortikaĵo estis levita en 1405. Pli multe pri ĝi hungarlingve bonvolu vidi en la Vikipedio: <https://hu.wikipedia.org/wiki/Gernyeszeg>

La fraŭlinoj sendis la noblajn servistojn por porti la leterojn. Iu servisto portis la leteron al Temesvár¹³², kie Thököly restadis, la alia servisto portis la leteron de Aranka al Buda, kie bejo Feriz kuŝis malsane.

Thököly ricevis la leteron ĉe vespera festeno. Finlegante la leteron li ekstaris, prenis sian glavon kaj diris al siaj kunuloj, ke li iras partopreni iun aventuron. Li surĉevaliĝis kaj malaperis de la urbo.

Bejo Feriz ankoraŭ konvaleskis, kuŝis sur sia kanapo. Li malrapiede saniĝis kaj la fiasko de la turkoj maltrankviligis lin. Li iĝis pli malsana, ol antaŭe. Oni ne lasis iri al li la heroldojn, ĉar pri ĉiuj famoj li kredis, ke tiuj estos malbonaj kaj tiuj estos por li veraj venenoj. Lastafoje lia greka doktoro ĉiujn leterojn finlegis kaj se en tiuj estis malbona informo, tiam li ne montris ĝin al bejo Feriz. Ankaŭ la leterojn senditajn de la virinoj li resendis.

Ĉi tiel okazus pri la letero de Aranka, se tiun ne portus sinjoro Gregorio Biró, la fama sikulo, kiu havis bonan econ. Nome li estis persista kaj atingis tiun personon kun kiu li devis paroli.

Ĉi tiu brava sikulo iutage aperis antaŭ la kiosko de la bejo Feriz kaj demandis: „Ĉu estas permesata eniri?”

La saraceno kaptis lin kaj kondukis en iun ĉambron, kie iu antaŭtukon havanta homo kuiris nigrajn foliojn en diversfomaj boteloj.

La saraceno prezentis Gregorion al la doktoro kiel iun heroldon.

– Kiel oni nomas vin? – demandis la doktoro, kiu kolere rigardis la sikulon.

– Mi estas Gregorio Bíró – respondis la sikulo.

– Kion vi volas fari ĉi tie?

– Mi volas paroli kun bejo Feriz.

– Mi estas tiu. Kion vi portis?

Gregorio faris ege malbonaĉan grimason, ĉar pensis, ke tiu homo ne povas esti bejo Feriz.

– Mi portis leteron de iu bela fraŭlino.

– Donu al mi la leteron kaj foriru.

Gregorio ĉirkaŭturnis sian mantelon kaj la burson sur sia kolo kvazaŭ li serĉus la leteron, sed li estis tiom saĝa, ĉar nur ĝian koverton donis al la doktoro, la leteron ne.

– Bone estas, Gregorio, nun vi povas foriri – diris la doktoro kaj la koverton li ĵetis en la kamenon.

– Ĉu ĉi tiel oni kutimas legi leteron? – demandis Gregorio kaj kaŝiris al la pordo, sed tie tuj haltis kaj elprenis el sia poŝo unu medalon dirinte: – Rigardu! Ĉi tiun medalon mi trovis dumvoje. Tiun certe bejo Feriz perdis.

La doktoro forprenis tiun medalon kiu estis belega juvelaĵo, kaj pensis, ke tiun iu ĉefsinjoro perdis, kaj diris, ke li tuj montros ĝin al bejo Feriz.

– Do, ĉu ne vi estas bejo Feriz? – demandis la sikulo.

La doktoro ekridis. Gregorio, ne ŝercu, mi estas la kuiristo kaj mi restigas vin por tagmanĝi. Gregorio grimacadis, ĉar li ne volis manĝi la legomaĵojn de la kuiristo.

¹³² Temesvár estas urbo en Rumanio. Ĝi estas loĝata ekde la pratempoj. Dum la hungara regado ĝi estis tre grava urbo, kies unua mencio devenas eble el 1266. Pri la urbhistorio vi povas legi hungare ĉe:

<https://hu.wikipedia.org/wiki/Temesv%C3%A1rt%C3%B6rt%C3%A9nete> / kaj /

esperantolingve ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Timi%C8%99oara>

La doktoro portis la medalon al bejo Feriz kaj diris al la saraceno ne trinku el la dekoktaĵoj, ĉar li mortus. Post kelkaj minutoj la doktoro revenis el ĉambro de Feriz kaj kriis al Gregorio:

– De kie vi akiris ĉi tiun medalon?

– De kie mi akiris? – alparolis Gregorio, nome al li ege plaĉis tio, ke lin oni volas ektimigi.

– Diru al mi rapide!

– Hodiaŭ ne.

– Ĉu ne?

– Mi perfidos al vi neniamaniere. Ankaŭ ne tiam, se oni radumigus min.

– Sed mi batigos sur viajn plandojn.

– Eĉ tiam ne, se oni palisumus min.

– Gregorio, se vi kolerigas min, tiam mi donas trinki mian medikamenton.

– Donu tiun al mi! – kriis Gregorio kaj el la ujoj ĝuste ekkaptis tiun ujon, en kiu estis la alkoholo. Li forigis la ŝtopilon de la ujo kaj trinkis preskaŭ la tuton.

– Ne drinku la tuton, hundo!

– Sed mi drinkas la tutan alkoholon. Tamen mi diras nenion al vi.

La doktoro vidis, ke trafis pugno pugnon.

– Ĉu vi perfidas tiun al bejo Feriz?

– Nur antaŭ li.

La doktoro devis malfermi la pordon de la ĉambro de bejo Feriz kaj enkondukis Gregorion al bejo Feriz. La bejo sidis sur la kanapo, sur lia pala vizaĝo estis ruĝaj makuloj kiam li rigardis la medalon. Tiun medalon li donis al Aranka Béldi en ilia infanaĝo.

– Kiel vi akiris ĉi tiun medalon?

– Al kiu vi donis tiun, tiu donis al mi por porti al vi.

Bejo Feriz iĝis ekscitita, pro kio li eksaltis.

– Ĉu ŝi sendis vin al mi? Ĉu ŝi memoras min? Ĉu ŝi pensas pri mi?

Ŝi sendis leteron al vi.

Feriz tremetante etendis sian manon.

– Kie estas la letero?

Mi ĵetis en fajron – miksis sin en la interparolon la doktoro.

– Kiel vi kuraĝis fari tion? – kriis kolere Feriz.

La doktoro ne ektimis.

– Mi estas via doktoro kaj ĉiuj leteroj damaĝas al vi.

– Panajot, vi estas aŭdaca! – kriegis Feriz ruĝiĝinte kaj per pugno bategis sur la tablon tiel, ke ĉiuj ujoj kun medikamentoj defalis de ĝi.

– Ne koleru, mia sinjoro – diris Gregorio, dum Panajot kolektis la defalintajn aĵojn – Panajot nur la koverton ĵetis en la fajron, ĉar la leteron mi ne donis al li.

Feriz scivoleme alrigardis lin. Gregorio elprenis la leteron el sia poŝo kaj transdonis al la junulo, kiu antaŭ la legado de la letero kisis ĝin, la vicojn, kiujn Aranka skribis. Dume Panajot, la doktoro, gapante diris al Gregorio:

– Ej, ruza Gregorio, aliokaze mi Vin ĵetos en fajron!

Gregorio ridetante rigardis la bejon Feriz, kiu legis la leteron de Aranka.

– Kvazaŭ oni ŝanĝus lian animon kaj li atingus el lando de la suferoj en la paradizon.

La junulo ridetis kaj lia vizaĝo iĝis brila. Kiam li finlegis la leteron, tiam premis tiun al sia koro kaj ame pensis pri Aranka.

Panajot ege gapis kaj pensis, ke Feriz pli malsaniĝis kaj grincigante siajn dentojn riproĉis Gregorion:

– Kian leteron vi portis al la bejo?

Li ne ricevis respondon. Dume Feriz ridetis kaj kapjesadis kvazaŭ li iun salutis kaj mallaŭte diris:

– Estu tiel, estu tiel.

– Mia sinjoro, vi estas malsana! – atentigis la bejon la doktoro.

Feriz alrigardis la doktoron kaj ridetis.

– Ĉu mi? Mi bone fartas. Forigu la medikamentojn kaj portigu al mi vinon kaj bonan manĝaĵon. Vokigu muzikistojn, malfermigu miajn pordegojn, metigu florojn en mian fenestron ke mi flaru la florodorojn. Ĉiuj ĝoju ĉirkaŭ mi, ĉar mi nun naskiĝis duafoje.

Panajot kredis, ke Feriz estas ekster si, ĉar li gaje ellitiĝis, surmetis silko-vestaĵon, metis surkapen turbanon, li ne plendadis jam kaj fiere iradis en la ĉambro. Lia vizaĝo ne estis jam pala, sed estis ruĝa. Panajot ne komprenis la ŝanĝon kaj kredis, ke li havas paroksismon. Pro tio li vokis servistojn de la bejo. La pordulo de Egiptio, iu ĉasisto de Nubio kaj la kuiristo de Ĉinio kuregis enen. La bejo Feriz ŝercante haltigis ilin antaŭ ol la doktoro parolus kun ili:

– Ali – li diris al la maljuna pordulo – iru en la moskeon kaj la enhavon de ĉi tiu monujo donu al la almozuloj kaj derviŝoj por doni dankon al Alaho, ĉar mi saniĝis. Kaj faru tagmanĝon por dek du homoj. Estu vino, floroj kaj kantistoj. Portu ĉi tien mian plej belan ĉevalon, ornamu tiun. Kaj vi, aliaj ekkaptu tiun pian doktoron, formetu liajn medikamentojn kaj ne lasu lin foriri. Voku miajn amikajn kunulojn dirante al ili, ke ni festos mian resaniĝon.

La servistoj ĝojkriante akceptis la ordonon de Feriz kaj unue portis la doktoron en sian kuirejon, kaj poste ili kuregis por plenumi la aliajn ordonojn.

Kaj Feriz premis la manon de Gregorio virece kaj diris al li:

– Restu ĉe mi ĝis mi plenumos la ordononon de via sinjorino, ĉar tio estas por mi ordono.

Post nelonge la ĉevalistoj portis al li la belegan araban ĉevalon, kiu estis antaŭ-preparita, kiu estis ripozinta, konstante maltrankviladis. La ĉevalistoj apenaŭ estis kapablaj briditi tiun ĉar la purrasa ĉevalo blovis tra la naztruo la varmegan vaporon kaj saltadis.

La malfeliĉa Panajot rigardis tra la fenestro de la kuirejo bejon Feriz, kiu surĉevaliĝis, kiu de antaŭ jaroj estis malsana plendadante senĉese, ke doloras lia kapo. La ĉevalo eksaltadis kaj la doktoro petpreĝis la servistojn ne lasi la bejon surĉevaliĝi. Sed la servistoj priridis lin. Feriz vigle surĉevaliĝis kiel iu lokusto. La ĉevalistoj lasis la kondukilon kaj la bejo spronis la ĉevalon. Efike de tio la ĉevalo ekblekis kaj kiel fulmo ekgalopegis.

La doktoro plorante postrigardis lin kaj kredis, ke la bejo defalos de la ĉevalo. Sed la bejo sidis sur la ĉevalo kvazaŭ li al tiu kreskintus. Li galopegis al la fortikaĵo de Buda kaj post la vojkurbiĝo li malaperis de antaŭ la gapantoj.

Post kelkaj minutoj Feriz estis sur la korto de la fortikaĵo. Li volis iri al la veziro, sed tiu neniun akceptis, pro tio li iris al liaj ŝatataj eŭnukoj, pagis al ili multajn ormonerojn kaj ĉion eksciis, kion li volis scii.

Li eksciis, ke Hasan gardigas la malliberan regnestrinon per Azraële kaj ambaŭ damoj estas kunĉenitaj unu al alia, nome la paŝao timas tion, ke oni la principinon forŝtelos. La odalisko ne lasas fuĝi la principinon. Hasan nokte multfoje kontrolas la ĉambregojn: ĉu iuj fremduloj ne estas en la palaco? De kiam li gardas Marian, li ne drinkas vinon, opion ne suĉas kaj de neniuj akceptas manĝaĵon, nur de sia ŝatata odalisko.

Ĉi tiuj ekscitaj aferoj sufiĉis por Feriz, denove li surĉevaliĝis kaj regalopegis al sia kiosko. Dumvoje li atingis la moskeon, kie li iris al la derviŝo, kiu aperis antaŭ li.

Diru al tiu, kiu anstataŭ vi kutimis viziti min, ke morgaŭ matene mi volas vidi ŝin, ke mi volas paroli kun ŝi.

Li ĵetis kelkajn ormonerojn al la derviŝo kaj forgalopegis. La derviŝo gapante postrigardis lin, kolektis la ormonerojn kaj tuj iris en la fortikaĵon. La tutan nokton li atendis antaŭ la pordegoj, sekvatage frumatene renkontiĝis kun Hayat kaj transdiris la mesaĝon al Azraële.

Tio estis tiu ĝojmesaĝo, kiu alvenis al Azraële efike de sia preĝo, pro kiu ŝi iĝis feliĉa.

— — —

Sekvatage fru-matene Feriz ordonis al siaj servistoj, ke escepte de la derviŝo ili neniun lasu enveni al li kaj kiam ili vidis jam la derviŝon enpaŝi al li, ili fermu ĉiujn pordojn.

Post nelonge Azraële kaj ŝiaj servistinoj alvenis al la moskeo kaj ŝi malaperis en ĝi malantaŭ ĝia krada fenestro. Post kelkaj momentoj aperis sur la strato la derviŝo apogante sin al la lambastono kaj lamante je sia dekstra piedo atingis la kioskon de Feriz. Kiam Feriz ekvidis tiun ordonis, ke ĉiuj foriru. Nome li volis resti kun la derviŝo. La derviŝo iris en la ĉambron de Feriz, fermis la pordon kaj la kurtenojn mallevis. La derviŝo forigis la perukon, la pseŭdovestaĵon kaj jen staris antaŭ Feriz tremetante, pro honto ruĝiĝinte la odalisko.

Feriz sur sia kanapo sidante portis la plej ornaman kompleton. La junulo estis nun ege bela kaj eleganta. Post la longa malsano malaperis lia paleco kaj lia vizaĝo estis ruĝa. Lia hararo estis longa ne detondita laŭ la turka kutimo kaj kun lozaj bukloj ĝi falis sur liajn ŝultrojn. Sur liaj lipo kaj vizaĝo videblis la feliĉo kontraŭ la enokule montriĝanta iom da zorgo.

Azraële staris antaŭ Feriz kiel iu pudora fraŭlino, kiu estas unue malkaŝita antaŭ iu viro.

- Vi vokigis min – ŝi balbutis mallaŭte – kaj mi venis al vi.
- Mi volas peti vin pri io – diris Feriz apogante sian kapon sur sian manon.
- Petu mian vivon – ŝi reciprokis – mia vivo estas la via! – kaj ŝi tremetante falis al la piedoj de la kanapo, sur kiu Feriz sidis.
- Mi petas vian vivon. Iam vi diris al mi, ke vi amas min. Ĉu ankaŭ nun vi amas min?
- Ĉu eblas ami vin kaj ne morti kun amo?
- Vi diris tiam, ke ankaŭ mi pli bone amus vin, se mi pli bone konus vin. Mi volas koni vin.

La damo tremetante rigardis la junulon. Ŝi atendis la plurajn vortojn de la junulo. La bejo Feriz ekstaris kaj serioze diris:

- Al mi ne la vizaĝo, la fajro de la okuloj, la ĉarmo de la staturo de la virino plaĉas, sed la beleco de ŝia animo. Mi rekonas ke la virino havas animon kaj tio ne estas

ludilo de la viro. Min ekprenas la nobla sento, mi estimas la fidelon, sinoferon kaj rezignon. Ĉu vi estas kapabla por morti por tiu, kiun vi amas?

– Tio estas volupto por mi.

– Ĉu vi estas kapabla morti por tiu, kiun vi malamas por pruvi vian amon?

– Mi ne komprenas vin, – diris Azraële hezitante.

– Vi komprenos min tuj. Iu malliberulino estas en la kastelo de Hasan, kiun vi gardas. – La malliberulino devas liberiĝi. Ĉu vi liberigos ŝin?

Azraële iĝis ekscitita, pala, malesperiĝinte rigardis la junulon kaj diris:

– Ĉu vi amas ŝin?

– KREDU tion, ke mi amas ŝin, ke mi amas ŝin kaj devas liberiĝi ŝin.

La odalisko falis al la piedoj de Feriz, brakumis tiujn kaj ploregis:

– Ho, diru, ke vi ne amas ŝin, kaj ne konas ŝin kaj mi liberigos ŝin.

Feriz frigide respondis:

– KREDU tion, ke mi amas ŝin, kaj vi oferu vin por ŝi. Hodiaŭ nokte mi atendos ŝin tie, kie vi deziras, kaj transprenos ŝin. Mi volas ekkoni vin. Poste vi povos foriri, sed povos reveni, se vi volos reveni.

La odalisko kaŝis siajn larmojn kaj konvulsiis ĉe la piedoj de Feriz kaj doloreme ploregis:

– Ho, ve, Feriz, vi estas kruelega al mi!

– Ne nur vi estas, kiu oferis sin por la amo.

– Sed ĉi tiel suferante kiel mi, neniuj oferis sian vivon!

– Ĉu pro tio vi ne estas fieraj?

La damo rigardis al la ĉielo, ŝiaj okuloj brilis. Ŝi ekkaptis la manon de Feriz kaj pere de tiu ŝi ekstaris.

– Jes, mi estas fieraj. Mi estas kapabla morti por vi.

Kaj poste kvazaŭ ŝi purigus la ĉielon de la malamaj nuboj, karesis la frunton kaj trankvile daŭrigis:

– Hodiaŭ nokte, kiam la muezino sur la balkono de la minareto krios la nokto-mezon, tiam estu antaŭ la fortikaĵgardeno kaj kunportu vian plej rapidan ĉevalon.

– Mi ne atendigos vin.

– Tie estas iu eta kaŝita pordo, malantaŭ kiu estas iu sekreta ŝtuparo. Mi kunportos tiun virinon al la eta pordo.

Bejo Feriz etendis sian manon al la odalisko, kiu premis lian manon. Kiam ŝi alrigardis lin ŝi vidis lin rideti. Malfeliĉa damo! Ŝi tion kredis, ke la manpremo kaj rideto ŝin feliĉigas! Sed antaŭ la junulo aperis la bildo de la alia fraŭlino kaj li pensis pri tiu virino. Tio estis la eraro de la amo! Azraële estis tute ekster si. Ŝi kredis, ke la junulo amas ŝin kaj ŝi mortos por li. Ĉi tiu kredo feliĉigis ŝin.

Bejo Feriz tuj vokigis Gregorion Biró. Li pridonacis lin kaj resendis al Aranka per la parola mesaĝo: „Kion vi deziris, tio okazos!” Li estis certa, ke Azraële faros tion, kion ŝi promesis – oferante sin.

Paŝao Hasan jam tre atendis la odaliskon, ĉar li sentis sin kiel senhelpulon, kiam ŝi ne estis apud li. Tiu similis al iu vojerarinta infano, kiam ties patrino ne estas apud tiu. Pro la malvenka batalo kaj lia neglekto li estis embarasita kaj la noktaj diboĉadoj, la preĝoj kun la derviŝoj, la opio kaŭzis damaĝon de liaj nervoj. Se li estis sola, tiam li tuj ekdormis. Poste li vekiĝis abrupte, iĝis nerva kvazaŭ li vidintus sonĝobildojn. Dum kelkaj tagoj li ne suĉis opion, sed ties ĉesigo fortigis lian embarason. Li iĝis avida je amo de Azraële, sen ŝia nesufiĉa afableco li sentis sin malsana.

Kiam Azraële reiris al li, tiam li dormis, elfalis la ĉeno el lia mano, per kiu li gardis la principon. Vekiĝante li vidis kunĝoj, ke Maria ne forfuĝis, kvankam ŝi estus havinta la eblecon. Hasan bezonis malmulte da tempo por rekoni la ŝatatan odaliskon. Azraële havis iun magian altiregon, ĉar Hasan tuj ekkonis ŝiajn paŝojn, la sibladon de ŝia vestaĵo kaj li tuj vekiĝis.

Azraële eksidis apud lin sur la kanapon kaj brakumis lin. Maria turnis sin de ili honteme, kion Hasan rimarkis. Li kisis la lipojn de Azraële kaj plendis:

– Mi havis satanajn sonĝojn. Hamaliel, la anĝelo de sonĝoj, aperis antaŭ mi kaj informis min: se mi ne mortigos Marian, tiam ŝi mortigos min. Mia vivo estas jam tre tre malbona, de kiam Maria estas ĉi tie. Mi ne kapablas pensadi kaj mi ne scias, kio mi estas. Eĉ tion mi ne scias, kie mi estas. Mi kredas, ke mi loĝas en Istambulo sed estas strange, ke mi ne vidas la Bosporon. Maria devas morti. Mi mortigos ŝin hodiaŭ. Tiam mi saniĝos.

Maria ne aŭdis la vortojn de la paŝao, ŝi nur atentis la babilaĉojn de sia infano. Sed Azraële allogante ridetis kaj ĵetis sin sur la bruston de Hasan, brakumis lian kapon, kisis lian vizaĝon konsolante lin.

La malfeliĉa Hasan kredis, ke la rideton, allogadon, kisojn li meritas. Sed en ŝia imago antaŭ la odalisko aperis la vizaĝo de la juna Feriz. Pro tio ŝi kisis ege ame kaj pasie.

Ĉi tiuj estas eraroj de la amo! ...

20. Ludo kun iu blinda homo

Azraële tremetis, kiam Hasan diris: „Ĉi tiun virinon mi mortigos ankoraŭ hodiaŭ!” Povas esti, ke la veziron iu fantomo ektimigis, ĉar li volis liberigi sin de tiu.

Azraële pensis fari interesan, strangan ludon por la senhelpa viro.

Post la sepa tago Hasan ĉesigis la malpermeson por ke venu al li homoj. Azraële memorigis lin, ke en la antaŭĉambro multe da delegitoj, heroldoj, agaoj kaj petpetegantoj atendadas por aŭdienco, kiuj portas donacon, aŭ volas fari submeton, aŭ portas mesaĝon de la grandveziro en la nomo de la sultano.

Pro tiuj vortoj li iĝis ekscitita, frivoleco videblis sur lia vizaĝo. Li diris al la odalisko lasi ilin enveni. Li petis, ke ŝi estu apud li, ke la gloro estu ŝia gloro.

Sed en la antaŭĉambro estis neniuj el inter la sklavoj de Hasan. Ŝi donis al tiuj pseŭdo-vestaĵojn por aspekti elitaj sinjoroj kaj donis al tiuj dokumentojn, monujojn, juvelojn, flagojn laŭ iliaj roloj. Poste ŝi sidigis la veziron en la akceptejo sur la altan kanapon kaj ŝi eksidis sur iun benketon ĉe liaj piedoj. La porduloj lasis ilin eniri po unu laŭvice.

Ŝi minacis ilin ege forte, se iu havus la kuraĝon informi lin, tiun li mortigus je unu mansigno de la odalisko, antaŭ ol li ekkomprenus tiun ludon. Tiu ludo estis akra moko de iu rapida demono, kiu ludis kun pigra mamuto, kiu kapablas frapadi tiun ja la kanajlaro ĉiam donas pravon al la batanto kaj ne al la batato. La plumpvizaĝaj servistoj venis po unu en la akceptejon, ĵetis sin surventren antaŭ Hasan kaj la odalisko diris ilian nomon kaj celon de la vizito.

– Ĉi tiu estas agao Ferhad – diris Azraële montrante iun ĉevaliston – kiu deziras esti via paĝio.

Hasan permesis tion.

Azraële prezentis al li lian kuiriston vestita en arĝentbutona blukolora vestaĵo, pro kio li similis al la urbestro de Debrecen. Tiu pene portis du sakojn de or- kaj arĝentmoneroj. (La moneroj devenis el la trezorejo de Hasan.)

– Ĉi tiu estas la juĝisto de Debrecen – diris la odalisko – kiu petas viziti sian urbon, se vi estos paŝao en Transilvanio.

Hasan ridetis ekvidante la sakojn, permane turnadis la monerojn, fine lasis foriri la delegiton.

La sekva delegito portis reakiritajn turkajn flagojn, kiujn Montecuculi rabis de ili. Hasan ne rekonis siajn homojn, ja li estis psika malsanulo, tiuj portis pseŭdo-vestaĵojn kaj li ĉion kredis, kion tiuj diris.

Azraële prezentis al li la heroldojn, militestrojn, delegitojn, fine ŝi prezentis delegiton de la grandveziro, kies rolon iu eŭnuko devis fari. Ŝi diris al la eŭnuko doni iun sigelitan dokumenton al Hasan, kiun Azraële legos, ja Hasan ne konas la literojn. Laŭ la teksto la grandveziro petas gardi la vivon de la princino, ĉar post kelkaj tagoj tiu transprenos ŝin.

Ŝi tion volis atingi, ke tiu sceno estu la plej efika. Pro tio ŝi kriis al la porduloj:

– Venu ene la delegito de la grandveziro kaj portu ties mesaĝon!

La porduloj flankentiris la kurtenojn de la tendo kaj enpaŝis – bejo Olaj...

– Mi devas rekonu – diris Hasan al la odalisko gapanta – ke vi havas magian forton, ĉar vi scias, kion volas atingi la delegitoj.

Azraële ekscitite eksaltis, kaj sentante la danĝeron diris:

– Ĉu vi portis la ordonon de la sultano?

– Ne demandu, ja vi sorĉinflua virino konas la ordonon!

Bejo Olaj estis teruranta kaj minacanta.

– Kion ordonas al mi la sultano? – demandis Hasan gapante.

– Farigu eŝafodon sur la korto de via palaco ĝis la mateno de morgaŭ!

– Por kiu? – demandis Hasan ektimante.

Estis strange, ke efike de tiuj vortoj ne la princino ektimis, sed Hasan. Bejo Olaj rigardadis la ĉeestantojn, sed neniun rekonis el inter tiuj. Pri vizaĝo de Azraële ne eblis ekscii la enigmon. Sed ŝi divenis la ordonon, ellegis ĝin tra okuloj de bejo Olaj, laŭ kiu se ĝis la mateno de la morgaŭa tago la princino ne liberiĝos, tiam por ŝi, fariĝos la eŝafodo, sed se la princino liberiĝos, tiam por Hasan fariĝos la eŝafodo kaj por tiu, kiu liberiĝos ŝin.

Ŝi devis klopodi por liberigi la princinon.

21. La antaŭmorta nokto

La anĝelo de la morto jam etendis siajn flugilojn super la palaco de Hasan. Tio jam estis sciita, ke matene mortos iu, kiu loĝas en la palaco, sed la nomo de tiu ne estis eldirita.

Ĝis malfrua vespero la ĉarpentistoj laboris antaŭ la pordego de la fortikaĵo kaj ĉiuj batoj de la marteloj aŭdeblis en la ĉambregoj, dum oni faris la eŝafodon. Kiam tiu estis jam preta, oni almetis ruĝan drapon, tri-piedan seĝon kaj apud ĝin iun brilan kurban glavegon. Poste iu grandstatura kurdo paŝis sur la eŝafodon por kontroli ties ĝustan staton. La seĝon li zorge ĝustigis, ĉar ĝi malbone estis almetita. Poste li prenis la glavegon kaj provis uzi tiun, kvazaŭ li elprovus iun instrumenton. Li ne sekretigis sian kontenton, apogis la glavegon al la seĝo kaj foriris de la eŝafodo.

Hasan tremetante metis la katenojn sur la manojn de Azraële kaj Maria. Multfoje li kontrolis, ĉu la ŝlosiloj ĉeestas kaj poste li trankviliĝis. Poste li lasis solaj la virinojn, sed baldaŭ reiris al ili, kontrolis la lokon de la ŝlosilo kaj kontrolis la murojn. Li memoris iun sonĝon pri ekzisto de iu pordo, sed li vidis nenie tiun pordon. Fine li iris al la fenestro, rigardis de tie en la profundon, kie sube al ĉielo leviĝas pintigitaj palisoj. Li vidis, ke en la ĉambrego ne estas ŝnurego, aŭ aĵo al tiu simila. La vestaĵoj estis faritaj el silko, kiuj ne estas taŭgaj por ŝnuregoj. Li trankviliĝis iom.

Azraële rimarkis la pensojn de Hasan.

- Kial vi rigardas min? – ŝi alkriis – se vi suspektas min, tiam vi gardu ŝin.
- Ne koleru min hodiaŭ – respondis Hasan al Azraële.
- Mi estis suspektanta al vi, neniam.
- Ĉu mi ne amis vin ĉiam? Mi kredas vin.
- Do ne venu en mian ĉambron konstante, nome mi ŝatus ripozi.
- Ĉu vi volas ripozi nun? Ja la anĝelo de la morto estas antaŭ la pordego!
- Min ne interesas la anĝelo de la morto. Mi scias, kiam mi mortos, kaj ĝis la morto mi fermas miajn okulojn.
- Kiam mortos Hasan?
- La morto de Hasan okazos unu tagon post la mia – respondis la odalisko tremetante.

Hasan ekploris.

- Kial vivus Hasan, se Azraële jam ne vivas? Kial brilus la suno sur min, se Azraële jam ne vivas?

La senhelpa maljuna Hasan kisadis la kaftanon de la odalisko, ame ĉirkaŭbrakumis ŝin kaj forte ploregis. Kaj dume li balbutadis: „Ĉu vi volus morti pli baldaŭ, ol mi?”

- Tio estas antaŭdirita – diris ŝi malĝoje – ke dum vi vidas min, vi ne timu la morton. Sed se la anĝelo de la morto vokos min, tiam vi devos antaŭprepari vin por morti.

Hasan plorante foriris el la ĉambro de la odalisko, ekkuŝis sur sia lito kaj tuj ekdormis. Poste Maria surgenuis apud la liton, sur kiu ŝia fileto dormis kaj prenis iun eburkrucon kaj ekpreĝis. Azraële ekprenis la manon de Maria:

- Ne preĝu nun, ĉar vi havos tempon ankaŭ pli malfrue.

Maria miris pri tio.

- Kial ne? Ĉu la horoj de mia vivo ne estas denombritaj?

– Tiuj horoj ne estas denombritaj. Vi preĝis por la liberiĝo sed mi por unu feliĉa momento. Tiam iu granda animo ĉeestanta ekaŭdis niajn petojn. Faru tiel, kiel mi diras. Mi liberigos vin.

La princino nur gapis pri vortoj de la kunulino kaj kredis, ke ŝi nur sonĝas. Poste la odalisko prenis iun raspilon kaj komencis segi la ĉenon. Unue la raspilo rapide segis la arĝentĉenon, sed la raspilo ne estis tute taŭga por segi. Azraële ne komprenis la aferon kaj miris pri tio. Ja la raspilo segus eĉ ŝtalĉenon.

Subite Azraële destreĉinte de ĝi la maldikan arĝentan lamenon, komencis segi la tutan ĉenon. Ŝi bonrezultis, ĉar ĝia ekstera parto estis nur arĝento sed la interna parto estis vitro. La oraĵisto devis hasti, tial li pretigis tiun ĉenon pli malforta ol la arĝenta ĉeno pensante, ke neniuj rimarkos la diferencon. La sono sama estis kaj la ĉeno similis al arĝento.

Azraële ekĝojis pro la malkovro kaj prenis kandelington por surbati la vitran ĉenon, kiu rompiĝis tiel, ke nur la katenoj restis sur la manoj de ili.

– Nun jam ni pli rapide povos prepari nin por forfuĝi – diris la odalisko al Maria – helpu rapidigi vian forfuĝon.

Maria ankaŭ nun ne sciis, kio okazas pri ŝi.

– Kiel vi pensas forfuĝi – demandis Maria la odaliskon – ĉie estas gardistoj de Hasan. La pordojn Hasan fermis. Ĉe la pordegoj de la fortikaĵo staras multe da gardistoj.

– Ni povas forfuĝi tra la fenestro.

Maria gapis la odaliskon, kaj kredis, ke ŝi frenezigiĝis ja en la ĉambrego ne estis ŝnurego por malsupreniĝi kaj sube de la profundeco estas la pintigitaj palisoj.

– Helpu malkonstrui la ŝnureskalon de tiu planto – diris Azraële kaj ŝi rapide kiel scuro saltis al la ujo de la planto.

Ĉu Azraële estus pensinta iam, ke sur tiuj grimpotigoj iu homo el la fenestro de la fortikaĵo kapablas malsupreniĝi? Kiu pensintus tion, ke tiu grimpotigo estas taŭga por fari forfuĝon? Maria ekvidis, ke la odalisko estas sperta pri sia tasko. Ŝi helpis rapide al la kunulino por malkonstrui la grimpotigon de la ŝnureskalo. Kaj ili rigardis en la profundecon, sed neniun vidante ili rapide malsuprenigis la grimpotigon, kunligis la ŝnureskalon al la fenestro.

Sed tiu estis ankoraŭ mallonga, ne atingis la subon de la profundeco. Azraële ĉirkaŭrigardis en la ĉambro. Ŝi pensis iom kaj subite diris al Maria:

– Donu al mi tiun tondilon!

La odalisko prenis la tondilon kaj sian ege longan hararon.

– Ĉu vi volas detondi vian hararon? – demandis Maria.

– Jes, tio ne estas malbono, ja tiu estas ege taŭga kiel ŝnurego. Prefere mi detondas mian hararon ol resti ĉi tie – diris kaj ŝi malkonstruis sian harplektaĵon, kiu havis saman kvaliton kaj fortecon kiel la grimpotigoj.

– Bone estas, estu ambaŭ uzataj kiel ŝnuregoj! – diris ili preeskaŭ samtempe kaj ambaŭ damoj detondis la belegajn harplektaĵojn. Ili priploris tiujn belegaĵojn.

(„La mia estas jam superflua – flustris en si mem la odalisko.”)

Poste tiujn harplektaĵojn ili ligis al la ŝnureskalo. La fieraj kavaliroj de la mezepoko kunĝoje portus tiujn harplektaĵojn kiel rimenojn.

– Ĉu vi kredintus, ke niaj harplektaĵoj intermiksiĝos cele de ĉi tiu fuĝo?

Maria dankeme premis al sia koro la manon de la odalisko.

– Kiel mi povas danki vin pro boneco?

– Ne pensu tion, – diris Azraële mallaŭte – mi estas ŝuldanto de la sorto.

Nun jam la ŝnurego estis ĝuste longa, atingante la finojn de la pintaj palisoj. Nun jam ili povos malleviĝi inter la pintajn palisojn laŭ la espero. Poste ili elĵetis kusenojn sur la pintajn palisojn por ne vundiĝi de tiuj. Sekvamomente Azraële ligis la grimpotigon kaj la harplektaĵojn al la fenestro.

– Nun unue mi malleviĝos sur la ŝnurego – diris la odalisko – kaj se mi atingos finon ĝian finon, tiam vi povos veni kuraĝe, ja vi kaj via fileto estas pli malpezaj, ol mi.

Estis malhele kaj la ĉielo estis nuba. Pro tiuj neniuj rimarkis la malsupreniĝantajn personojn. Maria angorante atendis, ke la odalisko atingu la subon de la profundaĵo. Kiam Azraële sukcese atingis la subon de la profundaĵo ŝi ekskuis la ŝnuregon, signante, ke Maria povas komenci la subiĝon.

La princino angorante preĝis al Dio helpi ŝin. Ŝi nun ligis kun sia korpo sian fileton, kiu dank' al Dio dormis. Ŝi paŝis sur la ŝnuregon kaj ekiris malsupren sur ĝi.

Fakto estas, ke estis bezonate preĝi al Dio, ĉar se la fileto vekigis, tiam la infanploro perfidus la forfuĝon, sed neniuj malbono okazis. Maria kaj ŝia fileto sukcese atingis la subon de la profundaĵo. Azraële helpis al Maria veni de la ŝnurego kaj kaŝiri inter la palisoj. Ili ne volis iri sur la reduton, ĉar tie la gardistoj rimarkus ilin.

Finfine ili atingis la finon de la redutkavo, kie inter du bastionoj estis iu mallarĝa fendo, de kie videblis Peŝto. Tiu estis la kruta muro de la fortikaĵo de Buda de kie videblis la rivero Danubo.

Antaŭ la mallarĝa fendo staris iu turka gardisto, apogante sin sur sia lanco. La gardisto ne rimarkis la virinojn, sed la virinoj surpriziĝis ekvidante lin. La gardisto staris antaŭ la fendo do ili ne povis pluiri.

Azraële subite ekkaptis la manon de Maria kaj flustris:

– Restu ĉi tie kaj la bebon ne lasu plori!

Poste la odalisko kaŝiris malantaŭ la gardiston, kiu staris kiel iu statuo, gapis la riveron Danubo kaj certe pensis pri siaj patro, patrino kaj pri tiuj enlandaj riveroj, kie li batalos kaj akiros trezorojn.

Subite la odalisko kiel leopardo kureganta sur sian predon, saltis de malantaŭ la gardiston kaj antaŭ ol li krius ŝi forte puŝis lin sur la krutan montoflankon, de kiu li falegis suben.

– Nun ni iru antaŭen! Ni hastu! – konsilis la odalisko.

Ili kiel du spiritoj kuregis trans la bastionmuron. Azraële prenis la ŝlosilon de la ĝardeno de la fortikaĵo kaj post kelkaj minutoj ili estis en iu tunelo, kie sur malvasta ŝtuparo ili ekiris malsupren. Kiam Azraële fermis la pordon de la tunelo malantaŭ ili, ŝi turnis sin al Maria:

– Nun jam vi povas preĝi, nome vi estas liberigita!

Dumtempe la famo disvastiĝis en la urbo, ke morgaŭ matene iun homon oni senkapigos. Ankaŭ tion oni flustradis, ke la princino de Moldavio estos senkapigita. Ekster la fortikaĵo estis permesate disvastigi informojn. Sed vespere je la 6-a horo oni fermis la pordegojn de la fortikaĵo laŭ ordono de Hasan kaj neniuj rajtis eniri kaj eliri en la kaj el la fortikaĵo. Nur la gardistoj havis permesilon por trafiki tra la pordegoj.

Antaŭ la fermitaj pordegoj multe da homoj kolektiĝis loĝantaj en la fortikaĵo, atendante la bonŝancon iri hejmen en sian domon. Multe da homoj provis eniri ĉe aliaj pordegoj, sed vane. Ili brue frapadis la pordegojn, sed ĉar la gardistoj ne povis respondi al la homoj, oni ekenuis pro la frapado kaj blasfemante iris plu.

Ju pli malheliĝis, des pli multe da homoj tumultis al la pordegoj. Ne estis malfacila diveni, ke ili devos dormi nokte ekster la fortikaĵo. La plej multaj homoj atendis ĉe la pordego de Fejérvár, ĉe la ĉefenirejo. La homoj grumbladis. Kelkaj armenaj

komercistoj kuŝis ĉe la pordego por dormi ĝis mateno. Kelkaj sagacaj turkaj soldatoj furioze frapadis sur la pordego. Iu germana foira vendistino havante dorsosakon jam unu horon plendadis, dirante, ke ŝi havas multe da kaŭzoj por iri en la fortikaĵon: ŝi devas manĝigi siajn kokinojn kaj portas lakton al la mastro kaj la lakto acidiĝos sen malvarmigo, ŝi devas doni panon al la servistino ks. Dum tiuj paroloj ia gardisto staris senmove, estis kovrita de la mantelo, surkape estis ĉapo kaj nur la okuloj videblis.

Jam estis preskaŭ noktomezo kaj la homoj iĝis pli kaj pli maltrankvilaj, kiam alvenis al la pordego dek du rajdantoj portante kompleton de spahio. Iu el inter ili, kiu spite de la malheleco videblis kiel svelta juna, atletforma homo, frapadis per sia lanco la pordegon.

– Ja vi, mia sinjoro, vane frapadas – diris iu botisto de Buda, kiu kuŝis surventre sur la gazono kaj manĝis lardon trankvile – tiuj ne malfermos la pordegon.

– Kial vi estas ĉi tie? – demandis la junulo hungare.

– Ĉar ni alvenis post la 6-a horo kaj oni ne lasas nin eniri.

– Kial tio okazas?

– Ĉar oni diras, ke matene oni senkapigos iun.

– Kiun? – demandis la junulo konsternate.

– Certe la principon de Moldavio.

– Ho, ŝin tute ne! – kriis la juna estro de la spahioj – ĝuste nun mi venas de la sultano. Mi havas ties skriban fermanon, en kiu li ordonas portigi ŝin al Istambulo. Ŝi ne povas morti.

– Tiukaze bonvolu rapidi, mia sinjoro, en la fortikaĵon, ĉar povas esti, ke vi alvenos malfrue, se okazis la senkapigo.

La junulo iomete pensadis kaj demandis la ĉeestantojn:

– Ĉe kiu pordego la gardistoj trafikas?

– Ĉe la pordego de Sombat.

Tiam la junulo turnis sian ĉevalon kaj mansignis al la kunuloj postiri. Efike de ĉi tiu dialogo pri la principo, iu figuro kovrante sin en sian mantelon klopodis iri apud la junulon, kaj mallaŭte alparolis:

– Thököly! ...

– Ĉit! – eksiblis la junulo nevole konsternate scivole, volante ekscii, rekoni la vizaĝon de tiu. – Ĉu vi estas la princo? – kaj la junulo rekonis la princon Ghyca.

– Ĉu mi povus esti aliloke ol ĉi tie, kie mian edzinon oni volas mortigi? – respondis la princo apatie.

– Ne estu malĝoja – diris Thököly – ja ĝis morgaŭ estas multe da tempo. Mi kredas mian stelaron kaj mia intenco estas liberigi Marian.

La princo Ghyca forte emociiĝis kaj tute ne koleris lin, ke li nomis lian edzinon Maria.

– Ja la fermanon de la sultano vi havas kaj vi venis per akompano de la sultano.

– Ĉu fermanon? Mia amiko! Ĉe mi ne estas skriba ordono de la sultano kaj ĉi tiuj homoj estas miaj hungaraj amikoj, nur ilia vestaĵaro estas turkdevena. Ili promesis, ke ili ĉion faros por mi, por intereso de miaj celoj. Mi havas ion, pere de kio eblas fari skribaĵon, eblas ricevi ŝlosilon de la malliberejo. Tio estas unu ŝultrosako da ormoneroj.

– Kion vi volas atingi helpe de tio?

– Multon! Mi koruptos la gardistojn lasi min eniri en la fortikaĵon. Mi koruptos paŝaon Hasan, kaj bejon Olaj. Sed se tio ne sukcesus, tiam mi minacos ilin. Sed se

nenio sukcesos, tiam ni mortigos paŝaon Hasan kaj la gardistojn, forbruligos la fortikaĵon, sed mi ne trankviliĝos ĝis mi vian edzinon forportos el la fortikaĵo.

– Kiel mi povus danki vin pro via helpo?

– Mia amiko! Ne al mi danku pro tio, sed al Flora Teleki. Ŝi petis mian helpon.

– Ĉu vi denove amas unu la alian?

– Ne. Helena Zrínyi estas mia fianĉino. Ŝi estas fidela virino. Nun mi devus esti ĉe ŝi, sed se mi finos ĉi tiun aferon, ni aranĝos pompan geedziĝon, kia en Hungarujo ankoraŭ ne estis.

La frivola junulo tiel diris tiujn vortojn, kvazaŭ li ne pensus li povas perdi sian kapon, ĉar li ĝenas la politikon de la turka imperio. La menso ne malhelpas la koron, lia slogano estis: „Virtus nescia freni!” /La braveco ne konas la bridon./

La princo iĝis malĝoja, ĉar li pensis, ke li trovis iun bonvolan sed malmultan esperon donantan helpanton.

– Kion vi volas fari? – demandis Thököly la princon kvazaŭ li mirus pri tio, ke tiu estas en Buda.

– Ankaŭ mi Marian volas liberigi kaj ankaŭ mi esperadas.

– Kio estas via plano? Diru tion. Povas esti, ke ni faros iun bonan komunan planon.

– Mi havas alian planon. Mi volas transdoni min anstataŭ mia edzino. Ŝin oni volas senkapigi pro mi. Mi devas aperi sur la eŝafodo anstataŭ ŝi.

Kvankam la princo estis forta viro, tamen tremetis, kontraŭe lia decido estis firma.

– Tio estas stulta ideo! Se vi aperas antaŭ ilin, tiam kaj vin kaj vian edzinon ili mortigos. – Estus plej bone veni kune kun ni surĉevale en la fortikaĵon kaj per glavo batalante ni liberigos vian edzinon kaj vian fileton. La aŭdaculoj kaj kuraĝuloj atingas sukcesojn!

– Mia amiko, Thököly! Laŭ mi la turkoj ne estas homecaj kaj se mi denuncas min, tiam kaj min kaj mian edzinon ili mortigos kaj ni mortos kune. Tio konsolas min!

– Vi parolas malbone, – kriis malpacience la hungara junulo. – Kial vi malesperiĝas? – Kial vi ne estus kapabla superruzi paŝaon Hasan, ja li estas ege stulta homo? Nu! – Mi havas iun bonan planon. Vi venos kun ni kaj tiel ni faros kvazaŭ ni ekkaptintus vin. Mi diras antaŭ la pordego, ke, ni ekkaptis la faman princon de Moldavio. Efike de tio la gardistoj lasos nin iri en la fortikaĵon antaŭ paŝaon Hasan. La paŝao bone konas min kaj tiu kredas min. Se tiu ne kredas min, tiam mi romos lian kapon. – Tiu ĝojos ekvidante vin. Sed mi ne transdonos vin al tiu, dirante, ke, mi devas gardi vin. Pro tio vian edzinon nur post kelkaj tagoj eblas mortigi. Nome tiu devas skribi al la sultano, demandante, kiun oni mortigu. Ĝis la respondo alvenos, mi fuĝigos vin ambaŭ.

La princo ekesperadis. Al li plaĉis la plano de Thököly kaj li akceptis ĝin.

– Nun tuj ni devas iri en la fortikaĵon. Ni iru al iu gardisto, kiu staras ĉe la pordego kaj atendu la ŝanĝon de la gardistaro.

Poste la soldatoj de Thököly ekkaptis la princon kiel iun malliberulon kaj akompanis laŭ la bordo de Danubo. Estis malhela nokto. Sur la rivero videblis senformaj turkaj ŝipoj. La aventuremuloj en la forta vento senĉese disrigardadis ĉu ili rimarkos ie gardostarantojn. Ili vane atentis la krion de la gardostaranto. Aŭdeblis iu mallaŭta krio, sed tiu tuj ĉesis kvazaŭ iu mortbatus tiun. Preterirante la murojn de la fortikaĵo ili rimarkis, ke ĉe iu pordo de fortikaĵmuro staras iu armila figuro.

– Tie estas la gardisto! – ili diris al Thököly.

Certe la fihomo dormas, ja tiu ne rimarkis nin – diris Thököly turklingve.

- He! Ĉu vi gardas la pordon?
- Vi povas vidi – respondis la gardisto.
- Kial vi ne rimarkis la preterirantojn?
- Tio ne estas mia tasko.
- Kio estas via tasko?
- Stari ĉi tie ĝis la ŝanĝo de la gardistaro.
- Kiam okazos la ŝanĝo de la gardistaro?
- Kiam ajn.
- Ĉu ĉi tien venos al vi la patrolo?
- Ne ĉi tien.
- Kie ni povas eniri en la fortikaĵon?
- Nenie.
- Vi donas ege mallongajn respondojn, sed ni nepre devas iri nokte al Hasan.
- Ellernu flugi.
- Ne ŝercu, bona homo, ĉar mi devas transdoni ege gravan informon al la paŝao kaj. – Vi pli facile povas iri al la paŝao kaj diri al tiu, ke mi, Emeriko Thököly, ekkaptis la princon de Moldavio. Certe la paŝao donos al vi riĉan donacon.

Kiam Thököly diris sian nomon kaj montris la malliberigitan princon, tiam la turka gardisto elpaŝis de sub la volbaro de la pordo kaj Thököly kaj Ghyca samtempe diris surprizate:

- Bejo Feriz!
- Ĉit! Estu en silento! Mi estas tiu. Vi volas liberigi Marian. Ankaŭ mi.
- Jes. – diris Thököly. – Mi promesis al iu virino, kiu amis min, mi faros tiun agon por ŝi. Mi plenumos mian promeson.
- Kaj mi promesis al iu virino, kiu amas min, se mi faros tion.
- Ni ne havas sekreton antaŭ vi, ĉar ni pretendas vian helpon.
- Sed mi ne pretendas vian helpon.

La princo malesperiĝinte aŭskultis la paroladon de la kunuloj poste prenis la manojn de ambaŭ kaj kortuŝate parolis:

- Feriz! Thököly! Iam ni estis malamikoj kaj nun vi estas miaj sinoferaj amikoj. Mi ne volas esti pli mallerta, ol vi. La eŝafodo jam estas antaŭpreparita sur la korto de la fortikaĵo kaj atendas sian viktimon. Nome la sultano volas mortigi mian edzinon.

- Permesu al mi, ke mi estu la viktimo. Nome, kiu liberigas ŝin, tiu devas morti. Feriz!

- Kiam vi estos en la fortikaĵo, tiam diru al Hasan, ke anstataŭ sinjorino la eŝafodo ricevos sinjoron.

- Lasu la eŝafodon, princo! Tiu ricevos tiun, kiu plej vere meritas tiun.

- Ne atentu la princon – diris Thököly al Feriz, nome li freneziĝis, ĉar li al Hasan volas doni sian kapon. Helpu min eniri en la fortikaĵon. Se mi estos en la fortikaĵo, tiam okazos neniŭ malbono. Mi estas fortunido. Mi havas feliĉon kaj bonŝancon.

- Bone estas. Atendu ĉi tie ĝis la turko en la turo de la minareto krios la noktomezon. Sed ĝis tiam kaŝu viajn ĉevalojn por ne rimarkigi tiujn.

La grafo kaj la princo kredis, ke Feriz volas aliĝi al la nokta patrolo, kaj ili vere kaŝis sin kaj la ĉevalojn. La nokto iĝis pli kaj pli malhela, ol pli frue, kaj nur kelkaj steloj videblis.

Hasan havis maltrankvilan nokton. Li sonĝis pri fantomoj, ofte li vekiĝis kaj la fantomoj venis unu post alia.

Blovis forta vento, kiu deŝiris iun fenestron, ĵetis tiun al la muro kaj la vitroj falis sur la plankon. Pro la bruadoj Hasan denove vekiĝis kaj vidis la kurtenon proksimiĝi al li kvazaŭ iu fantomo venus al li por ektimigi.

– Kiu ĝi estas? – li kriis ektimante kaj ekkaptis la glavon.

Neniu estis tie, nur la vento movis la orankvastan kurtenon. Li fiksas la kurtenon kaj denove enlitiĝis. Sed la vento denove komencis blovi la kurtenon al la mezo de la ĉambrego.

La drapiraĵoj de la mebloj, la pordoj kaj la muroj ege forte movis pro la vento, kvazaŭ iu movus tiujn kaj la flamo de la meĉo moviĝis farante ombrojn sur la murojn.

– Kio okazis? Ĉu diabloj venis en la palacon? – demandis Hasan en si mem terurate.

La fermitaj pordoj tiel bruegis kvazaŭ iu piedbatus tiujn. Hasan pensis, ke en iu ĉambro unu fenestro estas malfermita kaj pro tio estas la nekutima trablovo. Tio movas la kurtenojn, skuas la pordojn. Certe tiu fenestro estas en la ĉambro de Azraële kaj tiam la virinoj forfuĝis.

Efike de ĉi tiu penso li tuj eksaltis, eltiris sian glavon kaj kiel frenezulo kuregis en la ĉambron de Azraële. Sed la odalisko antaŭ la forfuĝo alŝovis la kanapon al la pordo pro kio Hasan ne kapablis tuj malfermi la pordon.

Hasan komprenis ĉion.

Al neniu li kriis malfermi la pordon, sed furioze deprenis de la muro la batalhakilon kaj komencis bategi la pordon. Pro la bruo la gardistoj kaj servistoj kuris al li. Finfine ili sukcesis rompi la fortan pordon de la virinoj, kie li vidis, ke la virinoj ne estas tie.

Li kuris al la fenestro kriegante kaj vidinte la grimpotigojn de la planto li ekkriis batante sur sian frunton:

– Kuregu post ili! – li kriis malesperiĝinte al la gardistoj. – Ili forfuĝis. Ili forŝtelis sian vivon de mi kaj ankaŭ mian vivon! Persekutu ilin, reportu ilin! Ho, Azraële! Ĉu mi meritis ĉi tion? Kaj la maljuna Hasan komencis plori kaj ekvidante la silkorimenon de la odalisko ĉe la fenestro li ekkisis tiun centoble, per tiu li kovris sian vizaĝon kaj svene terenfalas.

— — —

....„Rapidu, princino, rapidu!”...

La odalisko premis la manon de sia kunulino kaj fortrenis kun si sur la flanko de la arbusta fortikaĵmonto. Jam ili atingis la ŝtuparon, kiu estas komenco de la malhela tunelo kaj kies fino estas ĉe la pordegoj de la ĝardeno sur la bordo de Danubo. Pli frue la odalisko akiris la ŝlosilojn de la pordegoj, kiuj estis ĉe Hasan. Kiam la odalisko serĉis la ĝustan ŝlosilon, tiam kriegoj aŭdeblis el iu fenestro de la fortikaĵo. Ambaŭ damoj ektimante diris: „Hasan rimarkis nian malaperon!”

– Dio mia! Ne forlasu nin! – balbutadis mallaŭte Maria kaj premis al si sian fileton.

Azraële subite malfermis la grincantan pordon dum en la fortikaĵo estiĝis granda kaoso, kriego. La tuta gardistaro vekiĝis.

– Ni rapidegu! – kriis la odalisko, kuntirante la principon en la tunelon kaj la pordon fermis.

Subite aŭdeblis unu kanonpafo de kio Maria ektimis kaj terenfalas al la piedoj de Azraële kaj iĝis senmova, sed ankoraŭ ankaŭ tiam defendis sian fileton.

– Ho, ve! Ŝi svenis – kriis ektimante la odalisko, ja ŝi vidis, ke ŝi devas tiri la ŝajne senvivan korpon.

– Ni mortos ĉi tie – balbutis la princino malesperiĝinte – la bruego konstante fortiĝas kaj la kanonpafoj pli ofte aŭdeblas.

– Ni ne povas morti – kriis la odalisko, kiu pro la sento de danĝero iĝis pli forta, ol pli frue, kaj la princinon por movi sin nesciantan kaj la fileton levis en sian sinon kaj ekkuregis kiel povis sur la ŝtuparo malsupren.

Ŝi nur palpadante iris en la malhela tunelo kaj preskaŭ terenfalas pene portante la princinon kaj la bebon. Sed la kanonado ne lasis ŝin ripozi. Ŝi devis iri antaŭen, dum tio la bebo vekiĝis abrupte kaj ploris.

La genuoj de Azraële ŝanceliĝis sub la ŝarĝo, krome ĉar la tunelo kaj sia animo estis malhelaj ŝi neniun vidis, ankaŭ la mondo estis malhela. Kaj la ŝarĝo kaj la penso estis pezaj, ja kiun ŝi nun liberigas, tiu estas amantino de tiu, kiun ŝi amas. Sed ŝi devis liberigi tiun, ja ŝi promesis al tiu.

La odalisko sentis, ke ŝi havas jam malmulte da forto, tamen kapturnante apogis sin al la muro de la tunelo kvankam ili ne atingis la suban finon de la tunelo. Ŝi volis atingi la suban pordon kaj ekvidi bejon Feriz, kiu diros al ŝi: „Vi estas bona virino!” Poste ŝi trankvile atendas la grandan glavegon de Izrafil.

Ŝi jam komencis aŭdi bruon de paŝoj, pro kio kolektis la restintan forton, pene portis la princinon kaj la bebon, tamen atingis la finon de la tunelo. Poste ŝi terenfalas ĉe la sojlo de la pordo, sed laste ŝi sukcesis malfermi la pordon per la ŝlosilo.

Dum Thököly kaj Ghyca kaŝis sin kaj siajn ĉevalojn, Feriz kaŝis sin sub la volbaro de la riparolita pordo kaj atentis la krion de la muezino pri la noktomezo. Li atendis la odaliskon. Li certe sciis, ke ŝi alvenos, ja ŝi promesis.

Kvankam aŭdeblis iu kriego, tio estis la hororkriego de Hasan, kaj Feriz sciis, ke danĝero estas en la fortikaĵo, Feriz atendis plu. Li sciis, ke la odalisko forfuĝigis la princinon, sed la forfuĝon oni rimarkis. – Ĉu la forfuĝo okazis malfrue, aŭ frue? Pro tiu nerespondebla demando Feriz tremetis.

– Kion signifas tiu bruo? – demandis la princo.

Feriz ne volis ektimigi la princon.

– Estas neniun problemo. Nur iu kaŝiradis sur la bastionoj kaj tiun oni persekutas.

Tiam okazis la unua kanonpafo. Feriz ektimis pro la kanonpafo.

– Tio estas signo de la bruego – diris Thököly eltirante la glavon.

– Restu en silento! – flustris Feriz – povas esti, ke oni pafis la homojn, kiuj estas ĉe la pordegoj.

Sed oni kanonis de ĉiuj bastionoj. La bruego pligrandiĝis, oni tamburis, la trumpetoj signis alarmojn kaj en la fortikaĵo oni kuris tien kaj reen prenante glavojn kaj torĉojn.

– Ili persekutas iun – kriis la princo kaj eksaltis.

– Mi ne scias – balbutis Feriz kaj tremetis.

Ghyca prenante la glavon volis kuri al la fortikaĵo.

– Kion vi volas fari? – kriis Feriz al Ghyca ekkaptante la manon de la princo kaj kuntiris lin sub la volbaron de la pordo kie ili staris. Ambaŭ viroj tremetis unu apud alia.

Kelkajn minutojn ili estis silentaj, aŭskultante la kriegojn kaj pensis „Kio okazos, se oni ekkaptos ilin, la fuĝantojn?”

– Ĉit! – flustris Feriz, kiu kvazaŭ aŭdus, ke malantaŭ la pordo estus ĝemeto kaj iu infano ploras.

Post kelkaj momentoj iu malfermis la seruron per ŝlosilo, Feriz rapide premis la pordon al la tunelo kaj du virinoj falis al liaj piedoj. La juna bejo kuntiris la princon, kiu rekonis Marian, sian edzinon kuŝinta en la sino de Azraäle. Feriz irigis la princon al Maria kaj al lia bebo. Feriz metis la edzinon kaj la bebon inter la brakojn de la princo.

– Ĉi tie estas via edzino kaj via infano! ... Jam, tuj rapidu! ...

– Mia Maria! – balbutis la princo ekster si kaj brakumis sian edzinon kaj sian infanon.

La bebon nun li vidis unuafoje. Kaj li kisadis la fileton.

Dume Maria rekonsciiĝis, kaj trabrakumis sian edzon. Ŝi ne kapablis paroli pro la emocio pro la ĝojo vidante sian edzon.

– Hastu! – urĝis ilin Feriz – enboatigu, sur la transa bordo vi povos ĝoji unu kun la alia. Ĉi tie vi estas en danĝero. Sur la transa bordo iu mia sklavo atendas vin donante al vi du ĉevalojn. Nur menciuj mian nomon kaj li helpos vin. Ĉe la setlejo Vác vin atendas alia mia sklavo, kiu donos al vi ripozintajn ĉevalojn; poste iru al Nógrád. De tie vi povos iri facile al Pollando. Pri nenio danku, sed iru rapide!

Feriz kondukis ilin al la boato, en kiu sidis du sklavoj de Feriz. Ili enboatiĝis kaj post kelkaj minutoj la boato jam portis la regnestron, regnestrinon kaj ilian filon al la transa bordo de Danubo.

Bejo Feriz plifaciliĝis kvazaŭ rokoj defalintus de li.

– Ĉu oni ne postiros ilin? – demandis Thököly maltrankvile.

– Povas esti – diris Feriz – sed ĉevalojn ili ne kapablos porti sur boato. Sur la transa bordo nur tiuj ĉevaloj atendas, sur kiuj ili forgalopos. Mi sendis homojn malfiksi la ponton for de la bordo, tiel pro la ventego ne eblas porti ĝin al la bordo.

La gefuĝantoj estis jam meze de la rivero Danubo kiam Maria rekonsciiĝante subite ekstaris en la boato kaj komencis mansignadi al sia kunulino por danki ŝin pro sia helpo kiel adiaŭo.

– Kion vi faras? – kriis Feriz kolere, ĉar li timis, ke oni rimarkos ilin.

Sed feliĉo estis, ke estis malhelo kaj oni ne povis vidi de la bastiono de la fortikaĵo la malproksimiĝantan boaton. Fine eĉ Thököly kaj Feriz ne povis vidi la gesavatojn. Feriz kunĝoje rigardis al la ĉielo. Du brilaj steloj rigardis al la tero. Ĉu Feriz pensis pri tio, ke tiuj du steloj estas la okuloj de Aranka Béldi?

Thököly ekkaptis la manojn de Feriz kaj amike premis tiujn.

– Duafoje ni staras nun unu kontraŭ alia. Unuafoje mi venkis, nun vi. Dio benu vin. Adiaŭ!

Thököly enseliĝis kaj mansignante al siaj kamaradoj-soldatoj forgalopis al la monto Gellért.

Feriz staris sola sur la bordo de Danubo kaj serĉis perokule la jam ne videblan boaton. Neniu pensis pri la malfeliĉa odalisko, kiu liberigis la geregnestrojn kaj ilian fileton.

Subite iu varmega mano tuŝis la manon de Feriz. Li vidis, ke la odalisko pene portas sin laca al li. Feriz levis ŝin, tiris ŝin al sia brusto kaj kisis. Ŝi ne estis kapabla paroli, nur ploris, ploregis.

– Vi estas bona virino – diris Feriz milde.

Ŝi brakumis liajn genuojn kaj Feriz lasis sin brakumi.

– Kore mi dankas vin, ĉar vi plenumis vian promeson – diris Feriz. – Tiu virino ne estis mia amantino, ja ŝi havas edzon, kiun ŝi amas.

La diro de Feriz plaĉis al ŝi, kiu diro estis donaco por ŝia sinofero. Do, Feriz ne pro la amo pri ŝi liberigis la virinon.

La bruego pliiĝis ankaŭ sur la bordo, la persekutantoj certe atingis la spurojn de la gefuĝintoj.

– Mi devas foriri de ĉi tie! – diris Feriz. – Ĉu vi volas veni ĉe mi?

– Ĉu por iri al li? Por esti kun li? Por resti ĉe li? – ŝi demandadis sin.

– Mi ne iras al vi – ŝi respondis al Feriz.

Nome ŝi pensis pri tio, ke se oni trovas ŝin ĉe la junulo, tiam pro ŝi ankaŭ li mortus. Ŝi sciis, ke la invito estas noblaanima danko, sed ne amo. ...

– Mi volas iri al la insulo – ŝi diris mallaŭte.

– Tiukaze mi helpas vin enkorvetiĝi – diris Feriz kaj etendis la manon al la odalisko por levi.

Sed ŝi surgenuis sur la teron.

– Feriz! Vi kutimis premii tiujn virinojn, kiuj mortis noble por vi, ĉar vin amis – ŝi diris larmante – ĉu mi meritas vian premion?

Bejo Feriz iĝis malĝoja kvazaŭ dolorus ŝia diro. Li tiris al si la virinon kaj kisis ŝian frunton. Pro tio la odalisko iĝis feliĉa, eksaltis, kaj siajn brakojn levis al la ĉielo dirante mallaŭte:

– Mi estas feliĉa! ... Unuafoje en mia vivo. Nun mi povas iri morti.

Feriz tenere brakumis ŝin kaj enkorvetigis la damon. En la korveto starante ŝi flustris al li:

– Kiam vi atingos vian kioskon, ne enlitiĝu, sed rigardu al la insulo, pensu pri mi, preĝu por mi, se vi vidas la fruaŭronon diru: „Ĉi tiu virino pro siaj pekoj puniĝis.”

La larmoj de la junulo falis sur la vizaĝon de la odalisko. Ŝi estis la plej feliĉa en la tuta mondo.

Post kelkaj momentoj la akvoondo forportis lulante la korveton.

22. La viktimo

La princino estis liberigita, sed la liberiginto pereis.

Kiu faris la atencon, tiu de nun estis transdonita al la nereturnebla morto se ne estis kapabla por savi sin, sed ankaŭ ne volis savi sin.

Sur la bastionoj de la fortikaĵo aperis la danĝeron signantaj fajroj, informante pri la kurego de la forfuĝantoj. La soldatoj kuregis sur la arabaj ĉevaloj pli rapide, ol la vento. Sed ankaŭ la vento estis ege forta kaj pro tio la akvoondoj de Danubo ĵetadis tiujn boatojn, kaj aliajn ŝiptipojn kiuj estis sur la ondoj tiutempe. Nur unu korveto estis kuraĝa navigi meze de Danubo ĵetiĝadinte inter la akvoondoj. En la korveto iu blankan vestaĵon portanta figuro staris kuraĝe, kies vestaĵon forte blovis la vento. La boatisto konstante petadis Alahon por helpi.

– Ne timu la morton, ja vi portas min! – diris Azraële, kiu ŝi memoradis.

Rigardis unu stelon inter la nuboj. Tiu stelo vidis ŝin jam ankaŭ aliafoje inter la danĝeroj naĝante – kaj nun ĝi denove alrigardas ŝin.

Fine la korveto atingis la insulon Margareta. La odalisko elkorvetiĝis. Ŝi deprenis de sia mano la lastan brakringon kaj ĵetis tiun al la korvetisto.

– Rememoru pri mi kaj reiru en la fortikaĵon.

– Ĉu vi restas ĉi tie?

– Ne.

– Kien vi iras?

Azraële respondis nenion, nur mute montris al la ĉielo. La korvetisto nenion komprenis, sed sciis, ke tien ne li portos la damon, kaj li ekiris per la korveto al la transa bordo. Azraële restis sola sur la insulo. Antaŭtage ŝi ĉiujn forigis de tie en la nomo de Hasan: damojn, gardistojn, eŭnukojn portigis en la fortikaĵon. Pro tio la paradizo iĝis malplena kaj neloĝata.

Azraële unua promenis sur la insula bordo de Danubo. Sur la bastionoj de la fortikaĵo oni kanonadis, brulis la danĝeron signantaj fajroj, la rajdistoj galopadis kriegante, la forta vento tordadis la arbojn. Estis malhelo. Ŝi neniun vidis, aŭdis, nur pensis pri la elizeo, kie estas la anĝeloj, kiuj estas interkonsentaĵoj.

Ŝi pensis, ke ŝi ektrovis la veran feliĉon, kie la animo trankviliĝas. La amo de la animo estas pli daŭra, ol tiu de la korpo. Kie estis la animo ĝis nun? Se la animo vidintus sin, tiam ĝi teruriĝintus vidante ŝian korpon, infektitan figuron, kiu estis nur ludilo de la abomena pasio. Multe da homoj asertas, ke la virinoj ne havas animon. Sed ili havas tiun. Nome dum la korpo tremetas, timas la morton, la animo gustumas iun alian plezuron. La korpo sentas la vivon, la animo sentas, ke la korpo neniĝas. La animo ne kisis, ne brakumis abomene, sed estis sub neĝblanka vualo kaj ne konis la pekon. Ankaŭ la oro estas inter la rokoj, sed en fajro forbrulas la elĵetaĵo kaj estiĝas la pura oro. Same ankaŭ la korpo neniĝas kaj estiĝas la pura animo.

Pri ĉi tiuj pensante la damo atingis la kioskon. Ŝi promenis senkonscie kaj surpriziĝis ekvidante la someran dometon. Ŝi kaj memoris kaj fantaziis.

Ŝi memoris kiam adiaŭante la junan bejon ŝi diris al li: „En via kiosko ne enlitiĝu, sed rigardu al la insulo. Tie la nokto pli frue heliĝos, ol aliaokaze. Se vi vidos tion, tiam pensu pri mi kaj diru por mi preĝon, kiu estu mia akompananto!”

Ŝi pensis, ke la junulo nun rigardas al la insulo, lacigante siajn okulojn. Ŝi ne volis lacigi longtempe liajn okulojn. Ŝi subite malfermis per ŝlosilo la pordon de la kiosko

kaj enpaŝis. Meze de la ĉambrego lumis iu meĉo. Ŝi ekbruligis torĉon, iris en ĉiujn ĉambrojn, kie estis orientaj tapiŝoj, kurtenoj. En la ĉambroj estis ebriigaodoro.

Ŝi abomenis tiun odoron. Surpaŝante la tapiŝojn ŝi sentis, kvazaŭ ŝi irus sur ardaĵoj kaj sentis ŝimodoron. Ĉie ŝi memoris la pekon kaj abomenon. Ŝi devis memori ĉiujn aĵojn, meblojn, vestaĵojn. Tiu memorado estis ŝia puno.

Se tiuj neniiĝos, tiam la animo ne memoros tiujn. Ĝi flugos al la ĉiellando, kie ĝi estos feliĉa kiel tiuj, kiuj estas proksime al Dio, kiu estas indulga! Ŝi estos fine feliĉa ĉar Dio liberigis ŝin, ĉar Dio ne estas kolerema, venĝema! Ĝi al ĉiuj montras sian vizaĝon kaj kvankam ĝia lando estas ege alte, tamen la ĝemeto de la pentanta animo atingis ĝin dum unu minuto.

Prenante la brulantan torĉon ŝi iris en la ĉambrojn kaj dume deŝiris la kurtenojn, tapiŝojn metante tiujn sur la kanapojn. En iu spegulo la damo vidis proksimiĝi iun blankan figuron. La figuro estis konata por la damo, kiu havis mallongan hararon, kiu similis al la gardanta anĝelo. La damo gapis tremetante la fenomenon kaj kredis, ke tiun sendis Dio kiel heroldon. Sed ŝi tamen ne konis tiun figuron, sed vidis tiun en la spegulo. Ŝi neniam vidis tiel malĝojan vizaĝon, la mallonga hararo pliigis la senvirineskon kaj ŝi similis al la konvertiĝantoj.

Ŝi tremetante surgenuis antaŭ la fenomeno, ŝia vizaĝo tuŝis la plankon, longtempe tie ploregis kaj levante sin kvazaŭ ŝi vidintus, ke la fenomeno etendas al ŝi la manon komplete ankaŭ ŝi levis la vizaĝon gloriĝinte.

Ho, ne! La vidita vizaĝo ne estis ŝia vizaĝo, ja ŝi neniam estis bela! Tiu vizaĝo estis fremda por ŝi, nur ŝia animo protestis kontraŭ la vidaĵo.

Azraële mansignis al la fenomeno, ke ŝi postiros tiun kaj antaŭpreparis la katafalkon por si. Sur la kanapo estis la kusenoj, vestaĵoj de Hindujo, la divano plenata de plumoj de cignoj, tabletoj, harpo. En la baseno estis bonodora oleo, per kiu ŝi akvumis la vestaĵojn.

Poste ŝi premis sian koron kaj flustris: „Mia Dio! Estu kun mi!”

Kaj ŝi ekbruligis la kunĵetitajn aĵojn kaj kvazaŭ ŝi paŝus sur iun fianĉinan liton ekkuŝis mezen de la vestaĵoj kaj silente feliĉe ridetis. Post kelkaj momentoj la vestaĵoj ekflamiĝis kaj ŝi ankaŭ tiam ridetis, kiam ankaŭ ŝi mem ekbrulis. Ankaŭ super la ŝtiparo la fumo leviĝis kaj ankaŭ post la malapero de la fumo la fraŭlino kuŝis ridetante, feliĉe. La kordoj de la harpo disŝiriĝis tremetante kvazaŭ ili kompatus la damon. Kiam la lasta kordo ŝiriĝis, tiam jam la odalisko estis mortinta.

Jam preskaŭ finiĝis la nokto kaj bejo Feriz silente rigardis al la insulo el fenestro de sia kiosko. Ja li promesis tion al la odalisko. Li ne komprenis la kaŭzon de tio, sed plenumis ŝian deziron.

Bone estis al li, ke li ŝin kisis, kio estis favora donaco por la kompatinda estaĵo, kion la peko malhonorigis kaj ŝian animon lia kiso liberigis, ja tiu kiso estis vera.

Subite, rigardante al la insulo super la rivero Danubo, sur la insulo li vidis iun brilan flamkolonon, kiu faris grandegan fumon. Kvazaŭ li vidus en la fumo iun brilegantan figuron.

Post unu momento la flamoj de la brulanta kiosko lumigis la tutan ĉirkaŭaĵon. Multege da homoj gapis tiun fajron, kies flamojn la vento blovis alten. Neniu pensis pri tio, ke ili helpu al la homoj por estingi. La homoj diris trankvile, ke neniu estas sur la insulo, ja la loĝantinoj de la haremo kaj la gardistoj jam estis liveritaj fore hieraŭ.

La vento helpis la fajron kaj la kiosko, kiu estis farita el ligno, iĝis matene jam nur cindro. Feriz rigardadis ĝis la flamo ruĝigis la ĉielon.

La bejo matene portigis sin sur la insulon akompanigante sin de iu oficiala persono. Loke de la fajro estis jam nur karbiĝintaĵoj kaj cindraĵoj. La krimul-kaŝejon

forviŝis la fajro, ĝialoke restis iu nigra makulo, kie dum la estonta printempo estiĝis verda gazono.

Sekvatage tagmeze iu konata kavaliro rajdis al la pordego de la fortikaĵo. Ŝajnas, ke tiu estas bejo Iffim. Li venis de Kolozsvár kaj ege cerbumadis, kiel li diru inde tiujn ofendojn, kiuj atingis lin kaj lian veziron, kiujn faris la nobeloj de Transilvanio, kiel lin oni persekutis per skurĝo ĝis la limo de la lando batante kaj lin kaj lian ĉevalon, konsilante al li, ke la batojn ili sendas al paŝao Hasan.

Alvenante al la palaco de Hasan Iffim nenion demandis, sed deĉevaliĝis, la kondukilon de sia ĉevalo donis al la konata eŭnuko por promenigi la ĉevalon.

La hieraŭa eŝafodo ne estis sur la korto de la fortikaĵo. Bejo Iffim paŝis en la palacon, finpromenis tra la ĉambroj, kies pordojn soldatoj de Hasan gardis. Atingante la akceptejon li ekvidis bejon Olaj sidanta sur kanapo kaj leganta la Koranon. Bejo Iffim ĉirkaŭrigardis en la ĉambrego, sed ne vidis la serĉatan personon, do li turnis sin al bejo Olaj.

– Mi volas paroli kun paŝao Hasan.

Bejo Olaj alrigardis bejon Iffim, poste ekstaris kaj iris al la tablo, sur kiu iu arĝenta pleto estis kovrita de kovrilo. Li forigis la kovrilon kaj Iffim vidis fortranĉitan sangan kapon, kiu havis rigidajn okulojn.

– Jen, tie estas tiu. Vi povas paroli kun tiu.

23. Variaj tempoj, variaj homoj

Malgrandaj landoj ne havas pli grandan danĝeron, ol se ili havas grandpotencajn homojn. Iu el inter ni naskiĝas per la sento de alvokiĝo por esti militestro kaj mortos kiel bandestro.

Se Miĥaelo Teleki estus membro de kabineto de iu granda lando, tiam li estus simila al Richelieu¹³³ kaj tiu lando estus fiera, por tiuj jaroj kiam li estis ties reganto. Sed estis lia malbena, ke Transilvanio malvasta estis por la flugo de lia spirito, kaj li estis la malbena ankaŭ al la eta Transilvanio, ĉar li estis pli granda ol necese. Li lerte povis sin kaŝi dum la danĝeraj tempoj sed ĉe la veno de la unua bonŝanca tempo la fortunon li ekprenis fortamane, faris lin kapabla dum longaj jaroj povi plensukcese remi politike inter du kontraŭdirektaj potencoj. Li povis alianci kaj kun la romia imperiestro kaj kun la sultano. Foje li montris al ambaŭ omaĝon, aliafoje li batalis kontraŭ ambaŭ. Unufoje li helpis la turkojn kontraŭ la romia imperiestro, aliafoje la sultanon kaj la nobelojn de Transilvanio li kapablis persvadi ĉesigante la pacon ligitan kun la imperiestro.

La batalo ĉe Szentgotthard estis nur dolora vundo por la Otomana gloro, sed tiu memoraĵo instigis la imperion sin venĝi. Kvankam la paco estis konsekrita por dek jaroj, tamen nun montriĝis bona ŝanco por venĝi kaj por ne akcepti la klarigon de la juristoj, kio ŝancelis la saĝecon de la sinjoroj de Transilvanio.

La romia imperiestro devis batali por la hispana trono kontraŭ reĝo Ludoviko la 14-a. La opoziciularo nun anoncis batalon, kiun oni devis ekirigi el Transilvanio, kies regnestro devis akiri la hungaran reĝlandon kiel donacon, kiun la antaŭuloj ne kapablis akiri.

Kvankam tiu ludo estis danĝera, ĉar unu lando estis elmetita al risko por unu lando. Tamen ambaŭ landoj estis riskitaj. Sed ankaŭ povas esti, ke ankaŭ tiuj ne estos danĝerigitaj. Kelkaj transilvaniaj partioj riskis la etan regnestran landon por la granda reĝlando. Kvankam Denizo Bánffy estis senkapigita, tamen Transilvanio havis nobelojn havantaj grandan prestiĝon, kiel Paŭlon Béldi¹³⁴ kaj la pli junan Nikolaon Bethlen.

Iutage oni kunvokis la Parlamenton en Fogaraș, kie la germanoj de la regnestro (infanterio) ĉirkaŭprenis la kvartirojn de Paŭlo Béldi kaj la pli juna Nikolao Bethlen, dirante, ke ili estas malliberuloj de la lando. Kio estis ilia kulpo? Kiu konis ilian kulpon? Almenaŭ oni ekkaptis ilin. La bona Miĥaelo Apafi kredis, ke ili volas esti regnestroj anstataŭ li. Tio estis ilia peko. Pro tio li urĝis ke kun la plena severo de la leĝo frapu, kondamnu la ekkaptintajn ĉefsinjorojn. Sed tiuj konsilentaraj sinjoroj gardis sin de tio. Pli facile estis ambaŭ sinjorojn mortigigi unue kaj poste kondamni.

Tiuempe la pia Ĉerei estis la ĉefkapitano de la fortikaĵo Fogaraș¹³⁵. La fortikaĵo estis posedaĵo de la regnestrino, kaj tie estis karcerigitaj la arestitaj sinjoroj. Kiam Anna Bornemissza, la regnestrino sciiĝis pri la aresto, ŝi vokigis la ĉefkapitanon Ĉerei kaj montris al li sian sigelringon dirinte:

¹³³ Pri Richelieu vi povas legi en la vikipedia artikolo:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Armand_Jean_du_Plessis_de_Richelieu

¹³⁴ Paŭlo Béldi estis hungara nobelo vivanta en Transilvanio. Pri li vi povas legi pli detale ĉe:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Pa%C5%ADlo_B%C3%A9ldi

¹³⁵ La fortikaĵo de Fogaraș estas trovebla en la nuna Rumanio, dum la hungara regado ĝi estis havaĵo plej parte de la hungaraj reĝoj – noto de la tradukisto.

– Rigardu la blazonon de ĉi tiu sigelringo kaj se la mortkondamnon vi ricevos kaj sur tiu vi ne vidas ĉi tiun blazonon, tiam ne kuraĝu fari ekzekuton, nome mi havas ĉi tiun fortikaĵon kaj ĉi tie mi ordonas kaj ne Apafi.

Kiam la geregnestroj reiris al Gyulafehérvár, sekvatage la viroj de la lando kolektiĝis partopreni privatkunvenon. Teleki tiel aranĝis la aferon, ke krom la regnestro nur tiuj partoprenu, kiuj havas la saman opinion. Estu tie Klemento Mikeŝ, la pli aĝa kaj la pli juna Bethlen, Nalácz, Ladislao Székely. Ili kaj la regnestro tutnokte amuzis kaj ridis ŝercojn de Gregorio Biró, la kortega pajaco. La pajaco faris eksterordinarajn aferojn: li englutis tranĉilon, forkon, eĉ homojn. Li ektimigis sinjoron Nalácz engluti, kiu petpetegis lin ne engluti.

Ankaŭ Apafi ne rimarkis, kiom da vino li drinkis, ĉar konstante oni plenigis lian glason. Lia vizaĝo iĝis ĉiam pli kaj pli ruĝa. Subite li ekvidis apud si iun malplenan seĝon kaj furioze ekkriis:

– Kiu fuĝis denove de ĉi tie? Ĉi tiu seĝo estas la seĝo de Denizo Bánffy. Kie li estas?

La sinjoroj mutiĝis, nur Teleki kapablis respondi:

– Denizo Bánffy mortis.

– Ĉu li mortis? – demandis Apafi – Kiel li mortis?

– Béldi faris ribelon kontraŭ tiu kaj li senkapigis tiun.

– Ĉu Béldi? – kriis furioze Apafi eksaltante. – Kie estas nun tiu homo?

– Nun en malliberejo, sed poste sur la trono de la regnestro.

– Sur la eŝafodon! – kriegis Apafi ekster si. – Li devas esti sur la eŝafodo, ne sur la trono de la regnestro! Mi pruvos, ke mi estas la regnestro, kaj kiu pekas kontraŭ mi, tiun laŭleĝe mi punos. Voku la juĝiston, ĉar ni devas kondamni tiun.

– La kondamnoj jam estas antaŭpreparitaj – diris Nalácz, kaj eltiris el sia poŝo tri skribaĵojn – nur vi devas subskribi tiujn.

Oni donis al la regnestro inkon kaj skribilon kaj tiu tremetante subskribis la kondamnojn.

– Ĉu ne estas ĉi tie fremdulo? – demandis Teleki suspekta.

– Nur la pajaco ĉeestas, sed ni ne timu tiun.

Nun la pajaco dancigis iun glavon sur la pinto de sia nazo. Sur la glavo estis iu plata telero kaj dume li kriadis al la sinjoroj atenti lin kaj ne la aliajn.

La tri leteroj enhavis tri ordonojn: unu estis adresita al Ĉerei, ordonante al li mortigi la malliberulojn. La alia estis adresita al Sigismundo Boer, la provoso ordonante al li, ke se Ĉerei protestas, tiam oni devas mortigi ankaŭ tiun. La tria letero estis adresita al la gardistaro de la fortikaĵo, ordonante, se la provoso ne volas fari la mortigojn, tiam ankaŭ la provoson oni devas mortigi. Tiujn leterojn oni sigelis per vakso kaj transdonis al Nalácz, kiu la leterojn metis en sian felĉapon, la felĉapon sur sian kapon kaj ekiris for. Sed li devis preteriri la pajacon. La pajaco saltis al Nalácz kaj kriis al li: „Ho, sur via kapo estas mia ĉapo, donu reen al mi, ĉe mi estas la via!” Kiam Nalácz konsciiĝis, tiam sur lia kapo estis iu ĉapo havanta tintilojn.

Nalácz ne komprenis la ŝercon, ege koleris, ekkaptis la gorĝon de la pajaco:

– Kie estas mia felĉapo, fripono? Diru, aŭ mi sufokos vin!

– Ne sufoku min, mia sinjoro – protestis la pajaco, ĉar tiuokaze vi estos la plej granda frenezulo ĉe la kortego de la regnestro.

– Donu reen mian felĉapon! – kriis Nalácz furioze. – Kien vi kaŝis tiun?

– Mi englutis tiun.

– Vi estas fripono! – Nalácz kriis kaj sufokadis la pajacon – vi provokas min.

- Mia sinjoro, mi ne estas kapabla redoni tiun, se vi premas mian gorĝon.
- Nu, mi serĉos tiun ĉe vi – diris Naláczí kaj movis la vestaĵon de la pajaco.
- Efike de tio la felĉapo defalis de sub la vestaĵo de la pajaco.
- Vi estas mallerta iluziisto – ridis Naláczí.

Poste Naláczí metis la felĉapon surkapen kune kun la tri sigelitaj leteroj. Sed nun li gardis tiujn pli bone, ol pli frue.

Samnokte li galopis al Fogaraș, vokigis la ĉefkapitanon Ĉerei kaj transdonis al tiu la al li adresitan leteron, dirante:

- Tiun severan ordonon tuj plenumu!
- La ĉefkapitano transprenis la leteron, rompis la sigelon kaj vidinte tiun nur gapis:
- Ĉu mi estas freneza, aŭ vi, sed en ĉi tiu letero eĉ ne unu litero estas.

Naláczí ege miris pri tio. Li rompis ankaŭ la aliajn leterojn kaj ankaŭ en tiuj ne vidis literojn. La „mallerta” pajaco dum sia sufokiĝo ŝanĝis la leterojn kaj senliterajn leterojn donis al Naláczí. Kaj la pajaco kunportis la mortkondamnojn samvespere al la regnestro, kiu eksciis ĉion, kio okazis ĉirkaŭ la regnestro.

La postan matenon la regnestro portis la tri ordonojn al la regnestro kaj riproĉis lin, ke siajn funkciulojn li volis mortigigi.

La pia regnestro ege surpriziĝis ekvidante la ordonojn, sur kiuj estis liaj subskriboj. Pri kiuj li jam tute forgesadis. Pro tio li dankeme brakumis sian edzinon, kiu ne lasis forsendi la ordonojn. Sinjoro Naláczí pro la fiasko ne kuraĝis aperi antaŭ la regnestro kaj riproĉis la pajacon.

Tiu kazo konsternis la regnestron kaj li decidis tiel, ke li la malliberulojn liberigos. Sed unue la malliberuloj devis subskribi interkonsenton, laŭ kiu ili devigis sin, ke ili ne venĝos al la akuzitoj.

Paŭlo Béldi estis ofendita, sed li sentis, ke li meritis la punon, ja kiel unu li subskribis la akuzon de perfido de patrujo kontraŭ Denizo Bánffy.

Kiam Béldi kaj Nikolao Bethlen estis en la karcero, tiam la batalon volanta partio libere funkciis kaj kiam ili liberiĝis, tiam ili konsterniĝante informiĝis, ke nun jam nur estas bezonata la konsento de la divano por malkonstrui la pacon. Nome se la paco ĉesas, tiam perdiĝos.

Béldi sciis, ke li devas agi por paca intereso, ĉar alie la lando pereos. Li tuj kunvokis tiujn, kiuj havis samajn opiniojn, inter tiuj estis Georgo Kapi, Ladislao Csáky¹³⁶ kaj Johano Haller. Ili interkonsiladis pri la estonteco de la lando.

Béldi volis atingi, ke oni devigu la regnestron forigi la nunajn konsilantojn rigardantaj propran intereson kaj ne tion de Transilvanio, inter ili sinjorojn Teleki, Naláczí, Székely,¹³⁷ kaj fondi novan pliu taŭgan landan konsilantaron. Kapi volis atingi ankaŭ ion alian.

– Ni devas interbatali per glavoj kaj ne petpetegi kaj kiu venkos, tiu estu la regnestro.

– Dio punu min – diris Béldi – se mi sopirus esti la regnestro. Mi volas esti fidela al la regnestro, kion mi promesis al li. Mi proponas, ke dum la kunsido de la Parlamento de Nagysink¹³⁸ ni aperu kun armiloj kune kun la sikuloj kaj kiam ni montros nian

¹³⁶ La nomon Csáky bonvolu prononci ĉaki.

¹³⁷ La nomon Székely, bonvolu prononci sekelj.

¹³⁸ La rumanian setlejnomo Nagysink, bonvolu prononci nadjŝink. Ĝia nomo-mencio devenas el 1328 – noto de la tradukisto.

forton, tiam la regnestro ne dubados, protesti por disiĝi de siaj konsilantoj, ja li timas tiujn, sed ne ŝatas ilin.

Escepte de Kapi la ĉeestantaj sinjoroj akceptis la proponon de Béldi.

– Tiukaze mi forlasas vin – diris Kapi tremetante – nome mi ne timas la batalon, mi batalas kontraŭ la malamiko, sed mi ne ŝatas la armilajn petpetegojn, ĉar oni tuj elprenos la glavon el mia mano kaj per tiu fortranĉos mian kolon.

Poste Kapi foriris. La aliaj sinjoroj armilojn donis al siaj fideluloj. Laŭ ordono de Béldi la armitaj sikuloj atendis antaŭpreparate en Háromszék, Csik kaj Udvarhelyszék¹³⁹ por iri batali.

La famo de la aŭdaca ribelo trovis sinjoron Teleki en Gernyeszeg. Li estis ekster si pro la ĝojo. Ja li sciis bone, ke Béldi ne kapablos veni en civila milito kaj pro la ribelo li mortos. Li tuj rapidis al la regnestro por sciigi, ke Béldi faris ribelon kontraŭ la regnestro. Apafi terurigis pro tio kaj ekiris per kaleŝo al Fogaraŝ. Gregorio Bethlen, Farkaŝ Bethlen kaj la aliaj konsilantoj terurigis, nur Teleki ne. Li konis bone sinjoron Béldi kaj ne timis lin.

Se sinjoron Béldi estrus nur la fajrero de la venĝemo, la troambicio, dum kelkaj tagoj li povus mastri la situacion en Transilvanio kaj neniue estus kapabla kontraŭstari al la sikuloj, nome la armeoj estis senditaj en la limfortikaĵojn.

Béldi pensis sufiĉa nur montri sian armilon, pri sia respekto li sendis estimplanan leteron al la regnestro informinte lin, ke li ne kontraŭ la regnestro batalas, sed postulas nome de la lando, ke la konsilantoj estu starigotaj antaŭ tribunalon.

Ĝis ĉi tiu mildavoĉa letero foriris kaj reeniris la respondo, Teleki havis tempon kunvoki tiujn sikulojn, kiujn, Béldi ne povis persvadi. Teleki argumentis per tio, ke por defendo de la regnestro, ili devas kolektiĝi apud sinjoro Klemento Mikeŝ. Kvankam Béldi evitis la lin ataki volintajn regnestrajn armeojn, Teleki mem atakis lin.

Iutage kiam Csáky tempopasigis en la fortikaĵo de Bodola oni portis la mesaĝon, ke Gregorio Bethlen kune kun la armeoj de la regnestro jam estas ĉe Braŝŝo.

- Jam ni ne povas eviti la batalon – suspiris Csáky.
- Sed ni povas eviti tion – diris Béldi – se ni kapitulacos.
- Ĉu via ekscelenco volas kapitulaci? – demandis Csáky ektimante.
- Mi ne batalas en batalo de la partioj.
- Sed tiukaze ni pereos.
- Prefere nur ni pereu, ol mil homoj pereu por ni.

Ankoraŭ samtage li ordonis al sia armeo iri hejmen. Sekvatage Gregorio Bethlen sendis Miĥaelon Vay al Bodola, kiu portis leteron pri senkulpiĝo deklarita de la regnestro por li. Csáky fartis malbone, ja li memoris, ke li senkapigis sinjoron Bánffy, kontraŭ tio, ke li same ricevis senpuniĝon. Li tremetante demandis sinjoron Vay:

- Ĉu ni povas esti trankvilaj ricevintaj la deklaron pri la senpuniĝo?

Vay havis tiom da sincereco por respondi jene:

– Pli bone estos por vi kuraĝe foriri el Transilvanio, ol havi simple la leteron pri la senpuniĝo.

Csáky tute ne pensadis plu, sed kolektis siajn pakaĵojn kaj samtage forveturis tra la intermonto de Bozza. Vay sciigis al siaj edzino kaj infanoj, ke ĉar estas danĝero, prefere li rifuĝos ol petpetegante sin savos. Béldi volis resti, ĉar la honto ne lasis lin kuri.

¹³⁹ Háromszék, Csik kaj Udvarhelyszék estas loknomoj (bv. prononci la nomojn: háromsek, ĉik kaj udvarhejsék), ili trovas en Sikullando, en parto de Rumanio – noto de la tradukisto.

– Nu, kaj vi? Kion vi volas fari? – demandis Béldi rigardante siajn familianojn.

Li havis du filojn kaj filinon Aranka, kiu iĝis bela fraŭlino. Ŝi estis plie amata de sia patro, ol la pupilo de sia okulo.

– Vi kapablos defendi pli bone nin en Istambulo, ol ĉi tie – respondis sinjorino Béldi.

Sinjoro Béldi sciis, ke lia edzino diras la veron. Li serĉis la eblecon de la rifuĝo ĉe la turkoj, kie li povas helpi ne nur sian familion, sed povas esti, ke li povos helpi ankaŭ sian patrujon. Ja en Istambulo li havas bonajn konatojn inter la veziroj.

Li tuj alportigis sian ĉevalon, selumigis tiun kaj tra la intermonto de Bozza samnokte li rifuĝis antaŭ ol li plenespere adiaŭis sian familion. En Valaĥio li renkontiĝis kun siaj kelkaj forkurantaj kunuloj kaj kune kun ili rifuĝis al la plej supera tribunalo de Transilvanio, al la divano.

24. La dívano

La pordegoj de la serajlo malfermiĝis, la senharmonia, stentora muziko ĉesis efike de unu tondra tamburbato. La dek du turkaj rajdantaj gardistoj nur malfacile povis certigi liberan pluiradon por la veziraro inter la popolamaso. Tiuj, per lignomadzoj kaj skurĝoj faritaj per led de rinocero, batis la gapantojn por certigi la liberan vojon. La doloron ne sentante la gapantaj homoj spite al la bategoj tamen ne iris flanken.

Membroj de la divano en la kortego deĉevaliĝis, supreniris sur la ŝtupoj inter la du kordonoj de la gardantaj janiĉaroj starantaj kun elingitaj sabroj. Antaŭ la veziroj oni distiris la bluajn kaj flavajn kurtenojn de la konferencejo antaŭ ol enpaŝi ĝin. La membroj de la dívano enpaŝis en la internon de la konferencejo montranta senlimajn lumon kaj potencon. Tiu ejo estis vera mistero.

Tiu ĉambrego estis okangula, en kiu ne estis pentraĵoj, ja la Korano malpermesis ornami la murojn tiel. La marmorplankon kovris orientaj tapiŝoj. Sur la muroj ĝis homolonga alteco estis videbla perlamotmozaiko. Apud la muroj staris malaltaj sofoj kovritaj per ruĝa veluro. La sofoj ne havis dorsapogilojn. En la malantaŭo troviĝis niĉo kaj kaŝpordo, malantaŭ kiu Amurat¹⁴⁰ kutimis subaŭskulti la interkonsiladon de la dívano.

La membroj de la divano laŭrange paŝis en la ĉambregon. Antaŭe iris la grandveziro, kiu estis alta sekstatura homo, kies kolo estas kurbiĝinta, la kapo konstante moviĝis tien kaj reen kvazaŭ li ĉiam kaŝrigardus ion. Lia vizaĝo estis bruna, montrante eternan malkontentecon, primokon, koleron, galmalsanon. Siajn nigrajn dentojn li kunpremis dum parolo. Li kuntiris la brovojn. Poste li malfermis la okulojn, sian frunton sulkis, liaj lipoj konvulsiis, la mentono tremetis. La barbo estis hirta kaj li nur tiam ridis, se la aliaj, al kiuj li parolis, tremetis. Lia vestaĵaro estis hirta kaj tiel aspektis kvazaŭ ĝi estus malpura.

La grandveziron sekvis Küprili, kiu estis dika, ruĝvizaĝa paŝao, havanta grandegan barbon. Lia glavo estis larĝega pendants sur lia flanko. Li estis forta. Lia voĉo similis al murmurado de taŭro. Se li parolis mallaŭte, tiam malfacile aŭdeblis lia voĉo. Dum bataloj li kapablis kriegi, kio estis pli laŭta, ol la bruoj de la kanono.

El inter la membroj de la dívano ankoraŭ tri viroj estas atentindaj.

Unu estis paŝao Kuĉuk, kiu estis muskola, batalema viro, kies vizaĝo estis sunumita havante vundojn kaj cikatrojn. Liaj okuloj similis al la aglaj kaj kvankam li estis ege maljuna, tamen lia sinteno estis kuraĝa. Li portis la glavon en sia maldekstra mano, aŭdace staris, iris, rigardis. Li malmulte parolis kaj rapide agis.

Alia viro estis bejo Feriz apud Kuĉuk, kiu estis filo de Kuĉuk. Li helpis la sukcesojn de bataloj de sia patro. Li estis alta kavaliro, portis orientan vestaĵaron, kaftanon, blankan turbanon, sur tiu ardeoplumon. Li estis eleganta junulo, kies okuloj estis entuziasmaj kaj sur lia vizaĝo videblis la juneca vivo. Li ofte revadis kaj se oni parolis al li, tiam li ektimis kvazaŭ li estus sur malpermesata loko.

Kiel lasta venis la kristana doktoro de la sultano, la interpretisto de la kortego, kies nomo estis Aleksandro Maurocordato. Li estis alta, muskola viro portanta longan talaron, longan nigran barbon. Lia vizaĝo montris grekajn trajtojn, lia hararo estis densa, surkape la dislimo estis meze de la kapo.

La veziroj sidiĝis, la loko de la sultano restis malplena. Apud la malplena loko sidis la grandveziro kaj sur la alia flanko sidiĝis la paŝaoj, agaoj kaj bejoj.

¹⁴⁰ Amurat estis nomo de turka sultano – jen la noto de la tradukisto.

– Mia ekscelenca sinjoro – alparolis Maurocordato irante antaŭ la veziron – la malfeliĉaj hungaraj sinjoroj de mateno atendadas ĉe la sojlo.

La veziro kolere rigardis la interpretiston.

– Nur ili atendadu! Prefere ili atendu nin, ol ni atendu ilin!

Poste la veziro mansignis al la ĉefkorpgardisto por konduki la peticianojn. Dek du rifuĝintojn li kondukis en la ĉambregon, kie oni flankentiris la tapiŝojn de la flankpordo. Antaŭe venis Paŭlo Béldi kuraĝe, trankvile, sed la aliaj hezitante, maltrankvile sekvis lin.

La vizaĝo de Béldi ankaŭ nun estis vireca kaj bela, sed videblis, ke li maljuniĝis. Liajn trajtojn karakterizis konscia trankvilo, estanta honesta kaj decidita. Li ne estis sensaciema, liaj lipoj estis parolemaj, spite de tio, ke tiuj estis fermitaj. Li rigardis la ĉeestantojn dolore, kiuj sentis simpatian direkte al li.

Nur la veziro rigardas lin kolere, malkontente, sed tio estis lia kutimo, ĉar nur ĉi tie estis kapabla rigardi.

– Parolu! Kion vi volas diri? Diru la mesaĝon aŭ viajn proprajn dirindaĵojn! Ne timu min! – diris la veziro al la rifuĝintoj.

Béldi alpaŝis la veziron, klinis sin antaŭ tiu. Maurocordato malhelpis, ke la aliaj iru antaŭ la veziron. Kaj la interpretisto mansignis al Béldi alparoli.

– Miaj ekscelencaj sinjoroj! – Béldi komencis paroli – Vi konas niajn sortojn. Ni venis kiel almozuloj el nia patrujo, sed ne kiel almozulo petpetegas vin, sed kiel patriotoj. Oni forpelis nin el nia patrujo, sed ni ne estis pekantoj kaj ribelantoj, ni nur volis savi nian patrujon. La regnestro kuregas senkape al la pereigo kaj faras malbonon al la patrujo. Lia ĉefkonsilanto volas, ke li estu la hungara reĝo. Tiam la ĉefkonsilanto estus la hungara palatino. Ja vi, sinjoroj scias, kio okazos post Transilvanio post tiuj bataloj. Ni voĉdonis kontraŭ tiu batalo, ĉar ni sciis, ke ni povas nur malvenki. El inter tiuj, kiuj kontraŭis la batalon, ni estas la lastaj, ĉar la aliaj estas en malliberejo, aŭ malinde mortis. Miaj moŝtaj sinjoroj! Ni, maljunuloj estis feliĉaj, sed nun niaj edzinoj, infanoj estas en karcero, niaj fortikaĵoj estas ruinigitaj, niaj blazonoj estas rompitaĵoj. Sed ni ne petas vin redoni la havaĵon, kiun ni perdis, kaj ne petas, ke ni brakumu niajn edzinojn, infanojn. Ni estas kapablaj vivi kiel almozuloj, forlasante ĉion. Nur ni petegas vin savi nian patrujon.

Paŝao Kuĉuk bone komprenis hungare kaj efike de la vortoj kolere batis sur sian glavon. Bejo Feriz nevolante larmiĝis.

– Miaj moŝtaj sinjoroj! – daŭrigis Béldi trankvile – ni ne volas venĝi la regnestron pro la neniigita vivo, pro la faligita sango. Ni sole funebras pro la viktimoj, sed ni petas vin sendi pli taŭgajn konsilantojn, ol estas la nunaj kaj por promesigi tiujn batali por la nacio kaj devigi tiujn helpi la restantajn patriotojn.

– Kiam Béldi finis la parolon, tiam Maurocordato sidiĝis inter la veziron kaj sinjoron Béldi kaj komencis interpreti la vortojn de Béldi.

Post la unuaj vortoj la interpretisto iĝis ekscitita kaj entuziasme interpretis. Pli malfrue kiam Béldi trankvile parolis pri la estonteco, tiam la interpretisto tremetante interpretis. Kiam Béldi rezignis pri ĉio, kaj petpetegis por Transilvanio, tiam la interpretisto pasie interpretis kvazaŭ lia parolo estus la originala parolo kaj ne kopio. Li similis al Demosteno¹⁴¹.

La paŝaoj entuziasme aŭskultis la vortojn de la interpretisto kaj jesis al tiuj vortoj. La grandveziro kuntiris la brovojn kaj la lipojn kurbigis komencante paroli malestime.

¹⁴¹ Demosteno estis la plej fama helena oratoro. Pri li abunde vi povos legi ĉe:
<https://eo.wikipedia.org/wiki/Demosteno>

Al ĉiuj li parolis furioze, moke. Kiu aŭdis lin paroli, tiu ege ektimis. Memkompreneble la turkan lingvon ne komprenantaj hungaroj kredis, ke la veziro riproĉas ilin forte.

Sinjoro Ladislao Csáky, kiu staris apud Béldi, skuis la bekeĉon de Béldi kaj tremetante flustris al tiu:

– Kial vi ne parolis sufiĉe humile? Nun ili certe palisumos nin.

La veziro laŭkutime lace ridetante finis la parolon montrante siajn nigrajn pintajn dentojn. Efike de tio la sango de la hungaroj frostiĝis en siaj angioj.

Poste subite Maurocordato alparolis milde ridetante interpretante la vortojn de la veziro:

– Honestaj hungaroj! Fidu je ni! Viaj vortoj trovis kompaton. Ni scias, ke vi pravas. Viaj malbonoj estos sanigotaj. Vi faris bone, ke vi petis la helpon de la sultano kaj ankaŭ pli malfrue petu ties helpon kaj estos neniuj malbono. Nun iru pace kaj se estos bezonate, ni vokigos vin.

Ĉiuj plifaciliĝis kaj Béldi diris kelkajn vortojn dankante pro la bonvolo de la veziro. Sed Ladislao Csáky, kiun pli interesis lia bieno de Sóvár, ol la sorto de Transilvanio, ne estis kontenta pri la propono de Béldi, en kiu li petas la savon de la patrujo, kaj ege atendis por alparoli. Kaj li tuj kuregis al la piedoj de la veziro, brakumis tiujn kaj komencis plori. Pro la ploro ne eblis aŭdi liajn vortojn kaj cetere la vortoj de Csáky malfacile estis kompreneblaj. Efike de tio la veziro kriis, riproĉadis. Finfine la hungaraj sinjoroj kuniris sinjoron Csáky. Maurocordato kolere kondukis la hungarojn el la konferencejo, ĉesigante la ĉagrenan scenon.

– Vi ne devintus plori surgenuante antaŭ la vezo – diris Béldi – ja vi similis al iu infano.

La foriranta Béldi ĉe la pordo ricevis dankeman manpremon. Li rekonis bejon Feriz, la junan ĉampionon.

– Ĉu vi diris, ke via edzino estas kaptita?

– Ankaŭ miaj infanoj.

Feriz iĝis ekscitita.

– Ili liberiĝos. – Promesis la junulo ekscitite premante la manon de Béldi – Atendu min en via kvartiro.

La hungaraj rifuĝantoj foriris, ĉiuj esperadis pro la kuraĝigo de la veziro. Nur sinjoro Csáky ne estis kontenta pri la rezulto. Kiam li hejmeniris al la kvartiro, tiam li skribis du leterojn: unu al la generalo de la romia imperiestro kaj la alian al parolportantoj de la franca reĝo Ludoviko la 14-a. Li promesis al ambaŭ ĉion, se tiu lin helpos. Li pensis, se la sultano ne helpas, tiam helpos la francoj, aŭ la romianoj. Tio estas la plej bona, se la homo havas kelkajn helpantojn.

Kiam la rifuĝantoj foriris el la konferencejo de la dīvano, tiam iu agao anoncis: „alvenis iuj hungaraj sinjoroj.”

– Kiaj hungaraj sinjoroj? – demandis la grandveziro furioze la agaon.

– Kiujn la regnestro sendis.

– Ili venis en la ĝusta tempo – diris la grandveziro kaj antaŭpreparis sian plej koleran vizaĝon.

Oni distiris la kurtenojn kaj enpaŝis en la konferencejon la delegitaro de la regnestro. Ili havis kortegajn velurajn vestaĵojn kaj afablajn vizaĝojn. La prezidanto de la delegitaro estis Farkaŝ Bethlen, kiu ekhaltis sur tiu loko, kie staris Béldi antaŭ unu horo. Tiu portis velurmantelon, sur tiu cignopelton kaj havis glavon ornamitan per turkisoj. Ties kompleto estis pompa kaj la vizaĝo estis humila, trankvila kaj decidita.

– Kion vi volas? Diru rapide! – kriegis al ili la grandveziro montrante furiozon.

Farkaŝ Bethlen klinis sin kaj komencis oratori respondante ĉion, sed la demandon de la grandveziro ne.

– Miaj favorkoraj, majestaj, gloraj kaj bravaj sinjoroj, digna grandveziro, nevenkeblaj paŝaoj, bejoj, agaoj, helpantoj de nia lando, regnestroj de tri kontinentoj kaj miaj bonfarantoj!

Ĉi tio estis la alparolo.

Küprili furioze ŝvitis, Kuĉuk batadis la glavon al sia genuo kaj Feriz atentis tra la fenestro la fontanon de la serajlo.

– Diru rapide la mesaĝon, miaj sinjoroj – interkriis malpacience Maurocordato.

Farkaŝ Bethlen kredis, ke la interpretisto ofendiĝis, ĉar li ne diris lian nomon pro kio li kompletigis la alparolon:

– Saĝa interpretisto, la estimata kortega doktoro de la sultano!

Küprili oscedis kaj membrostreĉis. Pro tio lia rimeno disŝiriĝis ĉe lia talio.

Sed Farkaŝ Bethlen ne atentis la enuantojn, sed daŭrigis:

– Mia pia regnestro malĝoje informiĝis, ke la ribelantoj havis kuraĝon peticii al la dĭvano post la malsukcesaj planoj por malbonigi la situacion de la regnestro kaj la lando. Sed mi scias, ke Apafi estas konvinkita, ke vortojn de la ribelantoj la dĭvano refutos. Pro tio por prui sendis nin la regnestro, ke la kalumnioj estas malsinceraj.

Kiam la oratoro faris iom da paŭzo, tiam Maurocordato komencis interpreti la diraĵojn al la grandveziro. Nome li sciis, ke la veziro post sia parolo neniun lasas paroli.

Sed nun la interpretisto interpretis la vortojn de Farkaŝ Bethlen ne same entuziasme kiel la oratoradon de Béldi.

La grandveziro kolere respondis, gestadante montris al la pordo, kio signifis, ke la delegitoj foriru. Maurocordato interpretis al la delegitoj la respondon de la grandveziro:

– La grandveziro diris, ke vi estas la ribelantoj, ĉar vi ne plenumis la ordonojn de la dĭvano kaj ne tiuj estas la ribelantoj, kiujn vi forpelis. Laŭ viaj gloravidaj planoj vi volas disiĝi de la dĭvano kaj volas okupi Hungarujon. Ĉi tiel vi perdas la helpon de la dĭvano kaj perdas Hungarujon. La grandveziro diris, ke se vi ne klopodas fari pacon kun viaj samlandanoj, tiam li sendos tiun „helpanton”, ke vi eterne memoros tiun.

La hungaraj sinjoroj ektimis, sed Farkaŝ Bethlen ankaŭ nun estis afabla kaj ne estis ĉagrena. Li sciis, ke li parolis malbone kaj nun parolis pli draste, ol pli frue.

– Ho, mia sinjoro! Ni ĉiam fidele plenumis viajn dezirojn. Mi donis al vi imposton, donacojn modeste. Ankaŭ nun la regnestro ne sendis nin sen donaco. Nia regnestro ordonis al Miĥaelo Teleki doni ĉi tiun centmil talerojn kiel signon de liaj estimo kaj respekto. Li petis, ke vi akceptu ĉi tiun modestan donacon.

Fine li mansignis al la aliaj delegitoj porti la donacon. Poste tiuj portis grandan ferkeston, kiun Farkaŝ Bethlen malfermigis kaj ĝian enhavon elŝutis antaŭ la piedojn de la grandveziro. Centmil taleroj kuŝis antaŭ la dĭvano. Efike de tio la grandveziro alie kondutis. Maurocordato ekstaris flanken. Nome tiun vorton li ne devis interpreti. La grandveziro ridetis kaj sur lia vizaĝo estis videbla la hiena avareco. Li ridetante rigardis la talerojn kiel rabobesto kaŝrigardas la predon. Farkaŝ Bethlen humile retiriĝis inter siajn kunulojn. La grandveziro ekstaris, kaj frotante siajn manojn, batadis la ŝultrojn de la oratoro, rigardis ridetante la delegitojn, etendis siajn manojn por kisi, kaj kelkaj delegitoj klopodis kisi liajn manojn. La veziro turklingve diris al il ion, sed ili nekompreneblaj liajn vortojn, senĉese klinadis sin kaj komplimentis al la veziro.

Maurocordato kaŝiris dum tiu sceno. Sen interpretisto la delegitoj kaj la grandveziro ne komprenis, nur aŭdis unu la alian, pro tio la veziro donis al ili elegantajn kaftanojn kaj kuraĝigis ilin reiri en sian patrujon. Fine Küprili, kiu ellernis la hungaran lingvon kiam li estis paŝao de Eger, kriegis fortege al la delegitoj:

– La grandveziro diris: „nekredantaj hundoj, vi povas iri en la inferon”. Se estos bezonate, tiam li vokigos vin.

Poste Küprili kolere per piedbato forigis unu taleron alruliĝinta sian pantoflon kaj la delegitoj post aro da salutoj forlasis la konferencejon.

Kiam la delegitaro de la regnestro foriris, la grandveziro tuj vokigis sinjoron Béldi kaj liajn kunulojn. Kiam Béldi kaj la kunuloj enpaŝis en la konferencejon, tiam ili ne sciis, ke pli frue tie vizitis la delegitoj de la regnestro. Ili ne povis eltrovi, ili ne sciis klarigi, kio estas la celo de la grandveziro pri tiuj multaj taleroj. Maurocordato estis videbla nenie kaj la hungaroj nur provis diveni la sencon de la vortoj de la grandveziro. La grandveziro klarigis gestante kaj montradante al la taleroj kun abomeno kaj ridetis:

– Tiujn talerojn la grandveziro volas doni al ni – diris mallaŭte Csáky.

Pro tio Béldi ridetis konante pri la naiveco de Csáky. La interpretisto nenie troveblis pro kio Küprili devis interpreti la vortojn de la grandveziro:

– Honestaj sinjoroj! La grandveziro sciigas al vi la akcepton de la delegitoj de via regnestro. Bone estintus, se ili mortintus. Tiuj portis ĉi tiujn talerojn, krome diris multe da malpravaĵojn. Laŭ la grandveziro vi pravas, sed se vi volas atingi, ke viaj pravoj plifortiĝu, tiam promesu doni al li pli multe da mono, ol ĉi tiuj taleroj, kiujn metitaj en sakojn li ĵetigos en la markolon Bosporo kaj vin helpos por reiri en vian patrujon kaj vi estos elituloj de la grandveziro.

Béldi iĝis malĝoja, amare suspiris dum li rerigardis siajn kunulojn.

– Mia sinjoro, vi scias – diris Béldi al Küprili – ke ni ne havas multe da mono ĉar ni estas malriĉaj kiel la muso de la templo. Ni ne mastrumis la monon de nia lando por riĉiĝi, pro kio ni ne kapablas aĉeti nian pravon kaj ĉi tiel ni ne kapablas liberigi nian patrujon. Ni heredis malmulte da havaĵo de niaj prauloj kaj la kolektitan forprenis la servistoj de la regnestro. Se vi ne helpos, ni petpetegos la fremdajn regnestrojn helpi nin. Estu salutata! Ni ne havas monon!

– Mi havas tion! – iu kriis apud Béldi.

Oni vidis paŝaon Kuĉuk paŝi al Béldi, kiu manpremis virece la manon de la malĝoja Béldi kaj diris:

– Kiom ajn da mono mi donos, marĉandadu pri la sumo kaj mi donos al vi la deziritan sumon.

Bejo Feriz kuregis al sia patro emociate kaj Béldi ne estis kapabla alparoli:

– Mi dankas pro tio miloble, sed ne povas akcepti tion, ĉar tiun ŝuldon ni ne kapablas repagi. Sed estu benata pro via bonvolo, sed vi ne povas helpi por tiu sumo.

Küprili interkriis malpacience:

– Estu saĝa, Paŭlo Béldi! Ne kolerigu min. Atentu miajn vortojn kaj akceptu mian konsilon. Kvankaŭ estus stultaĵo peti multe da mono de iu ekzilito, tamen por la regnestro tiu sumo estas treege malmulte da mono. Do, nur promesu tiun sumon kaj tiun vi povos repagi, se vi estos regnestro.

Béldi teruriĝis kaj tremetante diris al Küprili:

– Ĉu mi miskomprenis vin, aŭ mi malbone aŭdis la vortojn?

– Do, komprenu min bone. Se vi diris veron, laŭ kio la nuna regnestro de Transilvanio ne estas ĝusta por direkti la landon kaj vi ege amas vian patrujon kaj vi estus pli taŭga kiel regnestro, ol la nuna, tiam estu vi la regnestro. Mi mesaĝos al la limrandaj paŝaoj kaj ili iros al Transilvanio por kapti Miĥaelon Apafi kaj liajn konsilantojn kaj kunportos ili al Jedukula. Tiukaze vi kaj viaj kunuloj regos antaŭ tiuj. Nur, vi devas promesi al la grandveziro ducent sepdek talerojn kaj vi estos regnestro helpe de la grandveziro. Sed, se vi ne donos tiujn talerojn, tiam vi devas iri anstataŭ Apafi en la karceron de Jedikula.

Paŭlo Béldi dum la tuta parolo de Küprili estis ekscitita, multfoje volis interkrii, sed la hungaraj sinjoroj ne lasis fari tion. Kiam Küprili finis la parolon, tiam Béldi forta voĉe decidite respondis:

– Mi dankas pro via propono, sed tion mi ne akceptos. Mi promesis al la nuna regnestro esti fidela al tiu. Se tiu forgesis la promeson, kiun li donis al la nacio, eĉ tiam ni ne povas rompi nian promeson. Ni devas memori li pri tiu promeso. Ni venis al vi por peti juston kaj ne por venĝi la maljuston. Transilvanio ne volas havi novan regnestron, sed nur la malnovan liberecon. Se mi volintus batali kontraŭ la regnestro, tiam la tuta sikularo batalintus apud mi. Mi trankviligis ilin kaj volis fari pacon. Mi venis ne pro la venĝo, sed pro la verdikto. Mi ne por mia sorto petpetegas, sed por mia patrujo. Mi ne volas esti senpage regnestro por forpeli unu uzurpulon kaj ne kunportos kontraŭ mia patrujo uzurpulojn por forigi sinjoron Teleki. Mi ne neniigos Transilvanion por liberigi malmulte da homoj. Pro tio mi ne liberigos dek homojn por malliberigi centmil homojn. Mi ankaŭ tiam ne volas fari tion, se mi puniĝos maljuste kaj estus mi malbenita, se mi monon de mia patrujo forŝtelos kaj batalos kontraŭ mia nacio. Mi prefere entreprenos la malliberiĝon, aŭ la morton. Mi venis al vi por justo, sed eventuale lasi min mortigi!

Küprili konsterniĝis aŭdante la parolon de Béldi, ĉar li ne estus kredinta, kion Béldi diris. Nome la ekzilitaj sinjoroj ĉiam venis petpetegi por favoro de la dĭvano kaj nun Béldi refutis tion.

La grandvezirro vidis la surprizon de la sinjoroj kaj post ioma pensado komencis kompreni la respondon de Béldi: Tiu teruriĝis kaj paliĝis.

Ankaŭ la hungaraj sinjoroj teruriĝis efike de la respondo de Béldi. Finfine Ladislao Csáky ne kapablanta regi sin, kuregis al Béldi kaj petpetegis lin akcepti la proponon de la grandveziro. Li certe akceptintus tiun proponon.

– Neniam mi akceptos tion – diris Béldi frigide.

Ankaŭ la aliaj hungaraj sinjoroj petpetegis surgenuante al la piedoj de Béldi nevolante malbonon al ili kaj iliaj infanoj.

– Sinjoroj, ekstaru, ja mi ne estas Dio! – diris Béldi kaj forturnis sin de ili.

La grandveziro jam komprenis la aferon, eksaltis furioze forĵetante sian turbanon kaj kriegis al la korpgardistoj:

– Katenu ĉi tiun frenezan hundon! – ordonis la grandveziro montrinta al Béldi, kiu lasis sin kateni trankvile per la pezaj katenoj.

– Ĉu vi akceptas mian proponon, nekredanta hundo? – kriis la grandveziro al Béldi.

– Mi ne akceptas vian proponon – diris Béldi, kiam li estis jam katenita. – Dio min tiel helpu!

– Tiukaze mortaĉu en la prizono! – kriegis Kara Mustafa kaj mansignis al la provosoj forporti sinjoron Béldi.

Dume Béldi fiere turnis sin al la grandveziro kaj diris ekskuante siajn pezajn ĉenojn:

– Ankaŭ vi mortaĉos! –

Poste Béldi lasis sin konduki en la prizonon.

La grandveziro tuj revokigis la delegitojn de la regnestro laŭdante ilin donis al ili elegantajn kaftanojn kaj kuraĝigis ilin reiri en sian patrujon.

Ĉe la pordego de la serajlo ili renkontiĝis kun sinjoro Ladislao Csáky. Csáky vidis ilian rideton kaj sciis, ke la veziro donis al ili bonan respondon. Li sciis, ke estis superflue koalicii kun Béldi, sed estis bezonate submeti al la franca kaj germana delegitoj kaj bone estis amikiĝi kun sinjoro Farkaŝ Bethlen, kiu povas redonigi liajn havaĵojn.

Farkaŝ Bethlen promesis amnestion kaj oficon al sinjoro Csáky, se li disiĝas de Béldi kaj ankaŭ pridonacis lin. Tio estas bona, se li havas pli multe da apogantoj, protektantoj.

– Béldi ĉion malbonigis pri sia afero – diris paŝao Kuĉuk al sia filo – kaj mi tute ne volas helpi lin.

– Sed mi volas liberigi lin, aŭ ni ambaŭ mortos.

– Ni iru al Maurocordato kaj eblas ke tiu povas doni konsilon. Ili, Kuĉuk, Feriz kaj Maurocordato – interkonsiladis unu horon.

Poste bejo Feriz kaj liaj kvindek armitaj rajdistoj ekiris al Nagyvárád.

25. La turka morto

Ĉe la pordego de la paŝao de Nagyvárad inter la gapanta popolo iu maldika muzulmano sidis pigre sur la sojlo. Tiel ŝajnis kvazaŭ neniu kaj nenion li atentus. Sed de tempo al tempo li kaŝrigardadis kiel kato kaj kelkfoje ridetis.

Subite iu altstatura junulo rajdis el la fortikaĵo, antaŭ kiu la sodatoj klinis sin. Tiu estis la plej ŝatata kavaliro de la paŝao. Li estis bejo Feriz, kiu antaŭ nelonge alvenis el Istambulo.

La bejo, kvazaŭ nur hazarde ekvidus la sidantan muzulmanon, batis per sia lanco sur ties ŝultron kaj vokis lin al si.

– Ĉu vi ne rekonas jam min, Zülfikar?

Tiu klinis sin.

– Alaho estas favorkora. La animo de la profeto portis vin ĉi tien! – kaj tiu komencis perpiedi apud la ĉevalo de la bejo, ĉar la bejo mansignis postiri.

– Mi perdis multe da mono kaj ĉevaloj dum la ĵetkubado en Istambulo. – diris Feriz, la bejo al Zülfikar – nun pro tio mi venis, ke mi plenigu mian monujon. Kien vi kutimis iri por rabo, Zülfikar?

– La illah, il Alaho! Alaho estas favorkora, Mohamedo estas lia sankta profeto! – diris Zülfikar rigardante al la ĉielo.

– Lasu la pseŭdopiadon, Zülfikar! Vi, renegatoj insolente laŭdas la profeton, ĉe la naskitaj turkoj menciadas ĝin ne tre ofte. Diru al mi, kien vi kutimis iri por rabadi.

– Mi dankas al vi, mia sinjoro – respondis Zülfikar kvazaŭ li nenion sciis – mia edzino estas sana kaj ankaŭ mi estas sana.

– Zülfikar, mi estimas vin, ĉar se vi volas esti surda, vi povas esti tia kiam estas bezono, sed mi bone konas ĝian medikamenton, mi kapablas ĉesigi vian surdecon.

Zülfikar humiliĝis pro la montrita lanco, kiu direktiĝis al li kaj farinte al la bejo la fariseo similan vizaĝon diris:

– Kion vi demandis, mia sinjoro?

– Ne demandu duafoje!

– Kien oni kutimis iri por rabadi? Mi ĵuras je la barbo de la Profeto, ke mi nenien kutimis iri rabi.

– Mi tion scias, vi, kato, ke vi iras nenien, kie estas malbono, sed vi kaŝrigardas la predon kaj vi kondukas la spahiojn al la predo. La spahioj donas premion al vi por la laboro. Do, respondu rapide, kiun lokon vi vizitis nokte por prirabi, ĉar alie mi senkapigos vin.

– Sed mia sinjoro, ne perfidu min, se mi diros tion, ĉar la spahioj ligos min al la vosto de ĉevalo kaj la paŝao palisumigos min. Nome li ne permesas la rabadon, sed se tio okazis, tiam li preteratentas tion.

– Mi ne nur ne perfidos vin, sed ankaŭ mi volas iri rabi. Mi konas vere la manieron de la rabado kaj akiri la kaptajon. Ĝis la spahioj atakas iun setlejon mi iros pli malproksimen al la vilaĝfino, ĉar kiu havas iun trezoron, tiu rapidas eskapi ĉe la transa vilaĝfino kaj tiel ĉio estos la mia.

Post ĉi konigo la renegato kunsentis kun la bejo ĉar la rabadojn li simile faris.

– Mia bona sinjoro, la spahioj iros nokte al Élesd, kie loĝas riĉaj valaĥoj, kiuj neniam estis kontribuciitaj kaj havas multe da ormoneroj kaj arĝentoj. Mi petas vin, ke vi ne forgesu min kiam vi havos bonan predon.

– Ĉu tie ne trafos nin la soldatoj de Ladislao Székely?
– Ho, ne, mia sinjoro – diris Zülfikar palpebrumante – tiuj estas malproksime. Ne forgesu vian fidelan serviston.

Bejo Feriz ekspronis sian ĉevalon kaj forgalopis. Poste Zülfikar denove sidiĝis apud la pordegon, dormeme palpebrumis kaj ridetis.

Krepuske dudek kvar spahioj kaŝiris el la urbo kaj ekiris al Eleŝd. Bejo Feriz atentis ilin kaj kiam ili estis jam nevideblaj de la vojo, tiam li postiris ilin kun liaj albanaj rajdistoj.

Jam pasis la noktomezo, kiam Feriz kaj liaj soldatoj atingis tiun montoflankon, kiu kovris la setlejon Eleŝd. La spahioj jam delonge rabis tie, kion pruvis la ŝrikadoj, eĉ ankaŭ sonorigado anoncis la danĝeron, kaj fojnostakoj brulis. La lastaj lumigis la ĉirkaŭaĵon.

Nun ĉe la komenco de la intermonto, Feriz haltigis siajn albanajn rajdistojn, disdividis ilin je kvar grupoj, ordonis al ili esti silentaj kaj atendis trankvile la revenon de la spahioj.

Post kelkhoraj rabadoj ĉesis la malproksima bruego, sed aŭdeblis proksimiĝinta kverelado. En la valo eblis vidi la spahiojn pene portantaj la rabbitajn kaptaĵojn, kaj interkverelantaj pro la akirita predo.

Bejo Feriz lasis ilin proksimiĝi kaj kiam ili malsuspekteme daŭrigis la interkvereladon, tiam li klarionis kaj liaj albanaj rajdistoj ĉirkaŭprenis la spahiojn, kiuj pro la surprizo ne povis uzi la armilojn. Li atakis ilin de ĉiuj direktoj. La lukto estis mallonga. El inter la albanoj neniu mortfalis, sed elinter la spahioj neniu restis viva.

Feriz forviŝis sian glavon, lasis samloke la mortigitajn spahiojn kaj regalopis al Nagyvárad. Li denove renkontiĝis ĉe la pordego de la fortikaĵo kun Zülfikar. Li minacante per pugno kriis al tiu:

– Vi, hundo! Vi perfidis nin ĉe Ladislao Székely! La spahiojn oni mortigis!

Zülfikar iĝis flava, paliĝis pro ektimo. Kvankam li kutimis fari tion, se la spahioj promesis al li malmulte da premioj. Tiam por kelkaj ormoneroj la hungarojn li atentigis pri la alveno de la spahioj. Tiukaze kelkaj spahioj mortis, sed la aliaj sen kaptaĵo revenis. Pri la nokta aventuro li informis la kapitanon de Kolozsvár, sed la informo ne estis utila, ĉar la soldatoj festis la nomtagon de la regnestro.

Zülfikar ektimis aŭdante la morton de la dudek kvar spahioj. Li tuj fuĝis el la urbo tra la arbaroj irante al Kolozsvár.

Bejo Feriz teruriĝante paŝis antaŭ la paŝaon.

– Mia ekscelenca sinjoro! – diris li ŝajnigante koleron – jen ni havas nefidindajn alianculojn. Pasintnakte mi ekiris kun miaj rajdistoj kaj pluse dudek kvar spahioj por aĉeti ĉevalojn. La ĉevalojn mi aĉetis kaj konfidis tiujn al la spahioj poste mi rajdis antaŭen. Ĉe iu intermonto soldatoj de Ladislao Székely ĉirkaŭprenis la spahiojn kaj ĉiujn mortigis. Mi volis tiujn helpi, sed tiuj estis jam mortigitaj kaj la mortigantoj sur la de mi aĉetitaj ĉevaloj forfuĝis de mi. Tio estis nekredanteco! Kaj ili estas niaj aliancanoj. Tion mi ne toleras. Se vi ne donas al mi kompenson, tiam mi iros al Kolozsvár kaj elvokos sinjorojn Apafi kaj Székely kaj iliajn homojn por dueli.

Paŝao Ajas, kiu ege ŝatis bejon Feriz, komencis ridi kaj afable batadis la belan vizaĝon de la junulo kaj konsolante diris al la juna bejo:

– Ne faru tion, mia kara filo, ne batalu superflue kontraŭ nekredantoj. Mi solvos tiun problemon.

Poste Ajas vokigis al si iun agaon kaj ordonis al li:

– Surĉevaliĝu kaj rapide iru al Kolozsvár. Tie iru al la kapitano, Ladislao Székely kaj diru al tiu: „Paŝao Ajas deziras al vi bonan tagon, nekredanta homo, kaj tion mesaĝas: ĉar viaj servistoj mortigis pasintnokte dudek kvar homojn de bejo Feriz, pro tio sendu rapide al mi la mortigintojn. Se vi ne plenumos mian ordonon, tiam vi povos atendi la konsekvencojn. Krome anstataŭ la forŝtelitaj ĉevaloj sendu dudek kvar belegajn ĉevalojn kaj ne atendu, ke mi eniru por la ĉevaloj, ĉar tio estos malĝoja tago por vi.”

La agao bone komprenis la mesaĝon kaj foriris. Poste paŝao Ajas trankvile turnis sin al bejo Feriz:

– Ne havu problemon pro tio, ĉar post du tagoj la mortigintoj ĉi tie estos.

– Mi timas tion, – diris la bejo – ĉar la regnestro certe defendados ilin.

– Ĉu vi kredas, ke la regnestro kuraĝos kontraŭdiri al la dĭvano por kelkaj nekredantaj solduloj?

– Ho, mi kuraĝus veti kun vi je cent ormoneroj, ke sinjoro Székely mesaĝos, ke liaj soldatoj pasintnokte estis en la fortikaĵo.

– Mi bedaŭras viajn cent ormonerojn, sed mi akceptas vian veton. Sed se mi malvenkos, tiam mi fendos cent striojn el la haŭto de Ladislao Székely.

La ektimanta Zŭlfikar anhelante kuregis en la kortegon de Ladislao Székely. Kiam li lace serĉante la kapitanon fine ekvidis, tiu estis portinta mantelon kun peltokolumo kaj ĝuste tiam purigadis siajn juvelaĵojn (rubenojn kaj smeraldojn).

La fortikaĵkapitano kolektis juvelaĵojn, kio estis jam ne nur lia ŝatokupo sed lia pasio. Li havis la plej belan kolekton en la tuta Transilvanio, pro kio lin oni povis korupti iam ajn per iu malofta juvelo.

Ankaŭ nun kiam la renegato lace atingis lin per leporpiedo li purigis iun kolrington por briliĝi. Sinjoro Székely kredis, ke Zŭlfikar venis por transpreni la premion de la perfido pro kio li flegme turnis sin al tiu por antaŭi la peton:

– Ne estis utila la informo, Zŭlfikar, ja la regnestro festis sian nomtagon kaj la soldatoj ne povis eliri el la fortikaĵo.

– Vi povas diri kion ajn – diris Zŭlfikar anhelante – ĉe Eleŝd viaj homoj mortigis dudek kvar spahiojn. Kial vi mortigis ilin? Ili devintus nur depreni la predon.

Sinjoro Székely faligis la kolrington kaj surprizate gapis la renegaton.

– Ne estu freneza, mia filo, Zŭlfikar. Neniu foriris el la fortikaĵo hieraŭ kaj hodiaŭ.

– Vi ege bone afektas la senkulpan vizaĝon – diris kolere la renegato.

– Vi bone ellernis kion vi devos diri, montri vin senkulpa kiel nur nun naskiĝinta safido!

– Mi ĵuras al vi, ke mi nenion komprenas.

– Tio estas bona! Sed vi estu kapabla mensogi al la delegito de paŝao Ajas, kiu tuj venos ĉi tien, kaj tiun frenezigu, sed ne min.

Sinjoro Székely nun jam sciis, ke tiu nun diris la veron, kaj kion la renegato diris, tio estas ne nur ŝerco. Tamen li kolere kriegis al la renegato.

– Foriru de ĉi tie, Zŭlfikar, por ŝerci, ĉar mi ĵetos al vi ĉi tiun leporpiedon kaj vi kredos, ke la ĉielo estas kontrabaso.

– Tio estis bona respondo, sed ankaŭ Zŭlfikar bone respondis.

– Ne ĵetu al mi vian leporpiedon, ĉar mian glavon eltirante mi metos vian kapon en vian mankavon.

– Ej, vi estas bestio! – kriis sinjoro Székely kaj disrigardis serĉante bastonon por levi ĝin kontraŭ lia vizitanto. Li ekvidinte iun arĝentbutonan nodbastonon, tiun

enmanigite minacis la renegaton. – Malaperu, fihomo! Nur vi ne forkuru dum mi atingos vin!

Sed Zülfikar subite ekvidis elrigardante tra la fenestro la agaon galopegantan en la fortikaĵkorton sendita de paŝao Ajas. Ĉar li timis renkontiĝi kun la agao, pro tio li haste-draste forlasis la ĉambregon. Sinjoro Székely kredis, ke la renegato tial ekkuris ĉar timis la minacadon, postkuris lin. Tiel povis okazi, ke li forpuŝis la agaon, kiu ĝuste venis kontraŭ li. Efike de la neatendita puŝo la agao iĝis ege kolera kaj per sia pugno bategis la ventron de sinjoro Székely insultinte la patron, patrinon, parencojn de fortikaĵkapitano. La agao, nur poste komencis diri la mesaĝon de la paŝao Ajas. Li pro sia kolero diris la mesaĝon riĉe ornamita per la elementoj de la sakro.

Pro la mesaĝo sinjoro Székely paliĝis kaj komencis ŝanceliĝadi, sed li provis regi sin kaj pripensi por kion diri.

Li sciis, ke la rabantajn spahiojn iuj mortigis, sed sciis, ke la krimon nek li nek liaj homoj faris. Nome liaj homoj je la deka horo (vespere) iris hejmen. Sed ankaŭ tion li sciis, ke li suferos pro la krimo.

– Mia ekscelenca sinjoro, ne venkebla agao, – diris sinjoro Székely, – kiam la agao finis la parolon kaj lasis lin paroli – miaj homoj dum tiu tago estis ĉe la fenestro de la regnestro por doni honorsaluton al li kaj mi ne lasis eliri ilin el la fortikaĵo. Pro tio mi petas vin, vi ne kolere min kaj ne postulu la mortigintojn, ĉar ni ne mortigis ilin.

La agao grincigis siajn dentojn pro furiozo, kaptadis por aero pensadante diri respondon:

– Ĉu vi estas kuraĝa diri al mi ĉi tion, vi vindrinkanta nekredanto? Mi scias, ke vi sola ne mortigis la spahiojn, sed sendu al mi tiujn du mil homojn kiuj mortigis ilin!

Sinjoro Székely forte ŝvitis kaj pensis, ke li la kolringon donu al la agao kiel kompenson. Sed la agao ĵetis la kolringon ene per la krizoplazaj kaj zirkonkristalaj juvelŝtonoj al la piedoj de la kapitano. La juvelŝtonoj dise-mise ruliĝis sur la planko. La agao pro kolero ruĝvizaĝe piedfrapadante la kolĉenon kriegis:

– Donu al mi la mortigintojn, mi volas tiujn, ne viajn juvelŝtonojn!

La kapitano divenis, ke la agao postulo estas serioza, tiu vere postulas la mortigintojn. Li kondukis la agaon al liaj soldatoj kaj ĉiujn demandis, kie li estis hieraŭ nokte. Ĉiuj soldatoj havis alibion. Ili ne estis suspektindaj.

La agao iĝis furioza, nenion diris, nur rigardinte la soldatojn cerbumis pri kiondiĉo, kiam ĉiuj soldatoj savis sin de la turka morto. Poste la agao enseliĝis kaj minacante ilin per la pugno grincigante la dentojn grumblis:

– Gardu vin! Ankaŭ vi havos tagon de Sankta Demetrio!¹⁴² – diris la agao kaj forgalopis al Nagyvárad.

La alvenanta agao ĝuste tie trovis la bejon Feriz ĉe la paŝao Ajas. La agao rakontis rezulton de sia vizitado, troigante tion.

– Ĉu ili diris tion? – demandis Feriz la paŝaon.

– Ili diris, ke ili ne foriris el la fortikaĵo.

– Mi bedaŭras viajn ormonerojn, kiujn vi devas pagi al mi.

Ajas iĝis furioza kaj ordonis al la agao forgalopi al Istambulo.

– Rakontu al la grandveziro ĉi tiun okazintaĵon kaj diru, se tiu ne donos tutan kompenson al mi, tiam, mi kaptos la nekredantajn hundojn, la mortigintojn kaj

¹⁴² Sankta Demetrio vivis komence de la kvara jarcento kaj estis mortkondamnita kaj ekzekutita en 306, pro la malakcepto de estimo de la paganaj Dioj:
https://eo.wikipedia.org/wiki/Demetrio_de_Tesaloniko

neniigos ilin. Sed se mi ne povos fari tion, tiam mi forĵetos mian glavon kaj iros al Iskender, surmetos frokon de monaĥo kaj estos almozanta monaĥo. Ne forgesu diri ĉi tion al la grandveziro!

Baldaŭ la ordonoj de la sultano alvenis unu post alia al la regnestro, per kiuj li postulis serĉi la mortigintojn de la spahioj. La regnestro serĉigis tiujn, sed neniu surpronis la nefaritan krimon.

La ordonoj de la divano iĝis ĉiam pli kaj pli furiozaj. La morto de la spahioj ne estis skandalo, sed la veziroj ĉagreniĝis pro tio, ke la regnestro neis la krimon. Sed tiu ne povis agi alie, ja en sia lando ne estis suspektebla homo.

En la malliberejo de Kolozsvár estis multe da kondamnitaj rabistoj. Pasintjare oni kaptis tridek bruligadantojn, kiuj volis forbruligi la tutan Transilvanion.

Por solvi la nefaritan krimon, iutage la tiea provoso, sinjoro Marteno Pók iris al la rabistoj, por erarigi la plej satanajn banditojn kaj diris al ili:

– Sentaŭguloj! Penduminduloj! Kiu volas liberiĝi ĉiamaniere?

– Ankaŭ mi! Ankaŭ mi! – ĉiuj kriis.

– Nome la pano plimultekostas, oni ne volas manĝigi vin. Kiu el inter vi volas esti turko, tiu estos ĉe paŝao Ajas janiĉaro kaj la aliajn la regnestro enĵetigos en la riveron Samoŝ. Do, kiu volas esti turko, tiu anoncu sin.

Ĉiuj volis esti turkoj.

– Ĉio estas en ordo, sentaŭguloj. Do, ellernu la direndojn antaŭ la paŝao, kiujn vi devas diri: „ĉu vi estas homoj de Ladislao Székely?” Vi respondos: „Jes.” „Ĉu vi estis ĉe Eleŝd hieraŭ nokte?” Vi respondos: „Jes, mi estas el tiuj.” „Ĉu vi renkontis bejon Feriz?” Vi respondos: „Jes.” Ĉiuj viaj respondoj estu jesaj kaj li liberigos vin. Ĉu vi ekkomprenis ĉion?

– Jes, mi komprenis! – ili kriegis dancante inter siaj katenoj. Poste ili sekvis la provoson, kiu rigardis ilin memkontante.

Du leteroj alvenis iutage el Istambulo al Nagyvárad. Unu alvenis de paŝao Kuĉuk al sia filo la alian skribis la sultano al paŝao Ajas.

Paŝao Kuĉuk skribis al sia filo la suban:

„Mia filo! Estu gaja, ĉar Küprili kaj Maurocordato havis sukcesojn. Nome la grandveziro koleregas la kortegon de la regnestro. La morto de la spahioj estas nun pli grava temo en Istambulo, ol okupo de Candia¹⁴³. Mi kredas, ke ni baldaŭ atingos niajn celojn.”

Bejo Feriz, komprenante la informon de sia patro, bonhumore iris al la paŝao, kiu havis pli bonan humoron, ol li.

– Legu la leteron de la sultano – diris la paŝao al Feriz kaj donis al la bejo la pergamenon, sur kiu estis la subskribo de la sultano. Tiu subskribo similis al iu taŭzita birdonesto. Bejo Feriz legante la leteron tremetis pro ĝojo kaj surprizo. La sultano skribis la sekvan:

„Brava paŝao Ajas, mia fidela servisto! Mi deziras al vi ĉion bonan kaj honoron. Mi informiĝis, ke malfidelaj homoj mortigis la spahiojn kaj tiun faron iliaj sinjoroj ne venĝis kaj min akuzas per mensogoj. Pro tio mi rajtigas vin por fari venĝon, se oni ne transdonos la mortigintojn. Tiukaze laŭ mia ordono ataku Transilvanion kun niaj armeoj. Paŝao Kuĉuk jam atendas vin ĉe Vörös torony (ruĝa turo) kaj ankaŭ la tatara armeo helpos vin. Forpelu la regnestron, aŭ portu lin al mi kaj tiam mi liberigos

¹⁴³ Candia, alianome Iraklio estas trovebla en Grekujo sur la insulo Kreto:
[https://eo.wikipedia.org/wiki/Iraklio_\(urbo\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Iraklio_(urbo))

sinjoron Béldi, kiu estas nun en Jedikula kaj ĉiamaniere mi sidigos en la tronon de la regnestro.”

Bejo Feriz kisadis la ordonon kaj poste la fermanon redonis al paŝao Ajas. Li devis turni sin, ke la paŝao ne rimarku liajn ĝojlarmojn.

– Ĉu vi kredas jam, ke ni kaptos la mortigintojn? – demandis paŝao Ajas.

– Neniam! – kriis Feriz ekster si.

– Ĉu ne? – murmuris Ajas konsternate. – Sed ni iros por la mortigintoj!

– Ĉu? – diris Feriz rimarkante, ke li preskaŭ perfidis sin. – Tiuokaze mi kredas tion, (sed li pensis, ke ankaŭ tiam. Béldi liberiĝos kaj estos regnestro, lia edzino estos regnestrino kaj Aranka estos regnestroido kaj denove ni vidos unu la alian.)

Sed en la sekva minuto la ago enpaŝis en la ĉambregon kaj memplaĉvizaĝe anoncis:

– Sinjoro Ladislao Székely sendas la mortigintojn.

Bejo Feriz ekŝanceliĝis, volus krei „neeble”, sed ne kapablis alparoli.

– Tiuj venu enen! – kriis la paŝao kolere, kiu plej forte dezirus batali, por konkeri landojn.

– Bejo Feriz kredis, ke li sonĝas, kiam li ekvidis la banditojn, kiujn kondukis Marteno Pók. La banditoj portis servistvestaĵojn, sed videblis, ke ĉiuj estas fihomoj.

Sinjoro Marteno Pók prezentis ilin al la paŝao Ajas kaj bejo Feriz. Poste la provoso flankenstaris. Bejo Feris treege miris pri tio, ja li sciis plej bone, ke la banditoj ne vidis la spahiojn. Feriz atentis iliajn respondojn.

Paŝao Ajas frigide sidiĝis en sian sofion. Li signis per siaj brovoj al la janiĉaroj ekstari envice malantaŭ la dorsoj de la uloj. La fihomoj klopodis rideti antaŭ la paŝao por plaĉi al tiu.

– Ĉu vi estas homoj de sinjoro Ladislao Székely? – demandis la paŝao la ulojn.

– Ni estas tiuj – ili respondis klinante sin.

La paŝao mansignis al la janiĉaroj kaj ĉiuj iris malantaŭ iun ulon.

– Ĉu vi estis ĉe Élesd nokte nomtage de Sankta Miĥaelo? – demandis denove la paŝao.

– Ni estis tie – ili respondis klinante sin.

Feriz estis ekster si. Li dezirus interkrii: „Mensogo, vi ne estis tie.” Sed li devis esti en silento.

Ajas signis al la janiĉaroj eltiri siajn glavojn. Ili tiris tiujn kaj kaŝis malantaŭ sian dorson. Poste la paŝao demandis denove:

– Ĉu vi vidis bejon Feriz?

– Ne mensogu! Interkriis bejo Feriz furioze. – Rigardu min! Ĉu vi vidis min ĉe Élesd?

La uloj klinante sin ĝisteren respondis:

– Jes, mi vidis vin tie!

Poste en la sekva momento la glavoj de janiĉaroj leviĝis kaj samtempe la kapoj de la uloj falis surteren.

– Ho, ve, nekredantaj fihomoj – kriegis bejo Feriz furioze.

Paŝao Ajas trankvile turnis sin al sinjoro Marteno Pók:

– Mi salutigas vian mastron kaj tiu aliokaze pli frue obeu al mi kaj ne kolerigu min! Kaj vi, mia filo, bejo Feriz, bonvolu repagi miajn cent ormonerojn!

26. La garantiulo

luvespere du rajdistoj portantaj turkan vestaĵon troitis al la kortego de la fortikaĵo de Szamosujvár¹⁴⁴. Ili demandis, kie estas la kapitano, Dano Solymosi.¹⁴⁵ Iu armita servisto volonte kondukis ilin al la fortikaĵkapitano. Unu turko aspektis pli aĝa, ol la alia. Lia vizaĝo estis sunbruliĝinta havante multe da cikatro. La vizaĝon de la alia kovris lia mantelo, nur la nigraj okuloj videblis.

– Bonan vesperon, sinjoro kapitano – salutis la kapitanon la pliaĝulo.

La kapitano rekonis tuj la enpaŝanton kaj ĝojante manpremis kun tiu.

– Dio portis vin al mia hejmo, paŝao Kuĉuk.

– Ĉu vi rekonas min, brava maljunulo? – demandis Kuĉuk, nevolante lasi la manon de la kapitano.

– Mi rekonis vin, ja vi liberigis mian filinon de la malbonaĉaj tataroj, vi elaĉetis min el mia malliberejo, vi donis rifuĝejon, manĝaĵon, konsoladon en fremda lando. Mi ne estus honesta homo, se mi forgesus vin.

– Vi estas brava maljunulo. Memorante tion, mi havas peton, pro kiu mi venis al vi.

– Diru, ja mi atendas vian ordonon.

– Ĉu vi gardas ĉi tie la familion de Paŭlo Béldi?

– Jes, mia sinjoro. Oni portis ĉi tien tiujn, la malfeliĉulinojn.

– Mi dezirus kunporti la edzinon de Paŭlo Béldi. Post du semajnoj mi revenigos ŝin.

– Sed min oni senkapigos! – diris la kapitano ektimante.

– Neniu ekscios ĉition.

– Sed eblos, ke vi forgesos ŝin reporti.

– Pro tio ne estu maltrankvila. Dum tiuj du semajnoj mia filo restos ĉi tie kiel garantiulo.

La pli juna rajdisto paŝis antaŭ la kapitanon kaj diris:

– Mia sinjoro, mi estas bejo Feriz!

– Ĉu vi jam kredas min, ke post du semajnoj mi reportos la edzinon de Béldi? – demandis paŝao Kuĉuk.

– Faru tion laŭ via deziro, mia sinjoro – diris la kapitano, ja mi estos eterne dankema al vi. Venu post mi.

La kapitano kondukis siajn gastojn en la okcidentan turon irante sur la malvasta helika ŝtuparo. Tie estis la malliberejoj de la arestitoj. La etajn fenestrojn gardis ferkradoj kaj la pezaj pordoj faritaj el kverkoligno grincadis, kiujn nur malofte oni malfermis.

– Kial vi metis ilin en malvarmajn ejojn? – demandis Kuĉuk la kapitanon. – Ĉu ne estas pli varmaejo en la fortikaĵo?

– Ne riproĉu min, mia sinjoro, ja mi ricevis ordonon, ke la infanoj kaj la patrino estu en apartaj ejoj. Ambaŭ ejoj estas unu apud alia kaj inter la ejoj estas fenestro tra kiu ili povas paroli, etendi la manojn, kisi unu la alian.

– Vi estas brava, maljunulo – diris Kuĉuk batadante la ŝultron de la kapitano. Feriz demandis la kapitanon:

¹⁴⁴ La setlejnomon bonvolu prononci: samoŝujvar.

¹⁴⁵ La familionomon bonvolu prononci: ŝojmoŝi.

- Ĉu ankaŭ mi estos enkarcerigita en saman ejon?
- Ne, vi, bona Feriz, vi povas loĝi en mia ĉambro.
- Sed mi volas esti fermita en la najbara ejo – diris la junulo. Nome li pensis pri Aranka por esti en la karcero ne malproksime de ŝi.

Fine la pordo de la malliberejo malfermiĝis. La kapitano lasis enpaŝi tien ambaŭ otomanajn virojn. Virino portanta funebran vestaĵon sidis antaŭ iu eta fenestro kaj el la biblio legis laŭte kaj ŝiaj tri infanoj aŭskultis sur la alia flanko de la eta fenestro el la najbarejo la vortojn de la difavoro.

Kiam la viroj enpaŝis en la ejon, la virino ektimis, paliĝis, severe rigardis la enpaŝantojn. La iam gaja vizaĝo nun estis serioza, montrante multe da suferoj. Paŝao Kuĉuk iris al la virino preni ŝian manon kaj diris al ŝi sian nomon.

- Mi estas paŝao Kuĉuk, post vi la plej bona amiko de via edzo. Mi salutas vin!
- Mi dankas vin pro via vizito. Mia edzo multfoje menciadis vian nomon. Ĉu vi portas lian mesaĝon al mi?

- Mi volas kunporti vin al via edzo.

- Ĉu mi estas libera? – kriis la virino tremetante, meditante.

- Ne ĝoju, bona sinjorino, mi ne havas la rajton liberigi vin, nur organizas renkontiĝon kun Paŭlo Béldi por rakonti al li vian suferon. Li ne povas veni al vi, sed vi devas iri al li. Mi kunportas vin. Mi kunportas vin klopodante, ĉar la veturo estas longtempa.

- Ĉu ankaŭ miaj infanoj venos kun mi?

- Ili restas ĉi tie. Sed vi vidos ilin denove. Nome aŭ vi persvados vian edzon esti regnestro de Transilvanio, aŭ li ne akceptos vian peton kaj ankaŭ li restos en sia malliberejo kaj ankaŭ vi iros en la vian kaj vi mortos en malliberejo de du landoj. Nun adiaŭu viajn infanojn kaj klopodu prepariĝi. De vi dependas, ĉu li estos regnestro, aŭ malliberulo ĝiseterne.

- Kiu defendos ilin, kiu preĝos por ili en mia foresto?

- Ne timu, ja mia filo restas ĉi tie kiel garantiulo. Mia filo, bejo Feriz, estas en via malliberejo kaj li konsolos ilin. Nun adiaŭu, ĉar ni devas ekiri.

Sinjorino Béldi kuregis al la eta fenestro, karesadis siajn infanojn tra la ferkrado. Tiu ferkrado ne lasis brakumadi unu la alian. Ĉiuj infanoj sendis kisojn al sia patro. Ili prenis la manojn unu de alia tra la ferkrado.

- Ĉi tiujn kisojn ni sendas al nia patro! – balbutis la infanoj.

- Mia filineto, Aranka – diris sinjorino Béldi – Vi estas la plej aĝa, gardu viajn fratojn. Vi, miaj bonaj filetoj, gardu vian pli aĝan fratinon.

Kaj ili lastfoje kisis unu la alian.

- Mia sinjorino venu, la tempo urĝas nin ja Paŭlo Béldi atendas vin en la malliberejo – diris paŝao Kuĉuk fortirante la sinjorinon de la eta fenestro.

Sinjorino Béldi turnis sin al bejo Feriz doloreme kaj ploregante petis:

- Vi estas nobla animo! Promesu al mi, ke miajn karajn infanojn vi amos en mia foresto.

- Mi promesas je Alaho – kriis la junulo premante ŝin al si. – Mi eterne amos ilin!

Ja la plej aĝan infanon li jam longtempe amis.

- Mia sinjorino, ni ekiru rapide – urĝis ŝin Kuĉuk. – Surmetu la mantelon, metu surkapen turbanon por ke ne rimarku la gardistaro vian foriron. La veturo estos longa, sed la tempo estas mallonga.

– Adiaŭ! Adiaŭ! – Ŝi diris mallaŭte, ĵetante kisojn al siaj infanoj. La infanoj mansignadis adiaŭon.

Poste ŝi rapide elkuregis el la malliberejo. Paŝao Kuĉuk mute premis la manon de sia filo kaj lasis lin en la karcero de sinjorino Béldi. La infanoj ege ploregis ĉe la fenestro de la karcero. La junulo iris al la fenestro.

– Ne ploregu! – li konsolis ilin – Via patrino baldaŭ revenos kaj kunportos vian patron kaj vi denove ĝojos unu kun alia.

– Ho, ve! Oni mortigos mian patron – balbutis iu infano.

– Kiu? – kriis ekscitite la junulo. – Ĝis bejo Feriz kapablas batali, neniu batos Paŭlon Béldi. La glavoj de mi kaj mia patro defendos lin. Kiu batos sinjoron Béldi, tiu estos nia malamiko, ja ankaŭ Johano Kemény mortfalis pro mia glavo. Ne timu, se mi rericevos mian glavon, tiam vi rericevos la liberecon.

– Mi dankas vin – balbutis iu emociita voĉo, kiun bejo Feriz tuj rekonis.

Tiu voĉo estis la neforgesebla voĉo de Aranka. Li vidinte en ŝiaj okuloj la veran amon, lia koro preskaŭ volis elsalti pro ĝojo. Li kompate je ŝi sopirege rigardis ŝian amatan, larman vizaĝon. Al la ferkrado li iris pli proksimen kaj dolĉavoĉe demandis:

– Ĉu vi permesos min ami vin ankaŭ tiam, kiam vi reiros en vian hejmon en la praan kastelon kiam vi estos feliĉaj? Ĉu ankaŭ tiam mi povos esti via frato? Ĉu vi, kara fraŭlineto, pardonas min, se rigardante vin mi ĝojas, ploras kaj benas vin? Ĉu mi estos feliĉa ankaŭ tiam, kiam ni ne estos en la malliberejo? Ĉu mi havos lokon en via hejmo kaj koro?

La malĝoja fraŭlineto etendis sian liliokoloran manon tra la ferkrado. Feriz feliĉe prenis kaj kisadis tiun. Poste surgenuiĝinte per pia adoro li tuŝetis tiun karan manon al sia frunto.

27. La viro

Kiam paŝao Kuĉuk alvenis al Istambulo, ĝuste tiam elĉariĝis ankaŭ sinjoro Ladislao Székely, kiun Teleki sendis por porti altvalorajn donacojn al la dĭvano. Ili volis akiri la bonvolon de la forte koleriĝintaj membroj de la dĭvano. Nome la dĭvano ege urĝis por nomumi sinjoron Béldi.

Sinjoro Ladislao Székely kunportis la renegaton Zŭlfikar por esti lia gvidanto kaj ĉiĉerono sur la stratoj de Istambulo. Ni jam scias, ke la pasio de sinjoro Székely estis la kolekto de la juvelaĵoj kaj nun la regnestro portigis multe da raraj juveloj. Sinjoro Székely pensis, ke li prefere hejme rigardadus tiujn multekostajn juvelojn, ol donus tiujn donace al la membroj de la dĭvano.

Tute ne estas certe, ke tiuj juveloj portos sukcesojn. Pli bona estus mortigi sinjoron Béldi, ja ankaŭ Stefano Apafi simile mortis.

– Zŭlfikar, ĉu vi povus iun veneni? – demandis sinjoro Székely la renegaton.

– Eĉ, iun tutan urbon.

– Vi devus mortigi sinjoron Béldi, ja tio estas tute egala por li, ĉu li mortas, aŭ restas en la malliberejo.

– Mi faros por ducent ormoneroj, se cent ormonerojn vi tuj pagas.

– Mi pagos. Kiel vi faros?

– Tio ne kaŭzu zorgon, vi nur donu la monon.

– Do, sinjoro Székely pagis la antaŭmonon al la renegato kaj hejmeniris.

La renegato skribis iun leteron en la nomo de la bejo:

„Estu bonhumora kaj fidu min, vian celon vi baldaŭ atingos!”

Sur la leteron la renegato ŝutis fajnan bluan pulvoron, kiu estis ege forta veneno. Li sciis, kiu volas legi la leteron, tiu forigos la pulvoron, dume ĝin ensuĉos kaj tiu kaŭzos ties morton.

Li metis la leteron en sian turbanon kaj poste komencis la staraĉon antaŭ la prizono de Béldi. Li atendis la ĝustan momenton por eniri al tiu ĉefsinjoro sidadanta en la malhela malliberejo de Jedikula (Septuro)¹⁴⁶. Ĉe piedoj de Béldi kuŝis Körtövély, lia fidela hungara halthundo. La hundo konstante rigardis sian mastron kaj aŭdinte brueton, ĝi komencis grumbli aŭ boji.

Béldi sidis en la plej malhela prizono de la Jedikula sur malvarma ŝtono al kiu li estis ĉenita. Ĉenite li iĝis ege maldika, sed liaj trajtoj iĝis pli deciditaj, ol estis pli frue. Li ne volis foriri el la malhelo, li ne volis vidi la sunbrilon. Li tute hardiĝis.

Subite la hundo maltrankvile levis sian kapon, kunĝoje rigardis sian mastron, kuris al la pordo kaj rekuris al sia mastro, svingis la voston, bojante volis diri ion.

– Kio estas malbona, mia bona hundo? – demandis Béldi karesante la kapon de la hundo. – Certe neniu venas al mi ĉi tien.

Sed nun malfermiĝis la pordo kaj multe da viroj aperis en la prizonĉambro de Béldi. La hundo kuris al la pordo kaj kuris reen al sia mastro. Ĝi forte bojis pro ĝojo, sed Béldi ne komprenis la bojadon de la hundo. Béldi vidis inter la enpaŝantoj la grandveziron, la paŝaon Küprili kaj Maurocordaton. Béldi ordonis al la hundo esti silenta.

¹⁴⁶ Jedikula estis malnova konstruaĵo nomita ankaŭ Sangoturo, prizono por turkaj kaj aliaj elituloj en Istambulo. Pri ĝi detale vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Septuro>

– Nu, vi, obstina homo – diris Küprili – ĝis kiam vi ĉagrenigos vin, la imperiestron kaj viajn amikojn? Ĉu ne estus pli bone sidi sur la trono, ol sur malvarma ŝtono?

– Ju pli multe mi suferas, des pli mi ĝojas, ĉar ne mia patrujo devas suferi anstataŭ mi.

Subite la grandveziro diris ion turklingve. Maurocordato interpretis malĝoje:

– La grandveziro diris, ke nur tiam vi liberiĝos, se vi pagos la ducent sepdek ormonerojn kaj akceptos la tronon de la regnestro.

– Jam mi diris mian decidon – respondis Béldi – kaj tion mi ne ŝangos. Monon de mia nacio mi ne donas al vi, mi ne batalos kontraŭ mia patrujo. Mian ĵuron mi ne rompas. Nenio povas ŝanĝi mian decidon.

– Ĉu nenio? – kriis paŝao Kuĉuk – Ĉu eĉ ne ŝi? – kaj li kondukis iun palan virinon antaŭ sinjoron Béldi:

– Mia edzino – kriis Béldi kaj prenis siajn katenojn, ĉenojn por ne fali surteren pro la ĝojo, ektimo kaj surprizo.

La pala sinjorino Béldi falis sur la bruston de sia edzo kaj kisis ties bruston kaj liajn katenojn. Sinjoro Béldi komencis ploregi, lia animo rompis kaj li residiĝis al la malvarma ŝtono. Li brakumis la kolon de sia edzino, sed ne estis kapabla ekparoli. La hundo kisis la manojn de siaj mastro kaj mastrino.

– Ni lasu ilin solaj – diris paŝao Kuĉuk – por paroli unu al alia.

Poste ĉiuj turkoj foriris el la prizono malhela.

– Mi kredis – diris sinjorino Béldi – ke mi suferas anstataŭ vi sed vi pli forte suferas, ol mi.

– Kiel vi povis veni ĉi tien? – demandis sinjoro Béldi sian edzinon.

– Paŝao Kuĉuk lasis tie anstataŭ mi sian filon kiel garantiulon.

– Li estas brava homo. Li oferas sin kaj sian filon por mi. Kio estas pri miaj infanoj?

– Ili restis en la malliberejo. Mi devas reiri tien, se vi ne akceptas la proponon de la sultano.

– Ĉu oni forportis ankaŭ mian filinon, Aranka? – demandis sinjoro Béldi.

– Ankaŭ ŝin. Sed se ni liberiĝus, tiam ni nenien povos iri, nome, oni forportis nian tutan havaĵon. Nian brutaron Farkaŝ Bethlen havas kiel predon. Nian brutaron de Háromszék havas Klemento Mikeŝ kontraŭ tio, ke pli frue ne estis permesata forpreni brutaron de la sikuloj. Nian fortikaĵon de Bodola oni ruinigis, vian blazonon oni rompis kaj vian nomon oni skribis en la taglibron de la parlamento kiel nomon de patruj-perfidulo.

– Homoj! – kriegis sinjoro Béldi – Se mi ne estus Béldi, tiam la kolero de Dio bategus sur viajn kapojn! Sed mi amas mian patrujon ankaŭ tiam, se ĝin neniigas la malamiko. Mia kara, bona edzino! Ne ploru, ja ankaŭ mi ne ploras. Dio vidas nin kaj venĝos nin kontraŭ la malamikoj. Mi restas kristana kaj patriota. Mian aferon Dio aranĝu!

– Ĉu vi ne volas akcepti la proponon de la sultano? – demandis malesperiĝinte sinjorino Béldi.

– Neniam! – respondis sinjoro Béldi.

La virino ŝrikante ĵetis sin al la piedoj de sia edzo balbutante:

– Vi volas resendi min en mian karceron! Neniam, neniam plu ni revidos unu la alian.

– Tiukaze vi pruvos, ke vi amis min, ke vi inda estis al mi, ke vi povos suferi kiel mi kaj pro mi!

– Ĉu viaj infanoj pereigu pro la eterna enkarcerigo?
– Diru al ili, ke ilia patro vivis kaj mortis honeste. Ankaŭ ili ellernu vivi kaj morti same.

– Pensu pri via plej amata infano, pri via filino Aranka!
– Prefere ankaŭ ŝi velku, ol Transilvanio plenflamiĝu, neniiĝu.
– Béldi, ne malesperigu min – kriis la virino. Mi timas la karceron. Mi estas malsana. Ho, ve! Mi mortos sen vi! La malesperiĝo mortigos min.

Sinjoro Béldi levis sian edzinon kaj kisis ŝin. Sed ŝi svenis inter la brakoj de Béldi. Béldi vokis paŝaon Kuĉuk. Dume sur la vizaĝo de Béldi aperis ia stanokoloro. Béldi metis sian edzinon inter la brakoj de Kuĉuk kaj apenaŭ kapable paroli li mallaŭte diris al paŝao Kuĉuk:

– Mi dankas vin pro via bonvolo. Ĉi tie estas mia edzino. Reportu ŝin en ŝian karceron.

La turkoj gapante senvorte levis la svenintan virinon. Sinjoron Béldi oni ne ĝenis per novaj demandoj. Ĉiuj foriris el lia malliberejo. Post foriro de la lasta turko sinjoro Béldi nur staris rigidiĝinte per senlumaj okuloj kaj mallfermitaj lipoj ĉar li sciis, ke sian edzinon li jam neniam povos vidi. Lia kapo estis peza, li kaptuniĝis kaj subite falis surteren. Körtövély, la kaduka hundo, malĝoje, konsternite ekhojlis.

En ĉi tiu momento enpaŝis Zülfikar en la prizanon portante la venenitan leteron. Sed tiu alvenis malfrue, ja Paŭlo Béldi jam mortis.

— — —

Sinjoro Ladislao Székely, aŭdante la sciigon pri la morto de Paŭlo Béldi, aranĝis pompan festenon. Kiam la societo havis la plej grandan gajecon, Zülfikar paŝis inter la homojn.

– Donu al mi tuj la cent ormonerojn – diris li mallaŭte al sinjoro Székely.
– Kial? – demandis Székely ebrie. – Ja Béldi mortis pro apopleksio. Estu dankema pro la pli fruaj cent ormoneroj.

– Ej, vi estas nekredanta hundo – kriis la renegato ege laŭte – kial vi trompis min? Vi promesis al mi ducent ormonerojn, se mi venenos sinjoron Béldi, kaj la alian parton de la cent ormoneroj vi ne volas doni al mi! Vi superruzis min honestan homon. Aliokaze mi petos la tutan monsumon, ne nur la antaŭmonon. Vi estas nekredanta rabisto.

La societo ridis pro la aŭdaĵoj. Sed sinjoro Székely ĉagreniĝis pro tio.

– Kion vi parolas, duonfrenezulo? Mi neniam vidis vin, mi ne komisiis vin mortigi sinjoron Béldi.

– Ej! – kriis Zülfikar. – Ĉu vi volas nei, ke ĉi tiun leteron vi skribis al sinjoro Béldi? – kaj li ĵetis la venenitan leteron al sinjoro Székely. Székely kaptis ĝin, rompis la sigelon, forigis la pulvoron, finlegis tiun kaj reĵetis la leteron al la piedoj de la renegato.

– Ĉi tiun leteron ne mi skribis!

Poste sinjoro Székely ordonis al la servistoj ĵeti la renegaton sur la straton. Sed la renegato staris sub la fenestron kaj antaŭ la piedirantoj komencis riproĉi, dirante, ke Székely ne pagis al li la koston de la veneno.

La gastoj de Székely pensis, ke la tuto estas nur ŝerco, kaj ridis. Ankaŭ Székely ridis pri la ŝerco, sed hejmenalvenante en Transilvanion li diris, ke doloras lia

stomako. Li surdiĝis, ne havis apetiton, ne deziris drinki ĉar li jam ne havis sanajn intestojn.

Neniu estis kapabla resanigi lin. Tamen fine venis iu germana ĉarlatano, kiu kredigis tiun, ke li kapablas resanigi lin per diamant, – kaj smeraldpulvoroj. Sinjoro Székely transdonis al la ĉarlatano sian juvelaĵkolekton. Tiu forigis la valorajn juvelojn kaj anstataŭ tiuj metis senvalorajn sablerojn. Poste la ĉarlatano forfuĝis kunportante la juvelŝtonojn. Székely restis sola, kaj terure suferante mortis. La kaŭzo de la morto de Székely estis tiu veneno kiun li volis doni al Paŭlo Béldi.

Oni entombigis Paŭlon Béldi en fremda lando kaj neniu vizitis lian tombon. Nur lia fidela hundo sidis apud la tombo. Ĝi manĝis, trinkis nenion kaj post sep tagoj mortis apud la tombo de sia mastro.

28. Velkado de floro

Dum la pripensadoj rakontante ĉi tiun historion konstante mi sentas iun deprimon. Io premas mian koron kiel la kontricio aŭ fantomo. Povas esti, ke tio estas la sento de la forlasiteco, pri kiu mi pensadas. Ju pli proksimiĝas la fino de la historio, des pli bone mi memoras pri la de mia koro fremdajn figurojn, kiuj estas feliĉaj, sed ne estas poetaj figuroj, tamen ili estas kreaĵoj de la sorto. Sed ili estas suferantoj kaj figuroj de la historio. La verkisto povas vidi ilian velkadon.

Jam longtempe mi akompanas la figurojn de mia historio kaj tiel ŝajnas kvazaŭ mi irus en malliberejoj. Ni iras en malliberejon kaj venas el malliberejo kaj kie ni elvenas el la karcero, tie estas la tombejo.

Nun ni vizitu fraŭlinon Aranka kaj bejon Feriz.

Fine ili estas sub sama tegmento. Tio estas pli bona, ol la ĉerko, sed nur malpli, ĉar tiu ejo estas la malliberejo. Nome inter ili estas la ferkrado de la fenestro. Sed tio estas bona, ke ili povas preni la manojn unu de la alia. Ili povas paroladi pri estonteco, ĝojoj kaj feliĉo. La malliberejoj estas malvastaj, malsekaj, ne lasas enpenetri la sunradiojn kaj la novaĵojn de la mondo, sed kiam la junulo parolis pri sia patrujo, pri Damasko, kie estas multe da rozujo, palmoarboj kaj sur la tegmentoj estas floroj, tiam Aranka forgesis la malliberejon kaj kredis, ke ŝi estas en Damasko, inter la rozujoj. Kiam ŝi parolis al la junulo, tiam li forgesis Damaskon, kaj kredis, ke li estas en la Ĉiellando.

Jam multaj tagoj pasis ekde la foriro de sinjorino Béldi, sed neniuj famo venis pri ŝi. Aranka iĝis ĉiam pli kaj pli malĝoja, ĉiuvespere malĝoje adiaŭis la bejon kaj ĉiumatene la junulo malfacile povis konsoli ŝin. La junulo rimarkis, ke ŝia ruĝa vizaĝo daŭre plipaliĝas kaj ŝiaj okuloj tremetas, kiam rigardas lin.

La junulo ne kuraĝis demandi ŝian malbonon, sed Aranka diris tion:

– Ho, ve! Feriz! Mi mortos ĉi tie kaj vian brilantan landon mi ne ekvidos.

– Mi vidu pli frue la ĉielon nigra, ol vin mortinta.

– La ĉielo ridetos ankaŭ pli malfrue, sed mi neniam plu. Mi sentas ion, kio malpliigas la baton de mia koro kaj nokte mi vidas miajn parencojn, mi promenas en nekonataj pejzaĝoj kaj estas kapabla memori ĉiujn domojn kaj arbustojn.

– Ĉi tio signifas, ke vi venos kun mi al nekonata regiono.

– Ho, ve! Feriz! Mi jam ne estas kapabla ĝoji, mi ne havas jam ĝojon vidi viajn palmojn kaj se mi vidas vin, tiam mia animo estiĝas malhela, ĉar mi sentas, ke mi forlasos vin.

– Ne diru tion! Vi estas la ĝojo de mia vivo. Ne malĝojigu Dion, ja Dio malĝojas, se la senkulpaj homoj plendadas.

– Mi ne plendadas. El iu malbona mondo iri en alian pli bonan estas bone kaj de tie mi vidos vin kaj en miaj sonĝoj mi vizitos vin.

– Se ĉi tiu malbona mondo boniĝus kaj vi vivante estus feliĉa...

Aranka kapbalancis malĝoje pro tio.

– La malbona mondo ne necesas boniĝi, vi bone povas vidi el tio, ke la bonuloj devas morti kaj la satanuloj havas longan vivon. Dio kunportas la bonulojn, kiujn li amas kaj ne lasas longe suferi tiujn.

Feriz konsterniĝis. Kio inspiris ĉi tiujn seriozajn pensojn de Aranka? Tio estis la proksimiĝo de la morto. La malsana frukto pli frue maturiĝas ol la alia. La malrapida

morto maljunigas la infanon kaj ties parolo similas al tiu de la kadukulo. Tiun parolon estis malĝoje aŭskulti.

– Estu gaja – petegis ŝin Feriz kaj kisadis la manojn de la fraŭlineto – via patrino post nelonge alvenos, via patro okupos la tronon de la regnestro, vi estos regnestrido kaj mi luktos, ke mi estu inda al vi. Poste vi estos mia fianĉino, edzino kaj defendanta anĝelino.

Sed Aranka skuis la kapon malĝoje.

– Poste ni iros al la silentaj riveretoj, al la praa patrujo, kie la braveco regas, ne la superruzo, kaj la saĝuloj instruas la astronomion, la kuracefikon de la herboj, sed ne la kaoson. El fenestro de mia kiosko ni povos vidi la tutan regionon. Mia kiosko estas sur flanko de la monto Libano. En la densejo de la cedroarbaroj brulas la fajroj de la paŝtistoj, en la valo fluas klakadante la monta riverego kaj la najtingalo kantas pri la feliĉa amo. En la malproksimo videblas la maro, sur kiu velŝipo tangas, kiel lulilo. La luno rigardas sin en la granda spegulo de la maro. En la velŝipo sidas iu bela fraŭlino, ĉe ŝiaj piedoj sidas iu junulo kaj ili aŭskultas pri la feliĉa amo parolon de la travideblaj ondoj.

La fraŭlineto komencis larmiĝi kaj tiel ŝajnis, ke ŝi la menciitan bildon el la Ĉielregno vidus kaj bedaŭrus forlasi ĉi tiun belan teron.

Aranka adoris sian patron kiel idolon. Nome lin la tuta lando estimis, li estis ŝia idealo. Kiam Feriz parolis pri li, tiam ŝi iĝis ege gaja kaj kiam ŝi aŭdis liajn heroajn agojn, tiam ŝi jam ne ploris. Kiam la junulo diris, ke li liberigos la Béldi infanojn kaj ŝian patrinon kaj neniam forlasos ilin, tiam ŝi iĝis feliĉa kaj kuŝis sur la liton kaj preĝis por sia patro, por ekvidi lin.

Tiam jam Paŭlo Béldi estis entombigita, li estis en la Ĉielregno kaj ŝi devis iri post li.

Aranka iĝis ĉiam pli kaj pli pala, apenaŭ viva. La provoso kompatis la velkantan floron kaj ĉiun posttagmezon lasis ŝin eliri sur la supron de la turo por suĉi freŝan aeron. Sed la sunbrilo kaj la freŝa aero jam ne sanigis ŝin. Ŝi premis la manon de Feriz sur sian frunton.

– Ĉu vi sentas, ke mi estas ege febra? Mi ne ŝatus morti antaŭ la alveno de mia patrino. Ŝi estus malĝoja pro mia morto.

Feriz vidis ŝin velkadi ĉiutage, la liberiganto ne alvenis. La junulo iradis sur la korto kaj estis malesperiĝinta kiel la leono fermita en kaĝon pro kio per la frunto batadis la murojn. Ja kiu estis la celo de lia vivo, tiu nun estas proksime de la morto kaj tiun neniuj kapablas savi.

La edzino de la provoso, kiu estis bonvola sinjorino, flegis la malfortiĝintan fraŭlineton. La kuracistoj ne povis helpi ŝin, ja la homoj estimis nur la kuracplantojn kaj indulgon de Dio.

La bona sinjorino ĉion faris por Aranka, sed diris, ke tio estus la plej bona, se alvenus la gepatroj de Aranka, kio redonus la vivoforton al faraŭlino.

Bejo Feriz jam ne povis paroladi kun Aranka, ĉar ŝi ege suferis, kuŝis malsana sur la lito, febre anhelis, kaj li ne povis forigi la ŝviton de ŝia frunto kaj ne povis doni al ŝi unu glason da akvo kaj ne povis konsoli ŝin. Li ne povis trankviligi ŝin.

Matene ŝia febro malpliigis kaj la suferanta fraŭlino deziris, ke oni portu ŝin sub la liberan ĉielon. Jam ŝi ne estis kapabla iri, oni devis porti ŝin en brakseĝo sur la supron de la turo. La provoso estis homeca kaj lasis porti la gemalliberulojn sur supron de la turo. por ĝui la freŝan aeron.

Estis bela aŭtuna mateno. Super la regiono videblis nebulo, kiu malpliigis la sunradiadon. En la nebulo eblis rimarki polvonubon, kiu proksimiĝis al Szamosujvár.

– Ho! Bone estus, se mia patro venus tie! – balbutis Aranka.

La junulo atentis la polvonubon kaj subite rimarkis iun ĉaron tiritan de kvin ĉevaloj.

– Estas fakto, ke tiu ĉaro proksimiĝas, kiu forportis vian patrinon. Aranka mutiĝis pro ĝojo kaj emocio, sed ne kapablis paroli, nur prenis la manon de Feriz kaj dankeme rigardis lin. La ĉaro ege rapide proksimiĝis. Certe en tiu tiuj homoj sidas, kiuj portas bonan novaĵon – pensis Feriz. Sed li timis, ke la ĝojmesaĝo ne utilis al Aranka.

La ĉaro atingis la fortikaĵon, venis al la korto ĝia. Aranka apogante sin al Feriz iris al la korto, sed ege tremetis. Ŝi pli similis al iu anĝelino, ol tera vivaĵo. Ŝi malĝoje iris al la ĉaro pere de Feriz. La ĉaro ekhaltis kaj paŝao Kuĉuk deĉariĝis.

Ties rigagardo ne estis konsola, li nenion diris al sia filo kaj al la fraŭlino. Sed li diris al la provoso:

– Jen, sur la ĉaro estas la malliberulino, portu ŝin en ŝian malliberejon, sed eksciu, ke la malliberulino estas ege malsana.

SinJORINO Béldi kuŝis en la ĉaro senmove, senkonscie.

Aranka demandis tremetante:

– Kie estas mia patro?

Paŝao Kuĉuk volis diri ion, sed anstataŭ vortoj sur lia vireca vizaĝo larmoj defluis. Li mallaŭte, apenaŭ atendeble flustris siajn manojn levante al la ĉielo:

„En la ĉielregno!”

Aranka, la kvieta fraŭlino aŭdinta la famon pri la amata patro, falis sur la teron kiel falĉita floro. Feriz levis la svenintan fraŭlinon. La ĉielbluaj okuloj de Aranka rigardis al la ĉielo kaj ŝi preĝetis. Poste kaj ŝiaj belaj lipoj kaj okuloj fermiĝis por eterne.

La kara fraŭlino iris al sia patro en la ĉielregnon.

29. La glavo de Dio

„Kiu tondras en la fulmanta ĉielregno?
Kiun signifas la koleratango de la tero? ...”
(Laŭdo)

Depost iom da tempo plimultiĝis la mirakloj de Dio en Transilvanio. Tiuj jam ne estis maltrankviligaj famoj, kiujn oni eltrovis kontraŭ la paco de la mondo, sed tiuj estis naturaj fenomenoj, kiuj emociigis la korojn de la skeptikuloj. Tiuj estis sekretaj scenoj, laŭ kiuj la plebo kredas, ke sekvos landaj ŝanĝoj kiuj rapidigas la teruran faton.

Dum iu frumateno post serena nokto subite nekutima densa nebulo estiĝis, kiu nur posttagmeze leviĝis, kaj ĝi kiel nigra nubo dissterniĝis sur la ĉielo. La nubo ekhaltis kaj tute ne falis el ĝi akvo. Pro tio en la domoj iĝis malhelo kaj oni devis lumigi per kandeloj.

Vespere la birdoj silentiĝis, la petaloj de la floroj kuntiriĝis, la folioj de la plantoj velkadis. Sub la libera ĉielo piedirantoj treege tuis pro la sufoka aero. Tiutempe en ĉiuj plantoj, en akvo, en la sango de homo estis iu malsaniga materialo kaj disvastiĝis iu kontaĝo, la herbaĉoj plimultiĝis, sekiĝis la arboj de la arbaroj, nome sur tiuj dense kreskis la muskoj. Kaj sur la fekundema grundo aperis verda ŝimo.

La malhelo de la ĉielo daŭris tri tagojn kaj dum la kvara tago post la sufoka kalmo grandega uragano estiĝis, deĵetadis la tegmentojn de la domoj, la krucojn de la temploj, miksis la polvon de la landvojoj, kaj iĝis ege granda malhelo kiel nokte. La ventego disŝutis la polenon de la pinarboj kaj la estiĝantaj pluvogutoj portis la polenon sur la flankojn de la domoj. Pro la ruĝaj polenoj sur la domoj estiĝisbuntaj makuloj kvazaŭ estus ili sangomakuloj. Ĉiuj terurate kriis: „Rigardu, sango falas el la ĉielo!” Baldaŭ tondris kaj fulmis, la fulmoj lumigis la teron kvazaŭ skurĝante tiun. La homoj pensis, ke alvenis la tempo de la lasta juĝo.

Sed la uragano disŝutis la nubojn kaj ankoraŭ ne estis krepusko, kiam iĝis serena ĉielo kaj la loĝantoj vidis iun grandan kometon, kiun ili ĝis nun ne povis vidi pro la nuboj. La mezo de la kometo tie haltis, kie la suno subiris. La krepuska ruĝa lumo ne estis kapabla senigi la sunbrilon kaj ŝajnis kvazaŭ ĝi mortigus la sunon kaj baniĝus en la sango de la suno.

La vosto de la kometo estis ege longa, preskaŭ enkovris la ĉielon, ĝia fino estis larĝa kaj kurba kiel turka glavo. „Tie estas la glavo de Dio!” – la homoj balbutis timante tiun. Tiu fenomeno videblis tage-nokte dum du semajnoj, sed tage videblis pli klare, ol nokte. Ĝi estis ege pala, kvazaŭ ĝi estus malsana, kaj oni povis rigardi al la suno propraokule sen okulvitroj. La popolo timis la eksterordinaran fenomenon. Kiam la senkonssciaj homoj pro senscio blinde teruriĝis, tiam proksimiĝis la tempesto kaj ili kapablis fari ĉion por liberiĝi de la timo.

Tiutempe la pastoroj de Transilvanio mirinde pruvis la forton de la enigmo. La temploj tuttage estis malfermitaj antaŭ la geloĝantoj kaj la pastroj instigis la homojn por eniri kaj preĝi. Ĉiutage kvarfoje ili diris predikojn kaj la homoj antaŭ la templo aŭskultis tiujn.

Ĉiuvespere la templo pleniĝis de homoj, ankaŭ ĉe la pordo sidis homoj. Antaŭ la pordego de la templo staris Kolozsvár-anoj, sikuloj sidis sur la ŝtupoj kaj post la kantado ili ekparoladis pri diversaj aferoj.

– Ni povas paroli nur pri tio – komencis la paroladon iu sikulo – via vivo estas ankoraŭ bona, sed ĉe ni estas male. Nur vi vidus!

– Ĉu ĉe vi videblas la glavo de Dio? – demandis iu juna knabo.

– Ne nur tio estas videbla, mia fraĉjeto, sed ni ankaŭ sentas ties efikon. Ni ne enlitiĝas sen la aŭskulto, de la preĝo dirota dum horo de nia morto legata de nia iu servisto, kiun ni diras kune kun niaj geservistoj.

– Ĉar ni vivas en malica tempo, ni povas vidi dum ĉiuj noktoj la ruĝecon de la fajro.

– Kio ĝi estas?

– Tiam, mia filo, iu setlejo forbrulis. Oni diras, ke en la lando estas multe da bruligaj banditoj kaj ni neniam scias, kiam forbrulos la tegmento super nia kapo.

– Mia Dio, gardu nin de tiuj.

– Ĉu vi aŭdis, ke en Háromszék la edzino de la valaĥia ŝafisto naskis infanon havinta du kapojn, tri nazojn kaj sur ambaŭ manoj estis dek ses fingroj krome ĝi havis dentojn kaj barbon? La edzino pro tio abrupte mortis. Feliĉo estis, ke la infano ne restis vivanta. Tiun, sinjoro Gencseri volis meti en etilalkoholon, sed la homoj ne lasis fari tion, ili volis entombigi la bebon malproksime de la setlejo. Oni entombigis la novnaskiton sekrete ĉe la fino de bieno de iu sakso de Braŝŝo. Kio okazis poste? Tio okazis, ke sur la bieno de la sakso ne tritiko produktiĝis, sed sekalo.

– De ĉie oni povas aŭdi pri strangaj okazintaĵoj – parolis iu metiisto, faranto de mielkukoj de Kolozsvár – mi parolis hieraŭ kun la edzino de iu valaĥo, kies edzo per floso volis porti fromaĝon al Torda¹⁴⁷ sur la rivero Jára. Post unu tago la rivero komencis reflui kaj hejmenportis la valaĥon. Kvankam la pastoro klarigis la aferon tiumaniere, ke la rivero Aranyos, en kiun fluas la akvo de Jára, estis inundita kaj ties akvo reen kondukis la akvon de Jára. La dia providenco reportis la valaĥon, ĉar se tiu irantus plu, tiam li renkontiĝus kun tataroj, kiuj certe mortigus lin.

– Mi jam multon travivis – parolis la sama maljunulo – militon, peston, inundon, fajron, sed mi timas ion: mi timas la tertremon, nome tiam ne eblas iri en la preĝejon por preĝi.

– Sed ni ne povas eldanĝeriĝi – diris la sikulo – nome mi multfoje aŭdis, kiam mi ĉasadis urson, ke la monto muĝas sub mi, kvazaŭ iuj ruladus barelojn. La ursoj timas tion kaj elkuras el siaj grotoj, ili estos mildaj kaj mi povas kapti ilin. Sed ankaŭ mi ektimis. Tio okazis ne antaŭlonge, ke apud iu sikula setlejo la monto komencis moviĝi kaj sur tiu la domaĉoj moviĝis. Tiuj moviĝis tri tagojn kaj atingante la alian monton ili ekhaltis. Unue la homoj ĝojis, ĉar la ĝardenoj venis pli proksimen. Sed la ĝojo pasis, nome la tie estantan rivereton tiuj du montoj ne lasis flui plu kaj tiuj ŝlimon portis sur la setlejon. La domojn enkovris la ŝlimo kaj la homoj devis forlasi la domojn. La akvo de la rivereto ĉiam pli kaj pli vaste inundis la setlejon kaj nun nur la kuprokoko de la turo de la templo estas videbla.

Subite la pastoro komencis paroli ege laŭte kaj la homoj finis la paroladon kaj aŭskultis la oratoradon de la pastoro.

Sinjoro Magyar, la pastoro tre forte riproĉis la ĉeestantajn sinjorojn:

„Dio prepariĝas batali kontraŭ vi, ĉar vi prepariĝas batali kontraŭ Li. La packont-rakton vi ĉiam rompas pro kio vi havos militon en – kaj eksterlande. Pro tio vi diros: sufiĉas jam mia Di-sinjoro! Kaj vi ne ekscios la finojn de la militoj kiujn vi ekirigis stulte.”

¹⁴⁷ Torda estas urbo en Rumanio. Pri Torda vi povas legi ĉe:
<https://eo.wikipedia.org/wiki/Turda>

(Jam tiutempe sinjoro Magyari sciis, ke sinjoro Teleki proponos al la kunsido de la Parlamento de Szamosujvár la estontan militon.)

Ĝuste nun alvenas du sinjoroj portante marteso-ĉapon. La Kolozsvár-anoj rekonis ilin: tiuj estis Teleki kaj Ladislao Vajda. Ili helpis ilin por la atingo en la templon, sed la sikulo ne konis ilin do li ne iris aliloken lasante libera la vojon por la alvenantoj. Sinjoro Vajda ekpuŝis perkubute la sikulon. La sikulo pro la ĝeno turnis sin al Vajda dirante:

– Ne kubutbatu min, mia sinjoro, ja ĉi tio estas la domo de Dio, ne de iu granda sinjoro, kaj ankaŭ mi estas sama homo kiel vi.

Apud la sikulo starantaj aŭdante la malpacon komencis tranviligi la sikulon, sed tiu iĝis pli kaj pli furioza. Samtempe kun Vajda ankaŭ li klopodis antaŭeniri en la templon por okupi sian benkoparton. Dum tio li kriis al la ĉeestantoj:

– Lasu ilin iri en la templon. Ĉu vi ne aŭdis, ke pri ili temas en la prediko?

Teleki haltis ĉe la sojlo de la templo, demetis la ĉapon. La ĉeestantoj turnis sin al li. Post ĉi tiu intermezo Magyari daŭrigis la riproĉajn vortojn:

„Nun neniu kuraĝas paroli kontraŭ vi, nome vi koleras ĉiujn. Ĉiuj klinante sin nomas vin moŝtaj sinjoroj kaj sinjorinoj. Kiam Dio mortigos vin oni diros pri vi: tie estas la infanoj de la sendiaj homoj, kiuj estas edzinoj de la homoj perfidantaj la patrujon. Viaj idoj hontos, ke ankaŭ ili estos malhonoraj. Ĉiuj parolos kontraŭ vi kaj diros al siaj idoj, ja ilia patro perfidis Transilvanion kaj sendis nin por batali.”

– Foriru ni de ĉi tie, mia sinjoro – diris Ladislao Vajda al Teleki, ĉar lin rimarkis sinjoro Magyari, la pastoro, ja tiu parolis pri li.

– Ni restas ĉi tie – kontraŭis Teleki – tiu pastoro pravas, sed tio signifas nenion.

„Kien vi volas iri, stultuloj, hezitantaj? – Magyari daŭrigis – Kiu havos la respondecon, ke viroj kaj virinoj de Transilvanio iĝis senhejmuloj, la edzinoj iĝis vidvinoj kaj la infanoj iĝis orfaj? Tiel okazos ĉe vi kiel ĉe la dromedaro, kiu iris al Jupitero por ke tiu donu al ĝi kornojn, kaj Jupitero tranĉigis eĉ ankaŭ ĝiajn orelojn.” –

– Tio povas okazi ankaŭ pri mi – flustris Teleki al Vajda – sed ni foriru.

La pastoro rimakis ke la du ĉefsinjoroj kritikis lian parolon. Dum lia frunto sulkiĝis li diris:

„Kiam mortis reĝo Ludoviko ĉe Mohács, tiam la sultano portigis la kadavrojn antaŭ sin kaj rekoninte la kadavron de iu satanulo, nomita Szalánczi, tiam li batis per bastoneto tlon kapon de la kadavro dirante: – Se vi ne vivintus, hundaĉo, tiam tiu pia infanaĝa reĝo ne mortintus. Donu Dio, vi ne havu saman sorton pere de la fremda nacio.”

Teleki skuis la kapon kaj diris mallaŭte:

– Tiun sorton ankaŭ mi povos havi, sed tio nenion ŝanĝos.

Baldaŭ aŭdeblis denove la kanto de la ĥoro, ambaŭ ĉefsinjoroj volis foriri sed la homoj ĉirkaŭprenis ilin, el inter kiuj la jam menciita sikulo persiste iris post tiuj laŭdante la predikon de Magyari laŭte dirite al Teleki kaj Vajda:

– Ĉi tio estis la vera prediko! Ĉi tiel oni devas riproĉi la sinjorojn! La pastoro pravas. Kial ili faras militon? Kial ili batas Transilvanion, se ili havas malbonon? Kial ni okupiĝas pri vagabondaj fremduloj? La fremduloj venis al ni maldikaj kaj bone dikiĝis. Jam nun ili ne povas riĉiĝi plu kaj ni devas ilin elteni.

Sinjoro Vajda jam ne estis kapabla toleri la persekutadon kaj paroladon de la sikulo. Li turnis sin kaj kriis al la sikulo:

– Malaperu de malantaŭ mia dorso, malbenita adultido! Ne boju ĉi tie kiel rabia hundaĉo, kiam vi vidas homojn pli bravajn, ol vi.

Efike de tiuj vortoj la sikulo fierege levis la kapon kaj respondis:

– Ne estu orgojla, mia atestimata sinjoro, ĉar ankaŭ min ne ĵus elkovis la cikonio, ne diru al mi, ke mi estas adultido! Nome se mi hejmeniros por portii mian glavon, mi metos vian kapon en vian mankavon.

Ladislao Vajda volis respondi al la sikulo, sed Teleki prenis lian brakon kaj kunportis.

– Ĉu via ekscelenco pro nenio ekscitiĝas? – demandis la ekscitiĝinta ĉefsinjoro Vajda.

– Ni lasu lin murmuri: li estos bona soldato. Ne diskutu kun la sikulo, ĉar tiu estas pli saĝa, ol alia homo.

Poste ambaŭ sinjoroj malaperis sub la volbo de la pordo de la palaco de la regnestro.

Ankaŭ la regnestro partoprenis la dumtempe okazintan oratoraĵon kaj akceptis ties instruadon pro kio volis fasti. Li nenion manĝante enlitiĝis kaj tutnokte li havis viziojn, kiam li sonĝis malbonojn. Li vekis siajn paĝojn kaj fine li vokigis la regnestrinon. Li nur tiam trankviliĝis, kiam la regnestrino aperis ĉe lia lito. Li nur rakontis al ŝi malĝojajn aferojn, pro kiuj la regnestrino terurigis, kiom eblis aŭdi ekster la pordo.

Matene la regnestrino foriris en sian ĉambron kaj tuj vokigis sinjoron Teleki, kiu baldaŭ aperis ĉe la regnestrino, ĉar li loĝis en la palaco de la regnestro. Li trankvile sidiĝis en la ĉambro de la regnestrino, spite de tio, ke li aŭdis jam multege da malĝojindaĵoj.

– Mia sinjoro! diris al li la regnestrino. – Apafi fartis malbone nokte.

– Tion kaŭzis la fasto; nome li ne alkitimiĝis al tio. Li ĉiam abunde vespermanĝas, sed nun, ke li ŝanĝis sian kutiman vivordon, por li tutegale estas kaj trosate dormi kaj malsate.

– Sed estas plej malbone sonĝi, se la animo havas ŝarĝojn. Mi pasigis la tutan nokton apud lia lito, li ne lasis min foriri, konstante tenis mian manon. Li rakontis terurajn aferojn, kiajn tiu kutimas diri, kiu havas tifon. Li diris, ke li nokte staris antaŭ la tribunalo de Dio kie ĉirkaŭ iu granda longa tablo sidis sinjoroj Denizo Bánfi, Béldi, sinjorino Béldi, Aranka Béldi kaj la pli aĝa filo de sinjoro Béldi, kiuj mortis en malliberejo. La aliaj estis por li same tre konataj, kiel Kapi, pli juna Korniŝ, pli aĝa Bethlen. Ili rigardis lin perfingre montrantaj al li lin akuzante. Tio estis ege terura sonĝo.

– Ĉu laŭ vi mi estas klariganto de sonĝo? – demandis Teleki ĉagrene.

– Mia sinjoro, tio ne estas sonĝo klarigenda, sed estas vizio, ĉiela aperaĵo.

– Tio eblas. La animoj de la menciitaj sinjoroj jam estas en la ĉielregno kaj povas esti, ke multe da sinjoroj postiros ilin.

Ilia animo iras tien. Kien iras ilia sango?

– Diru tion, ke ilia sango iras sur mian animon! Ja mi kaŭzis ĉiujn mabonojn en Transilvanio. Ĝis nun, ĉi tie loĝis mildaj homoj en la imperio. En ties vejnoj fluis ne sango, sed lakto kaj mielo. Mi instruis al ili la skermadon per glavo. Dum la regado de reĝo Sigismundo, Bethlen, Bocskai, Georgo Rákóczi nur kvindek mil homoj mortfalis kaj laŭ la ĝenerala opinio ili estis la veraj patriotaj. – Sed mi sopiris la kronon, pro kio mi prenis glavon, pro tio mi estas mortiganto kaj respondeca por tiuj, kiuj mortis senbatale.

– Vi, mia sinjoro, ne volis batali por Transilvanio.

– Vi, mia sinjorino, deziris komenci batalon nome de viaj hungarlandaj parencoj. Do, ŝanĝiĝas la tempoj kaj ŝanĝiĝas la homoj.

– Tiutempe mi ne sciis, ke la deziro kaŭzos la morton de multe da homoj.
– Tiuj timis la batalon kaj mortfalis antaŭ la bataloj. Kiu staras antaŭ la neĝlavango, por haltigi tiun, tiun la lavango kunportas. Nun la sortoj de landoj estas riskataj kaj ne la sorto de homoj. Apafi estu trankvila: laŭ Dio ni ambaŭ estas sensignifaj homoj kaj ankaŭ sen ni povas okazi la neniiĝo de la patrujo. Niaj blazonoj kaj sloganoj estas samaj: Tiuj de Apafi estas: „La sorto ektrovas sian vojon.” Tiuj de mi: „La akvoguto kavigas la ŝtonon.” Fidu nin laŭ niaj sloganoj.

SinJORINO Apafi meditante rigardis tra la fenestro kaj dronante en pensoj diris:

– La familio Béldi havis malfeliĉan sorton. Kiom da homoj devas morti same?

– Mia moŝta sinJORINO! – respondis Teleki – kiam estas seka vetero, tiam la homoj preĝas por pluvo, sed neniue demandas, kio okazos pri la veturantoj, kiujn atingas la pluvo dumvoje. Povas esti, ke kelkaj malvarmumas kaj mortas.

– Mi ne komprenas la metaforon.

– La lando ankaŭ nun petpetegas por pluvo, por sangopluvo kaj Dio certe donos tion. La miraklojn kredu la popolo, sed mi kredas la instruadojn de la tempoj, kiujn observas la pensanta homo. Tiutempe estis en Transilvanio unu partio, kiu volis la pacon kaj volis regadi, kiu postulis gardi tiun pacon kaj aliancis kun la sultano kaj la romia imperiestro. Foje Denizo Bánffy kuraĝe diris al mi, ke tiu partio estas mano havanta cent fingrojn, kiu elpremas min kiel spongon. Poste tiuj fingroj defalis. Mortis Denizo Bánfi. Oni diras, ke ankaŭ lin mi mortigis. Ankaŭ tion oni diras, ke mi mortigis Johanon Bethlen, sinJORON Kapi kaj Gabrielon Korniš. Tiuj mortigis ilin, kiuj en la divano kontraŭis la batalon kaj la monhelpon. Paŝaon Kuĉuk ĉe Lippa oni mortpafis, Küprili¹⁴⁸ mortis pro la dikeco kaj la plej juna bejo, Feriz freneziĝis.

– Ĉu Feriz freneziĝis? – kriis sinJORINO Apafi, kovrante sian vizaĝon. – Li ege amis Transilvanion, li estis nobla brava junulo.

– Ĉu ne Dio faris tion? – demandis Teleki.

– Ne, mia sinJORO – respondis sinJORINO Apafi doloreme ekstarante kaj paŝante al Teleki – tiujn aferojn vi faris. SinJORON Denizo Bánfi vi senkapigis, sinJORON Béldi vi forpelis en malliberejon kaj lian familion vi kaptigis. Tiujn vi liberigis nur tiam, kiam ili estis mortaj malsanuloj. Bejo Feriz pro tio freneziĝis, ĉar li amis filinon de Béldi kaj ŝi mortis.

– Nu, ĉio estas en ordo! – diris Teleki – ĉiuj malbonaj aferoj devenas de mi. Kredu, ke la brulanta kometo, kiu estas la glavo de Dio laŭ la popolo, estas en mia mano kaj mi surbategos per tiu la Teron pro kio okazos tertremo.

Nun subite la palaco ekskuiĝis. La registrestrino ŝrikante eksaltis:

– Aĥ! Kio okazis? – Ŝi demandis morte pale.

– Tio estas tertremo – respondis Teleki trankvile – ni ne devas timi tion, ja la palaco estas ege forta konstruaĵo. Sed vi povas stari ĉe la pordo, tiu ne falegos.

La registrestrino ne kapablis moviĝi pro la timo.

La plej terura fenomeno estas la tertremo. La ŝipisto kapablas apogi sin al la ŝipo, sed la homo nenien kapablas fuĝi de antaŭ moviĝo de la tero. Estas malfacile senti, ke la tero, kiu donis niajn nutraĵojn kaj toleris niajn pekojn, subite koleras kaj ribelas kontraŭ la homoj. Ĉiuj elkuregas el sia domo, la paŝtigantaj brutoj blekegante kuregas en la urbon, el la putoj fluas sulfura akvo, la arboj defalas el la tero kaj la sonorilegoj sonoras anoncanta incendion.

¹⁴⁸ La plena nomo de paŝao Küprili estis Küprili Amhát. La batalo apud Szentgotthárd okazis la 1-an de aŭgusto en 1664. Bildojn bv. rigardi ĉe:

[https://hu.wikipedia.org/wiki/Szentgotth%C3%A1rdi_csata_\(1664\)](https://hu.wikipedia.org/wiki/Szentgotth%C3%A1rdi_csata_(1664))

La regnestrino rekonsciiĝinte estis kapabla alparoli:

– Dio gardu nin. Mi hastas al la regnestro. Ĉu vi ne venos tien?

– Mi restas ĉi tie – diris Teleki aplombe. – Mi estas ĉie en la potenco de Dio kaj kiam li vokas min, tiam mi prenas la respondecon por miaj agoj.

SinJORINO Apafi hastante kuris al sia edzo kaj kunportis lin el la moviĝanta koridoro en la ĝardenon de la palaco.

Terura estis vidi, ke la granda palaco moviĝas pro la tertremo. Estis atendeble, ke la palaco povas ruiniĝi.

La regnestro ne vidis sinJORON Teleki, la regnestrino diris al sia edzo, ke li estas en sia ĉambro.

– Vokigu lin! – kriis la regnestro, sed neniuj estis, el tiuj ĉirkaŭ li, kiu irus por Teleki.

Nome ĉiuj homoj estas kuraĝaj, se oni batalas sen glavo, aŭ devas iri sur iun altegan turon, aŭ devas iri per boato sur la ondanta maro, sed dum la tertremo ĉiuj estos malkuraĝaj.

Dume Teleki silente sidis ĉe sia skribotablo kaj skribis leteron al Kara Mustafa, kiu okupis la lokon de la mortinta Kŭprili. Li estas helpanto de la sultano, batalema viro, kiu pere de la kozakoj neniigis multe da polaj urboj kaj poste mortigis cent mil polojn; pli malfrue la tricent mil kozakoj iĝis sklavoj de li.

Teleki skribis tiun leteron al Kara Mustafa por ke li helpu la hungarojn. La mebloj moviĝis en lia ĉambro ĉirkaŭ li, la seĝo elglitis de sub li, la skribotablo moviĝis kaj nur malfacile li kapablis skribi. Sub la tekston li skribis la sekvon:

„Si fractus illabatur orbis impavidum ferient ruinae./Eĉ se l' mondo ruiniĝos, mi ne teruriĝos.”

Mustafa povis cerbumi, kial Teleki skribis sub la tekston tiun noton, kiu ne apartenas al la teksto. Teleki preskaŭ senkonscie skribis tion.

Kiam pasis la ektimiga tertremo, tiam la paĝioj reiris en la palacon, Teleki prenante la sigelitan leteron riproĉe diris al unu paĝio:

– Kie vi estis? Eĉ unu mi trovas nenie el inter vi kiam estas bezonate. Ĉi tiun leteron du rajdistoj portu al Várna¹⁴⁹, al la ĉefveziro. – ordonis transdonante la leteron.

Poste li komencis promeni en sia ĉambro, kvazaŭ nenio okazintus.

¹⁴⁹ Varna/Varno estas urbo sur la bordo de la Nigra Maro. Pri ĝi vi povos legi abunde ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Varna>

30. La frenezulo

En la plej sekretaj ĉambregoj de la divano kunvenis la veziroj pro ege grava temo. La temo estis la komencenda batalo. Pri tio ili devis decidi. Nome Mohamedo eldiris, kiel Alaho estas la unu sola Dio en la ĉielo tiel same sur la tero nur estu unu sinjoro. Multe da homoj kredis, ke tio nun realiĝos.

La saĝuloj de la lando, la honestaj konsilantoj Kuĉuk kaj Küprili estis jam mortintaj nun Kara Mustafa, la ĉefveziro, la tro fiero, aliulojn malrespektanta, ĉagrene orgojla homo prezidis dum la kunveno de la divano. Li kapablis influi la membrojn de la d'ivano, en kio ĉiuj jesis lian volon.

Ankaŭ mem la sultano partoprenis la kunvenon. Li estis bela viro, sed laŭ la vizaĝtraĵoj estis trolaciĝinta. Longaj malhelaj okulharoj kovris liajn grandajn okulojn; la densa brila barbo disterniĝis sur lia brusto kaj renkontis tie lian densan nigran lipharon. Li ne parolis dum la kunveno. Senmovaj estis liaj trajtoj. Li aspektis kiel mortinta figuro.

Unu post la alia venis la delegitoj de eksterlandoj: oratoro de reĝo Ludoviko la 14-a, diris, ke per la plena militforto atakos la franca reĝo la romian imperiestron se ankaŭ la sultano atakos tiun, tiukaze ne nur Hungarion sed ankaŭ Vienon li povos okupi de tiu.

La sultano silentis, ne alparolis. Anstataŭ li la ĉefveziro respondis, dirante, ke Hungario delonge estas provinco de la sultano kaj certe ankaŭ Polujo kaj Vieno havos saman sorton. *La sultano volas vidi en la mondo nur impostpagantajn reĝojn.*

La delegito kun miro aŭskultis tiujn vortojn konsiderante, ke ankaŭ Francujo ekzistas en la mondo. Baldaŭe li foriris.

Poste venis delegitoj de Emeriko Thököly, kiuj proponis al la sultano la oferon de sangoj kaj glavoj de la hungaraj malkontentaj grumbladantoj, se la sultano helpas reokupi Hungarion.

Anstataŭ la sultano denove Mustafa respondis:

– La sultano dankas pro la servado kaj helpas al vi tiam, se vi helpas al li reokupi Hungarion.

La delegitoj ekkomprenis, ke la du frazoj estas inversigitaj, sed ankaŭ ili havis postopiniojn. Ili rigardis unu la alian ridetante kaj foriris.

Poste alvenis la delegitaro de Transilvanio. Ili estis afablaj, karaj sinjoroj, kies porparolanto elokvente diris, ke Miĥaelo Apafi estas volonta invadi kun la nobeloj de Transilvanio Hungarion. Mustafa respondis:

– La sultano, la grandsinjoro permesas, ke vi helpu al viaj hungaraj kunuloj.

La oratoro ankoraŭ volis aŭdi pri donoj de hungaria krono al Miĥaelo Apafi kaj palatina ofico al Teleki, sed li vane atendis tie senvorte, kaj fine la sultano mansignis, ke ili povas foriri.

Do, la turka politiko estas skribita artifike turklingve!

Post la fremdlandaj delegitoj venis la heroldoj de paŝaoj kaj veziroj de la fortikaĵoj de Hungario. Tiuj raportis pri teruraĵoj. La paŝaoj de Buda kaj Érsekújvár plendadis kontraŭ la detruadoj de la germanaj gardistaroj de Fülek, Győr, Ŝelmec. La vaste konata rabisto Francisketo Kökényesdi forrabis iunokte ĉevalaron de la paŝao de Nagyváras kaj kunportis al Böszörmény. Poste la gardistaro de Nagykálló mortigis

apud la urbo militvagadantaj Saráč-anojn¹⁵⁰ kaj portis iliajn orelojn por montri al la paŝao. Eĉ kelkaj aŭdacaj bravuloj de la gardistaro de Füle kuregis ĝis la eksterurbo de Buda, kie ili kaptis bejon Iffim dum banado kaj ili surverŝis lin per brogaĵo tiome, ke lia haŭto deskvamiĝis.

La veziroj terurigante kriadis aŭdante la terurajn famojn, nur la sultano restis en silento.

Fine la ulemoj¹⁵¹, la religiosaĝuloj venis, kiuj devis decidi pri multo. Ili povis decidi, ke ĉu la paco estas rompebla pli frue, ol la atingo de la fino de la preparolita dato de la armistiko. La konsilantaro de la religiosaĝuloj estis la plej supera tribunalo.

Ili venis antaŭ la dĭvanon solene. Antaŭe venis la muftio¹⁵², la plej supra fakspertulo pri la kono de la islambazaj religiaj juraj reguloj kaj leĝoj. Li portis longan talaron, felĉapon, havis blankan barbon atinganta la talion. Poste venis du imamoj. Unu kunportis leteron fermitan en purpura ujo, kies sigelo kuŝis en granda ora skatoleto pendinta sur fino de orfadeno; la alia imamo pene portis iun ege grandan libron. Tio estas la „Korano.”¹⁵³

Tiu libro estas bela, dika kaj simila al la iama „corpus juris” (leĝo libro), kiu enhavas akuzantajn, defendantajn, kondamnantajn frazojn pri la procesaj aferoj.

La imamo portis tiun leĝolibron al la sultano kaj al la veziroj, kiuj kisis ĝin. Poste tiu mansignis al unu imamo¹⁵⁴ por surgenuiĝi antaŭ benketo de la dĭvano kaj stari mane – piede. Tiu nun metis la sanktan libron sur la dorson de la imamo kaj legis el ĝi frazojn.

Tiu muftio tute bone konis la enhavon de la sankta libro kaj scipovis vicigi kiuj estas skribitaj sur ĝiaj paĝoj. Li okupiĝis sepdek jarojn pri tiu libro kaj kiel li diris, li septcent naŭdek trioble finlegis ĝin. Li tuj malfermis ĝin sur tiu paĝo, kie estis la legenda frazo.

– La leĝo diras – ekparolis li favorpiece – „kiu packontraktis antaŭ Alaho, tiun packontrakton nur Alaho povas rompi.” Sed ankaŭ tion diras „kie ajn ni estas kaj kion ajn ni havas, nin kaj nian havaĵon havas enmane Alaho.” Do, tiun pacon nur Alaho povas estigi kaj Alaho povas rompi. „Se iu suferanto petas helpon de vi, tiam ne diru al tiu, ke morgaŭ vi helpos. Se tiu petas almozon, tiam ne diru, ke hodiaŭ vi ne povas doni.” „Se iu volas mortigi iun homon antaŭ vi, kaj vi dirus, ke vi morgaŭ povos helpi, ĉar hodiaŭ vi ne povas uzi la glavon, ĉar tion vi promesis, la rompo de via promeso malplie endanĝerigas vin ol la teno de via promeso por ne eltiri vian glavon.” Poste diras la libro: „La regantoj devas helpi la feliĉon de la popoloj, sed plej prefere devas laŭdi Alahon.” Kaj fine estas skribita „kiu aliancas kun nekredantoj, tiu batalas kontraŭ Alaho. Nome kun la popoloj de la mondo vi vane aliancas, Alaho atakas ilin kaj neniigas ilin, kaj reĝojn kaj almozulojn.”

¹⁵⁰ Tiuj Saraĉ-anoj loĝis plejparte en la setlejo Szárazd, sed onidire ili nomis sin saraĉoj, kvazaŭ tiu loko estus memstara setlejo de kie ili devenas – noto de la tradukisto.

¹⁵¹ Pri la ulemoj/islamaj religiosaĝuloj posedantoj de la scio vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Ulemo>

¹⁵² Pri la vortoklarigo mi sciigis ĉe: <https://wikiszotar.hu/ertelmezo-szotar/F%C5%91mufti>

¹⁵³ Korano estas la sankta libro de Islamo, pri la religio de Mahometanoj. Pri ĝi vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Korano>

¹⁵⁴ La imamo estas rekonata religia gvidanto, (gvidanto de preĝadoj kaj diservoj en la moskeoj), instruisto, gvidanto de muslimreligiaj komunumoj. Pli abunde bv. legi tie: <https://hu.wikipedia.org/wiki/Im%C3%A1m>

La veziroj kaj ulemoj pri juĝo ĉe ĉiuj frazoj klinis sin ĝisteren. Mustafa sangosoife ridetis, kiu rideto ĉiam pli kaj pli groteskiĝis kaj tiu ekkuŝis surventre sur la tapiŝon kaj ĝojante kisadis la talaron de la ulemo.

Poste la muftio elprenis el la purpurujo la dokumenton de la packontrakto, la pergamenon disfaldis kaj iu imamo montris al la veziroj ĝian tekston. La teksto estis longa, riĉe ornamita, la inicialo estis granda kiel iu figurita fortikaĵo, ĉirkaŭ tiu estis pentritaj floroj kaj birdoj. La literoj de la unua vico estis desegnitaj per ultramara bluo koloro, la aliaj literoj estis laŭgrade pli etaj kaj pli palaj sed la nomo de Alaho estis skribita per grandaj orliteroj, la nomo de la sultano estis ruĝaj literaj, la nomo de la romia imperiestro estis malhelverdkoloraj literaj. Sub la teksto videblis la troornamita meandra subskribo de la sultano, kiun li ne povus surskribi ĉiufoje tiel bele, tial li ĉizigis ĝin en oran fingroringon kaj nun la dokumento estis premiita per ĝia arta premaĵo.

– Jen ĉi tie estas la packontrakto – diris la muftio montrante la dokumenton, – de kiu per akvo mi deviŝas la tekston laŭ la ordono de Alaho.

Poste la muftio portigis iun sitelon, en kiu estis speciala erca likvo. La muftio komencis lavi la tekston per spongo pro kio malaperis envice la ruĝaj, nigraj, verdaj literoj. Sed la nomliteroj de la Dio, de Alaho ne malaperis.

La estroj de la dīvano estis en silento kaj gapis la blankan pergamenon.

Poste la ulemo prenis glavon, kiun li levis al la ĉielo kaj diris:

– Forigante la skribon, kiu malhonoris la nomon de Alaho, mi ĉi tiun pergamenon dispecetigos per ĉi tiu glavo.

La pergamenon, kiun prenis la imamo, la muftio dispecetigis poste metis ties pecojn en iun kaserolon kaj verŝis sur tiujn naftooleon dirinte:

– Mi ĉi tiun pergamenon bruligas antaŭ Alaho!

Li per brulanta kandelo ekbruligis la pecojn de la pergamenon en la kaserolo, el kiuj unue estiĝis flamo kaj fumo, sed post kelkaj minutoj ĝi cindriĝis.

– Nun mi disŝutos la cindron en la aeron – diris la muftio kaj la cindron portis al la fenestro de la palaco kaj ĝin disŝutis. La paperĉifonaĵoj flugis kiel nigraj papilioj kaj la vento portis ilin al la Bosporo-markolo.

Tion vidante la paŝaoj, veziroj eksaltis, prenante la glavojn entuziasme ĵuris je la barbo de la Profeto, ke ili batalos ĝis videblos la Duonluno sur la turo de la Sankta Stefano-preĝejo de Vieno.

En la sama momento oni flankentiris la tapiŝojn de la pordo kaj paŝis en la konferencejon bejo Feriz. Malfacile eblis rekoni la junulon. Lia turbano kovris lian frunton, li estis melankolia, lia mantelo ne estis butonita, lia talaro pendis sur la ŝultroj, sur lia glavo ne estis tenilo, kiu estis en la glavingo. Neniu malhelpis lin veni en la konferencejon. Kiam li enpaŝis tien la ulemoj terurigaflanke flankenstarigis. La junulo atingante la mezon de la ĉambrego rigardis la vezirojn, kunmetis siajn brakojn, kvazaŭ li volus konstati la nombron de la ĉeestantoj. La veziroj kaj ankaŭ la sultano ekstaris antaŭ la junulo kaj atendis tremetante liajn vortojn. Pri *la frenezuloj* en la orientaj landoj ĉiuj kondutas terurate. Se iu freneza fakiro haltigas la plej elitajn kalifojn kaj ordonas al tiu deĉevaliĝi kaj ŝanĝi vestaĵon, tiam tiu ne kuraĝas kontraŭdiri, sed plenumas la deziron de la frenezulo, ĉar tiu havas fremdan spiriton al li senditan de Dio.

Des pli kruela estas la vivo, kiam la spirito de frenezo trafas kuraĝan kavaliron, kiu estis elstara militestro, kiel bejo Feriz, kiu en sia dudek-sesa jaraĝo venkis en cent bataloj kaj per sia braveco hontigis maljunajn estrojn. Li iradas kiel frenezulo sur la

stratoj kaj teruradas siajn parolpartnerojn per siaj vortoj, pro kio tiuj ne povas dormi. La junulo silente, milde rigardis la ĉeestantojn kaj emociante ekparolis:

– Pardonu min, moŝtaj sinjoroj, ĉar neatendite mi aperis. Ni havas neniun komunan aferon pri viaj aferoj. Mia mondo mortis: kiun mi amis, tiu foriris al la ĉielregno kaj estas fore de mi. Mi iĝis senkora, sensenta. Mi ne sopiras la amon, kuraĝon, gloron. Multfoje mi kriegante al la muroj ĉion neniigas, sed ili ne estas kulpaj. Poste mi kuŝas kiel mortinto. Mi petas vin, kiuj iros en la paradizon baldaŭ, ke vi portu mian mesaĝon tien.

La sinjoroj terurigante aŭskultis la vortojn de la frenezulo kaj paliĝis. Feriz ne rimarkis la teruran efikon sur la vizaĝoj de la sinjoroj.

– Diru al tiuj, kiujn mi amis kaj kiuj havas mian koron, ke ili redonu mian koron, ĉar senkore mi estas ege malsana. Mi ne sentas la odoron de la rozo, ne ĝuas la guston de la vino, ne sentas la varmon de la fajro kaj sunradio, ne entuziasmigas min la batala klariono kaj blekado de la ĉevaloj. Moŝtaj sinjoroj! Diru ĉi tion en la paradizo, kien baldaŭ vi foriros.

Ĉeestis Mustafa, paŝao Rizlân, bejo Ajas, agao Rifât, Kara Ogli, kaj aliaj, kiuj longan vivon volis vivi.

La sultano ege ŝatis bejon Feriz kaj alparolis kvazaŭ li estus lia patro:

– Kara mia filo! Rekonsciiĝu, ne forĵetu la glavon, ja miaj veziroj ekiras por konkeri la landojn de la mondo. Iru kun la armeoj batali kaj vi retrovos vian heroan koron kaj saniĝos.

Bejo Feriz ridetis, sian kapon movis antaŭen-malantaŭen, kio signifis neadon laŭ la turka kutimo. Via batalo ne povas esti sukcesa, ĉar Alaho malbonigos tion. Nome vi batalos favore al murdistoj, intrigistoj kaj patrujon perfidantoj. Mi derompis la tenilon de mia glavo kaj deĵetis ĝin por ne batali per tiu en tiu batalo kiu estis komencita pro ilia intereso, en intereso de tiuj kiuj kaŭzis la morton de miaj amatoj.

La junulo ruĝiĝis efike de tiuj ĉi pensoj, en liaj okuloj videblis la frenezeco. Poste li ekstaris antaŭ la sultano kaj aŭdace kriis:

– Via batalo estos malvenka, ĉar viaj veziroj estas senpovaj, viaj soldatoj estas malkuraĝaj, viaj aliancanoj estas perfiduloj, viaj saĝuloj estas frenezaj, viaj pastoroj estas sakrilegiistoj kaj vi estas ĵurrompisto!

Poste kvazaŭ li bedaŭrus la vortojn diritajn al la sultano, li humile klinis sin al la kaftano de la sultano, ekkisis ĝin kaj mallaŭte flustris:

– Malfeliĉa sultano! Vi devas morti en via junaĝo!

Poste li malĝoje turnis sin kaj ekiris al la pordo. Neniu malhelpis lian foriron. Ĉe la pordo li stumblis ĉe sia glavo, ekgrumblis pro la manko de tenilo de glavo kaj refoje turnante sin frustrante diris:

– Ne pensu, ke mia glavo rustiĝos en la ingo. Alvenos tiu tempo, kiam mi batalos per ĝi. Mi batalos kontraŭ tiuj, kiuj batalos kontraŭ vi. Sed tiam jam, sed tiam vi jam ne ĉeestos, sed vi vidos tiun batalon el la paradizo. Se vi ne kredas miajn vortojn, rigardu la tombejon, kie la vermoj neniam serĉas lumon, sed nun venos por vi. Malfeliĉa juna sultano...

Post la futurvidantaj vortoj la freneza junulo foriris, dum la membroj de la dîvano estis forte embarasitaj. Aŭdinte la omenan futurvidon ili surventriĝis surteren kaj preĝis al Alaho forpeli de ili la satanan spiriton kaj ne lasi duonrompi la armilojn eltiritajn por akiri gloron al Alaho.

31. Utilaj trompiĝoj

La sultano ordonis al la ĉefveziro kaj al la paŝaoj de la limfortikaĵoj ekbatali kontraŭ la romia imperiestro kaj sieĝi la fortikaĵojn de Füleke, Böszörmény kaj Nagykálló kiuj servis per la preteksto por la konflikto.

Samtempe la nobeloj de Transilvanio ricevis la permeson por ataki Hungarion kiam ili findecidos ĝin dum la parlamentsesio de Szamosujvár.

Okazis granda militpreparado ĉie. Kvankam la hungaroj estis malfacile konvinkeblaj batali sen preteksto, tamen kiam ili estis konvinkitaj, ili ne saĝumadis plu. La saĝumadaj homoj alpartianiĝis al la venkanta partio kaj entreprenis esti leŭtenantoj en la armeoj. Tiutempe tio estis la kutimo, ke la ĉefjupanoj, ĉefkapitanoj kaj juĝistoj iĝis la estroj de la soldataro, la kamparanoj iĝis la soldatoj. La sikula plebo iĝis la rajdistoj, la tria klaso de la sikulaj nobeloj iĝis la „infanterio” kaj la ĉefkonsilanto iĝis la ĉefestro.

Ankaŭ Teleki atingis sian celon, por kiu li oferis multe da bonaj patriotoj, ja li iĝis generalo de la armeoj de Transilvanio.

La en Transilvanion kurintaj hungaraj rifuĝintoj salutis lin kiel savinton. Sed li havis jam novan celon okupi la oficon de Eszterházy¹⁵⁵. Kial ne? Ja ankaŭ li estis saĝa kiel tiu, kvankam tiu estis la unua ŝtatviro de sia epoko kaj nacio. Kiam li iris ĝis Füleke¹⁵⁶ ĉiuj akceptis lin kun kaĵolo kaj kuraĝigaj espero, la hungaraj armeoj aliĝis al lia armeo. La pia regnestro ne tre montris sin dum tio, nur restadis en sia tendo kaj legadis, aŭ sian horloĝon malmuntis, poste ĝin kunmetis.

Ĉe Füleke renkontiĝis la armeo de Transilvanio kaj la armeo de Kara Mustafa.

Teleki vestis la regnestron en ornaman vestaĵon kaj kun li kaj lia kortega akompano rajdis antaŭ la tendon de la turka ĉefveziro. Li estis fiero aŭdi la klarigonon de la gardistaro, la ĉefveziro akceptis ilin kunestime kaj lasis ilin kisi la manon. Por ilia fidelo ili ricevis novan kaftanon kaj li lasis ilin por rigardi la turkan tendaron dum akompanis ilin agao, dragomano kaj dek du gardistoj.

Teleki sciis, ke vizito de la turka tendaro estas bona antaŭsigno, ĉar la turkaj militestroj ne volonte lasas viziti la tendaron al fremduloj.

La dragomano montris al la hungaraj sinjoroj detale la tendaron: la entendaran lokon de la agaoj, la husararon, la brigadojn, la lignotabultendojn, en kiuj la pulvo estis konservita, la grandajn piramidojn, kie estis la grandegaj kugloj kaj la diversajn kanonojn. Tie estis multe da diversaj militaj armiloj, kiuj povis neniigi eĉ la tutan kontinenton.

La sinjoroj esperadante iris reen en siajn tendojn sed la regnestro ĝojante pro la militaj antaŭpreparadoj donis grandan festenon partoprenintan ankaŭ la sinjoroj de Hungarujo. Ĉe iu rapide konstruita vestiblo farita el lignotabuloj estis starigitaj la primetitaj tabloj. Fine de la tagmanĝo la sinjoroj ege bone amuziĝis, kaj esperadis la venkon, sed plej bone amuziĝis Miĥaelo Teleki.

La tostoj sekvis unu la alian, en kiujn oni teksis „je sano de la regnestro kaj Teleki”. Apafi jam komencis kredi, ke li povos esti hungara reĝo. Teleki jam sentis sin kiel palatino.

¹⁵⁵ La nobelnomon Eszterházy bonvolu prononci: esterhazi.

¹⁵⁶ Füleke estas urbo en Slovakio. La unua mencio pri la urbo devenis el 1246, pri la fortikaĵo el 1262. Pli abunde vi trovos informon pri la setlejo ĉe:
<https://eo.wikipedia.org/wiki/Fi%C4%BEakovo>

Kio estus la malhelpaĵo? Ja al la unuigita hungara, transilvania, turka armeo ne plu estis malebla venki la armeon de Leopold kaj elpreni de li la landon, kiu venko kaj la packontrakto por la militestroj valorus unu reĝlandon. Teleki pensis ankaŭ tion, se ili povas venki, li povas akiri gravan oficon... Sed li ne pensis pri la plej malbona ebleco kaj ĝuste ĉi tiu ebleco realiĝis pri li.

Ĉar la sorto estas eltrovema kaj la justo-faro de la poetoj estas nur ombro, la sorto ne punas per glavego, veneno, sed saĝiĝas el la eraroj kaj punas la kulpantojn laŭ ilia kulpo.

Teleki estis saĝa viro, kiu estis ege eĉ tro ambicia. Li volis estis heroo de la hungara historio, sed pro tiu sopiro iĝis peka kaj ĉar li multe da patriotoj oferis por la sopiro, li devis puniĝi.

Kiam la sinjoroj plej intense, plej gaje amuziĝis kaj drinkadis, tiam aŭdeblis iu tendara muziko, kvazaŭ la turkoj salutis iun alvenantan regnestron.

La amuziĝantaj sinjoroj tuj eksaltis, kuris antaŭ la tendon kaj gapante kaj surprizate kriis vidante la vidaĵon. Emeriko Thököly alvenis avane de sia armeo, kiu havis dek milojn da hungaroj. La soldatoj estis bravaj, elitaj rajdistoj portantaj dolmanon, surdorse portitan orpasamentan mantelon kaj felĉapon kun tartarfalkoplu-mo. Thököly rajdis kiel iu regnestro kaj liaj estroj estis elitaj ĉefnobeloj de Hungarujo. Lia persona apero estis la plej kavalira inter siaj soldatoj.

Teleki ekvidante ilin iĝis treege malserena. Sed la aliuloj tre ĝojis kaj entuziasme kriis la „vivu“-on al Thököly. Pro tio Teleki kaptuniĝis. La junulon ili vivigis pli entuziasme, ol lin.

Dume Thököly atingis la duopan kordonon de la turkoj kaj inter tiuj li kaj lia akompano rajdis. Antaŭ li la turkoj klinis salute la ĉevalvostajn standardojn. La junulo atingis la mezon de la kordono kiam kontraŭ li venis la kaleŝo de la ĉefveziro. Teleki ĉion vidis bone de iu monteto. Kiam Thököly atingis la kaleŝon de la ĉefveziro, tiam deĉevaliĝis, ankaŭ Kara Mustafa deĉevaliĝis kaj hastante iris al la junulo. Li trabrakumis lin, kisis lian frunton, enkaleŝigis lin kaj portis en sian tendon dum ĝojkriado de la turkoj.

Teleki devis vidi tion! La turkoj pli entuziasme akceptis la junulon, ol lin kaj la regnestron de Transilvanio. Li ĉie vidis gajajn vizaĝojn, ĉi tiuj ridetoj estis mortigaj puŝoj, pro kiuj lia koro premiĝis.

Post duonhoru Thököly elpaŝis el la tendo de la grandveziro. Sur lia kapo estis diamanta diademo, kiun la sultano sendis al li de Nándorfehérvár. Li siamane portis regnestran flagan-bastonon. Post kiam li surĉevaliĝis kaj forrajdis proksime al la tendoj de la transilvanianoj, la hungarlandaj homoj de Teleki ĝojkriadante deprenis la junulon de la ĉevalo kaj surŝultre portis lin reen al lia armeo.

Teleki ne estis kapabla rigardi tiun scenon, li kuris en sian tendon kaj ĵetante sin sur sian liton ploris kiel infano.

Do, ĉio, kion li faris inter danĝeroj persiste, por kio li oferis siajn amikojn, parencojn, saĝulojn, nobelojn, subite neniĝis, ĉar ĉion neniigis iu junulo, kiu ne havas aliajn meritojn, nur kelkajn venkajn batalojn. Do, kion li ne kapablis ekkapti, kion li ne timis pri la milito, ne pri la paco, tion iu junulo neniigas nur pere de lia persona apero. Ĉi tio estis la plej granda puno por li. Ho ve! La sorto estas treege trovema.

Teleki ne montris sin ekster la tendo, sed vespere la regnestro vizitis lin. Li ne volis informiĝi, sed la regnestro ĉion rakontis al li.

– Ĉu vi scias, mia sinjoro, ke la hungaraj sinjoroj ne revenis al ni, sed restis apud Thököly? Nome Thököly ne volis scii pri ni, ĉar li ne aliĝis al ni. Li iris sur la transan flankon de la turka tendaro kaj tie li starigis siajn tendojn.

Teleki ege turmente fartis, ĉar li estis treege furioza.

– Tiel ŝajnas, mia sinjoro Miĥaelo Teleki, ke ni sonĝis pri ormontoj – daŭrigis Apafi joviale – ne al ni oni volis doni la titolon de la hungara reĝo kaj titolon de palatino. Mi memoras la fabelan katon, per kies ungo aliulo elprenis la kaŝtanon el la fajro.

Sinjoron Teleki turmentis la frostotremo. Sed Apafi daŭrigis cinike:

– Mi pli dezirus, se ni estus hejme kaj Denizo Bánfi, Paŭlo Béldi kaj la aliaj sidus apud mi kaj mi aŭskultus ilian parolon.

Teleki iĝis pli furioza, ol antaŭe, kaj plandofrapis, kvazaŭ li dirus: „Ankaŭ tiam mi ne lasas min! Ankaŭ tiam mi ne cedos al la premo!” Poste li acerbe rigardis la regnestron, kiu iradis tien kaj reen en la tendo kaj durvoĉe diris:

– Unu hirundo ne faras printempon! Mi ne enviadas Emerikon Thököly pro tio, ĉar tiuj kelkaj fihomoj aliĝis al li, ja ili estis nur blaguloj. Veraj bravuloj ne postiros lin, ĉar ili povas batali apud la regnestro kaj ne apud iu senpatruja aventuristo!

– Tiukaze estos bone, se via ekscelenco klopodas paroli kun ili, ĉar certe nokte ili turnos sin de vi.

Teleki surpriziĝis, sed tuj ordonis al siaj infanterianoj kunvoki la leŭtenantojn de la hungarlandaj armeoj, kiuj kun Apafi venis al Füleki. Ili venis maleme, senvolonte en la tendon de Teleki. Li parolis al ili du horojn klopodante konvinki ilin resti apud Apafi kaj ke ili faros malbonan aferon, se ili aliĝos al Thököly. Sed la leŭtenantojn tedis jam la parolo de Teleki kaj prefere diris la „vivu”-on, ĉar ili volis liberiĝi de Teleki. Ili jam samnokte aliĝis al Emeriko Thököly. Apud Apafi restis nur la transilvaniaj sinjoroj.

Teleki eĉ nun ne volis kapitulaci, ĉar li ne volis, ke li estu duaranga persono. Li faris la lastan manovron. Li iris al la grandveziro, anoncis sin al tiu. La gardistoj lasis lin enpaŝi.

La grandveziro kaj lia interpretisto estis en la tendo. La grandveziro ekvidante sinjoron Teleki provis fari sian malagrablan vizaĝon pli abomena kaj kolerege demandis:

– Kiu vi estas? Kio estas via nomo? Kion vi volas?

– Mi estas Miĥaelo Teleki, generalo de la armeoj de Transilvanio. Vi povas koni bone, ja hieraŭ mi estis ĉi tie kun la regnestro. (Ĉar ili ne komprenis la lingvojn unu de la alia, la interpretisto devis interpreti la demandojn kaj respondojn.)

– Ĉu vi ne deziras tion, ke mi ekkonu ĉiujn regnestretojn, generaletojn?

La sultano havas multe da servutulaj regnestroj en Eŭropo, Afriko, Azio, kiuj estas pli gravaj homoj, ol vi. Kial mi devus koni vin?

Teleki englutis sian koleron kaj sciis, ke la grandveziro indiferentas pri li, kaj tuj menciis sian temon.

– Mia ekscelenca sinjoro! Mi havas gravan direndon, kiun mi dezirus diri inter kvar okuloj.

La grandveziro furioziĝis.

– Ĉu vi freneziĝis, aŭ estas ebria? Kial vi volas paroli kun mi inter kvar okuloj? Ja mi ne komprenas la hungaran lingvon kaj vi ne komprenas la turklingvon. Ĉu mi ellernu la hungarlingvon por via ŝato? Vi ellernis la studentlingvon, kiun vivantaj nacioj ne komprenas. Vi ellernis la germanan, francan, grekan lingvojn, sed la turklingvon ne kvankam la turkoj estas viaj mastroj kaj defendantoj. Dum cent kvindek jaroj niaj armeoj estas en via lando. Kiu ellernis la turklingvon el inter vi? Niaj

soldatoj ellernis la hungarlingvon, ĉar via lingvo estas gluema, simila al la katomielo¹⁵⁷, kiu troveblas sur la arboj. Pro tio mi diras al vi, ke vi iru hejmen kaj ellernu la turklingvon.

Teleki klinis sin, hejmeniris kaj ellernis la turklingvon. Nome kelkmil talerojn li metis en sakojn kaj kunportante reiris en la tendon de la ĉefveziro.

Nun jam la ĉefveziro ĉion ekkomprenis, kion Teleki diris. La interpretisto interpretis ĉion al li; ke la sultano konfidis la sorton de la hungaroj al la frivola juna Thököly, kiu estis malbona estro de Hungarujo kaj prefere forfuĝis el Transilvanio, lasis perdi siajn havaĵojn kaj ne obeis al la regnestro. Li ribelis kontraŭ du regantoj, sed certe ankaŭ al la tria ne havos fidelecon. Sed Apafi ĉiam estis fidela servutulo de la dĭvano kaj la nuna regnestro estos pli utila, ol Thököly. Apafi helpas la dĭvanon, sed sinjoron Thököly la dĭvano ne devus subteni.

Mustafa finaŭskultis la longan parolon, akceptis la monon kaj promesis pripensi la farendojn. Teleki ne antaŭsciis la efikon de sia parolo al la grandveziro, sed baldaŭ eksciis kion okazigis lia parolo, kion decidis Mustafa. Kiam li atingis en la tendon de la regnestro tuj alvenis iu defterdaro (impostenkasiganta oficisto) kaj dek du rajdantaj gvardianoj. La oficisto anoncis, ke la grandveziro ordonis kunporti sinjoron Teleki katenita antaŭ la konsilantaron de la paŝaoj.

Teleki paliĝis. La malfidela interpretisto ĉiujn liajn vortojn rakontis al Thököly, kiu postulis kompenson de la grandveziro, kiu ne havis rimorson, ĉar de kiu li akceptis la donacon antaŭ unu horo, ties kapon li fordonacis al aliulo.

Teleki sciis, ke li estas homo kvazaŭ ne ekzistanta eĉ estas mortinta.

La situacion vidante la regnestro paŝis al li kaj sian manon sur lian ŝultron metite diris:

– Se mi estus malkuraĝa homo, kion vi pensis kaj disfamigis pri mi, tiuokaze post unu horo vi ne havus kapon. Sed mi pruvas al ĉiuj, ke mi ne estas malkuraĝa.

Poste la regnestro turnis sin al la delegita oficisto kaj diris al tiu decidite:

– Reiru al via mastro kaj komuniku al tiu: Miĥaelo Teleki estas generalo de miaj armeoj kaj estas sub mia defendo. Ankaŭ nun li estas en mia tendo. Kiu pekon iun lian konas, tiu anoncu al mi kaj mi punos lin. Neniu havu kuraĝon enpaŝi en mian tendon kaj bati sinjoron Teleki, ĉar mi promesas, ke la enpaŝanton mi mortbatos. Mi ne lasas humiligi nin, ke fremduloj venu en mian tendon kaj iun ekkaptu en mia tendo.

Dum la oficisto portis la mesaĝon de la regnestro al la grandveziro, Thököly estis ĉe la grandveziro, pro kio ambaŭ sinjoroj aŭdis la mesaĝon kaj jesis. „Ja Apafi tamen estas brava homo.” Ili resendis la impostenkasigantan oficiston por anonci al la regnestro, ke la regnestro diris pravon, li estas inda esti regnestro kaj Miĥaelon Teleki neniu batos en la tendo de la regnestro. Sed se li elpaŝos el tiu tendo, tiam li tuj estos ekkaptita kaj mortbatita kvazaŭ li neniam estintus generalo de Transilvanio. Ankaŭ nun li povas esti dankema al la regnestro, ke li restas vivanta.

Teleki estis neniigita. Lian ambician animon ofendis, ke lin defendas la regnestro. Tiu homo, kiu laŭ la homoj estis malkuraĝa, senpova, nun iĝis kuraĝa kaj Teleki iĝis malgrava homo. Sinjoron Apafi li direktadis kaj nun subite li iĝis malkuraĝa kaj bezonis defendon de Apafi.

¹⁵⁷ La infanoj nomas „katomielo”: la mielaspektan rezino-similan materialon kun flavecbruna koloro kiu defluas el la ŝelo de arboj de kernofruktoj. Tiun materialon produktas vunditaj malsanaj arboj – noto de la tradukisto.

La generalo, Teleki estis neniigita antaŭ si. Li ĉesis esti kuraĝa, saĝa, potenca kaj konvinkiĝis, ke tiu homo, kun kiu li nur subskribigis la dokumentojn komunikante siajn konsilojn, nun iĝis pli saĝa, potenca, kuraĝa, ol li.

La minacita Teleki povis vidi elrigardante el la tendo de la regnestro, ke la minacado de la ĉefveziro estis vera. Nome la malaltranga turka soldata delegito gvatsekvis ĉirkaŭ la tendo de la regnestro kaj atentigis la soldatojn, kiam Teleki forlasos la tendon, tiam ili tuj devas ekkapti lin. La sikuloj mokridis la generalon.

Dume la ĉefsinjoro Teleki komencis pensadi pri la ebleco, ke li kun glavo kuregos inter la turkajn soldatojn, batalos kontraŭ ili ĝis ili lin mortbatos. Poste li neis tiun eblecon, ja tio estus ridindaĵo!

Vespere Emeriko Thököly vizitis la regnestron per infana estimo. Li elkore salutis la estimindan maljunan regnestron kaj volis kisi lian manon sed Apafi ne lasis fari la mankison. Li brakumis la junulon, kisis lian frunton kaj sidigis lin apud sin sur sian militiran tendaran ursoledan liton.

La juna estro petis pardonon pro liaj agoj kaŭzintaj al la regnestro malĝojojn, kiuj fine okazigis, ke Apafi forpelis lin el Transilvanio.

– Mi devus peti pardonon de via ekscelenco. – diris Apafi obeema voĉe.

– Ho, tute ne! Vin ĉiam amis mi, sed viaj satanaj konsilistoj intrigis kontraŭ mi, pro kio vi devis malami min. Sed Dio punos ilin, kvankam eblas, ke mi punos ilin.

– Estu bonanima pri ili kaj se mi batis vin pro ili, tiam pardonu ilin pro mi.

Thököly ion alian ne diris. Li sciis, ke Teleki estas en la tendo, ĉar li vidis lin, sed li ne volis rimarki lin. Laste ne rigardante al Teleki, per voĉo de la plej ekscitita pasia minacado li diris:

– KREDU min, Teleki, vi multfoje intrigis kontraŭ mi, sed mi ne forsendos vin el la tendo de la regnestro, ĉar tiam vi tuj mortus. Ankaŭ nun via vivo dependas de mi, sed laŭ la volo de la regnestro, kiun mi honoras kiel mian patron anstataŭ mia patro, mi ne senkapigas vin, la filon de perfidulo.

Teleki silentis. Kion lia koro diris, tion ni ekscios pli malfrue.

Kiam post la kapitulaco oni transdonis la fortikaĵon de Füleke al la turkoj, tiam la sinjoroj de Transilvanio iris hejmen en sian patrujon. Atingante hejmen Teleki vizitis la preĝejon de Bethlen, kie la cindroj de Denizo Bánfi ripozis. Sur la tombŝtonon de Denizo Bánfi, li surgenuis kaj priploris la noblan patrioton, kiun li oferis por atingi proprajn ambiciajn planojn.

32. Iu viro, kiun sia gardanta anĝelo forlasis

Unu plago sekvis la alian.

En la sekva jaro la sultano kolektis grandegan armeon kontraŭ Vieno, Ankaŭ la armeoj de Transilvanio devis iri tien. Teleki ne volis batali, sed liaj pretekstoj, kontraŭargumentoj ne estis aŭskultitaj. Oni diris al li, se ĝis nun li urĝis la batalon, tiam li nun jam devas batali. *Se plaĉis la komenco, plaĉu ankaŭ ties fino!*

Sed la fino de tiu iĝis ege amara.

La grandegan turkan armeon, ĉirkaŭzoninta la urbon de Vieno, dum unu nokto neniigis la armeo de Sobiesky¹⁵⁸, la heroo. Multe da militekipaĵoj ekposedis la venkanta armeo kaj la turkaj herooj mortis. La armeoj de Transilvanio tamen ne ricevis respekton, ĉar dum sieĝo de Vieno oni lasis ilin kantonmeti ĉe Győr. Teleki ne pasigis senutile la tiean restadon. Dum la stultaj turkoj grimpis sur la remparojn, li pritraktis kun la germanaj generaloj de Győr, ke la venkantoj posedu Transilvanion.

Ĉio okazis laŭ la profetaĵo de bejo Feriz. La turkaj armeoj ĉie malvenkis. La turkoj perdis la fortikaĵojn de Esztergom¹⁵⁹, Visegrad¹⁶⁰, Érsekújvár¹⁶¹. En la fortikaĵo de Nógrád¹⁶² fulmo eksplodigis la pulvon, pro kio la fortikaĵo ruiniĝis kaj la ruinoj entombigis la gardistaron de la fortikaĵo. Fine oni sieĝis la fortikaĵon de Buda kaj antaŭ okuloj de la grandveziro post cent kvindek jara turka regado oni deĵetis de la turoj la turkajn duonlunojn kaj ilian lokon okupis la krucoj. Por la membroj de la dīvano plenumiĝis la profetaĵo „baldaŭ ili ekvidos la paradizon”

Paŝao Rizlân mortfalis ĉe Vieno, la veziron de Buda strangoligis Kara Mustafa post la malvenko, agaon Rifa ĉe Esztergom en la riveron Danubo puŝis la rifuĝantaj armeoj, Kara Ogli mortfalis ĉe Buda. Paŝaon Ajas, Emeriko Thököly murdigis laŭ ordono de la sultano. Post la sieĝo de Buda bejo Olaj portis la silkoŝnureton kaj la purpuran monsakon por Kara Mustafa. La purpuran monsakon tiam li vidis lastafoje, ĉar post la sieĝo de Buda oni metis en ĝin lian kapon.

Kiam jam neniu vivis el inter la mortigendoj, krom la sultano, tiam la popolo de Istambulo iĝis furioza pro la malvenko kaj kune kun la ribelantaj janiĉaroj ekatakis la serajlon, mortigis la konsilantojn de la sultano kaj la sultanon fermis en malliberejon, kie iam li sian fraton suferigis tridek naŭ jarojn. La ribelantoj lian fraton sidigis sur la tronon kaj la pli frua sultano mortis en la malliberejo.

¹⁵⁸ Generalo Sobiesky estis polo, kiu dispelis la tutan turkan armeon ĉirkaŭprenintan Vienon kaj liberigis la urbon en 1683. Lian memoron kapelo gardas apud Vieno sur la riverbordo de Danubo. Pri li kaj la batalo en Kahlenberg vi povas legi abunde ĉe:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Batalo_de_Vieno

¹⁵⁹ Esztergom estas hungara urbo sur la bordo de la rivero Danubo. Pri la setlejo vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Esztergom>

¹⁶⁰ Visegrád estas urbo en Meza Hungarujo. Pri ĝi abunde vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Visegr%C3%A1d>

¹⁶¹ Érsekújvár estas setlejo en Slovakio. Pri ĝi abunde vi povas legi ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/Nov%C3%A9_Z%C3%A1mk%C3%BD

¹⁶² Pri la slovakia setlejo kaj fortikaĵo Nógrád, vi povas legi ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/Nov%C3%A9_Z%C3%A1mk%C3%BD

Ankaŭ tio realiĝis, ke kiuj instigis la turkojn batali, je la fino de la batalo tiuj turnis sin kontraŭ la pli foraj instigantoj. Transilvanio subiĝis al Caraffa¹⁶³ kaj Teleki iĝis grafo de la Romia Imperio, la fortikaĵoj kaj fermitaj urboj lasis eniri la germanajn garnizonojn. La regnestro pagis al la venkantoj unu milionon kaj tricent mil Rejnajn-forintojn, kiujn el la fortikaĵo de Fogaraŝ portis la regnestro al Nagyszeben sur varĉaroj. Teleki ricevis kiel donacon la grafan titolon de la Romia Imperio, krome arĝentan manĝilaron, kies valoro estis dek mil forintoj. Transilvanio iĝis provinco de la romia imperiestro kaj pere de tio ĉesis la kontrakto inter la divano kaj la Romia Imperiestro.

Ĉi tiam vokis Dio al si mem la lastan karan figuron de nia historio, la virtan, bonaniman Annan Bornemissza.

Apafi sentis post la morto de sia edzino, ke ŝi estis lia gardanta anĝelino, konsolantino, lian vivon ŝi heligis kaj post ŝia morto ĉio malheliĝis ĉirkaŭ li.

Ĉiuj zorgoj duoble premis liajn animon kaj koron. Li ne havis rifuĝejon, kien li rifuĝu de antaŭ la malĝojo, li konsumiĝis pro ĉagreno. Li iris de urbo al urbo kiel pafita sovaĝbesto, kiu ne kapablas liberiĝi de la sagovergo. Fine li fermis sin en sian ĉambron kaj dum multe da semajnoj iris nenien. Al siaj vizitantoj li nur plendadis kiel iu infano.

– Mi malsatmortos. Mian havaĵon oni forportis, mi nenion ricevas el la saloimposto, de la minejoj. Mi ne estas kapabla pagi al la peltisto la koston de mia mantelo. Nome mi ne havas monon! Kio okazos pri mia filo post mia morto? La malfeliĉa regnestrido ne havos monon por lerni en la lernejo.

Li komencis freneziĝi, nome li komencis plendi, ke li havas nek trinkaĵon, nek manĝaĵon kaj ne povas dormi. Tuttage li promenis tien kaj reen en la ĉambro kaj deliris. Li diris ĉiam, ke li devas malsatmorti.

Fine la konataj sinjoroj komencis lin sanigi tiel, ke ili donis al li monon, dirante, ke Stefano Apor, Paŭlo Inczédy, aŭ la juĝisto portis tiujn monuojn, pro tio li ne devas malĝoji! Poste en la samaj monuoj ili portis monon, divenante, kiuj sendis pli novajn monerojn. Tiu naive stulta artifiko trankviligis lin, la pian maljunulon, sed li ne refortiĝis, ne revenis la malnova bonhumoro kaj gajeco de la regnestro. Li iĝis ĉiam pli kaj pli laca kaj eĉ ankaŭ du tagojn dormis daŭre.

Fine li iĝis nimfomania, kiam li turmente sopiradas al la virina ĉarmo. Kelkfoje li ekvidis la belan sinjorinon, edzinon de Stefano Mikó kaj la karan sinjorinon de Georgo Vér. Ili estis jam vidvinoj kaj li ĉiam volis renkonti ilin por demandi: Ĉu ili ne volus esti lia edzino?

Teleki eksciant tiun aferon riproĉis la regnestron pro tiu penso. Li memorigis Apafin pri lia karega edzino, kiu estis senpara, tamen li povis forgesi rigardanta al alia sinjorino. La kompatinda maljuna regnestro grandmezure emociiĝis kaj iris al la enkastela naturgranda portreto de Anna Bornemissza, kisis tiun kaj petpetegis ŝin pardonon lian pekon. Li riproĉis sin, ĉar li estis kapabla forgesi ŝin, la senparan, ege bonkoran sinjorinon. Kiel li povos aperi tiel antaŭ ŝiaj okuloj en la transa mondo?

Fine la Ĉiopova Dio ekkompatis lin kaj vokis lin al si el la valo de la plorego al tiu patrujo, kie ne loĝas turkoj kaj ne estas milito.

¹⁶³ Grafo Antonio Caraffa estis generalo de la Habsburg-dinastiaj kontraŭturkaj armeoj. Li mortis en Vieno en 1693, originale li estis itala kondotiero, poste unu generalo de la armeoj de la Sankta Ligo: laŭ la hungara vikipedio: https://hu.wikipedia.org/wiki/Antonio_Caraffa

Malmulte da homoj priploris la regnestron. Multaj homoj diris: „li la kompatindulo forpasante rikoltis dian favorkorecon.” Liajn cindrojn oni metis por eterna ripozo en la tombokelo de la familio Apafi, en Almakerék en 1691.¹⁶⁴ Li ripozu en paco!



La sieĝo de Buda.

<https://dka.oszk.hu/html/kepoldal/index.phtml?id=26416>

¹⁶⁴ La cindrojn de la Apafi-familianoj oni metis por la lasta ripozo en 1942 en Kolozsvár (Cluj Napoca en Rumanio) en la preĝejo Farkaș-strata: <https://rakoczimuzeum.hu/hu/40-kep/577-az-erdelyi-fejedelmek-temetkezesi-helyei>

33. La denove eltirita glavo

La germanaj armeoj prenis en posedon la tutan Transilvanion kaj la turkaj armeoj ĉie estis malvenkintaj. Mikŝa, la bavara regnestro, sieĝante la fortikaĵon de Nándor-fehérvár,¹⁶⁵ okupis ĝin, dum liaj armeoj mortigis dek du mil janiĉarojn. Per tio Turkio iĝis neniigita. La venkantaj imperiestraj armeoj estrate de la princo de Baden neniigis la restaĵojn de la turkaj armeoj ĉe Nissa¹⁶⁶, okupis Viddion, subiĝigis Bulgarlandon kaj Istambulon. Nenio defendis plu Istambulon krom la neĝmontaroj de Haemus¹⁶⁷.

Ankaŭ la eta Valaĥio ekvidis la flagojn de la konkerantoj, spite de tio, ke ĝi havis malbonajn vojojn kaj senhomajn pejzaĝojn pro kiuj pli frue ĝi sukcese evitis la transpason de la armeoj. Ankaŭ nun la maljuna Ŝ* estis la regnestro, kiu estis modelo de la lerto de valaĥoj, kies pensmaniero estis simpla.

Generalo Heisler kondukis al Valaĥio la germanajn armeojn, kaj skribis al princo Ŝ*, ke li kaj liaj dek mil homoj iros al Bukareŝto trans la neĝmontaron de Transilvanio, kaj tiu certigu por ili la kvartiron de la armeoj, ĉar la vintron li volas pasigi tie.

Samtempe okazis, ke ankaŭ la tataro ĥano informis la princon, ke li kaj liaj kvardek mil homoj volas invadi Valaĥion kaj volas atenti de tie la militmovojn de la armeoj de Transilvanio.

Al la princo plaĉis nek la unua nek la alia promeso. La leteron de la tataro ĥano li sendis al Heisler informante lin, ke li estu singarda, ĉar tiu atakos lin per forta armeo. Poste la leteron de Heisler li sendis al la tataro ĥano amike admonante ne movi multe, ĉar Heisler atakos de malantaŭo. Efike de tio ambaŭ armeoj retiriĝis kaj Valaĥion neniue el ambaŭ armeoj atakis. Ĉi tio estis granda diplomatia manovro.

Inter la romantikaj montoj de Libano estas iu pitoreska valo, kiun la naturo kreis. La vastan valon ĉirkaŭas grandegaj rondformaj rokaj montoj. En la valo estas iu monteto, sur kiu estas trovebla nur bonodoraj cedroj. En tuta Turkio oni povas trovi tie la plej malhelkolorajn kaj dikajn trunkaj arbojn. Duflanke de la monteto fluegas muĝa monta rivero kaj lignoponto traarkas inter la du montopintoj. Sub la mezo de la ponto de la akvo elstaras iu roko, sur kiun apogas sin la ponto. El inter la arbaroj videblas la blankaj dometoj de la urbo Éden. La dometoj konstruitaj sur la monto-flankon similas al iu kartofortikaĵo. En la malproksimo oni povas vidi la golfon de Sirio.

Nun sur ĉi tiu pitoreska loko estas la komforta loĝejo de fraŭlino Stanhope Estera, angla damo. La domo konstruiĝis laŭ eŭropa stilo. Pli frue ĉi tie staris la fama kiosko de la bejo Feriz vivanta multjarojn izolece.

Tiu profetaĵo, kion li aŭguris al la membroj de la dīvano, disvastiĝis inter la homoj, en la militarmeo kaj radikiĝis en la koro de la batalantoj. Ĉiuj sciis, ke dum Feriz ne komencas batali, la turkaj armeoj malvenkos. Sed kiam li aperos sur la batalejo, tio estos favora al la osmanaj armiloj, la turkoj denove havos militfeliĉon.

Pro tio la dīvano volis utiligi ĉi tiun blindan kredon kaj konstante sendis delegitojn al Feriz, al la juna ermito por informi lin pri la malvenkoj, pri la mortfalo de la veziroj.

¹⁶⁵ Pri Nándorfehérvár (Beogrado) setlejo de la nuna Serbio, vi povas legi abunde ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Beogrado>

¹⁶⁶ Nissa estas urbo en Serbio. Pri tiu urbo vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Ni%C5%9Do>

¹⁶⁷ Haemus estas bolgarlingve: Malnova montaro: <https://www.arcanum.com/hu/online-kiadvanyok/Lexikonok-okori-lexikon-CA894/h-CBA28/haemus-CBA3E/>

La bejon nenio ŝancelis en sia decido. Li nur respondis: „Tio devis okazi tiel kiel mi diris. El la ovoĵoj de la serpento ne eloviĝos kolomboj. Vi entombigis viajn bonajn amikojn por servi viajn malamikojn. Vi akceptis konsilojn de la frenezuloj kaj perfiduloj kaj dancis sur la tomboj de la fideluloj. Kunĝoĵoj vi akceptis la malfidelulojn, en prizono mortigis tiujn, kiuj volis liberigi vin. Nun tiuj venu, kiuj la pacon rompis, antaŭ Dio kaj ĉesigu la malhonoron. Ili diru: Tio estis, tio ne estis kaj tio ankaŭ ne estu! Ili renovigu la armeojn, ili reokupu la fortikaĵojn kaj ellernu, ke ili la nomon de Alaho ne menciadu superflue! Ja ankaŭ tiu estas homo kaj se la tero ekmoviĝas, tiam tiu ankaŭ neniigis!”

La homoj ekkomprenis, ke tiuj vortoj ne estas vortoj de iu frenezulo, kaj petis la bejon eltiri denove la glavon kaj esti veziro de la armeoj.

Sed la bejo rifuzis la peton kaj ne akceptis la proponon de la homoj.

– Se la ĝusta tempo alvenos, tiam mi ne atendos, ke oni voku min. Tiuokaze mi libervole ekiros por batali. La tempo ne rapidas pro emo de iu homo, sed eĉ ne postrestas. La ĝusta tempo pli-malpli frue alvenos...

Tiun ĝustan tempon oni ege longe atendis en la Osmana Imperio. La germanaj imperiaj flagoj fliris en interno de Turkio. La poloj reokupis Podolion¹⁶⁸, la venecianoj estis jam ĉe la turkaj insuloj kaj Transilvanio disiĝis de la dĵvano kaj la kontraŭturkaj armeoj posedis ties fortikaĵojn.

La nova sultano sen armeoj, veziroj, sukcesoj komencis regi. Li en la malliberejo ellernis trabori dikajn murojn per unu peco da bakita argilaĵo kaj ne malesperiĝi dum la malliberado. Li liberiĝinte tuj kolektis novajn armeojn, entuziasmigis la soldatojn, akiris helpantojn el inter kiuj estis Thököly, kiu estis lia plej ŝatata helpanto. Pro tio Thököly iĝis de li regnestro de Transilvanio. Li ordonis al la tatara ĥano kaj vojevodo de Moldavio helpi lin por invadi Transilvanion.

Thököly ĝojis, ja li sopiris la gloron, sed malĝojiĝis ekvidante la armeon por li certigitan, pere de kiu li devos invadi Transilvanion. Ili povis esti taŭgaj por rabi, bruligadi, sed batali ne. Ĉar ili konis nenian disciplinon, kaj neniom da militscienco, estis demando kiel eblos ilin starigi en iun ajn armeoformon por batali, kaj estis stranga, ke ili konis nur la uzon de sagoj, pro kio se ili aŭdis fusilpafojn, tiam ili tuj diskuris kiel la musoj.

Kiel li batalu kun tiuj menciitaj soldatoj kontraŭ la germanaj imperiaj armeoj, kiuj estas disciplinitaj kaj konas diversajn militmanovrojn?

Subite iu penso venis en lian kapon rememoranta pri bejo Feriz. Li skribis leteron al li kaj tiun sendis per sia rapida heroldo ordonante, ne ripozu ĝis ĝia transdono. Li informis la bejon pri la okazintaĵo de Transilvanio.

„Jen, kion vi profetis, tio okazis. Kiuj batalis apud ni, tiuj nun batalas kontraŭ ni. Memoru vian promeson, kiu atendas la plenumon.”

Kiam la bejo ricevis la leteron frue-matene, kaj ĝin finlegis, li tute ne pensadis plu, sed ordonis al siaj ĉevalistoj prepari siajn ĉevalojn. Li preparis el inter siaj glavoj la plej bonajn, kiuj estas la plej taŭgaj por batali. Li deĵetis la ĉiutagan vestaĵaron kaj vestis sin en festa ornama vestaĵaro. Poste li malfermigis sian kelon, siajn homojn – servistojn, armitajn akompanantojn – gastigis kaj kune kun ili amuziĝis, drinkis, kion li longtempe ne faris. Li diris al ili, ke ili sin amuzu gaje, ĉar post unu horo ili ekiros por batali.

¹⁶⁸ Podolio estas historia regiono en la nuntempa ŝtato Ukrainio, troviĝanta ĉe nordaj alfluoĵoj de la centra Dnestro. Pri tiu loko pli abunde vi povos legi ĉe:
<https://eo.wikipedia.org/wiki/Podolio>

La germanaj armeoj jam tute hejmece fartis en Albanio. Belaj pejzaĝoj, belaj sinjorinoj ridetis al ili. Ili havis monon abunde, ja la albanaj viroj pagis unu ormoneron da imposto. Krome ĉiu albana sinjorino pagis unu kison.

Poste baldaŭ venis la famo, ke iu tatarea armeo proksimiĝas al la montoj de Albanio kaj ĝi havas sesdek mil soldatojn.

La germana armeo havis nur naŭ mil soldatojn, sed ili priridis la militan famon, ja ili vidis kuri pli grandan armeon de antaŭ ili. Eĉ: la turkajn heroojn, spahiojn, janiĉarojn ili mortigis. Do, ili ne timis la tatarojn, kiujn oni uzis ĉiam nur por bruligadi kaj rabi. Laŭ ili ne estis inde peti helpon de Hungarujo, kie la princo de Baden ĉe Nándorfehérvár restadis kun sia eta armeo. La estro de armeo de Albanio estis la regnestro de Hanovero.¹⁶⁹

Li estis estro anstataŭ la mortinta saĝa generalo Piccolomini, kiu estis same brava, sed malpli saĝa. Li informiĝanta pri la famo, laŭ kiu la tataroj proksimiĝas, akceptis la eblecon ke li ekbatalu sur la batalejo. Kia estas tiu malamiko? Tio estis la malnova kanajlaro, kiu nur tial galopas, ke pli malfacila estu lin postatingi, kaj tiu tuj ektimas de la batalo kaj komencas kuri.

Jes, tio estis la malnova kanajlaro sed nun nova spirito entuziasmigis, ja ĝi havis novan estron, kiu neniam kuris de antaŭ la malamiko. Tio estis la el sia morto reviviĝinta bejo Feriz. Kiam li ricevis la leteron de Thököly, li tuj anoncis sin por batali por la nova sultano. La nova sultano rekonis la bejon kaj tuj sciis, ke ne tiu junulo estas frenezulo, sed tiuj, kiuj kontraŭdiris al li. Pro tio la nova sultano nomumis la junan bejon estro de iu tatarea armeo por batali kontraŭ la germanaj armeoj.

La turkaj armeoj entuziasmiĝis aŭdante, ke bejo Feriz denove volas batali. Ili esperis la sukcesojn de la bataloj kaj grandnombre kolektiĝis al armeoj de la junulo.

Bejo Feriz estis ne nur brava soldato, kiu kuraĝe kuras antaŭen dum la batalo, sed estis ankaŭ saĝa militestro. Li batalis saĝe, ne riskis la vivojn de siaj soldatoj. Li konis militmanovrojn de la nacioj kaj ne timis la hazardon. Pro tio liaj soldatoj forte kroĉiĝis al li, ĉar ili sciis, ke ilia morto povas esti la sigelo de la sukceso.

Kiam Feriz rigardis la armeojn de la regnestro de Hanover de iu monteto, tiam li sendis siajn tatarojn en la pinarbaron por ŝmiri per rezino¹⁷⁰ siajn sagovergojn kaj poste sieĝi la tendaron de la regnestro.

La regnestro vidis tiujn naivajn manovrojn pli frue multfoje, li lasis la malamikon agadi. La turkoj jam plurfoje faris tiujn „naivajn agojn”. Ili dumtempe ĉirkaŭprenis kaj rapide ekatakis la malamikon. La regnestro lasis ilin veni pli proksimen kaj poste mortpafis ilin.

Feriz ne atakis ilin, sed ordonis al la tataroj ĉirkaŭpreni la germanojn je pli granda distanco ol falo de iu depafita sago. La tataroj poste, el tiu distanco elpafu siajn brulantajn sagovergojn al la ĉielo tiel, ke tiuj refalu sur la mezon de la germana tendaro. La tataroj jenamaniere kapablis elpafi la sagovergojn el pli granda distanco, ol la germanoj al ili. Nome la arkiginta pafaĵo pli malproksimen iras, ol la rekte iranta pafaĵo, kiu faras sur la haŭto vundon dum la malĝuste depafita kuglo krake deĵetiĝas.

Nun subite inundo de brulantaj sagovergoj kovris la ĉielvolbaron kaj poste falegis sur la germanajn armeojn. Tio similis al infera fajropluvo. La sagovergoj atingis la dorson de la ĉevaloj kaj vizaĝojn de la soldatoj kaj sur tiuj la sagovergoj vundofaris.

¹⁶⁹ Hanovro aŭ Hanovero estas la ĉefurbo de la germana federacia lando Malsupra Saksio. Pri la urbo vi povos legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Hanovro>

¹⁷⁰ La sagovergojn oni ŝmiris per rezino por ke per ili la batalantoj povu bruligi diversajn aĵojn de la malamiko – noto de la tradukisto.

La ĉevaloj sovaĝe baŭmis terurante, la soldatoj blasfemante pafadis la tatarojn. En la germana armeo la militordo rompiĝis, la soldatoj ne obeis al la estroj, ja nenien ili povis rifuĝi, ja ĉiu sagovergo atingis sian celpunkton.

Nun Feriz klarionigis kaj de ĉiuj flankoj la tataroj atakis la germanojn. Tiam komenciĝis la batalo kapo kontraŭ kapo. La germanoj kuraĝe batalis kaj ĉiuj germanoj kunportis kune kun si iun al la Transmondo. Sed estis pli multe da tataroj, ol germanoj, la germanoj estis pli lacaj, ol la kontraŭuloj. Feriz nun vokigis la ripozintajn janiĉarojn, spahiojn, kiuj volis venĝi tiun malhonoron, kiun ili ricevis iam. Nun jam ankaŭ ili ekbatalis.

La regnestro de Hanover malesperiĝinte vidis la findanĝeron. Lastfoje li provis venki kontraŭ la tataroj, sed ĉie li vidis arbaron de lancoj ĉirkaŭ si, li vane provis batali, kaj fine li mortfalis. Ankaŭ la aliaj mortfalis, ĉar ili ne kapitulacis. Neniu restis vivanta. Neniu estis kapabla hejmeniri kiel raportisto.

Tio estis la unua venko post la multaj malvenkoj, kiu portis feliĉon por la turka armeo. Tiun militfeliĉon kaŭzis la glavo de bejo Feriz, kiu glavo estis malbenita de Alaho por resti en la glavingo dum daŭris la malvenkoj, kaj kiu nur tiam povis batali, se denove ekradios la suno de la venkoj.

La famo tuj disvastiĝis en la Osmana Imperio. La turkaj soldatoj denove entuziasmiĝis, la malesperiĝinta popolo iris batali. En Istambulo ne plu pendis la danĝero super la kapo de la loĝantaro. Ili liberiĝis de la danĝero.

34. La lasta tago

Ni jam priparolis ĉion, sed ne estis temo pri la puno de iu figuro.

La plej ŝatatajn figurojn, la karan fraŭlinon, la belajn damojn, la fascinan odaliskon ni jam entombigis, kiuj estas jam en la ĉielregno. La plej satana figuro ankoraŭ vivas, ĉar la sorto volis lin puni antaŭ la okuloj de landoj kaj popoloj je la gloro de Dio kaj je utilo de la homoj.

Oni sciis jam en Transilvanio, ke la divano nomumis Emerikon Thököly, regnestro de Transilvanio. La divano donis armeojn al li por okupi Transilvanion. Pro tio Heisler ordonis al la nobeloj kaj al la sikuloj defendi la landon. Ili ankaŭ faris tion. Nome la popolo de Transilvanio suferis tiom multe de siaj aliancoj, ke estis evidente, ili obeis, se oni ordonis ilin por bati iun.

La estroj de la hungaraj armeoj estis Baltazaro Macskási¹⁷¹ kaj Miĥaelo Teleki. La estro de la germanoj estis Heisler kaj apud li estis Norcher kaj Doria, la generaloj, pluse la juna heroa Doria, la kolonelo. La lastaj havis militfeliĉon, kvankam tiu armeo, kiun ili estris, ne vidis aliajn turkojn de Vieno ĝis Valaĥio nur vivonperditajn, aŭ kurintajn.

Kiam Thököly proksimiĝis kun siaj armeoj tra Valaĥio, tiam Heisler haste blokigis la vojojn de Thököly tiel, ke tri regimentojn li sendis al la intermonto – Vaskapu¹⁷², la armeojn de Marosszék¹⁷³ li sendis al la intermonto de Töröcsvár¹⁷⁴ kaj li faris tendaron ĉe la intermonto de Bozza por sia ĉefarmeo inter la montoj.

La germanaj generaloj nenion ŝatis malpli, se la hungaraj estroj miksas sin en interparolon de la estro Heisler. La germanoj konstante primokis la hungarajn estrojn kaj nomis tiujn rustikaj generaloj. Sed Teleki volante pruvi sian saĝecon konstante donis siajn konsilojn, faris al Heisler militplanojn, kiujn kvankam li jesis, sed ne agis laŭ tiuj.

En la milita tendaro de Heisler ĉiuj ege gaje amuziĝis, havis manĝaĵojn kaj drinkaĵojn abunde. La sikuloj estis proksime al siaj edzinoj, al siaj domoj, ne volis iri hejmen. Sed Teleki konstante estis maltrankvila. Li volis akceptigi per Heisler, sed vane, ke la armeoj krozu inter la intermontoj kaj gardu konstante la vojetojn kondukantaj al la lando.

Jam ili tri semajnojn pasigis ĉe la intermonto de Bozza, kiam Teleki diris maltrankvile al la generalo:

– Kion vi pensas, mia sinjoro? Ĉu Thököly ne aperos aliloke, malantaŭ nia dorso, dum ni ĉi tie atendadas?

– Ĉiuj intermontoj estas fermitaj, okupitaj de miaj armeoj – respondis Heisler.

– Ĉu povas esti, ke li tamen malfermos iun kaj povos enveni?

– Se li envenas, ne tio estos damaĝo, sed eliri jam li ne kapablos.

Teleki volis montri, ke ankaŭ li konas la militsciencon kaj kompetente, senĉese li donis siajn konsilojn:

¹⁷¹ La familionomon Macskási bonvolu elparoli laŭ la esperanto eldirmaniero: maĉkaŝi.

¹⁷² La intermonto Vaskapu/Fera Pordo estas parto de Rumanio, pri ĝi vi povas legi ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/Fera_Pordo

¹⁷³ Marosszék (maroŝsek) estas unu el la centroj de la rumania sikularo, kies administracia centro estas: Marosvásárhely: <https://hu.wikipedia.org/wiki/Marossz%C3%A9k> / kaj: https://eo.wikipedia.org/wiki/T%C3%A2rgu_Mure%C8%99

¹⁷⁴ Pri la kastelo de Töröcsvár vi povas legi ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/Kastelo_Bran

– Laŭ mi ne estas konsilinda, ke la ĉefa armeo restadu ĉe la landlimo. Prefere ni devus lasi garnizonojn ĉe ĉiuj intermontoj kaj la ĉefarmeo iru al la mezo de la lando, kio estas proksime kaj al Töröcsvár kaj al Bozza.

Nun Teleki pravis, pro tio Heisler ĉagreniĝis, ĉar tion li ne povis refuti. Ĉi-okaze Teleki kvazaŭ sentus ion malbonan, li estis maltrankvila. Li sentis, kiuj volas invadi Transilvanion, tiuj estas liaj senindulgaj malamikoj.

– Mia sinjoro – li diris al la generalo – mi neniun laboron havas. Sendu min kien ajn kaj mi honeste faros mian laboron.

– Mi tuj donos al vi laboron – diris Heisler kaj sidigis lin apud tablon en sia tendo. Li kunvokigis la generalojn. Kiam Norcher, Magni kaj Doria alvenis, ankaŭ ilin li sidigis apud la tablon kaj fine ankaŭ li mem sidiĝis apud la tablon. Poste Heisler elprenis ludkartaron, donis tiun al Teleki, dirante:

– Tio estas via dezirita okupo. Bonvolu disdividi la ludkartojn al la kartludantoj.

– Sed sinjoro mia! – Teleki diris indignante – ĉu nun vi volas kartludi, kiam baldaŭ alvenos la malamiko?

– Ni ne povas fari ion pli saĝan, ol tiun ĝis la malamiko estos antaŭ ni. Ĉu vi povas ludi la „landsknecht”¹⁷⁵-on, tiun malnovan kartludon?

– Mi ne konas tiun, mia sinjoro.

– Ni instruos vin ludi tiun.

La instruo okazis tiel, ke dum kelkaj horoj li perdis kelkcent omonerojn. Poste Teleki flankeniris de la ludo dirante, ke li ne havas jam monon li ne povos ludi plue. Li bedaŭris ne tiujn kelkcent ormonerojn, sed tion, ke oni neglektas liajn saĝajn konsilojn.

Heisler multe da mono gajnis, lia felĉapo tute plenpleniĝis de la taleroj kaj ormoneroj. La malgajnantoj provis konsoli sin per ŝercodiradoj:

– Kiu havas feliĉon en la kartludo, tiu estas malfeliĉa en la amo!

– Ej! – kriis Heisler – mia sola amo estis dum mia vivo la batalejo kaj tie mi estis ĉiam feliĉa.

Nun subite aŭdeblis ĉevalhufbruo. Heroldo alvenis en la tendon kaj balbutis anhelante:

– La antaŭgvardioj de Thököly estas ĉe Töröcsvár, tiuj ekatakis kaj neniigis la armeojn estantajn en la intermonto. La sikularo ankoraŭ kontraŭstaras al ili, sed se vi ne rapidos, tiam ili okupos la intermonton.

Heisler tuj ĉesigis la kartludadon, la monerojn ĵetis sur la tablon, surmetis sian felĉapon kaj elingigite la glavon kriis:

– Enseliĝu, miaj sinjoroj! Ni ekiru rapide al Töröcsvár! Ni povas atingi ĝustatempe!

– Ĉu mi pravis? – murmuris Teleki.

– Ej, estas neniun malbono. Klarionigu! Malmuntu la tendojn, la signalfajroj restu brulantaj! Post la tria klarionado ekiru al Töröcsvár. Ĉi tie restu nur unu bataliono kaj du kanonoj por gardi la intermonton. Mia sinjoro Teleki, okupu vian lokon.

Ĉi tiujn dirante Heisler ĵetis sin en la selon, Teleki reiris al la nobelaj armeoj kaj en la nokta malhelo la tuta tendaro ekiris al Töröcsvár.

¹⁷⁵ La landsknecht/Lansquenet – estas malnova banka societa ludo, kion oni ludis per ludkartoj. Ĝia signifo „servisto de la tero aŭ lando” ricevis la nomon de la franca skribmaniero de la germana landsknecht, kiu estis tamburo ĉe la 15-16. jc-aj germanaj dungosoldatoj: <https://gobertpartners.com/what-is-the-game-landsknecht>

Estis la 19-a de aŭgusto. Silenta varmeta somera nokto regis. Eĉ venteto ne blovis. Sur la ĉielo brilis la steloj. La neĝmontaroj digne leviĝis, kies grandega kunĉenaĵo ĉirkaŭzonas Transilvanion. Ĉio silentis, aŭdeblis nur bruo de la armeoj kuregantaj al Töröcsvár.

Iluloke la intermonto estas treege malvasta, kie du ĉaroj ne kapablas preterlasi unu la alian. Se tie staras kelkcent persistaj viroj, tiuj kapablas haltigi eĉ la plej grandan armeon.

De antaŭ Valaĥio, se oni staris sur la monto rigardante al la valo, povis vidi la signalfajrojn de Thököly, kie ripozis lia grandampleksa tendaro.

Estis ege malhele, pro kio kelkcentoj da dragonoj mortis post la unua forta surpriziĝo. Kiuj elinter ili atingis Valaĥion, tiuj mortfalis, ĉar la sikularo faris barikadojn el dehakitaj arbotrunkoj, poste de la montopinto aron da ŝtonoj ĵetis sur la proksimiĝantojn, kiuj devis retiriĝi de tiu akcepto.

En la turka tendaro estis granda irado-venado, oni rostis bovon sur rostostango por la armeanoj. Kelkaj bonhumoraj valaĥoj dancis sian nacian dancon, la hungaraj husaroj aŭskultis la muzikon de la tarogato¹⁷⁶, kies sono certe aŭdeblis ankaŭ en la alia tendaro estanta transflanke de la neĝmontaroj. La antaŭgvardioj konstante observis la ĉirkaŭaĵon. Ambaŭ estroj estis junaj sed la multaj batalaj spertoj faris ilin maljunaj kiuj nun vizitis la gvardiojn. Ili maldomas anstataŭ ĉiuj. Ambaŭ alvenis el alia direkto kaj fine renkontiĝis.

Kiam Thököly ekkonis bejon Feriz, tiam li rajdis apud lin, manpremis, poste ili senvorte rajdis plu kune sur la montaj vojoj.

Fine Feriz ekparolis kaj melankolie diris al Thököly:

- Ĉu ekzistas pli senesperiga afero, ol vidi monton sed ne kapabli flugi?
- Precipe tiam, se la sopiroj altiras al la alia flanko de la monto.
- Kiuj estas viaj sopiroj? – demandis amare Feriz. – Ja la via povas esti nur la gloravido, sed la mia estas la sangosoifo.
- Ho, la mia estas des pli forta, ol kio min instigas – diris Thököly malĝoje – mi havas edzinon.
- Aĥ! Mi komprenas vin! Ĉu vi volas vidi vian edzinon? Ankaŭ mi havas edzinon, se oni ne mortigintus ŝin. Ĉu via edzino meritas vin?
- Vi certe vivis malproksime de ĉi tiu lando – diris Thököly fiere – ĉar vi ne aŭdis pri ŝi. Ne mia nomo glorigas la nomon de mia edzino Helena, sed ŝia nomo glorigas la mian. Kiam miaj sampatrujanoj forĵetis la armilon en Hungarujo, tiam ankaŭ mi forlasis mian patrujon, sed Helena restis en la fortikaĵo de Munkács¹⁷⁷ kaj defendis tiun heroe kiel heroe viro. La malamiko forte sieĝis la fortikaĵon kaj Helena la obusojn, kiuj falis en la fortikaĵon, estingis per malsekaj bizonletoj. Ŝi kanonadis la sieĝantojn kaj ĉiunokte ŝi kaj ŝia armeo elkuregis el la fortikaĵo, mortigis la malamikojn kaj ties tendojn forbruligis.

Tiuj vortoj ege entuziasmigis la bejon Feriz pro kio li diris:

- Ni liberigos tiun bravan sinjorinon. Ĉu ŝi ankoraŭ nun defendas sin?

¹⁷⁶ La tarogato estas 74 cm longa hungara blovinstrumento. Pli abunde pri la muzikilo vi povos legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Tarogato>

¹⁷⁷ Munkács (munkaĉ) estas urbo en Ukrainio. Tiu loko kun la fortikaĵo havis tre gravan rolon en la epoko de la kontraŭ-Habsburgaj bataloj, kies unu periodo ligiĝis al Ilona Zrinyi. Pri la setlejo kaj historio de ĝia fortikaĵo vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Muka%C4%89evo> / kaj: https://hu.wikipedia.org/wiki/Munk%C3%A1csi_v%C3%A1r

– Jam ne. Mia plej ŝatata homo, kiu gardis ŝin, kiu de mi iĝis sinjoro, tiu perfidis ŝin kaj poste li diris al mi, ke ŝi estas en malliberejo. Ho ve, kredu min, se oni redonus ŝin al mi, tiam ĉiujn sopirojn mi povus forgesi, ne sentus sopiron por akiri la kronon. Sed ĝis mi liberigos ŝin mi transiras la montojn; kvankam mi ne havas flugilojn, tamen mi transgrimpos tiujn.

Feriz notis malĝoje:

– Ho ve! Mi havas jam neniun, por kiu mi batalu!

Dume la junuloj atingis al iu signalfajro. Tie ili manpremis kaj disiris al sia tendo. Sekvatage frumatene Thököly iris en la tendon de Feriz diri la novaĵon, laŭ kiu nokte Heisler alvenis al Töröcsvár kunportante sinjoron Teleki. La mencio de la nomo de Teleki, tute elektrigis la junan turkon. Li elsaltis el la lito, elingigis la glavon kaj ĝin levante al la ĉielo, taŭzita miene diris:

– Alaho! Mi dankas al vi, ke vi portis ankaŭ lin antaŭ min.

Poste ambaŭ junuloj manpremis.

– Nun jam ankaŭ mi diras, se devas flugi, ni transiros la montojn – notis la bejo.

La du estroj Feriz kaj Thököly konsiladis sekrete kune pli ol unu horon. Poste ili vicigis la armeojn; Feriz elektis siajn plej bonajn janiĉarojn kaj spahiojn. Thököly elektis la plej bonajn husarojn, la plej rapidajn tatarojn kaj per tiu eta armeo havanta nur ĉ. ses mil soldatojn ekiris, sed ne diris kien, ili ne diris la celon. La vojevodo de Moldavio restis en la tendaro turka, ja li devis gardi la grandiozan tendaron kaj ne havis permeson forlasi sian lokon. La junaj estroj, Feriz kaj Thököly kondukis la elektitan armeon en la malhelajn arbarajn fendegojn, kaj al la sunbrilaj rokoj kie homaj piedoj neniam tretis. En ĉi tiuj sovaĝaj lokoj neniam estis vizitanto alia ol la roka aglo, kio nun scivoleme rigardis la rapidantajn armeanojn de si mem demandante kion ili serĉas tie, ja tiu loko estas ne ilia patrujo. De la rokomuroj elkreskis radikoj kiuj baris la antaŭeniron, do ili ligis ŝnuregojn sur tiujn por helpi sin. Sur la arbotrunkojn ili metis ferpuliojn kaj per tiuj tiris la homojn kaj ĉevalojn sur la montopinton. Tie ili devis iri sur longa montospino, sub kies ambaŭ flankoj estis profundaj fendegoj. Sur la montospino estis ege mallarĝe, kie nur unu ĉevalo estis kapabla iradi. Tie ne eblis reen turniĝi. Sur la montospino estis grandaj kavoj, kuĵn ili devis transsalti. Kiu ne sukcesis transsalti, tiu falegis en la fendego. Ilia persistado instigis la soldatojn kaj ĉe ĉiuj malhelpaĵoj ili montris sian lertecon kaj trovemon. Sur la krutaj rokoflankoj inter la roksubaĵo kaj la ĉielo super la kapturna profundo ili pasis farinte paŝon-post-paŝo, paŝante en spuron unu de la alia kaj nur malmultnombro estis perditaj dum la tuta vojo tra la nekonataj neĝmontoj.

La du junaj estroj iris ĉie antaŭ la armeanoj kaj per sia eltrovema sagaco ili povis solvi ĉiuspecan problemon. Ĉi tiu entreprenado kunporti iun etan armeon, en kio estis ankaŭ husaroj, sur la krutaj rokoj, montoflankoj, povis naskiĝi nur en la cerbo de Emeriko Thököly.

La sinjoroj de Transilvanio starantaj sur iu montetsupro per lornoj rigardis la intermontajn armeojn, kiel ili faras militajn ludojn, batalmanovrojn unu kun la alia. Foje la sikuloj ekkuregigis la tatarojn ilin atakintajn, foje la valaĥoj pelis tiujn ĝis la rando de la arbaro. Tio estis bona amuzo por Heisler, Doria kaj Teleki, kiuj rigardis tiun vireskan batalludon.

Foje, la gardistoj akompanis valaĥon antaŭ Heisler, kiu diris, ke li portis sekretan mesaĝon de la vojevodo.

– Certe tiu mesaĝas, ke ni ne iru al Valaĥio, ĉar la malamiko manĝos nin. – opiniis Heisler turnante sin al Teleki. – Kion mesaĝis via mastro?

– Tiu sendas saluton al vi kaj sciigas, ke vi devas gardi vin de Thököly, kiu havas grandan armeon kaj estas tre ruza homo. Bona estus, se vi ne irus al Valaĥio, sed plie gardu Transilvanion kontraŭ la atendebla atako de Thököly. Ĉefe gardu vin tial, ĉar antaŭ tri tagoj li kaj bejo Feriz, la ĉefmilitestro foriris de la ĉefarmeoj kunportante ses mil elitajn batalantojn.

– Ĉu mi ne parolis pri la sama mesaĝo? – demandis ridetante Heisler – vi povas reiri tien, de kie vi venis – diris Heisler kaj mansignis la permeson de foriro.

Dum Heisler traktis la tuton desupre, sinjoron Teleki ekpripensis ĉi tiu informado:

– Ĉu tio povas esti, ke ili aperos malantaŭ nia dorso?

Heisler montris al la neĝmontaroj:

– Ĉu trans tiuj iu povas veni krom birdo?

– Se Thököly estras la armeojn, tiam jes.

– Laŭ via ekscelenco Thököly estas lerta kaj saĝa.

– Sinjoro Generalo, vere, mi konsilus, ke la armeojn ĉe la intermonto Vaŝkapu (Fera Pordo)¹⁷⁸ ni retiru kaj alportigu ankaŭ kromajn kanonojn.

Heisler ne respondis al Teleki sed mansignis ke li restu en silento. Nun subite sovaĝa kriego aŭdeblis. Heisler scivoleme rigardis al direkto de Zernyest.¹⁷⁹ Li konstatis, ke de tie fumokolono leviĝas, kaj antaŭgvardioj kuras al la tendaro de la germanoj.

– Kio povis okazi?

– Thököly tutsukcese transiris la neĝmontaron! – aŭdeblis la teruriga novaĵo. – La tataroj okupis la setlejon Tohán kaj forbruligis la tendaron de pakaĵoj! Ili baldaŭ alvenos!

– Enseliĝu! Armilojn en ĉiujn manojn! – kriis Heisler kaj elingigite la glavon li enseliĝis.

Doria, Norcher kaj Magni rapide vicigis la armeojn. Macskási¹⁸⁰ kunkolektis la sikulojn kaj ekiris al la ebenaĵo.

Kiam la armeoj estis pretaj por batali, tiam alvenis Balaĉan, la rifuĝinta ĉefnobelo, veninta kun proprakoste elektitaj du batalionoj konsistantaj hungarojn kaj valaĥojn por helpi al Heisler. Jam eblis aŭdi la kriegojn de la rabadaj tataroj el direkto de la vilaĝo Tohán. Tiu setlejo flagris antaŭ la armeoj de Transilvanio. Balaĉan jam sopirante la batalon petis sinjoron Heisler, ke li mem rajtu forpeli la tatarojn el Tohán. Li kun la armeanoj forkuregis kaj baldaŭ forpelis la tatarojn el la setlejo. Poste Heisler kunportante la ĉefarmeon galopis al Zernyest, kiun li sukcesis okupi, antaŭ ol Thököly estis atinginta tiun.

Tie la armeoj de Heisler havis iom da ripozo. Heisler disdonigis vinon, brandon inter la batalantoj. Poste la tendaraj pastroj enmane per krucifikso preĝigis la germanajn batalantojn. Sinjoro pastro Gernyeszegi diris la predikon al la kalvinanoj:

– Miaj karaj filoj! Vi ne vane uzis viajn glavojn. Ĉiuj batalu plu honeste. Vidu: kiu mortfalias, tiu atingos Dion en la ĉielregno kaj venos en la teron de la patrujo. Jen, ankaŭ mi zonis al mi glavon kaj batalos apud vi.

Subite aperis la armeo de Thököly ĉe Zernyest sur la monto flanko. Apud tiu armeo unuflanke estis la neĝmontoj aliflanke iu marĉa kampo etendiĝis. La kanoplena kampo nun estis tute elsekigita de suno pro kio tion eblis facile travadi.

¹⁷⁸ La intermonto Vaskapu (Fera Pordo) estas parto de Rumanio, pri ĝi vi povas legi ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/Fera_Pordo

¹⁷⁹ Zernyest/Zerneŝt estas urbo en Rumanio, pri ĝi vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Z%C4%83rne%C8%99ti>

¹⁸⁰ La familionomon bonvolu elparoli: maĉkaŝi.

Kiam la sikuloj ekvidis la turkojn, tiam ili ruze prenis la lancojn kaj volis ataki entuziasme la turkojn, kriegante:

– Jesuo, helpu! Jesuo! Jesuo!

La estroj per la glavoj rebatis ilin kaj malhelpis la fruan komencon de la atako. Fine la sikuloj ofendiĝinte retiriĝis, sed kolere murmuris mallaŭte:

– Se nun vi ne lasas nin ekbatali, pli malfrue vi ne sendu nin batali!

Dume Teleki vokigis sian serviston. Teleki portis nigran vestaĵon, ĉar eĉ ankaŭ tiam li funebriis pri la regnestro. Ne estis sur lia vestaĵo juveloj, sur la fingroj ne estis fingroringoj. La forigitajn juvelojn li donis al lia fidinda servisto, por porti tiujn antaŭ la batalo al Gernyeszeg por transdoni tiujn al sia filino, sinjorino Miĥaelo Vay.

La maljuna servisto volis demandi: kial li devas fari tion? Sed Teleki turnis sin alidirekten senvorte kaj mansignis foriron al la servisto.

Post la foriro de lia interna homo li portigis sian ŝatatan ĉevalon nomitan Kolo-mano, kaj surĉevaliĝinte rajdis antaŭ la armeojn kie li parolon diris al la soldatoj:

– *Bonaj bravuloj! Heroaj transilvaniuloj! Alvenis la tempo, ke ni povu akiri trankvilon, liberecon al ni kaj niaj idoj, ĉar ni povas batali por nia majesta imperiestro. Nun ni povas defendi nian domon, ŝirmi, gardi edzinon, infanojn kontraŭ la turka jugo kaj tiu malica tirano Thököly. Cetere ni kaj niaj idoj estos eternaj servutuloj se ni ne agos tiel. La germanoj ne transdonos Transilvanion al la turkoj ĉar ili havas grandan, fortan armeon en Hungarujo, kiu baldaŭ invados kaj forpelos la turkojn.*

Por, ke neniu diru, ke mi kaŝis min, vidu mian grizan barbon, mi estas ĉi tie, batalos por Transilvanio kaj ne timas la morton.

Post la fino de la parolo Macskási plendadis al Teleki, ke la transilvaniajn hungarajn armeojn oni vicigis malantaŭ aliajn armeojn kaj tiuj murmuris pro la neglekto.

Tiun plendon aŭdanta Teleki galopegis al Heisler pridemandi lin pri la neglekto:

– Mia sinjoro! Vi konas malbone la hungarojn, ĉar vi vicigis ilin en la lastan vicon. La sikuloj estas taŭgaj komenci la atakon! Sed vi ne povos atendi de ili helpon, se la atakoj de la germanoj malsukcesos, aŭ la batalvicoj estiĝis difektitaj pere de la malamiko, tiuokaze la hungaroj ne helpos el ilia nuna restadejo.

La militestroj ne ŝatis, se iu intervenas en ilian militplanon. Nun Heisler iomete senindulge refutis sinjoron Teleki, pro kio Teleki nenion dirante plu regalopis silente al la armeoj. Pli malfrue Heisler tamen postgalopis sinjoron Teleki repacigi volante kaj latinlingve entuziasmigis la armeojn de Transilvanio:

– *Vi sinjoroj havos belan amuzon, ĉar la turkoj forkuros de antaŭ vi ĉar ili ne povos elteni nian kanonfajron kaj vi vidante tiun kuron, forpeli ilin. Sed se la turkoj estos pli fortaj ol vi, tiam ne rekte venu antaŭ la regimenton sed deflanke ataku ilin kaj tiam mi denove rebatos, repuŝos, forpelos la turkon.*

Dumtempe la turkoj malrapide proksimiĝis. La maldekstra flanko unu regimentaj tataroj kaŝiradis en la kanejon volante ĉirkaŭpreni la armeojn de Transilvanio. La spertohava estro Heisler rimarkis la movojn de la kano-ondado kaj ordonis al Doria rapide ataki kun siaj ses plotonoj de la dragonoj la tie sin kaŝantojn. Ankaŭ Teleki sendis siajn dek tri batalionojn de la sikulojn estratajn de Miĥaelo Henter, kiuj forte kriante ekatakis la tatarojn. La tataroj retiriĝis en la densan kanejon. La armeo de Doria postiris ilin. Pro la pafadoj la kanejo plurloke ekbrulis super la kapo de la batalantoj.

Post kelkaj minutoj Thököly klarionigis kaj forte kriegante ekatakis la malamikon per tridek du flirtantaj flagoj. La malamikaj armeoj staris antaŭ la atako kiel arbaro antaŭ la tempesto. Kiam la atakantoj estis proksime, la muskedojn havantuloj

komencis pafadi daŭre, pro kio el la tridek du flagoj tuj falis naŭ kaj centoj de batalantoj mortfalis de la ĉevaloj.

Sed la aliaj ne returnis sin kiel alian fojon, ja ilin estris bejo Feriz, lia glavo brilis antaŭe, do ili kuregis antaŭen kredante la triumfon. Iu kuglo trafis la bruston de Feriz, sed li ne rimarkis tion, ĉar li vidis nur sinjoron Teleki en nigra vestaĵo, li rekonis lin de malpropksimo kaj rekte al tiu li galopegis.

La kruelega atako atinginta la dragonojn malordigis iliajn vicojn. La lanco de la spahioj kaj la pioĉoj de la husaroj estis pli utilaj, ol la malpeza kiraso kaj la rekta glavo. Kiam Norcher ricevis vundon sur sian frunton de iu lanco kaj falis de sur la ĉevalo, la atakantoj atingis kaj rompis la mezon de la germana armeo.

La sikuloj nur rigardis la batalon de malantaŭe.

– Kiel vi opinias, amiketo – ili demandis unu la alian – se ni povas nur rigardi la batalon, ĉu ne estus plej bone rigardi ĝin de la kontraŭflanka montet-supro?

Post la konsento ili metis sur la ŝultron la lancojn kaj ne batalante foriris de la batalejo. La husararo vidante la foriron de la infanterio perdis la kuraĝon resti kaj same forkuris. Nur Heisler restis sur la batalejo kaj provis forte turni la sorton de la batalo. Tutvane.

Antaŭ la okuloj de la maldekstra alo de la armeo mortfalis Balaĉan, generalo Magni ricevis grandan tranĉvundon sur la kapo. Apenaŭ li estis rekonebla, ĉar lia vizaĝo estis sanga kaj lia brako estis trapikita per lanco. Magni eĉ nun maltrankviladis ne pro si, sed por Heisler. De la batalejo li perforte kunportis sinjoron Heisler kaj lian ĉevalon.

Atingante sur iun montopinton li vidis, ke la grupo de Doria pelante la tatarojn restis sola por batali kun la venkantoj, tamen ili ne kapitulacis.

Tion vidante Heisler liberigis sin de siaj akompanantoj kaj regalopis al la batalejo helpi al Doria. Sed iu altstatura viro ne lasis lin plugalopi.

– Kapitulacu! La forkuro estus via honto! Mi estas Emeriko Thököly.

Heisler ne respondis, sed elingigis la glavon kaj komencis skermi kontraŭ Thököly. La junulo ne lasis la aliajn helpi al li, ĉar li volis skermi kontraŭ la inda kontraŭulo. Efike de iu furioza bato duonrompiĝis la glavo de la germana estro kaj tiu devis kapitulaci.

Dume ankaŭ la armeojn de Doria oni venkis kaj ĉar Doria falis sub sian ĉevalon, oni kaptis lin. Thököly portigis lin en sian tendon. La aliaj germanoj forkuris.

Ankaŭ Miĥaelo Teleki forkuris galopante sur sia ŝatata ĉevalo Kolomano, sed inter liaj persekutantoj estis unu kiu konstante postiris lin. Teleki pensis, ke ie jam vidis tiun.

Tiu persekutanto estis la ĉefmilitestro, bejo Feriz. La bejo estis morte vundita, sed li ne forgesis pri la ĝismorta venĝo. Kvankam li sangis, tamen li sentis sufiĉe da forto por mortigi sian kontraŭulon.

Subite Teleki elektis alian vojon, por deflankiĝi de la ĝenerala vojo, al iu tritik-kampo, kie lia ĉevalo stumblis neatendite en kampa grenokruco. Li terenfalas, sed liaj piedoj restis en la piedingo.

Ĉi tie postatingis bejo Feriz la sinjoron konsiliston Teleki kaj sian glavon swingante li kriis:

– Ĉi tiun bategon mi donas al vi, ĉar vi mortigis sinjoron Denizon Bánfi.

Teleki defendis sin kontraŭ la bato per la glavo, sed kiam li aŭdis la nomon de Denizo Bánfi, la glavo falis el lia mano ĉar la bato atingis lian vizaĝon. Li metis la manojn antaŭ siajn okulojn kiam li aŭdis la sekvajn vortojn:

– Ĉi tiun bategon mi donas al vi, por la mortigo de sinjoro Paŭlo Béldi! Ĉi tion por la infanoj de Paŭlo Béldi! Ĉi tiun bategon por Transilvanio!

Tiu lasta batego estis la plej forta, la plej grava, la mortiga. Teleki mortfalis sur la teron.

Dum bejo Feriz rigardis supren al la ĉielo, lia vizaĝo montris gloriĝon. Li suspiris malfacile, poste enspiris la aeron kvazaŭ li volus enspiri la ĉielon. Laste li morte falis sur la kolon de sia ĉevalo.

Sekvatage oni retrovis apud la batalejo la kadavron de Teleki kaj portis ĝin antaŭ sinjoron Thököly. Li, la juna estro ekkriis:

– Hej, kalvulo, kalvulo! Se vi ne estintus en Transilvanio, multe da homoj ne mortintus!

Poste Thököly vestis la senvestitan kadavron en sian vestaĵon kaj sendis al Görnye al lia vidvino. Kontraŭ la ekkaptitaj Heisler kaj Doria li ricevis sian edzinon, Helenan. Ĉi tio estis por li, por kio li batalis, la plej granda bono.

Nun ili ambaŭ ripozas poreterne en Izmit en la valo de Nikodemio¹⁸¹.

— — —



Grafo Imre (Emeriko) Thököly. Transilvanio. Regnestro. Laŭ liaepoka gravuraĵo.

<https://dka.oszk.hu/html/kepoldal/index.phtml?id=6443>

¹⁸¹ Nikodemio estas malnova, antikvaepoka urbo en Turkujo priksime al Izmit:
<https://www.google.com/search?q=Nikod%C3%A9mia>